ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK
706.545-D
ESP



ÖNB
+Z137337307

304282

Sen titolo.

Originale verkita en Esperanto

de Ĵ. Ŝirjaev (Ĵ. Malpeliĉulo).

706545-D.Esp

ÖSTERR. NATIONALBIBLIOTHEK
WIEN

Sen titolo.

Antaŭparolo.

Ĉiujoje, kiam mi vizitas la urbon, mi ne preterlasas okazon viziti mo-
-on tiean konatan libriston maljunan, komercantan malnovajn librojn. Ĉu pro mal-
-riĉeco, ĉu pro avareco, tiom opte propra al maljunuloj, li ne posedas butikon kaj vend-
-as siajn komercaĵojn meze de urbbazaro, sub la ĉielo malkovrita. Malgraŭ tio, ke de
-via rigardo tiu ĉi loko šajnas ne taŭga por librokomerco, kiam komercaĵon ĉiam
ĉirkaŭas densa homamaso de antikvaĵistoj - amatoroj kaj scivoluloj. Ne multaj el ili
ordinare sukcesas poziri, nenion aĉetinte, la maljunulo scias tuj konjekti geston de ili
-jn kaj sen granda peno enteresas ĉiun je novaĵoj kaj opte iam porĉetindaĵon li vendas
kun granda profito.

Antaŭ unu monato mi estis en la urbo je aferoj de jus aranĝita nia vilaĝa kred-
-itasocio. Preskaŭ la tutan tagon mi pasigis en regnbanko kaj aliaj oficejoj kaj, lacigita,
mi deziregis ebla plej baldaŭ porveturi hejmen, jus la aferoj estos finitaj, prokrastante
ĉi plej necesajn aĉetaĵojn, kiujn komisiis al mi la edzino. Kiam mi, dezirante atenti ne-
-nion, estis jam proksime de la stacidomo, mi ekmemoris pri la maljunulo - libristo kaj
ia nekompreneble, nekontraŭstarebla forto igis min subite reveni kaj viziti lin. Mirante
je la neklarigebla sento, kiu ĉirkaŭkaptis min, mi rapidis al la libristo, kvazaŭ timante,
se ili antaŭvenos kaj foraĉetos dum mia foresto ion tre gravan por mi.

La libristo rimarkis min de malproksime antaŭ longe antaŭ mia alproksimiĝo
rudigis respektoplene la kapon. Je tiu ĉi fojo li havis nemultajn aĉetantojn: super liaj
amasoj de libroj malnovaj kliniĝis nur ia malriĉevestita vilaĝano, kiu deziris aĉeti
dikan Psalmolibron malnovan kaj unu sinjoro. La lasta kun granda atento foliis
malnovan volumon de ia germana ĵurnalo ilustrita kaj, malzontente balancante
la kapon, murmuris:

— Nur!... Ĉu vi nenion havas krom tio ĉi?.. Kiam-do, kiam vi havos la promesitan?..

— Pardonu, sinjoro!.. Je tio, mi atentos por vi la librojn deziratajn, sed vi iom atendu...— la
maljunulo respondis, forigante polvon de ia dika libroligaĵo.— Eble, mi povos konservi al vi
per tiu ĉi libreto?— li daŭrigis etendante al li unu el novaeldonitaj libroj.— Jen estas an-
-koraŭ unu...

La sinjoro ekpoliis la libron kaj konfuzo tuj montriĝis sur lia vizaĝo.

— En kia lingvo ĝi estas?..

— En itala... hispana...— apenaŭ audeble respondis la maljunulo, ne atendinte la
demandon.

Post unu minuto la sinjoro, paginte por la germana ĵurnalo, foriris.

—Kiom vi povas pagi, sinjoro, por tiuj ĉi libretoj ?.. Volu preni ilin por...

Sed la nekonatulo daŭrigis sian vojon ne atentante la vortojn de la libristo.

Kun scivoleco, ankoraŭ neniam sentita, mi malfermis la libreton malŝatitan kaj apenaŭ ne ekkriis pro surprizo kaj ĝojo; – ĝi estis bele bindita kaj bone konservi̇ĝinta jarkolekto de „Esperanto" – la unua esperanta ĵurnalo, kiun mi ankoraŭ neniam vidis. Per la manoj tremantaj mi ekkaptis alian libreton, – ĝi estis „Fantomoj", traduko de V. Cernet. Ne-poliante la libron, mi rec etendis senvorte la manon al la maljunulo kaj antaŭ mi, kvazaŭ per porto de ia sorĉajo, senĉese aperadis unu post la alia trezoroj de nia literaturo, nun jam nepre aĉeteblaj.

—Kie vi prenis la librojn ? – mi demandis la libriston, kiam mi trarigardis ĉiujn librojn.

—Dio donis ilin al mi !... – ruze ridetante, li respondis. – Volu aĉeti kune ĉiujn tiujn ĉi librojn... mi ne petos superfluan monon, pli malkare vi aĉetos ilin nenie ! – kaj li nomis ian monsumon negrandan.

Hi, kompreneble, ne marĉandis kaj la maljunulo, ne kutiminta komerci tiamaniere, estis tre kortuŝita. Li mem invitis por mi ĉiakriston, zorgeme metis la librojn en la ĉiakron kaj antaŭ mia porvetura mem, post ioma hezito, li metis donace al miaj piedoj ankoraŭ ian dikan paperligaĵon. Videble, la maljunulo estis ĝoja, vendinte la librojn kaj ricevis bonan profiton.

Zorgeme, kiel sanktaĵon, mi alportis hejmen la akiron okazan kaj kiun detenita spirado malpermis la pakaĵon. Antaŭ miaj okuloj tuj aperis senfina vico de diversaj malnovaj esperantaj gazetoj, leteroj kaj unu granda manuskripto, skribita per bela nerapidema vira skribmaniero. Ĝis mi expliis ĝin, elpalis letero, skribita per la sama mano. Mi jonon tralegis en ĝi :

„ Samideano ! Kiu ajn vi estas, tralegu tiun ĉi manuskripton. Mi legis ie riproĉon, ke ni esperantistoj ne havas nian personan literaturon esperantan, mi intencis forigi ĝin per tio ĉi, sed, ne estante literaturisto, mi ne havis kuraĝon publikigi ĝin. Ĉi tie mi kolektis miajn rememorojn kaj memorskribojn el longedaŭra mia esperanta vivo, aŭ pli ĝuste, ke el vi vidos, el unu mia jaro, kiu estis, eble, la plej felica jaro de mia vivo. Eble ili utilos al iu... Ne kritiku la verkon tro severe, se ĝia formo ne kontentigos vin, se, legante ĝin, vi diskreviĝos aŭ ne trovos tion, kion vi esperis trovi. Mi tie verkis nenion, sed ĉio skribita estas vero, travivaĵo. Eble, tio ĉi estas grava manko de la verko, sed, pardonu, mi celis ĝuste tion ĉi.

Ĉar la manuskripto trafos en viajn manojn nur post mia morto, vi estu tiom afabla, korektu kaj penu eldoni ĝin. Vi rajtas forstreki tutajn paĝojn de ĝi, se ili ne plaĉos al vi, kaj ĉi forbruligi ĝin tute, se ĝi meritas tion, sed mi petegas, antaŭe vi tralegu ĝin !..

Por viaj klopodoj pri korektado kaj prilaborado de mia verko, – se tio okazos, – mia spirito

ĉiam estos kun vi, forigante de vi danĝerojn kaj malfeliĉojn. Pastro Ĵ. Ŝ.....r."

Mi longe penis trovi la nomon de la aŭtoro, ankaŭ la daton de la letero, sed en tio ĉi mi ne sukcesis. Ĵi estis skribitaj tiom nelegeble, ke, nek grandiga vitro, nek multaj amikoj, al kiuj mi montris la leteron, helpis al mi. Traleginte la manuskripton, mi ankaŭ longan tempon uzis por informiĝi pri la urbo, pri Veselovo, ankaŭ pri la herooj, ĉiuj sercĉadoj miaj estis vanaj. Evidente la aŭtoro ŝanĝis pro ia kaŭzo iliajn verajn nomojn.

Neniom ŝanĝinte en la manuskripto, mi nur netskribis ĝin. La manuskripto havis titolon „Sen titolo" kaj mi decidis konservi ĝin.

I.

Ĵuna paca batalanto.

Estis varmega julia posttagmezo. La suno netolereble bruligis varmiĝintan teron kaj senmovan, sekan aeron. Apudvojaj arboj kun poliaro polvekovritaj kaj kun malgaje mallevitaj branĉoj, herbaro velkanta kaj flaviĝanta, birdoj, jam delonge ĉesintaj kanti, kaj sin kaŝintaj en ombro de densaj arbetaĵoj, - ĉio superis pro nekutima varmego, pro longedaŭra sekeco, ĉio malpacience soifis pluvon.

Laŭ vojo, glate piedbatita kaj malmola, kiel ŝtono, malkrute malsupreniĝinta de la vilaĝo al rivero kaj ĉirkaŭita je ambaŭ flankoj jen de malĝojnaj abioj malproksimen etendis super la vojo siajn branĉojn, kiel manojn, jen de belaj betuloj kun molaj silkaj folioj kaj blanka ŝelo, rimarkeblaj de malproksime, malrapide iris ĵoĝo-knabo maldika, altkreska de dekdekjaroj proksimume. Lia blanka jako estis malbutonumita kaj sub ĝi estis vidata kolora ĉemizo, zonita per silka zono kun grandaj kvastoj, sur la kapo, kun glate tonditaj haroj, estis metita ĉapelo kun granda sunŝirmilo, kiu duone kaŝis lian ĉarman vizaĝon maldikan kun molaj, belaj trajtoj kaj kaŝtankoloraj okuloj zorgatakitaj. Li malrapide iris malsupren de la monto kaj ĉe ĉiu paŝo streĉis sian vidsentonantaŭen, kvazaŭ esperante iun renkonti kaj nur malofte turnis flanken sian rigardon jen malpacience - emociitan kaj plenan de atendo, jen indiferente - senesperan.

Li malsupreniĝis de la monto kaj suriris ponton, metitan trans la rivero spegule-klara. Longe li staris meze de la ponto, jen rigardante la vojon, serpentintan tra la bordo kontraŭa, jen atente aŭskultante ĉe plej malgrandan brueton. Sed la vojo, kiom povis vidi liaj okuloj miopaj, estis dezerta, senhoma kaj en la aero staris silento tombeja, rompata nur de plustrado de arĝo sub la ponto kaj de eksplaŭdoj de grandaj fiŝoj, kiuj estis aŭdataj de tempo al tempo.

Ekspirinte profunde - plenbruste, li forlasis la ponton kaj ankoraŭ pli malrapide ekiris reen, ĉe ĉiu paŝo haltante, returnante la kapon kaj atentante, kiel antaŭe, ĉiun ĉe apenaŭ audeblan sonon.

Kiam li atingis vojkurbiĝon, de kie nenio estis vidata antaŭe pro densaj, kiel muro, arbetaĵoj, li klare ekaŭdis paŝosonojn rapidajn kaj facilajn. Li ekstremis, kiel subite timigita besteto, kaj volis sin kaŝi inter la arbetaĵoj, sed jam estis malfrue kaj vane. Renkontenĝis Annjo, samaĝa knabino beleta - la filino de la vilaĝanestro. Ŝi estis vigla kaj gaja. Ŝiaj blondaj haroj de la kapo malkovrita, zorgeme kunigitaj kaj bele aranĝitaj sur la verto, kaj bukletoj, petolemetremetintaj super la sunbrunigitaj pupvangetoj kaj grandaj rondaj okuloj plene harmoniis kun ŝia blanka vestaĵo muslina kun mallongaj manikoj puntaj kaj modesta eltranĉaĵo sur la bruston.

× malfacilajn?

La renkontiĝo, videble, estis neatendita ankaŭ por ŝi. Ŝi ruĝiĝis, malrapidigante sian paŝadon kaj ekridetis.

— Kiel vi timigis min, Joĉjo, - ŝi diris, eltirante al li sian molan kaj elastan manon. - Ĉu vi promenas?.. Venu hodiaŭ vespere promeni al la rivero post la vilaĝo, tie promenos ĉiuj niaj fraŭlinoj.

Joĉjo nenion respondis, ankaŭ ruĝiĝinte pro io, kaj longe ne ellasis el sia mano maldikan kaj malmolan la manon de la knabino. Li fikse rigardis la knabinon konfuziĝintan kaj ridetis per sia ĉarma, serena rideto.

— Adiaŭ! - diris la knabino. - Venu, alportu iun floreton bonodoran el via ĝardeno... Venu!.. - ŝi ripetis, liberigis sian manon kaj ekiris malsupren per sia antaŭa gracia kaj facila irmaniero.

Joĉjo nenion respondis. Li staris, kiel enposita kaj rigardis la rapide malaperantan knabinon. Li fikse rigardis ŝian hararanĝon kaj atendis, ĉu ŝi returnos la kapon al li.

„Se ŝi returniĝos al mi", - pensis la knabo, „tiam mi, tiam mi hodiaŭ"...

Sed li ankoraŭ ne havis tempon por klare prezenti al si sian penson kaj diri al si mem „kio" hodiaŭ „devos okazi", se la knabino returniĝos, kiam la knabino, atinginte alian vojkurbiĝon, haltis por unu momento, ordigis la bukletojn kaj returnis al li sian vizaĝon.

„Sekve mi ricevos hodiaŭ tion, kion mi atendas", - ekpensis la knabo, evidente, ke la knabino returniĝis al li, kaj opiniante tion bona antaŭsigno.

Lia vizaĝo pariĝis pli gaja kaj malpli zorgataksita, ol antaŭe. Post unu momento li ree ekiris malrapide pluen, kiel antaŭe, haltante preskaŭ ĉe ĉiu paŝo, returnante la kapon kaj fikse serĉante ion per la okuloj.

„Kiaj bonaj estas niaj fraŭlinoj vilaĝaj", li pensis, ĉiam suprenirante. „Jen tute ne similas al fraŭlinoj urbaj... al tiuj fieruloj... Mi ne ŝatas ilin! Kial okazas tio ĉi, ke en ĉesto de la lastaj mi ĉiam konfuziĝas, ne povas eldiri eĉ unu vorton, kaj en ĉeesto de tiaj beluloj, kiel Anrjo, mi estas vere bravulo"... li pensis, piereme rektiganta sian bruston enpalintan kaj bravule metante la ĉapelon sur la nukon.

Sed liaj pensoj tuj estis interrompitaj. Dekstre, tre proksime de li, subite ekaŭdiĝis ies malpacila spirado kaj koleremaj murmurado.

— Senlaboruloj!.. Stultuloj!.. - baldaŭ Joĉjo ekaŭdis malagrablan, maljunulan voĉon murmuremanan kaj, dismetante per la manoj la arbetajojn kaj rompante per la piedoj kvarantajn sekajn branĉetojn, sur la vojon eliris kun granda korbo da fungoj lia onklo - altkreska, maldika maljunulo kun glate razita vizaĝo kaj longaj grizaj brovoj.

Joĉjo volis sin kaŝi, sed, ion konsiderinte, li subite turniĝis kaj, same malrapide, ree ekiris al la rivero, malkvile rigardante antaŭen per malpacience - zorgataksitaj okuloj.

Hodiaŭ estis dimanĉo. Kaj ĉiudimanĉe (unu fojon ĉiusemajne) oni sendadis knabon (loĝiĝis) dektrijaran Demjan'on en la poŝtejon ĉe plej proksima stacio fervoja, kiu troviĝis de la vila-

ĝo je dek verstoj (distance). Demjan foriradis al la poŝtejo prumatene, preskaŭ samtempe kun tagiĝo kaj antaŭ vespero revenadis hejmen kun leda sako plena de leteroj kaj gazetoj.

Antaŭe joĝjo tute ne interesiĝis je la ĉiusemajnaj vojaĝoj de Demjan al la poŝtejo kaj reen, sed antaŭ du jaroj okazis al li io, kio tute aliigis lian vividecaron kaj de tiam ĉiumomente li atendis kun malpacienco kaj maltrankvileco.

Antaŭ du jaroj joĝja tralegis en semajna ĵurnalo „Nedjelja" (Semajno), kiun abonis lia patro, artikolon, kiu tre influis lin. La artikolo havis titolon „La svedoj en Rusujo" kaj detale priparolis jenan okazon neordinaran: du svedoj, studentoj de Upsala universitato, iaj esperantistoj (!) (joĝjo ĝis tiam neniam aŭdis tian strangan vorton) vizitis Odeson kaj pasigis tie kelkajn tagojn kun ticaj esperantistoj, parolante pri kio ajn nur en sia lingvo internacia Esperanto, ĉar la svedoj tute ne komprenis la rusan lingvon, kaj la rusoj ne la svedan. En la sama ĵurnalo joĝjo tralegis anoncon, ke „plena lernolibro de Esperanto" estas ricevebla de ĝia aŭtoro (Varsovio) kontraŭ unu poŝtmarko je 7 kopekoj. La artikolo kaj la anonco tiel ekinteresis la knabon, ke li sin turnis al la patrino, petante klarigojn. La patrino mem aŭdis je unua fojo pri tiu ĉi lingvo kaj konsilis demandi pri la objekto, kiu tiom interesis joĝjon, la plej aĝan fraton, kiu estis instruisto de loka lernejo kaj estis opiniata de la familianoj instruitulo. La frato plej aĝa, kun profundpenseco kaj mokemo, tiom proprae al ĉiuj veraj instruituloj, klarigis, ke Esperanto estas unu el tiuj normalaj, artefaritaj lingvoj, kiuj naskiĝas kiel fungoj post pluvo, kaj ... mortas atentataj de neniu, ke artefarita lingvo estas sensencaĵo, je kiu povas interesiĝi nur stultuloj. „Se vi deziras lerni preskaŭ ian lingvon, vi lernu la lingvon germanan", - li aldonis, - „kaj Esperanton kaj ĝiajn similulojn sennombraj ni lasu al stultuloj"...

Tiom malrespekta parolo de la „instruitulo" tamen ne havis efikon deziratan, kontraŭe, ĝi nur pligrandigis scivolecon de la knabo, kiu ĉiutage aŭdis, ke la frato, la onklo kaj la gepatroj nomis lin ĝuste „stultulo" kaj tiu ĉi cirkonstanco havis decidigan signifon. La knabo, laŭ la adreso montrita, sendis en letero necesan poŝtmarkon kaj baldaŭ ricevis respondan malgrandan libreton, kiu enteni sian taŭgan parolon, gramatikon, legmaterialon kaj vortareton esperanto-rusan de la lingvo.

La komenco estis farita.

Kun granda atento kaj ne malpli granda estimo la knabo tralegis la libreton. La lingvo montriĝis tiom simpla kaj la vortareto, pro ebleco per helpo de la sufiksoj kaj prefiksoj krei sennombran kvanton de novaj vortoj el la vortoj, montritaj en la vortareto kaj pli ofte prenitaj de la aŭtoro el la latina lingvo, kiun joĝjo estis ellernanta, - tiom eta, kompare kun vortaregoj de latina kaj greka lingvoj, ke iel nevole la knabo ekscentis en sia animo, ke li uzos ĉiujn fortojn por ekposedi la lingvon kaj jam neniam forlasi ĝin, kiujn ajn mokojn oni jetus al li, kiel ajn oni opinius pro lin pro tio „stultulo". Sed por tio estis nesufiĉa la lernolibro.

Sur malantaŭa paĝo de la kovrilo de la lernolibro li trovis neteneblite duanoncetojn,

kiuj altiris lian atenton kaj tiel eksinteresis lin, ke li ne povis trankviliĝi antaŭ ol li skribis al la aŭtoro de la lingvo leteron kun peto sendi al li: „Plenan kurson de la lingvo Esperanto", kiu konsistis el du vortaroj kaj kvar legolibroj kaj ĉiumonatan gazeton, eldonatan en tiu ĉi lingvo, - kiuj estis anoncitaj sur la kovrilo de la lernolibro.

Atendante la librojn, pri kiuj jaĝjo pensis senĉese, kion ajn li faris, kaj eĉ songis, li sin okupis je serioza kaj detala studado de la gramatiko kaj la vortareto.

Jaĝjo havis karakteron kaŝeman kaj li ĝenerale nevolente lasis scii iun pri siajn sekretojn; ecne la patrinon kaj du gefratojn pli junajn, al kiuj pli ol al iu li sentis aldonitecon. Kun, kvazaŭ timante ion, kvazaŭ ne deziranta, ke oni submetu al mokoj lian lingvon (en sia animo jaĝjo nomis la lingvon ne Esperanto, sed mia lingvo, ĉar ŝajnis al li, ke krom li neniu estas kapabla inde taksi ĝin kaj ŝati), li nenion diris eĉ al la patrino. Ricevinte la librojn, li pariĝis tiel ĝoja kaj pelica, ke ĉiuj familianoj tuj rimarkis en li tiun ĉi ŝanĝon, kiankam ili ne vidis ĝian kaŭzon. La libroj, malgraŭ ilia neatendita maldikeco, kiu tiom surprizis jaĝjon kompare kun la dikaj lernolibroj, estis tiom interesaj, ke li longe ne sciis, kiun el ili li devus preferi. Inter ili estis „Dua libro", „Aldono al la dua libro", „Neĝa Blovado" kaj unua rajero de „Hamleto". La lasta estis, evidente, ĵus eldonita kaj konservis preŝan odoron de presfarbo, kiu tre multe plaĉis al la knabo.

Kiankam jaĝjo, longe atendante la librojn, bone ellernis ĉiujn mallongajn regulojn de la gramatiko kaj ĉiujn vortojn, kiujn enteris la malgranda vortareto de la lernolibro, tamen tiuj ĉi sciaj tuj montriĝis nesufiĉaj, - li eĉ unue lirion de „Neĝa Blovado" ne povis komprezeni sempere sen helpo de la granda vortaro, ĵus ricevita. Sed tiu ĉi cirkonstanco ne mortigis energion de la knabo, kontraŭe, energio kaj forta deziro venki ĉiujn malhelpojn kaj eksedi la lingvon pligrandigis laŭmezure de malfacilaĵoj aperantaj.

Farinte specialan kajeron, li komencis enskribadi en ĝin komence vortojn nekonatajn poste ruslingvan traduk on de la taskonto. La laboro pro sia noveco kaj interesoplenjam ne eksedis la knabon. Sed jaĝjo ne kontentiĝis nur je legado de la literaturaĵoj ricevitaj, tiaĉi estis nesufiĉa por li. Li revis pri korespondado kun samideanoj. Laŭ lia peto, la aŭtoro de la lingvo sendis al li kelkajn adresojn de rusaj kaj eksterlandaj esperantistoj kaj de tiam la knabo komencis sendadi unu post la alia leterojn eksterlanden. Lia entuziasmo estis nepriskribebla, kiam li komencis ekricevadi respondojn. Ĝuste antaŭ unu semajno post la knabo leterportisto alportis al jaĝjo poŝtkarton el Portugalujo, per kiu lia nova korespondanto el Porto sciigis, ke samtempe estas sendata al li rekomendite granda letero, enhavanta krom priskribo de la urbo ankaŭ kelkajn fotografaĵojn kaj luksan albumon kun vidaĵoj de la urbo kaj iujn aliajn interesindaĵojn. Efektive, samtempe kune kun la poŝtkarto, jaĝjo ricevis avizon de la poŝtejo pri ricevo je lia nomo de eksterlanda rekomendita letero. Tio ĉi estis tre granda surprizo por la knabo, sed la leteron li povis ricevi de la poŝtejo ne pli frue, ol post unu semajno (t.e. hodiaŭ) kaj tiu ĉi cirkonstanco estis turmentiga kaj doloriga. Tamen jaĝjo penis, kiel eble, plej malmulte pensi pri la letero ricevota, - ju pli proksima estis la dimanĉo (la tago, en kiu li povis ricevi

ĝoj), des pli la tagoj, ŝajnis daŭris kiel jaroj, kaj des pli lia pacienco kaj konsumiĝadis kaj ĝoje, kiu antaŭ nelonge ŝajnis al li senfine daŭronta, iom post iom anstataŭiĝis de malĝojeco kaj sopiro. Li fariĝis distrita kaj malvigla. Ĉe dum noktoj li nur povis trovi trankvilon: nur pelebla penso pri la letero ricevota forpeladis dormon kaj kiam, fine, ĝi ĉirkaŭkaptadis per siaj cent brakoj lian Delikatan kaj maldikan korpon, sonĝoj inkubaj daŭrigis turmenti lin.

Li sonĝis pri fraŭlaro, dikaj poŝtpakaĵoj, kiu enhavis la leteron kaj fotografaĵojn, pri la onklo, kiun neniu, krom la patrino, ŝatis, kiu forprenis de li la leteron ricevitan kaj metis ĝin en ensiĝa ĉambro mistera kaj ĉiam ŝlosata, pri la prato, kiun oni opiniis instruitulo, kiu subite aperis, anstataŭante la onklon, kaj dum foresto de ĵoĝo dissŝiris la leteron jus ricevitan kaj amporaŭ ne trarigarditan de pri kiel ĉaj ĉoĝoj nekonatajn, kiuj komence flustris tedeme en liajn orelojn, poste, ĉiam plilaŭtiĝante kaj jam kriegante laŭtege, ripetadis la vortojn ofendajn, ne merititajn kaj maldelikatajn: „Stultulo! Stultulo!..“ Tiel la afero daŭris ĝis hodiaŭ.

Hodiaŭ ĵoĝo rekuŝis frumatene kun ĝoja kaj klara antaŭsento de io bona, kvankam li longe, sidante sur la lito kaj frotante la okulojn dormemajn, ne povis konsideri, ke estis dimanĉo, ke vespere li povis ricevi la poŝtaĵon. Rapidege vestiĝinte, li malfermis pordon en malgrandan balkonon, kiu tute estis ŝirmita de ĉiuj flankoj de hela, en kelkaj lokoj jam flaviganta pro longedaŭra sekeco, kreskaĵaro. La vetero, kvazaŭ intence, estis konforma al lia ĝoja humoro. La suno serene ludis de la ĉielo ŝemuba sur foliaro de arboj, sur herbaro kaj ĝardenkloroj, ornamitaj per malgrandetaj gutoj de roso, kiel per perloj. Birdoj, vigle pepante, saltis ĉiaŭ branĉoj, klopodeme kaj sentace plenumante sian taskon nerimarkeblan kaj nekompreneblan por homoj, indiferentaj al ĉiuj belaĵoj de la naturo, sed sagĉe destinitan al ili de la Kreinto. De la arbobranĉoj, de la ĝardenfloroj venturnis malvarmeto agrabla kaj freŝiganta per sia spirado kaj ebriiganta per sia, ankoraŭ ne dispersita de homo, virga bonodoro matena.

Sentante nekompreneblan malpezecon kaj ĉiam ridetante per siaj bonaj kaŝtankoloraj okuloj, ĵoĝo malsupreniĝis sen bruo en la ĝardenon kaj plenbruste enspiris la malvarmete-malsekan aeron bonodoran. Trairinte longan tetulalean ombroriĉan, li preteriris vicon de pomarboj, kies branĉoj jam kliniĝis malsupren pro abundeco de fruktoj, ankoraŭ malmaturaj, kaj haltis antaŭ la florbedoj.

Li sidiĝis sur ĝardenbenĉon kaj komencis admiri la florojn, kiuj, kiel luksa tapiŝo diverskolora, kuŝis apud liaj piedoj, frapante la rigardon per freŝeco de koloroj kaj groteska kombinaĵo de nuancoj. Altkreskaj, pieremaj peonioj kaj malvoj trudeme kaj fanfarone prezentis siajn grandajn kaj pompajn florojn, kiuj rigardis el sukplena, abunda foliaro. Ne malpli allogaj, tamen pli modestaj, diverskoloraj astroj, kiel petolulinoj rabinoj, jen sin kaŝis post najbaraj floroj, jen, ruze ridetante, balancetis per siaj kapetoj. Graciaj, delikataj levkojoj, blankaj, kiel neĝo, kaj hontemaj, kiel fianĉino en sia luksa edziĝofesta vestaĵo, eligis per siaj blankeco kaj pitoreskaj volvaĵoj de siaj folietoj, tiom similaj al buklo de la belulino—

londulino. Diantoj...

Sed ĵus rigardo de ĵoĉjo falis sur la diantojn, lia koro ĝoje ekbatis kaj ĝiaj okuloj lumiĝis kaj bona rideto. Tuj ĉi diantoj rememorigis al li unu antaŭnelongan, tamen tute forgesitan okazintaĵon.

Vespere dum la dimanĉo pasinta, intencante iri en la vilaĝan administrejon por ricevi ties korespondaĵon, ĵus alportitan de Demjan de la poŝtejo, li preteriris la florbedojn kaj seminte ce forŝiris unu dianton kaj, iante, li longatempe flaris ĝian aromon kaj kisis ĝiajn folietojn delikatajn kaj, fine, metis ĝin precize en butontruon de sia jako.

En la administrejo estis neniu, krom la vilaĝanestro - la patro de Annjo - kaj skribisto.

La vilaĝanestro estis en bona, festa humoro. Li afable salutis ĵoĉjon kaj, amike premante lian manon, ridetante kaj gaje fermetante siajn iom ruzajn okulojn, diris:

— Vi, ĵoĉjo, malfruiĝis hodiaŭ. Viajn literojn antaŭlonge Demjan mem forportis en vian domon. Sidiĝu, mi delonge nevidis vin.

Ĵoĉjo ripuziĝis kaj, salutinte la estron, intencis jam foriri, kiam la vilaĝanestro haltigis lin je la mano:

— Sidiĝu!.. Kien vi rapidas? Ĉual promeno kun la knabinoj? Nu, vi ne malfruiĝos...

Ĵoĉjo neintencis iri promeni, sed la vortoj de la vilaĝanestro kaj lia rideto konfuzis lin. Li staris ruĝiĝinte kaj mallevinte la okulojn, nenion parolante.

— Kiam floreton vi kunportas hodiaŭ!.. Nu, praŭlinoj, estu singardemaj! Al kiu el ili, diru al mi, vi prezentos la floreton? Kiu estas via elektitino? — li daŭrigis ŝerci, ĝuante konfuziĝon de la junulo.

Ĵoĉjo tute ne intencis tiam promeni kun la knabinoj, kion ne aprobis liaj gepatroj kaj kion li faris nur malofte, nesciate de ili, sed la vortoj de la vilaĝanestro kaj lia aludo neatendita ekzistion, ke Ĵoĉjo subite eksentis portan, nekonkreblan deziron intervidiĝi kun la knabinoj kaj partopreni iliajn ludojn kaj kantadon. Ne reveninte hejmen, li eniris sur la riverbordon, kie, sub malĝojaj larĝbranĉaj ulmoj, ordinare dum festaj vesperoj promenis la knabinoj.

La knabinoj, kiuj solaj en siaj festaj ornamoj sidis sur benkoj kaj gaje kantis ion, ofte interrompante la kantadon per ŝercoj kaj laŭta ridado, de malproksime rimarkis Ĵoĉjon kaj cirkaŭis lin, ĝis li eniris sub ombron de la arboj.

Ĵoĉjo cirkaŭrigardis la knabinojn kaj trovinte inter ili la filinon de la vilaĝanestro - Annjon, kiu diferencis de siaj kunulinoj per modesteco kaj kiun li ŝatis pli ol iam alian knabinon, li eltiris al ŝi la diantoj.

La beluleino ruĝiĝis, tamen, kun ĝoja rideto, ŝi tuj prenis la floron kaj koketeme alpinglis ĝin sur la brusto de sia blanka vestaĵo muslina kun mallongaj manikoj puntaj antaŭ okuloj de siaj amikinoj, kiuj envie rigardis ŝin.

— Ĵoĉjo, donu al mi unu floreton!..

— Ĵoĉjo, Ĵoĉjo!.. donu floreton!... - ekaŭdiĝis voĉoj de la knabinoj.

Joĉjo dismetis la manojn, montrante per tio, ke plu li ne havas florojn, salutis la knabinojn kaj foriris.

— Kien vi, Joĉjo?.. - ekkriis Annjo. — Promenu kun ni...

Li returniĝis, silente salutis la belulinon kaj per paŝoj rapidaj foriris.

Nun, rememorante tion ĉi, Joĉjo klare prezentis al si la ĝojon de la knabino. Sed liaj ĵusaj rememoroj kaj pensoj estis subite interrompitaj de laŭta sonorado preĝeja, kiu voksis ankaŭ al matena festa diservo. Li formetis de la kapo sian ĉapelon, faris respektoplenan krucosignon kaj eniris laŭ direkto al la preĝejo.

La dimanĉa liturgio finiĝis en la 12-a horo. Rapideme fininte matenmanĝon, Joĉjo ekvidis sian domon kaj kun malpacience - batanta koro kaj zorgatakitaj okuloj eniris la vojon, sur kiu li esperis renkonti Demjan'on, revenantan de la poŝtejo kaj kiefli, kiel jam ni vidis, dume renkontis nur la praŭlinon kaj la onklon.

Atente, kiel antaŭe, aŭskultante eĉ plej malfortan brueton sur la vojo, Joĉjo atingis tiun lokon, kie li antaŭ nelonge renkontis la praŭlinon. Li haltis tie, rememorante nekredeblecon de la renkontiĝo kun plej malgrandaj detaloj de ĝi, li rigardis tiun vojeturbiĝon ĝis kiu li akompanis per sia rigardo la belulinon kaj post kiu ŝi, donacinte al li lastan rigardon afablan, malaperis, kiam liaj revoj estis interrompitaj de ies voĉo konata. Joĉjo extremis nevole kaj ekrigardis laŭ tiu direkto, de kie aŭdiĝis la voĉo. En kelkaj paŝoj de li sub ombro de alnaro kuŝis Demjan.

— Kial vi kuŝas tie? — sin turnis la junulo al li.

— Kiu? Ĉu mi?.. - malrapideme kaj demande respondis Demjan, levante sian kapon de leda sako, plenigita de gazetoj kaj leteroj. — Mi laciĝis. Tre varmege estas hodiaŭ... Mi delonge jam kuŝas, mi neniufoje jam vidis vin preterpasanta ĉi tie... - babilis la knabo.

Sed Joĉjo jam ne aŭskultis lin. Per unu salto li atingis la knabon kuŝantan kaj, eltirante la manojn, tremantajn pro emocio, al la sako, li demandis:

— Ĉu vi ricevis?.. Ĉu vi portas de la poŝtejo por mi rekomenditan leteron... eksterlandan?..

— Ĉion mi ricevis! — nerapidante, kun grava mieno respondis la knabo, malfermante la sakon. — Kun vi legu, ne enuu, - li aldonis, ridetante.

Apremante la leteron al la brusto, kiel trezoron, Joĉjo, kiel saĝo, ekkuris hejmen en sian ĉambron.

II.

La onklo.

— Joĉjo, Joĉjo!.. Joĉjo, kie vi estas?.. - aŭdiĝis jam delonge tra la pordo malfermita de la balkono voĉo de Zinjo, la plijuna pratino de Joĉjo. — Joĉjo, la panjo vin vokas!..

Joĉjo klare aŭdis la vokon, li klare konsciis, ke li devis tuj resoni, sed li tuta per sia ekzistaĵo

Tiom estis okupita je traŭgardado de la ĵus ricevita longe-atendita letero, li estis tiom forlogita de ĝi, ke li nek havis forton por forturi sin de ĝi, nek povis resoni. Je cento, ŝajne, jam fojo relegante la leteron kaj traŭgardante belajn donacojn aldonitajn, li eĉ ne rimarkis, kiel antaŭ li subite, tute neatendite kaj neaŭdeble, aperis la patrino. Ŝi estis altkreska maldika virino kun iom malsanema vizaĝo sulkigita kaj delikata mieno, kiu havis mirindan similecon kun ascelto de la junulo.

—Kion vi faras, mia infano? — ŝi diris, klinigante super lia kapo kaj kisante ĝin.

—Ha, panjo!.. Vi ne kredos, kia feliĉa mi estas hodiaŭ, — komencis ĝojege, alpremiĝante al la brusto de la patrino kaj supersŭtante per varmaj kisoj ŝian malvarman, maldikan manon. Liaj okuloj lumiĝis per neesprimebla ĝojo kaj deziro esti sincera. — Ni ĵus ricevis tiun ĉi leteron el Portugalujo! Rigardu, mia kara, kiajn belajn donacojn sendis al mi iuno portugala samideano... jen estas lia portreto...

—Kiu konsilis al vi korespondi kun li? Ĉu vi interparolis pri la korespondado kun la frato? Ĉu, kredeble, memoras, mi konsilis al vi, ke vi ĉiam sekvu liajn konsilojn.

—Ni demandis lin ne unufoje...

—Nu, kion li diris al vi?

—Ho, panjo, li ne konas la lingvon, li havas nenian ideon pri ĝi... Li ne volas...

—Tamen, kion li diris?

—Li diris, kara panjo... Li ĉiam diras la saman... Li diras, ke tiun ĉi lingvon lernas nur... stultuloj!..

—Kaj ĉu vi estas stultulo? — la patrino ekridis.

—Jes, panjo! — simplanime respondis la junulo kun malgaja mieno kaj ĉarma rideto sur la lipoj. — Vi kaj la patro, sed, ĉefe, la onklo ofte nomas min ĝuste stultulo...

—Ha, kia ridinda vi estas! — ŝi respondis, ekspirante profunde kaj karesante lin per la mano je la glate tondita kapo. — Tamen ni iru al la onklo...

—Panjo! — kaj la junulo turnis al la patrino petegantan rigardon de siaj bonaj kaŝtankolora okuloj.

—Via laboro nenien forkuros de vi, mia kara. Vi ĉiam havos sufiĉan tempon por ĝi, sed ni devas ja transviviĝi nian bonan onklon. Hodiaŭ li estas tre maltransviviĝas, kredeble ree ĵus muŝo enfluĝis lian ĉambron.

La onklo estis frato de la patrino de Joĉjo; kaj sola ŝi ŝatis lin, sola ŝi havis ĉiam liberan eniron en ĉiam ŝlosatan lian ĉambron, ŝi sola indiĝis je liaj konversacioj kaj, fine, ŝi sola komprenis lin neniam alie, krom mia bona frato, nia bona onklo, — kvankam neniu el la familiano jam vidis ian bonecon de tiu ĉi ĉiam malkontenta, ĉiam murmurema kaj nepardonema maljunulo-stranĝulo.

—Tuj, panjo! — obeeme respondis Joĉjo, nevolante kaŝante la leteron. — Nur vi promesu al mi, ke neniu, neniu, krom vi, scios pri mia interesa korespondado. Mi ne volas, ke oni moku

je mi xaj je mia lingvo. Nu, mi estas ja stultulo, xaj mi lernos la lingvon de stultuloj! Kion oni ĉeronas anxoraŭ...

La patrino xaj la filo je la mano eliris el la ĉambro, ili malsupreniĝis laŭ xruita ŝtuparo xaj, malrapideme, senĉese haltante xaj admirante florojn en la ĝardeno, eliris al la onklo.

La domo, en kiu estis la ĉambro de Joĉjo, estis proprajo de lia patro. Ĝi estis neyranda komerdomo. Malsupre estis du grandaj ĉambroj, en unu el kiuj dum someroj laboris xaj dormis la patro, la alia estis destinita por parencoj xaj gastoj, kiuj ĉiujoje somere vizitadis la familion. En la supra etaĝo estis nur unu malgranda ĉambro de Joĉjo xun eta balkono. La onklo, kiun Joĉjo renkontis hodiaŭ sur la vojo xaj al kiu nun konduksis lin la patrino, loĝis en alia domo, staranta sur kontraŭa rando de la ĝardeno. Tiu domo estis konstruita antaŭ longe, anxoraŭ kiam Joĉjo estis tre malgranda etulo, aŭ, eble, xiam li anxoraŭ ne ekzistis en tiu ĉi bela mondo, - de la onklo, laŭ lia plano, sub lia senpera observado xaj je lia mono. Tial la familianoj, por diferenci la domojn, nomis ordinare la unuan „nia domo" xaj la duan „onkla domo".

La „onkla domo" estis tre granda. Krom kuirejo, manĝoĉambro, gastoĉambro, dormoĉambro, infanĉambro xaj kabineto de la patro de Joĉjo, ĝi havis anxoraŭ unu grandan ĉambron de la onklo mem, kiu havis apartan enirpordon el la vestiblo xaj ne komunikiĝis xun la ceteraj ĉambroj. Ordinare ĝi estis ĉiam ŝlosata de la onklo, pro kio penetri tien povis nur tiu, kiun konvolis enlasi en ĝin la mastro.

La onklo estis pli maljuna, ol la patrino - la patrino de Joĉjo - preskaŭ je dudek jaroj xaj tial li konservis ĝis la fino de sia vivo, rilate al ŝi, protektan, estrecan tonon, kiun havas plenaĝa homo al malgranda infano.

Li estis altkreska, kvazaŭĝiba, tute griza maljunulo kun ĉiam glate tondita la xapo, razita vizaĝo, laŭlonge xaj laŭlarĝe xovrita per sulkoj profundaj, kun maldikaj xaj malsuprenpendantaj, kiel sakoj, vangoj, ayla nazo xaj densaj, longaj grizaj brovoj, el-sub kiuj malaperade rigardis okuloj severaj.

Li estis fraŭlo. De junaj jaroj li loĝis en ia urbo de Polujo, kie nun li havis ian gravan oficon. (Kia estis tiu ĉi urbo, kia estis lia ofico, tion scias, ŝajne, neniu en la familio, krom la patrino). Sed de tiu jaro, kiam li konstruis sian domon en la vilaĝo, li ĉiujare printempe apercadis en la vilaĝo (por „ripozi" tie, kiel li parolis) kune kun unuaj kantbirdoj, revenantaj de sudo, xaj restis tie ĝis veno de unuaj frostoj aŭtunaj.

Tage li malofte eliradis el la domo, sed frumatene xaj malfrue vespere lia kvazaŭĝiba figuro ofte estis videbla en la florĝardeno, arbaro aŭ sur bordo de la rivero. Li estis pasia adoranto de floroj, fungamanto xaj senlaca fiŝkaptisto, kiu, dum lumaj someraj noktoj, iafoje ĝis tagiĝo mem pasigadis noktojn super la rivero kun fiŝkoxo en la manoj.

Li tre ŝatis purecon xaj neniam polveton oni povus trovi en lia ĉambro. Sed, kvankam li

opte parolis al la fratino, xe li ripozas anime en la vilaĝo, estis du objektoj, du aĵoj, kiujn li ne toleris, malamis, kiuj, laŭ liaj vortoj, venenigis lian vivon en la vilaĝo. Tiuj ĉi aĵoj estis muŝoj kaj infanoj. Se li toleris la lastajn, kiel neeviteblan malbonon, la unuajn li malamis kun ia nekredebla, malsaneca pasio. Se en lian ĉambron penetris de ie unu muŝo (por eviti tion ĉi, li neniam malfermis fenestrojn), li perdis trankvilecon, dormon, apetiton, kiuj revenis al li nur tiam, kiam tiu ĉi insekto pereis antaŭ liaj okuloj. Li neniam manĝis en la manĝoĉambro, kie muŝoj estis ĉiam, kvankam en negranda kvanto, sed ĉiam sola en sia ĉambro, kien oni alportadis por li manĝaĵojn. Unufoje tagmanĝis en la manĝoĉambro kun la familianoj ia grava kaj estimata de la onkla persono. Pro tio li ankaŭ je tiu ĉi fojo ĉeestis komunan tagmanĝon aŭskultante la gastan interesan. Sed meze de la tagmanĝo kaj interesplena interparolo kun la alveturinto, en lian glason enfalis de ie unu muŝo. La onklo tuj paliĝis, ekstremis kaj, ne povante sin deteni, kiel frenezulo, elsaltis el la ĉambro kaj jam plu ne revenis tien ĉe por adiaŭi kun la gasto.

—Kiu?..—ekkriaĉis laŭta, malkontenta voĉo maljunula, respondeje mallaŭta frapo de la patrino de Joĉjo je la pordo de la onkla ĉambro.

—Fraĉjo, malŝlosu...

—Eniru...—respondis la sama voĉo malkontenta kaj tuj ekkriaĉis laŭta murmurado nekomprenebla, tusado kaj malfacilaj paŝoj nerapidemaj. Post tio ekklakis ŝlosilo en serurtruo kaj la pordo malfermiĝis tiom malmulte, ke povu trairi ĝin nur unu homo.—Mi petas pli rapide, pli rapide!..—murmuris la maljunulo, el ĉiuj fortoj svingante antaŭ la pordo duonmalfermita per naztuko.—Ree la ĉambro estos plena de muŝoj malbenitaj... Fine, tio ĉi estas netolerebla!..

La patrino, tenante per la manoj ~~antaŭ~~ antaŭ si je la ŝultroj la filon, enpuŝis lin tra la pendo kaj tuj post li ŝi mem iel eksaltis en la ĉambron.

—Bonan tagon, fraĉjo!—diris la fratino, salutante la maljunulon, kiu kun bruego fermis post ŝi kaj tuj ŝlosis la pordon, tamen staranta antoraŭ apud ĝi kaj ne ellasante la ŝlosilon el la mano.

Joĉjo ekrigardis la patrinon, kvazaŭ demandante ŝin per la rigardo, kion li devas fari. Ŝi fakis al li okulsignon, kiu signifis, ke li ankaŭ devis saluti la onklon, kiun li antoraŭ ne vidis dum tiu ĉi tago.

—Bonan tagon, onkĉjo!—li diris malkuraĝe, kisante flavkoloran, vejnecan kaj sekan manon, kiun la onklo eltiris al li.

—Ni venis, fraĉjo, por sciiĝi, ĉu io estas bezona al vi... Eble, muŝoj ree enflugis de ie, Joĉjo...

—Dankon!—diris la maljunulo, ordigante baskojn de sia longa sentalia bluzo silka kaj kunfirante la brovojn, tamen antoraŭ nek ŝanĝante sian pozon, nek foririante de la pordo.—Dankon! Ni delonge atendas vin. Ni jam supozis, ke vi tute forgesis min... Ŝajne, mi estas nefremdulo... La tutan nokton mi pasigis sendorme, ankaŭ tage mi ne trovas trankvilon...

—Ĉu muŝoj?..

—Vi scias... Ĵi mortigos min, mortigos, malbenitaj... Mi nenie povas miŝkaŝi de ili! Ĵus mi kaptos unu, aliaj du aŭ tri jam enfluĝis en la ĉambron anstataŭ ĝi, kaj estus mirinde, se ili ne enfluĝus... oni senĉese jen eniras, jen eliras tra la pordo, - li diris, poiricante de la pordo kaj per atenta rigardo observante la plafonon kaj murojn.

Sur la fenestroj kaj specialaj benkoj, starintaj kontraŭ la fenestroj, estis vidataj ĉambrokloroj en bela potoj. Sur la muroj en valoraj kadroj pendis jam parte perdintaj sian koloron antikvaj portretoj kaj bildoj de vivo kamparana. Apud unu muro staris granda skribotablo ne kolorigita kun alnovita mola apogseĝo, kontraŭ ĝi - apud muro kontraŭa staris kunmetebla fera lito kun alta monto de molaj kusenoj. Du grandaj ŝrankoj kun dikaj libroj en antikvaj ledaj bindoj, starintaj proksime de la tablo konsistigis ornamaĵon de la ĉambro. Sur la tablo kuŝis kelkaj malfermitaj libroj kaj dika kajero kun paĝo ne tute skribita.

Malgraŭ diverskonsisteco de la meblaro kaj ĝia primitiveco, malgraŭ, rimarkebla de unua rigardo, fraŭleca karaktero de la ĉambro, ĝi nevole mirigis ĉiun per sia ordo kaj pureco. Nenie estis rimarkebla plej malgranda balaaĵero aŭ polvero kaj ĉie, kien ajn oni turnus rigardon - inter florpotoj, sur muroj, sur la lito, eĉ sur la skribotablo - pendis kaj kuŝis pecetoj de glua muŝkaptapapero kaj staris tasetoj kun diversaj muŝvenenaĵoj.

—Jen ĵus traflugis unu!... - la onklo diris, daŭrigante sian serĉadon de io sur la plafono kaj muroj, - kaj antaŭ via veno mem du muŝoj neforpeleble - trudeme senĉese atakis min je la tablo. Kenia veneno ĉirkas je ili, malbenitaj!..

—Serĉu, Joĝjo, vi havas pli akravidecajn okulojn, ol nia bona onklo, - diris la patrino.

—Ne dispremu, atendu, ne dispremu ĝin!... - la onklo kriis, alkurante kaj preninte unu kiktimon el la manoj de la nevo. Kun ĝojo malica sur la viŝaĝo, li forŝiris nerapidante, kvazaŭ ĝuante je la ekzekuto, la kapon de la kaptito kaj metis ĝin en specialan skatoleton.

—Bone!... - li laŭdis la nevon. - Daŭrigu ĉiam sammaniere, - kaj, sin turnante al la fratino, li admonis: - Li havas necesan lertecon de la mano. Se li ne estus tiel maldiligenta, li povus alporti netakseblan servon al la hejmaro...

—Li singardema... sentaŭgulo, stultulo! - li ree kriis subite, - Se vi disbatos mian florpoton, mi disbatos vian... Ĉu vi kaptis ĝin? Bone... Donu ĝin tien ĉi!..

Dum kvin minutoj, dum kiuj la fratino staris senmove sur la sama loko apud la pordo, la kaptistoj sukcesis jam kapti kelkajn muŝojn kaj poste ili longe vane marŝis ronde tra la ĉambro, atente serĉante la insektojn.

—Atendu!.. Ankoraŭ unu devas esti ie... - la onklo murmuris, plenigante la nazon per fortabako el malgranda arĝenta tabakujo, kiun li neniam ellasis el la manoj. - Atendu!..

Kaj efektive, post longa serĉado, Joĝjo al ĝojo nekaŝata de la onklo sukcesis trovi ie ankoraŭ unu muŝon - lastan kaj kapti ĝin.

—Nu, bone! Nun vi poziru, - li diris al la nevo, metante la muŝon ekzekutitan en la skatolon kaj alproksimiĝante al la pordo. - Kaj vi, - li sin turnis al la fratino, - restu, mi devos diri al vi du vortojn.

La onklo malŝlosis la pordon kaj tra malgranda fendo, iom malfermite la pordon, kiel bundaĉon, trapuŝis la nevon.

III.

Agrabla novaĵo.

La ĉielo ekkompatis la teron, kiu dulonge soifis malsekaĵon, kaj sendis al ĝi abundan pluvon kun fulmotondro. Post la pluvo ĉio reviviĝis en la naturo: la aero freŝiĝis kaj pleniĝis de kreskaĵaromo, arboj kaj floroj kvazaŭ plijuniĝis, lavinte sian polvokovritan someran vestaĵon. En la ĝardeno estis tiel bone, tiel facile tie spiris brusto, kompare kun la ĉambroj, kie aero estis supoka, ke oni decidis aranĝi vesperan tetrinkadon tie, sub branĉoj de maljuna pomarbo. Partopreni la tetrinkadon konsentis eĉ la onklo, kiu antaŭe proproksule certiĝis, ke muŝoj tute forestis sub la pomarbo.

Oni gaje alportis grandan tablon, metis ĝin sub la arbo kaj kovris ĝin per blanka tabletuko. Du servantinoj, Joĉjo, Ziŋjo kaj ilia plejjuna frato Boriso-okjara dikulo, gaje ekkuris tien kaj reen, laŭte piedbatante per la piedoj je pluvlagetoj sur vojetoj de la ĝardeno, kaj portante el la onkla domo seĝojn, tevazaron, biskvitojn kaj dolĉaĵojn.

Kiam ĉio estis preta kaj granda bruanta samovaro el ruĝa kupro estis starigita mezo de la tablo, en la aleo montriĝis figuroj de la onklo kaj de la patro de Joĉjo, pace ion priparolintaj; je kelkaj paŝoj de ili, por ne ĝeni ilin per sia ĉeesto, sekvis post ili la mastrino. La onklo, pro strangaĵoj de sia karaktero, kiel oni parolis, ne toleris la bopraton - la patron de Joĉjo - kaj nur en tre maloftaj okazoj permesis al si interparoli kun li. Sed tiuj ĉi maloftaj renkontiĝoj kaj, ankoraŭ pli maloftaj, interparoloj ordinare estis finataj subite per reciprokaj riproĉoj eĉ ofendoj kaj post tiaj kunpuŝiĝoj ili ĉiam ree disiris, por longe malpaciĝintaj.

— Li iras!.. — subite ekaŭdiĝis ies voĉo infana apud la tablo kaj tuj gaja ridado kaj ŝercoj de la infanoj ĉesiĝis, kvazaŭ pro gesto de bastono de sorĉisto. La vizaĝetoj de la infanoj ektiriĝis, fariĝis seriozaj kaj pro tio ne naturaj. Ili jam ne unuafoje spertis kiaj rezultatoj malĝojaj atendas ilin, se ili permesus al si en ĉeesto de la onklo ian ridon aŭ petolaĵon.

La mastro - la patro de Joĉjo, altkreska, nigrohara viro kun energia vizaĝo kaj regulaj vizaĝtrajtoj, kiu ĉiam akompanis sian parolon per gestoj kaj kutimaj esprimoj, - sidiĝis apud la onklo, la mastrino okupis sian lokon apud la samovaro, la infanoj sidis silente sur la kontraŭa flanko de la tablo. La mastro jus revenis el la lernejo, kie li pasigis kelkajn horojn ĉe sia plej maljuna filo, kiun oni opiniis instruitulo, kaj nun li rakontis al la onklo pri planoj de plua agado, projektata de la filo.

— Pĉjo baldaŭ veturos al la guberniestro, - li parolis kun ardo, malfermante arĝentan tabakujon de la onklo, kiu staris kontraŭ ili sur la tablo, kaj prenante el ĝi pinĉkvanton da flarta-

baro, kion li permesis al si en plej malofta j okazoj de bona humoro. – Li petos permeson de li fondi bibliotekon-legejon por la popolo, vilaĝanoj jam esprimis sian konsenton konstrui por ĝi specialan domon apud la ternejo.

– Hm... – malaprobe ekbalancinte per la kapo, diris respondo la onklo.

– Monrimedoj por aĉeto de libroj, laŭ lia opinio, estas superfluaj... – la mastro daŭrigis, ŝargante la nazon per la flartabako kaj ne rimarkante, ke la mieno de la onklo fariĝis pli kaj pli malkontenta. – Baŭsoŭ-nia konfaranto-ĵiĉulo promesas subvencion...

– Hm!... – pli laŭte interrompis lin la onklo, ekrapinte per la tabakujo je la tablo, kio ĉiam signifis lian malkontenton. – Kaj ĉu vi ĝojas?.. – li diris, turnante sian rigardon al la parolanto.

– Kompreneble!.. Kian strangan karakteron vi havas, frato! – respondis la mastro, farante riproĉgeston per la mano. – Ĉiam vi vidas en ĉiu entrepreno...

– Hm!... – supersonante la boxraton kaj prenante en la manon la tabakujon, per kiu ekrapi per ĝi je la tablo, diris la onklo. – Ĉu strangan karakteron?.. Ĉu ĉiam?..

– Ĉu Manjo revenis el la urbo? – malkuraĝe demandis la mastrino la edzon, penante per sia enmiksiĝo kvietigi la disputon, kiu minacis per malpaciĝo kutima.

– Ŝi alveturis... Ŝi, kredeble, baldaŭ venos al ni; ŝi alportos al vi iajn donacojn, – respondis la edzo, kiu turnante al la onklo sian rigardon. – Mia filo...

– Via filo estas stultulo... – neatendite interrompis lin la onklo.

– Tiel!.. Mi dankas vin...

– Ankaŭ stultulo estos via guberniestro, se li donos permeson por fondi la bibliotekon...

– Tiel... Bone!.. Daŭrigu, mi petas... – fermetinte la okulojn kaj ofendite-moxeme sxuante per la kapo, parolis la mastro. – Daŭrigu!..

– Pavel Ivanoviĉ! – kiu sin turnis al la edzo la mastrino, – Ĉesigu, mi petas, la interparolon. Mia bona frato...

– Silentu! – interrompis ŝin la edzo, kun tia forto ekbatante per la mano je la tablo, ke la ~~ke~~levazaro ekstintis sur la tablo kaj la inkanoj kuntiriĝis pro timo.

– La onklo fikse ekrigardis el-sub siaj densaj brovoj la mastron kaj siavice ekrapis je la tablo per la arĝenta tabakujo.

– Ne bruu!.. Se vi volas timigi min, do vi timigos min nek per via krio, nek per la bruado. Kaj tio kaj la alia estas tute superfluaj... Ŝajne, ni interparolas kaj ĉiu el ni povas libere esprimi sian opinion. Ĉu tiel?..

– La mastro silentis, evitante rigardon de la boxrato kaj per la mano, nervoze tremanta, li ordigis sur la kapo siajn longajn harojn.

– Mi estas pli maljuna, ol vi, – daŭrigis la onklo per tono solene-emocia kaj edifa, – mi estas ankaŭ pli maljuna, ol via filo <u>saĝulo</u>! – li elparolis la lastan vorton plej klare kaj kun speciala akcento, ĉirkaŭrigardante la gemastrojn per severa rigardo triumfa.

La mastrino faris okulsignojn al la frato kaj kaŝe viŝis larmerojn, kiuj de tempo al tempo glitis laŭ ŝiaj vangoj malsaneme-palaj. De unu flanko ŝin doloriga riproĉoj kaj mokoj, kiujn ŝia bona frato malavare eldiradis pri ŝia plej malĝusta kaj plej amata filo, de alia flanko ŝi estis kontenta, ke li ne cedis al la edzo en la interparolo.

— Ni ja ion komprenas en la vivo, - kiel vi opinias pri tio ĉi ? - la onklo daŭrigis kunpremante en la mano la tabakujon kaj incitige pli proksime almoviĝante al sia kunparolanto. — Kiel vi opinias pri tio ĉi ? Nu !... Kaj laŭ mi, laŭ mia malsaĝa opinio, niaj vilaĝanoj neniom bezonas je viaj bibliotekoj kaj instruistoj - instruituloj !... Se ni sidigos ĉiujn vilaĝanojn en legejoj al tabloj kaj donos al ĉiu el ili libron en la manojn... kiu plugos por ni ? Ni ja kune kun fantaziuloj, similaj al via filo, mortaĉos pro malsato ! Vere !... Vi diru tion ĉi, mi petas, al via filo...

— Tiel !... Daŭrigu, daŭrigu !

— Se li estas tia saĝa instruisto, li cedu parteton da sia saĝo al la vilaĝanoj, kiujn li opinias tiaj malsaĝaj... Permesu, permesu !... — li laŭte ekkriis, rimarkinte, ke la mastro leviĝas kaj kun rigardo decidoplena intencas paroli. - Permesu ! Kiam mi finos, tiam vi parolu... Se li, via fileto, instruus vilaĝanon kun eble plej malgranda perdo de tempo kaj laboro atingi eble plej grandan rikolton... jen tion ĉi mi komprenas ! Jen tiam la vilaĝanoj estus dankemaj ! Jen kion, rimarku, bezonas vilaĝanoj : pli perfektan plugilon, pli fortan ĉevalaĉon... sed ne bibliotekon ian, kiu celas nur malmoraligi la popolon !

— Ĉu vi finis ?..

— Mi ?.. Jes, mi finis. Ĉu vi volas rediri ? Tio ĉi estas superflua... Mi petas, liberigu min...

— Vi ofendis min, vi ofendis mian filon kaj vi...

— Trojunaj vi estas ankoraŭ kun via filo !... - laŭte interrompis lin la onklo, ree ekfrapante per la tabakujo je la tablo.

— Bone !.. Ni notos tion ĉi !.. Ni memoros, ke nia onklo... - malkontente murmurante laŭte kaj leviĝante, diris la mastro kaj foriris de la tablo dekstren post densajn arbetaĝojn de blanka akacio al sia domo.

— Nu, memoru !.. Nu, notu !.. Koro koleremo ... - aŭdiĝis responde voĉo triumfanta de la onklo, ŝarginta la nazon.

— Bonan vesperon ! - subite ekaŭdiĝis mola voĉo virina ĝuste post la dorso de la onklo. Kaj el-post la pomarbo eliris nealtkreska juna virino kun nigraj okuloj viglaj kaj gaja, ridetanta mieno. Je la mano maldekstra ŝi kondukis knabon kvarjaran, kiu survoje forŝiris foliojn de arbetaĝoj. Post ili sekvis knabino dekjara, beleta kaj maldiketa, kiel kamploro. - Mi serĉis, serĉis iun en la domo, nenie estas iu... Kaj vi jen kien foriris tetrinki !.. Kia mirinda aromo kaj freŝeco estas en tiu ĉi ĉarma ĝardenanguleto !

— Ha, Manjo ! - diris la mastrino, leviĝante de sia loko. - Kiam vi revenis el la urbo ?..

La virinoj ekkisis unu la alian.

—Lubnjo, Miĉjo, - diris la virino, - kisu la avnjon!

La knabo ektiris la manetojn al la avnjo, deplanke rigardante la maljunulon.

—Ne timu, mia etulo, ne timu! - diris la juna virino, kun rideto turniĝante de la fileto al la maljunulo.

—Pardonu, onklo, mi tuj. Jen tiu ĉi filo kunligis min je la manoj kaj la piedoj, - mi neniel povis foriri sen li.

La onklo sulkis la brovojn kaj apenaŭ audeble ekprapis per la tabakujo je la tablo.

—Vi, ŝajne, estas hodiaŭ en malbona humoro. Ni, aliflanke, audis tiel ĉi iajn voĉojn kolerajn.

—Via bopatĉjo, kara Manjo, ĉiam estas kapabla kaŭzi al iu ajn malbonan humoron, - respondis la mastrino anstataŭ la maljunulo, almovante al la gastino tason da teo. - Kia bona frato...

—Kien vi, kien, Miĉjo?.. - la juna virino sin turnis al la knabo, kiu ne volis sidi apud ŝi, sed tiriĝis al flanko kontraŭa, kie staris sur la tablo dolĉaĵoj. - Vi sidu tiel ĉi senmove, la avĉjo ne...

Miĉjo eksplodis.

La onklo kolereme kuntiris la brovojn, tamen je tiu ĉi fojo li jam ne ekprapis je la tablo per la tabakujo, sed leviĝis.

—Kovkokino!.. - li ekmurmuris, foriranta.

—Ĥa-ĥa-ĥa! Jen tio ĉi estas ĉarma! - ekridis la juna virino. - Ĉu vi audis, panjo, mi estas kovkokino!..

—Kia bona onklo...

—Kie estas la patĉjo? Ĉu ili jam malpaciĝis kutime? Jen, ili estas veraj kokoj!.. Ili neniam povas pace interparoli. Ha, mi ne rimarkis la infanojn!.. - ŝi aldonis, sin turnante al la geavo-ĉoj, kiuj ankoraŭ sidis senmove sur siaj lokoj. - Li jam foriris, - vi estu viglaj, kiel decas al infanoj.

La infanoj, timeme rigardante ĉirkaŭe, cliris unu post la alia al la bopatrino (ŝi estis la edzino de la frato plej maljuna, kiun oni opiniis instruitulo), poste ili salutis la genevojn.

—Kia bona frato... - komencis la mastrino, sed ŝi tuj ekspiris profunde kaj silentiĝis.

La patro de Jeĝjo estis homo nericaĉa. Liaj enspezoj estis apenaŭ sufiĉaj por doni vivrimedojn al la familio. Dum aŭtunoj kaj vintroj la patrino perlaboris per kudrado iam monsumon, sed ĉio tio ĉi estus ne sufiĉa por kovri grandajn elspezojn je instruado de la gefiloj en la urbo. Ne malgrandan partoprenon en tiuj ĉi elspezoj havis la onklo, kiu de tempo al tempo, sekrete de la bopatro, sendis al la fratino monon. Eble, ĝuste tiu ĉi cirkonstanco devigis ŝin ĉiam respekti-ege kaj dependi rilati al la frato, malgraŭ liaj strangaĵoj iamaj.

—Mil salutojn mi alveturigis al vi, panjo, - komencis la bopilino, almoriĝante al la bopatrino. - Sed antaŭe mi petas, ke vi akceptu de mi malgrandan donacon. Lubnjo, donu al la avnjo...

La knabino donis al la avnjo kunvolvaĵon en volvpapero.

—Dankon! Por kio vi, kara, elspezis monon pro mi? Vi havas idojn... - la avino diris mal-volante la kunvolvaĵon kaj trarigardante lanan ŝtofon por vestaĵo. - Ha, kia ĉarmaĵo! Nu, mi

'anxas, mi danxas vin, mia kara, - ŝi aldonis, xisante la bopilinon. - Nu, rakontu, kio èstas no-
a en la urbo?

La urbo estis nasxiĝloxo de la bopatrino. Ŝi malofte vizitis ĝin. Kaj sciigoj pri vivo de kona-
taj urbanoj ĉiam liveris veran plezuron al ŝi.

— Mi pasigis, xara panjo, en la urbo unu semajnon xaj mi ne havis tempon ĉiujn viziti, ĉion
xari, kion mi supozis ankoraŭ estante hejme. Novaĵoj estas multaj... - ŝi ekspiris profunde, ri-
zardante la infanojn. - joĝjo, Lulanjo, prenu Miĉjon xaj xune xun Zinjo iru promeni tra la ĝar-
deno, mi interparolos xun la avnjo. Nur vi ne forgesu, - ŝi aldonis, minacante per la fingro, -
vi nek iru proksime al la onkla domo, nek pli tolu.

La infanoj ĝoje ekxuris xaj baldaŭ malaperis post arbetaĵoj.

— Paraskovja Lavrentjevna mortis... - komencis ĝeneralajn novaĵojn la bopilino.

— Ke ŝi heredu la regnon ĉielan! - eksklamis la bopatrino, farante xrucosignon.

— Post ŝi restis tri idoj... La edzo drinkadas, la infanoj estas sen prizorgoj.

— Malfeliĉaj, malfeliĉaj infanoj! - eksopiris la bopatrino.

— Petr Pavliĉ diriĝis, mi apenaŭ povis rekoni lin! Nun li kun la familio logas en propra domo...
Patro Kosma tre griziĝis, tamen li estas ĉiam vigla, kiel antaŭe... Nikolaj Ivaniĉ edziĝis...

— Ĉu?.. Sinjoro, indulgu nin!.. Ĉu li freneziĝis?

— Mi ne vidis lian edzinon, sed oni parolas, ke ŝi estas tre juna, ankoraŭ tute xnabinaĉo. Ma-
rja Jakovlevna...

— Nu, nu!.. - malpacience interrompis ŝin la bopatrino. - Ĉu ŝi ankoraŭ ne mortis?..

— Kion vi parolas, panjo? - kun miro demandis la bopilino, fiksinte la nigrajn, gaje xurantajn de
unu objekto al alia, okulojn sur la bopatrinon. Kvazaŭ morto de tiu ĉi virino estis ĝenerale neebla,
kiu xontraŭa al leĝoj de la naturo. - Ŝi estas sana, kiel antaŭe. La urbo ja tute pereus, se ŝi mort-
us, - ŝi aldonis serioztone. - Kiu sen ŝi ĉikanus tra la urbo, kiu disportadus tra la urbo novaĵojn?
Ho, kiel ni ridis, kiel ni ridis kun Anna Mironovna je ŝi. Ŝi rakontis al mi: „Unufoje, vespere mal-
xue, mi aŭdas iu frapas je la pordo. Kiu povus esti dum tia hora malgaja? - mi pensas. Mi iras. Sur
la perono staras Marja Jakovlevna. - Malgermu, malgermu pli rapide, - ŝi diras, - xion mi tuj sciigos
al vi!.. Ĉu vi aŭdis?.. - mi rigardas ŝin xaj nenion komprenas; ŝi tremas tuta, kvazaŭ pro febro, la-
mieno estas multesignifa xaj enigmoplena. - Kio okazis? - mi pensas. - Eniru! - mi parolas al ŝi.
- Ne, - ŝi respondas, - mi tute ne havas tempon! Ĉu vi aŭdis? Hodiaŭ nokte falos sur la teron gran-
da planedo xun fajra vosto!.. Vere! Je Dio!.. Mi ne mensogas. Ivaniĉ (li estas ŝia edzo) jus aŭdis
tion ĉi en drinkejo... Kia teruro! Bone estos, se ĝi falos feliĉe ie meze de kampo, aŭ meze de arbaro,
aŭ en riveron... Sed kio okazos al ni, se ĝi falos super la urbo?.. Mi ne kuŝiĝos dormi hodiaŭ... - En-
iru, - mi parolas al ŝi. - Ne, ne, mi tute ne havas tempon, mi devas rapidi; - ŝi respondas, - mi
tuj kuros al Adrian Nikolaiĉ, al Marja Petrovna... ili, kredeble, ankoraŭ nenion supozas pri la dan-
ĝero minacanta..."

— Nu? Ĉu vere oni ne dormis en la urbo dum la nokto?

-Kontraŭe. Ĉiuj dormis. Eĉ Marja Jakovlevna mem. Sed meze de la nokto ekzercive falis, sed ne la silanedo, kompreneble, sed ŝi mem de la lito aŭ de ie alieloke, kie ŝi dormis kaj gratis profunde je io si-an nazon... Oni nun mokridas kaj parolas: la antaŭdiro de Marja Jakovlevna plenumiĝis: la silanedo ekzercive falis dum la nokto kaj per sia fajra vosto gratis ĝuste ŝian nazon.

La virinoj ridis gaje dum kelka tempo.

— Kaj ĉu vi vidis vian instruistinon iaman?.. Mi forgesas ŝian nomon, -diris la bopatrino, ŝian ili ambaŭ trankviliĝis de la ridado.

— Ĉu Julia'n Andreevna? - subite pliviglIĝis la bofilino. - Jes... Mi bedaŭras, ke Jeĵo nun for-estas tie ĉi.

— Ili alvokos lin, se vi bezonas jeli, -diris la bopatrino. - Sed jen li mem estas! Jeĵo, alire...

— Sidiĝu apud mi, mia kara, - diris la bopratino al Jeĵo, delikate prenante lin je la mano kaj, kun agrabla rideto, fikse rigardante liajn kaŝtankolorajn okulojn. - Kie estas la infanoj? Ĉu vi vidis ilin?.. Mi timas, ke ili tedos al la onklo.

— Ne, ili silente sidas en la ĝardenlaŭbo. Zinjo kun Lubnjo faras florkronon por Miĉjo.

— Bonege! Mi tre ĝojas. Kun aŭskultu, kion mi diros al vi... Mi jus revenis el la urbo. Mi pasigis tie unu semajnon kaj havis okazon viziti tie multajn miajn konatojn... Nu, unu-koje mi venis al unu el ili - al Julia Andreevna, kiu estis mia instruistino de franca lingvo kaj nun private instruas la lingvon al volontuloj, via panjo iom konas ŝin... Kaj prezentu al vi mian miron! La sinjorino sidas apud sia labortablo kun verdkorrila libreto en la mano, kiu estis lernolibro de „Esperanto"... Ŝajne, vi ankaŭ interesiĝas je tiu ĉi lingvaĉo? - ŝi demandis, kun ĝojo rimarkinte, ke la konfuziĝema vizaĝo de la junulo ruĝiĝis kaj esprimis entuziasmon. - Mi ĝuŝdis ion pri tiu ĉi via okupo laŭdinda.

Jeĵo kaŝe kaj demande ekrigardis la patrinon. Ŝi nee ekbalancis per la kapo.

— La sinjorino, -daŭrigis la bopratino, - tuj komencis entuziasme paroli al mi pri la lingvo, pri kiu ŝi mem sciiĝis antaŭ nelonge, laŭdi ĝian belecon, mirindan simplecon kaj antaŭdiri ĝrandan signifon, kiun havos la lingvo por interfratiĝo de popoloj. Ŝi nur bedaŭris, ke neniu el ŝiaj konatuloj estis esperantisto. Mi pacience aŭskultis tiun ĉi kontraŭvolan „propagand-an lecionon", kiel ŝi poste nomis ĝin kaj, fine, por plezurigi la sinjorinon, mi diris al ŝi privi. Ĝojo de la sinjorino ne havis limojn. Ŝi pliviglIĝis, plijuniĝis kaj, dezirante nek aŭskulti, nek parolI pri io alia, krom Esperanto, daŭrigis sian, kiel ŝajnis al mi, senfinan konversacion je la temo ŝatata de ŝi kaj tuj skribis ian leteron al vi... Bedaŭrinde, mi forgesis ĝin hejme. Se vi interesiĝas je ĝi, vi iru tuj en la lernejon. Sur la skribotablo de la edzo vi trovos ĝin met-ita meze de germane-rusa vortaro...

Jeĵo jam ne aŭdis plu la bopratinon. Li tuj, kiel birdo ektimigita, leviĝis de sia seĝo kaj ekkuris en la lernejon, kie staris post la vilaĝo, meze de grenkampo.

IV.

Unua paŝo.

La leteron estis mallonga, sed tiel kortuŝa kaj entuziasma, ke Joĉjo, legante kaj relegante ĝin, ne povis deteni larmojn. La sinjorino nekonata sciigis lin per la letero, ke ŝi tre šatas la lingvon kaj deziras perfektiĝi en ĝi, ke tiuĉi ŝi nepre devas pari, ĉar ŝi donis al iu promeson, ke ŝi estos pervora esperantistino kaj semantino de Esperanto. Ŝi plendis, ke ŝi havas, bedaŭrinde, tian aĝon, kiam oni jam ne lernas ion, ke ŝi tute ne havas ian esperantiston konatan, kiu helpus al ŝi perfektiĝi en la lingvo kaj atingi la celon deziratan. Ŝi petis je nomo de ĉio sankta, je nomo de ĉio, kion plej amas Joĉjo, ke li, revenante aŭtune en la urbon por daŭrigi sian lernadon en seminario, tuj vizitu ŝin kaj estu ŝia gvidanto-helpanto.

Ŝis nun Joĉjo toleris iafoje ofendojn kaj morojn, precipe de la prato-instruitulo, kaj eĉ per unu ekulo li ne vidis ian esperantiston. Li delonge deziregis renkonti kaj konatiĝi persone almenaŭ kun unu el ili kaj esperantistoj ŝajnis al li iaj tute ne ordinaraj homoj - duondioj kaj la sinjorino, kiun la patrino kaj la bopratino opiniis tre saĝa kaj estiminda, en lia imago sin prezentis ĉi li ne alie, kiel anĝelo. Tial ne estas mirinde, ke, ricevinte la leteron, Joĉjo estis senmezure gavita. Li ĉiutage legis kaj relegis la leteron, ĉiam trovante en ĝi ian novan sencon kaj novajn detalojn, kiuj, kiel ŝajnis al li, ne plene klare estis esprimitaj en la letero, kaj kiujn li antaŭe ne remarkis. Li kun malpacienco kalkulis tagojn, kiuj restis antaŭ lia forveturo kaj revis, revis dolĉe, senfine pri la konatiĝo estonta kaj sia agado esperanta. Antaŭ sia forveturo en la urbon li ricevis el Peterburgo esperantistan signeton, kiun li kun fiereco intencis uzi dum la vojo en la urbon kaj dum vizitoj de la sinjorino mistera.

Vespere de unu bela tago en fino de aŭgusto Joĉjo vaporŝipe venis en la urbon kaj unua afero, kiu entreprenita de li tie, kiel sendube konjektas leganto, estis la vizito. Sen granda peno kaj baldaŭ Joĉjo trovis la domon, li eĉ tuj instinkte distingis la enirpordon de la loĝejo, sur kiu briletis malgranda kupra tabuleto:

Julia Andreevna
Kurbatov.
÷
Instruistino de la franca lingvo.
Vizitantoj estas akceptataj
inter 4 kaj 6 horo de vespero ĉiutage.

Joĉjo staris unu momenton antaŭ la pordo mistera kaj fikse rigardis la tabuleton, dum du malsamaj intencoj batalis ie en profundajo de lia ekzistajo: ia forta nevidebla, nekomprenebla puŝis lin antaŭen, ia voĉo interna plustris en liajn orelojn, ke nun estas ĝuste tiu horo, kiam la sinjorino estas hejme kaj akceptas vizitantojn, ke li tuj sonorigu kaj tiamaniere komencu senprokraste efektivigon de la revado antaŭlonga, sed alia forta-pli potenca, kiu dum la vivo tiom da

ĵoj malutilis lin, -lia ĉiama konfuziĝemo kaj senkaŭza timemo fine venkis.

Malkontenta je si mem, ĵoĉjo malrapide reiris de la domo, de tempo al tempo haltante meze de la strato kaj ĵetante al ĝiaj fenestroj rigardojn amplenajn. Li indignis je sia maldeca konduto kaj promesis al si, sin konsolante, ke morgaŭ li havos jam necesan decidecon nešanceligeblan kaj plenumos ĝian intencon kiaj ajn malhelpoj starus sur lia vojo.

Sonoriloj de najbaraj preĝejoj ĝoje sonoris en senmova vespera aero, vokante urbanojn al vespera diservo, la suno subiranta, ludante per siaj radioj, origis krucojn de preĝejoj aj serajn tegmentojn de domoj, feste-ornamitaj infanoj je akompano de gepatroj kaj plenaĝuloj amase iris laŭlonge de la strato al riverbordo por promenado, kiam ĵoĉjo, kun decidecon nešanceligebla, rapidis al la domo alloge-mistera, senĉese ordigante sur la brusto sian signeton. Je tiu ĉi ĵoĉjo jam sen konfuziĝemo kutima, tamen kun korbatado, ĵoĉjo eksonorigis per la mano tremanta. Atendante rezultaton de sia tiom senekzempla arogantec, kiel ŝajnis al li, ĵoĉjo duonturniĝis renkonten al preteririntoj kaj kun piereco, elstariginte la brustom, vidigis al ĉiuj la signeton. Ili kun scivoleco rigardis lian maldikan, altkreskan figuron, modeste estitan, sed ĵoĉjo estis certigita, ke ilian atenton kaj admiron altiras la steleto kvinpinta kaj recipe la vorto ore skribita super ĝi „Esperanto".

Ĉar lia sonorigo, videble, havis nenian efikon, ĵoĉjo eksonorigis je dua ĵoĉjo jam pli persiste. Kaj preskaŭ tuj post la pordo ekaŭdiĝis ies pašoj alproksimiĝantaj. La pordo mistera malfermiĝis kaj englutis ĵoĉjon.

En negranda ĉambro, komforte meblita, kien enkonduksis ĵoĉjon servistino, sidis en granda fotelo apogseĝo virino de kvindek jaroj proksimume. Ŝi estis modeste vestita laŭhejme. Ŝia inteligenta, serioza vizaĝo portis klarajn postsignojn de iama beleco kaj sur ŝia kapo malkovrita argentiĝis ~~tegmento~~ grizaj haroj.

Ĉe apero de la junulo ŝi tuj forlasis sian laboron kaj fiksis al li sian mirigitan kaj demandoplenan rigardon. Sed tio ĉi daŭris tre nelonge, nur ian momenton. Poste ŝi, kvazaŭ ion konsiderinte kaj konjektinte, vigliĝis kaj, etendante al ĵoĉjo la manojn, ekkriis:

— Ĉu vi estas tiu junulo... esperantisto?.. Kiel mi ĝojas, kiel mi ĝojas!... Mi dankas vin. Sidiĝu!

Okupinte seĝon apud ŝi, ĵoĉjo dum longa tempo devis nur respondadi ŝiajn demandojn, kiuj ekfluis sur lin senĉese kaj abunde. Estis klare, ke ŝi efektive interesiĝis je la lingvo ankaŭ je la vizitinto kaj delonge preparis siajn demandojn, ĉiuplanke pripensitajn. ĵoĉjo respondis ĝenerale ĵigle kaj plejofte unusilabe: jes kaj ne. Kiam respondoj estis jesaj, en lia voĉo aŭdiĝis firmeco kaj memfido, sed kiam Julia Andreevna demandis: ĉu Esperanto jam estas disvastigita tra la tuta mondo? Ĉu esperantistoj havas ian seriozan tutmondan organizaĵon? Ĉu ia ruso, elleminte Esperanton, povas senmalhelpe trovi por si konvenan oficon eksterlande? kaj t.p., ĵoĉjo kun ĉiu anda konfuziĝemo kaj kulpvoĉe, kvazaŭ ĉio tio ĉi mankis ankoraŭ pro lia kulpo, respondis

algaje kaj nee balancante per la kapo.

Dank' al tia konversacio, post unu duonhoro Julia Andreevna jam suxcesis sciiĝi ĉion, kio ri-
tis al tiamaj suxcesoj de propagando de la lingvo en la mondo, ankaŭ biografion de joĉjo. Dum
tuta interparolo ŝi, interpingrinte la manojn kaj sin apoginte je la tablo, ne deturnis sian ri-
ardon de joĉjo kaj ĉiun, ĉu jesan, ĉu neanĉian respondon akompanis per ĉarma, facila kaperklin-
do kaj ofta ekspirado.

—Bone, bone!..—ŝi diris, fine, rektiĝante en la apogseĝo kaj enpensiĝante.—Viaj sciigoj tre kont-
ntigis min kaj dekobligis mian energion. Tamen, mia kara infano, mi ne povas kontentiĝi nur
e mia konatiĝo kun vi, mi deziras, ke vi estu mia gvidanto, mia instruisto de Esperanto... Vere,
lingvo estas facile ellernebla, sed mi, ho ve, estas nun en tia ago, kiam estas malfrue kaj mal-
ĉile lerni ionajn! Krom tio, se mi lernos la lingvon sola, sen ies helpo,—miaj opicaj kaj mastr-
maj laboroj, mi tion scias, ĉiam malhelpos al mi serioze lerni ĝin, sed mi promesis... mi de-
idis ellerni ĝin perfekte... Ĉu vi konsentos esti mia instruisto, mia profesoro de Esperanto?..

—Kun granda plezuro!—preskaŭ ekkriis la junulo ĝojigita.—Mi nur timas...

—Mi scias, vi timas, ke mia okupado, eble, malhelpos al via lernado,—do vi estu trankvila: por
ia studado de la lingvo estos sufiĉa unu leciono semajne... Kia tago estas pli oportuna por vi?

—Mi estas preta konservi por vi eĉ ĉiutage!—entuziasme diris la junulo.—Por Esperanto mi estas
reta operi ĉion...

—Ho, mia amiko!—riproĉe ekbalancinte per la kapo, diris Julia Andreevna.—Mi vidas, ke vi est-
s tre flamiĝema junulo. Sed, kredu al mi, nek Esperanto, nek mi postulas de vi oferojn! Kontraŭe,
or ĝi kaj por mi estus malutile kaj malagrable, se vi, laborante por ĝi kaj por mi, malutilus al vi mem,
! viaj devoj sanktaj de bona lernanto. Mi tuj rimarkis, ke vi estas fervora esperantisto, tio ĉi estas
e laŭdinda, sed mi konsilas al vi, mi petas vin, ke vi dediĉu tutan vian fervoron nun al via lernado
n seminario kaj por Esperanto—kiel por nia amuzaĵo—estos sufiĉaj unu-du horoj ĉiusemajne.

Joĉjo eksentis tutan justecon de la vortoj de Julia Andreevna kaj kulpe klinis la kapon.

—Ĉu vi konsentos viziti min ĉiusabate post vespera diservo, kiun mi ĉiam ĉeestas en la paro-
a preĝejo?

—Jes! Tio ĉi estos plej oportuna tempo!

—Ekve, ni dediĉados al ~~ellernado~~ ellernado de la lingvo unu-du horojn ĉiusabate? Ĉu tiel?.. Nu,
i penos altiri al nia okupado je la lingvo miajn gelernantojn de la franca lingvo,—tio ĉi estos
e malutila por ili. Eble, ĝin partoprenos ankaŭ iu el miaj multenombraj konatuloj, kiuj de-
nge scias jam mian emon al la lingvo internacia. Konateco kun kelkaj el ili povus havi
or vi grandan signifon... Vi tute ne vidis homojn kaj neniam estis en societo,—ŝi aldonis pli
nallaŭte post ioma pripensado.

Kia disiĝo estis tre kortuŝa. Kiam, adiaŭante, joĉjo jam intencis ekkisi la manon de Julia
ndreevna, ŝi neatendite kareseme prenis per la manoj lian kapon kaj, kisante ĝin, diris:

—Estu feliĉa, mia profesoro, mia infano!.. Kia juna kaj maldiketa vi estas! Kia fileto, antaŭ

longe mortinta, ankaŭ estis tia maldiketa... Inter li kaj ŝi mi rimarkas ĉiam similecon. Nun vi estus ĝuste samaĝuloj!.. Adiaŭ! Ĝis la sabato! Sardu vin Dio!

„Ĉu mi songas tion ĉi?" – Joĉjo sin demandis, ĵus li eliris el la domo. – „Kia agrabla, delikata, sagaca ŝi estas!.. Kaj kiel ŝi amas mian lingvon!.. Ho, mi uzos ĉiujn miajn fortojn por ke mi estu inda je ŝia agableco!"

Kaj lia imago longe pentris allogajn pentraĵojn de lia estonta agado propaganda.

V.

Novaj konatuloj.

Ĝuste je la oka horo en proksima sabato Joĉjo jam kuraĝe kaj trankvile eksonorigis ĉe la pordo, kiun tuj malfermis la servistino-knabino. Ŝi respektoplene salutis Joĉjon kaj konserveme helpis al li senvestiĝi en la antaŭĉambro.

– Bonvolu eniri, sinjoro! – ŝi diris, detenante facilan rideton, – la sinjorino estas en la gastoĉambro.

En la gastoĉambro, en tiu sama, kie antaŭ kelkaj tagoj Joĉjo konatiĝis kun Julia Andreevna, brulis granda lampo kun verda ŝirmilo, disversante molan duonverdan lumon, kiu aldonis al la ĉambro specialan allogecon kaj mildecon.

Julia Andreevna, en nigra festa vestaĵo kaj silka punta tuko sur la kapo, sidis en sia granda mola apogseĝo kaj jen franclingve, jen ruslingve interparolis kun du junuloj, kiuj sidis kontraŭ ŝi kaj skribis ion penerne en siaj kajeroj.

– Ha,! – ŝi ekkriis, ekvidinte enirantan Joĉjon, – Via akurateco tre plaĉas al mi. Bonan vesperon! – ŝi leviĝis, expremis la manon de Joĉjo kaj ekkisis lin je la frunto. – Sidiĝu!

Ŝi kvazaŭ forgesis, ke en la ĉambro krom ili estis ankoraŭ la junuloj. Joĉjo salutis ilin kaj amikeme expremis iliajn manojn, gaje ridetante per siaj ĉarmaj kaŝtankoloraj okuloj.

– Pardonu! – diris la mastrino, ree leviĝante de la apogseĝo. – Mi forgesis, ke vi ne konas ankoraŭ unu la alian. Tiu ĉi junulo estas fervora esperantisto, jen sur la brusto li havas sian distingaĵon, – ŝi montris la signeton. Joĉjo ruĝiĝis pro plezuro kaj nevole elstarigis sian enpalintan brustON, sur kiu brilis kvinpinta steleto. – Li estas mia profesoro de Esperanto. Ankaŭ li volonte instruos vin, se vi tion deziros. Estu amikoj! Sidiĝu, sidiĝu, mia kara, – ŝi montris al Joĉjo seĝon apud si. – Tiuj ĉi junuloj estas miaj lernantoj, – ŝi daŭrigis, interpingrante la manojn. – Atendante vin, mi, por ne perdi vane tempon, faris kun ili malgrandan ekzercon en la franca lingvo. Jen, tiu ĉi junulo, – ŝi daŭrigis, gaje balancante per la kapo kaj montrante per rigardo malaltkreskan diketan, pufvangan junulon kaj kutime sin apogante je la tablo, – estas s-ro Leskov, oficisto de komerca banko, mia fiereco! Li estas mia plej bona kaj plej fervora lernanto. – Julia Andreevna agrable ekrideti kaj ree kelkfoje ĉarme kaporlinis laŭ direkto de la junulo. – Kaj tiu ĉi, – ŝi profunde kaj laŭte ekspiris kaj montris al Joĉjo la alian junulon kun ovala aknekovrita vizaĝo kaj zorgeme frizitaj haroj

„Sen titolo".

flavrugĉetaj, -tiu ĉi sinjoro, s-ro Kustikov, kontraŭe, estas unu el plej, plej malbonaj kaj maldiligentaj miaj lernantoj.

Leskov ĉe tiuj ĉi vortoj ekspiziblovis kaj ŝirmis sian vizaĝon per kajero. Sed Kustikov konservis trankvilan mienon, kvazaŭ tiu ĉi ne tute laŭdinda atesto koncernis iun alian, sed ne lin.

Ekaŭdiĝis sonorado tranĉanta.

—Danjo! - ekkriis Julia Andreevna, - ĉu vi ne aŭdas, oni sonorigas...

—Li pli volonte flirtas je beletaj fraŭlinoj, - daŭrigis ŝi post nelonge, per iom mokema rigardo ree montrante Kustikov'on, - kaj li vizitas la lecionojn de la franca lingvo, ŝajne, ne pro tio, ke li volas ellerni la lingvon, sed por havi okazon amindumi, cetere vi mem vidos...

—Ĉu mi estas kulpa, ke vin vizitas ĉarmaj fraŭlinoj? - respondis Kustikov, ŝanĝante nek sian pozon, nek mienon.

Ĉiuj nevole ekridis.

En la antaŭĉambro estis aŭdata virina flustrado kaj brueto de formetataj vestaĵoj.

— Nun, miaj amikoj, - la mastrino diris per tono serioza kaj apenaŭ alla junuloj, kiam oni trankviliĝis post la rido, - vi permu viajn kajerojn. Ni daŭrigos aliookaze.

En la ĉambron eniris du virinoj. Antaŭe iris mezkreska, korpulenta virino de kvardek jaroj proksimume kun granda busto, buklitaj blondaj haroj kaj bela, kun restaĵoj de iama juneco, vizaĝo. Ŝi estis mode vestita je ia fantazia originala vestaĵo helkolora kun granda dekoltaĵo kaj ĝiskubute nudigitaj la manoj. Ŝia vizaĝo kaj kolo estis abunde pudritaj kaj tuta ŝia ekzistaĵo eligis ĉirkaŭen fortan parfumodoron. En unu mano ŝi tenis dikan libron ne binditan kaj nur duone distranĉitan, en la alia elegantan saketon el testuda ledo kun arĝenta ĉeneto de arta laboro.

Post ŝi paŝetis brunulino de la sama kresko kaj aĝo proksimume, malgraseta kun iom plata busto kaj neproporcie - granda nazo sur la simpatiplena vizaĝo kun persoplenaj rondaj bluaj okuloj kaj belaj maldikaj lipoj. Ŝia kapo estis kovrita super modesta hararanĝo per kolora punta tuko, simila al tiu de Julia Andreevna. Ŝia brunkolora vestaĵo estis simple, kvankam mode, ~~modista~~ kudrita. Sur la ŝultroj en estis metita grizkolora trikita mallonga mantelo kun rozkoloraj mallarĝaj rubandoj, sub kiun ŝi senĉese kaŝis la manojn. En siaj brakoj ŝi tenis malgrandan beletan hundeton Memeka'on, kun mallarĝa eleganta kolrimeneto kun ela j tintiloj arĝentaj.

Ĵli estis fratinoj, fraŭlinoj - grafinoj Trubaĉev'oj. Ĵli loĝis en domo de sia frato - vidvulo (farmeo-konata instruitulo, kiu tutan tempon pasigadis en sia kabineto je laboroj de plej alta matematiko), kaj administris mastrumadon kaj edukadon de du liaj filinoj, fraŭlinoj Sonjo kaj Alnjo, kiuj lernis en gimnazio. La fratinoj tre amis unu la alian, ili neniam disputis, neniam malpacis inter si, kvankam nek je sia aspekto, nek je vivkutimoj ili tute similis unu al la alia. La unua - grafino Eŭdokio - tre ŝatis romanojn franclingvajn kaj kiel ajn ŝi estus, ŝi neprehavis kun si preŝan franclibron. La alia - grafino Ĵrina - estis indiferenta al ro-

nanoj, sed ŝi ne povis vivi sen sia „Memeka". Ŝi perfekte posedis neniam lingvon fremdan, krom la fran-
ca, sed ŝi malŝatis ĉion rusan - parencan.

Julia Andreevna rapideme forlasis sian seĝon molan kaj kun vigleco de knabino ekrapidis renkonten
al la fraŭlinoj. Estis evidente, ke ŝi tre ŝatis la fratinojn - grafinojn kaj ĝojis, ke ili vizitis ŝin.

La fraŭlinoj parence ekkisis la mastrinon kaj interŝanĝis kun ŝi duonvoĉe kelkajn frazojn en la
franca lingvo. Poste, konduksante la gastinojn al la tablo, Julia Andreevna, montrante Jeĝjon, diris
kun kortuŝa mieno:

— Jen estas tiu junulo!.. - kaj ŝi interrompis sian frazon, kvazaŭ intence prezentante al la gast-
inoj mem inde taksi la junulon.

Jeĝjo leviĝis kaj respektoplene riverencis al ili.

Dum la fraŭlinoj kun scivoleco trarigardis Jeĝjon, kiel bestleton transmaran, ankoraŭ neniam
viditan de ili, li staris fiere elstariginte la brustON, ĉar sur ĝi estis la signeto, kaj konfuziĝeme mal-
levinte la okulojn.

— Kia juna li estas! - kvazaŭ kun bedaŭro, diris unu el ili.

— Kaj maldiketa, konfuziĝema... - aldonis la alia.

— Ha, kara Eŭnjo, vi ne forgesu, ke li estas seminariano kaj vi scias, kiel severe oni edukas ilin...

— Jes, jes!.. Ili estas malpeliĉuloj... Oni malpermesas al ili havi konatulojn, vizitadi teatrojn, so-
cieton... Pro tio ĉiuj seminarianoj estas mallertaj, konfuziĝemaj.

— Ni miras, franjo, kion oni celas per tia edukado. Ja ne ĉiuj seminarianoj estos pastroj, mona-
ĥoj, episkopoj, - ja multaj el ili, fininte seminarian kurson, instaliĝas je oficejoj!

— Tamen, miaj karaj, sufiĉe! - enmiksiĝis la mastrino. - Per viaj paroloj vi tute konfuzis mian kar-
an instruiston... mian profesoron! Sidiĝu, mi petas, alie li eksploros pro la ĉekutima medio kaj viaj
kortuŝaj paroloj. Sidiĝu!

Grafino Eŭdokio tuj obeeme sidiĝis je la alia flanko de la mastrino kaj senprokraste malfermis si-
an romanon, sed ŝia fratino sidiĝis apud Jeĝjo kaj daŭrigis silente esploreme observi la junulon.

— Eŭnjo! - ŝi diris post iom da tempo, jen eltirante siajn longajn manikojn de la vestaĵo, jen forskuante
per la mano ion de antaŭo de la mantelo, - atentu, kiaj ĉarmaj kaŝtankoloraj okuloj...

— Franjo, mi timas, vi enamiĝos hodiaŭ, - respondis grafino Eŭdokio, ne fortirante sian rigardon de
la libro.

Ree eksonoris la sonorileto kaj ekaŭdiĝis ies paŝosonoj en la antaŭĉambro.

— Eble, vi ion tralegos al ni? - Julia Andreevna sin turnis al Jeĝjo.

— Kion?.. Ĉu la himnon de esperantistoj? - malkuraĝe tiu demandis.

— Bonege! Mi petas... - la mastrino respondis.

— Mi petas, mi petas, - ripetis ankaŭ grafino Irina. - Tio ĉi estos tre interesa...

— Ĉu mi malfruiĝis? - subite ekaŭdiĝis sonora voĉo knabina kaj, kiel uragano, en la ĉambron enkur-
is vigla, rugĥvanga beleta knabino de dekses jaroj proksimume. - Avnjo, ĉu mi malfruiĝis? - ŝi ripetis
zorgatakite, ĉirkaŭprenante Julia'on Andreevna kaj kisante ŝin je la lipoj kaj frunto. Tuj post Julia An-

Andreevna al la sama sorto submetiĝis la fratinoj-grafinoj. - Ĉu mi malpruiĝis? - la knabino ĉiam respektadis, ridante ilin.

— Vi eĉ ne ŝanĝiĝis? - milde ridetante, rimarkis al la knabino la mastrino.

— Mi timis malpruiĝi... - eksklamis la knabino, malbutonumante sian jaketon kaj metante sur la tablon kajeron.

— Kio ĝi estas? - demandis Julia Andreevna.

— Mi aĉetis specialan kajeron...

— Kia saĝa knabino vi estas, Olnjo. Mi vidas, ke vi serioze volas lerni la lingvon.

— Serioze!.. Jes... - ŝi respondis, fordonante la jaketon kaj ĉapelon al Kustikov, kiu jam delonge staris malantaŭe de ŝi, kaj ordigante per la manoj siajn silkajn harojn, kiuj dissŭtiĝis el-sub bastoneto tra la ŝultretoj de la knabino.

— Ĉu ne veron mi parolis al vi? - diris Julia Andreevna al Joĉjo, geste montrante Kustikov'on. — Vi vidas, kia lertulo li estas.

Nur ordiginte la harojn kaj pompan banton sur la brusto de sia mallonga vestaĵo, ĉiritan de la jaketo, la knabino haltis antaŭ Joĉjo, kiu delonge jam staris, atendante pacience tiun tempon, kiam li povos saluti ŝin.

La knabino ektiris al li la manon kaj haltis senmove, kiel enposita, fiksinte sian rigardon al la signeto. — „Es-per-ant-o" - ŝi laŭte tralegis la subskribon, proksime kliniĝante al Joĉjo kaj atente trarigardante la signeton.

— Kion signifas la steleto? - ŝi demandis.

Joĉjo klarigis al la knabino.

— Ĉu tiajn signetojn portas nur viroj? - ŝi ree demandis.

— Ne, ankaŭ fraŭlinoj, sinjorinoj... - Joĉjo respondis.

— Kia ĉarma ĝi estas! Mi nepre petos la patrinon, ke ŝi aĉetu por mi tian signeton... Ĉu vi ne povas diri al mi, kiel portas la signeton fraŭlinoj? - ŝi daŭrigis demandadi. - Ĉu ankaŭ sur la brusto?..

— Jes, sur la brusto, ankaŭ sur ĉapeloj, - ĝentile respondis Joĉjo, starante antaŭ la knabino kaj siavice atente rigardante ŝiajn okulojn, ruĝetajn vangojn kaj trajtojn de la bela vizaĝeto.

— Kaj ĉu knabinoj portas ĝin sur pantofletoj, jen tie? - ŝi diris, levante sur seĝon la piedeton kaj montrante per la mano banteton, kiu ornamis etan pantofleton, vestitan super rozkolora ŝtrumpo.

Joĉjo estis en embaraso kaj silentis.

— Vi, Olnjo, parolas malsaĝaĵojn, - diris Julia Andreevna. - Oni ja portas, kredeble, ne podex signetoj, sed po unu...

— Kial ?.. - opendeme diris la knabino. - Laŭ mi, ju pli multajn signetojn oni portos, des pli baldaŭ homoj sciiĝos pri la lingvo kaj des pli baldaŭ okazos kunpratiĝo de popoloj.

Ŝi sidiĝis apud grafino Irina. Joĉjo ankaŭ sidiĝis kaj malfermis sian lernolibron, kie estis presita la himno.

— Aŭskultu! - diris Julia Andreevna.

—„En la mondon venis nova sento..." - ekkegis Joĉjo.

Ŝi legis bonege kaj kun granda entuziasmo. La ĉeestantoj silente aŭskultis, intersanĝante okulsignojn.

— Kia ĉarmaĵo !.. - diris grafino Irina, ĵus Joĉjo finis la himnon.

— Traduku, traduku, - ekmurmuris diris Olnjo kaj grafino Eŭdokio, kiu elprenis el la saketo parfumitan naztukon, kiu tuj eligis parfumodoron, sentatan tra la tuta ĉambro.

Joĉjo obeis.

— Ripetu, mi petas, ankoraŭ jen tion ĉi: „Ne al glavo sangon soifanta"... - diris grafino Irina, viŝante per naztuko larmojn, kiuj aperis sur ŝia vizaĝo. - Mi dankas vin... - ŝi diris, kiam Joĉjo plenumis ŝian peton. - Mirinde !.. Mi neniam aŭdis ion similan... Ĉu en nia rusa lingvo maldelikata oni povas skribi tiel kortuŝe-melodie ?.. Neniam!

— Kiu verkis la himnon ? - demandis Olnjo.

— D-ro Zamenhof, la aŭtoro de la lingvo, - respondis Joĉjo.

— Li estas vera poeto, - diris Julia Andreevna.

— Ĉu estas aplikita muziko al la himno ? - demandis ree Olnjo, - mi trešatas muzikon.

— Jes, jes !.. - gaje respondis Joĉjo. - Mi antaŭ nelonge legis en „Lingvo Internacia", ke runa sveda muzikverkisto... Adelsköld antaŭ kelka tempo faris tion ĉi. Oni parolas, ke li plene sukcese plenumis la taskon.

— Ĉu ni lernos sen libroj ? - post nelonga paŭzo Olnjo demandis. - Kie estas lernolibroj ?..

— Ni petos s-ron profesoron, ke li aĉetu por ni lernolibrojn kaj ekzercarojn, - enmiksiĝis Julia Andreevna.

— Kaj vortarojn, - aldonis Olnjo.

— Jes, ankaŭ vortarojn ! - ridetante, ripetis Julia Andreevna. - Ni havos ĉion !

— Mi petas vin... - Olnjo sin turnis al Joĉjo, forlasinte sian seĝon kaj alirinte al li, embarasante nomi lin. Nomi lin s-ro profesoro, kiel nomis lin Julia Andreevna, ŝajnis al ŝi ne konforma al lia aĝo kaj aspekto, sed lian nomon ŝi ankoraŭ nesciis. - Mi petas vin, enskribu la himnon en la kajeron, ankaŭ ĝian tradukon, mi ellernos ĝin parkere al la sabato estonta. Ankaŭ mi montros ĝin al la paĉjo, li ŝatas poezion ĝenerale.

Dum Joĉjo penege enskribis la himnon en la kajeron de la knabino, ĉiuj ĉeestintoj ĉirkaŭis lin kaj observis ĉiun lian trajton de la vizaĝo, ĉiun aperaŭ rimarkeblan movon en la mieno. Ĉe grafino Eŭdokio forlasis sian romanon kaj kliniĝis proksime al Joĉjo, ĉirkaŭventumante lin per parfumodoro, kiun, ŝajne, eligis abundege ĉiu faldo de ŝia vestaĵo.

— Kian belan skribmanieron li havas ! - diris Julia Andreevna.

— Ne, vi rimarku, kiaj estas ĉarmaj kaŝtankoloraj okuloj !.. - sopiris grafino Irina. - Kia milda, modesta kaj samtempe serioza li estas ! - ŝi aldonis pli malalte.

Olnjo kun zelo prenis la kajeron el la manoj de Joĉjo kaj, reverente sur sian lokon, ŝi metis ĝin antaŭ si sur la tablo. Ĉiuj silentis. Kaj meze de tiu ĉi silento la mastrino leviĝis

de sia mola apogseĝo, metis sian facilan manon sur la ŝultron de Joĉjo kaj diris kun rim-
~~ensimulan~~ arkebla emocio en la voĉo.

— Hodiaŭ estas komenco de nia okupado je Esperanto. Mi ne miras, ke nur ne multaj el mi-
aj konatoj, kiujn mi invitis, venis por partopreni ĝin, - mi scias, ke oni alrutiniĝis rilati
al ĉiu nova elpensaĵo kun malkonfido, kun antaŭjuĝo... Mi dankas vin, karaj fraŭlinoj, ke
vi simpatias nian entreprenon tiom modestan! Kun estos nia devo propagandi la lingv-
on, veki intereson al ĝi ĉe niaj proksimaj parencoj, konatoj, ke la genia elpensaĵo de D-ro
Zamenhof havu ankaŭ en nia urbo multajn fervorajn adeptojn, ke ni almenaŭ je
unu paŝo alproksimiĝu tiun feliĉan momenton, kiam laŭ la vortoj de la ĉarma him-
no „la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian"!... Por signi per io la
komencon de nia „paca batalado", mi proklamas, ke de hodiaŭ ĉiusabate-dum leci-
onoj de la lingvo - mia apogseĝo, sur kiu kutime neniam sidas (krom mi ... ke mia
apogseĝo apartenos al mia ... al nia fjuna instruisto de la lingvo.

VI.

La leŭtenanto.

De tiam la ~~la~~ lecionoj okazis akurate ĉiusabate. Ordinare ilin partoprenis 5-10 homoj, inter kiuj ĉiam estis iu novulo, sed serioze studis la lingvon kaj akurate vizitadis la lecionojn nur Olnjo kaj la mastrino de la loĝejo. Pro ia okazo, lernolibroj, ekzercaroj kaj leg materialo, delonge menditaj, longe ne estis ricevataj kaj dum la lecionoj oni kutime studis la lingvon sen tiuj ĉi libroj, enskribante en specialajn kajerojn, similajn al tiu de Olnjo, ekzercojn, kiujn Joĉjo donadis al ili.

En unu sabato, en komenco de Novembro, Joĉjo aliris al la domo de Julia Andreevna Šarĝita de grandaj paŝaĵoj. Metinte ilin sur la perono kaj svinginte iom da tempo per la manoj, kiuj tre laciĝis pro la šarĝo, Joĉjo eksonoriĝis.

— Ho, kiom da libroj!.. - eksmiris la servistino, kiu renkontis lin. - Kiu helpis al vi, sinjoro, porti?..

— Portu ilin en la ĉambron, mi petas... sur la tablon, - Joĉjo diris, irante tra la pordo malferm-
ita en la antaŭĉambron.

Ordigante antaŭ spegulo en la antaŭĉambro la harojn kaj viŝante per tuko la vizaĝon ŝvit-
kovritan, Joĉjo aŭdis, kiel voĉoj en la gastoĉambro subite plilaŭtiĝis kaj miksiĝis, kus la servist-
ino enportis la librojn.

Joĉjo, salutinte ĉiujn kunvenintojn, kiuj estis ĉiuj konataj al li, sidiĝis jam sen konfuziĝo en la
apogseĝon de Julia Andreevna.

— Donu al mi ankoraŭ tri lernolibrojn, tri ekzercarojn, tri..., - Olnjo sin turnis al li.

— Kiun vi volas vartbi ankoraŭ? - demandis grafino Eŭdokio Trubaĉev, sidinta dekstre de Joĉjo, el-
tirante al la libroj siajn kutime ĝiskrubute nudigitajn blankajn kaj puf-molajn manojn kaj eligan-

e per tiu či movo parfumaĵomon.

– Unu sortimenton bezonas la paĉjo, la alian mi prezentos al la doktoro. Li tre ŝatis al mi per siaj latinaj kaj francaj sentencoj, kiujn li senĉese uzas dum sia parolo kaj al kiuj li ĉiam aldonas sensângê: „kiel parolas francoj" aŭ „kiel parolis antikvuloj-romanoj"... Mi volas, ke li, konstatante tiujn ĉi malsaĝajn esprimojn, simple parolu: „kiel parolas esperantistoj". La tuan mi metos kun propaganda celo sur tablon de... Ĝustokaze, mi tute ne memoras, ĉu mi parolis al vi, – Olgo aldonis ne fininte la frazon komencitan kaj donacante al Jeĵo ĉarman rigardon, – ĵa paĉjo tre dankas vin por la himnoskribita. Li ĉion komprenis tuj sen helpo de la vortaro. Li ja konas multajn lingvojn... La himno tre, tre plaĉas al li!

– Via intenco estas tre laŭdinda, mia kara knabino! – diris Julia Andreevna, karesante per la mano molajn, kiel lanugo, silkecajn harojn de la knabino. – Lasu por mi unu sortimenton, – ŝi diris al Jeĵo.

– Mi prenos la librojn po kvin ekzempleroj, – kalkulante la librojn kaj metante ilin sub la francan romanon, kiu kutime kuŝis antaŭ ŝi, diris grafino Trubaĉev. – Kiaj nevinoj, kiuj tiom multe jam ŝuldis pri la mizinda lingvo de Zrinjo, ankaŭ volas studi ĝin...

– Kial vi, grafino, neniam konduktas ilin ĉi tien? – demandis Olgo.

– Ĉu estas ebla tio ĉi, mia kara? Vi scias, kiaj diligentaj lernantinoj ili estas... ili ĉiun minuton pordonas al siaj okupoj.

– Ĉu ili, kiel antaŭe, estas la plej bonaj lernantinoj de la lernejo? – demandis Julia Andreevna, sin apogante je la tablo kaj fikse rigardante ornamojn de grafino Eŭdokio. – Ili ambaŭ estas tre belaj kaj admirindaj knabinoj.

– Jes, jes! – kun fiereco respondis grafino Eŭdokio, fermante la romanon kaj ordigante per la manoj siajn buklitajn harojn. – Ili estas plej bonaj kaj plej diligentaj knabinoj. La geinstruistoj tre ŝatas ilin kaj ilia revo ĉiama estas pri gimnazian kurson kun oraj medaloj.

– Ho, mi scias, ili nepre ricevos ilin! – diris Julia Andreevna.

– Sed se ili estas tiel okupitaj, – enmiksiĝis en la interparolon Olgo, – kiam ili studos Esperanto?

– Ho, mia kara, Esperanto estas tiel facila, ke ili, estante tre kapablaj knabinoj, ellernos ĝin nerimarkeble dum minutoj de ripozo. Ĵi estos por ili distraĵo agrabla.

– Pardonu! Eble, mi ne malhelpos al vi en via... okupado? – ekmalĝentiĝis raŭka voĉo viro.

Ĉiuj, kiuj estis en la ĉambro, ekstremetis pro neatenditeco kaj ekrigardis laŭ tiu direkto, de kie aŭdiĝis la voĉo. En la pordoj staris juna mezkreska leŭtenanto infanteria en senriproĉe-pura uniformo. Elstariginte antaŭen sian larĝan bruston kaj alte levinte la kapon, li en kavaliraspozo per la mano maldekstra detenis sian spadon kaj per la dekstra – alte levita kaj kunfleksita – tordis longajn nigrajn lipharojn.

– Ha, Georgo, – diris Olgo, rapide forsaltante de sia seĝo, – kiel vi timigis nin!... Kiel vi eniris? Ni tute ne aŭdis, kiel vi sonorigis, kiel vi eniris...

La kavaliro faris tri paŝojn antaŭen, tintante per spronoj kaj faris komunan riverencon

l la sidintoj. Poste li ĉirkaŭiris la tablon, salutante komence la virinojn - ĉiun dise - kaj kis nte iliajn manojn, poste la virojn. Ĉio tio ĉi estis farita silente kaj kun aparta ĝentileco kaj elegantaj manieroj de la salonulo.

Dum ĉiuj ankoraŭ silente rigardis lin, li, kun malrapideneco en movoj, prenis unu seĝon, metis ĝin meze de la ĉambro kaj sidiĝis, ~~mmmm~~ large dismetinte la piedojn kaj stariginte inter ili a sabron. Poste li elprenis nazumon en ora ingo, viŝis ĝin per neĝblanka naztuko, metis ĝin sur la nazon kaj kun vigle-memkontenta rideto ĉirkaŭrigardis ĉiujn sidantojn, sin apogante per ambaŭ manoj je tenilo de la sabro, kvazaŭ ĝuante pro tio, ke oni forlasis sian okupadon kaj atente observis ĉiun movon de li.

— Daŭrigu, mi petas, vian okupadon, - li diris. - Se mi ne eraras, mi havas honoron ĉeesti sciencan okupadon.

— Jes! - interpingrante la manojn kaj sin apogante je la tablo, diris Julia Andreevna. - Vi ĵuste konjektis, s-ro leŭtenanto, ni nin okupas je scienca novaĵo, je genia elpensaĵo de d-ro Za- menhof, kiu estas nomata lingvo internacia Esperanto.

La leŭtenanto faris ironian mienon kaj ekfumis cigaredon.

— Nil novi sub sole! Ŝajne, mi precize transdonas la esprimon antikvan de romanoj, juna sinjoro, - li sin turnis al Joĉjo, lerte ellasante el la buŝo en aeron aron de malgrandaj fumring- etoj. - Mi konfesas, mi antaŭ longe studis la lingvon latinan kaj... supiĉe malbone. Tamen mi memoras ankoraŭ ion.

— La plejo parolas, ke en Esperanto estas tre multaj latinaj radikoj, tial, George, vi facile povos lerni ĝin kun ni, - diris Olrjo kun entuziasmo de fervora samideanino.

— Mi dankas vin, Olrjo! - li faris facilan kapklinon en flankon de la knabino. - Nenio nova estas sub la, suno, estimata Julia Andreevna! Jam multajn jarojn oni revas krei tutmondan lingvon, jam estis multaj provoj de tio antaŭ Esperanto, kiu estas ankaŭ unu el ili, sed ĉiuj ili havis ĉiam saman rezultaton: la provoj ĉiam restas nur provoj kaj plu nenio. Grandan bruon faris antaŭ nelonge Volapuk kaj silentiĝis... forlasita de ĉiuj. Kun bruetas Esperanto... Ho, ĝi silent- iĝos pli baldaŭ. Vi ne forgesu, ke Volapuk estis disvastigita tra la tuta mondo, kion neniam suk- cesos Esperanto, ĉar nun restis jam ne multaj revenuloj kaj mi dubas, ke iu serioze studus tiun ĉi frumaturan fuŝaĵon de d-ro Zamenhof...

— Zamenhof! - korektis Olrjo kun malkontenta mieno.

— Pardonu! Ha, Zamenhof!... - diris la leŭtenanto, bruligante la cigaredon estinĝigintan. - La aŭtoro de Volapuk... mi forgesis lian nomon, mi scias nur, ke li estis episkopo protestanta, se mi ne eraras, de Danujo, - la aŭtoro de Volapuk siatempe akiris tutmondan gloron pro sia elpensaĵo kaj tiu ĉi gloro nun tute ne donas trankvilon al diversaj instruituloj. Imitante lin, ili ĉiutage aperigas novajn kaj novajn tutmondajn lingvojn, kiuj, laŭ sciigoj de gazetoj, aperas, kiel fungoj post pluvo. Tio ĉi estas tute ne mirinda: nenio estas pli facila, ol verkado de lingvoj tutmondaj kaj nenio estas pli profitdona, ol eldonado de iliaj lernolibroj...

-Ĉu vi ŝercas aŭ serioze parolas, s-ro leŭtenanto?- diris Julia Andreevna, al kiu plaĉis nek
z pieremа mempido kun kiu li parolis pri la objekto, kiun, ŝajne, li tute ne konis, nek lia enmiks-
iĝo ĝenerale.-Se vi ŝercas, do tiu ĉi ŝerco, ŝajne, estas ne ĝustaloka, kaj se vi parolas...
—Pardonu! Nun mi vidas, ke mi surpaŝis ne intence vian kalon!..- la leŭtenanto diris, subite
arante seriozan mienon kaj apogante siajn ŝultrojn al dorsa parto de la seĝo.- Mi tute deziras nek
nniksiĝi en vian sciencan okupon, nek malhelpi al vi, nek disreviĝi vin. Mi simple nur volis mon-
zi al vi tiun cirkonstancon, kiun oni ordinare ne atentas... mi volis nur demandi: ĉu
e vana estos via laboro? Ĉu oni povas kompreni, parolante aŭ eĉ korespondante en tiu ĉi lingvo,
ne la alian?.. Kompreneble, homoj de sama nacieco, komprenas unu la alian, sed ĉu povas
ompreni, ekzemple, franco... nu... nu, anglon?..
—Ili komprenas!- laŭte kaj decidoplene subite diris Joĉjo, al kiu tre ne plaĉis la danda as-
ekto de la oficiro kaj lia malamika rilato al la opero, kiun li tiel amis. Li ruĝiĝis kaj konfuziĝ-
ne kaj timeme mallevis la okulojn. Malgraŭ rigardoj kaj okulsignoj aprobaj de Olnjo kaj gra-
ino Irina, kiujn li ne rimarkis, al li ŝajnis, ke li diris ion maldelikatan kaj ofendan por la
eŭtenanto.
—Ĉu vi tiel opinias, juna sinjoro?.. Ĥa-ĥa-ĥa!..- laŭte ekridis la leŭtenanto, metante la spa-
don sur la genuojn kaj per la manoj ambaŭ tordante la lipharojn. Sed, rimarkinte, ke lia ridado
ne havis tiun efikon, je kiu li esperis, ke oni aprobe kaj serioze rigardis la junulon, li baldaŭ ĉesigis
a ridadon kaj kun rideto ironia kaj pikemeco sin turnis al li:
—Mi ne disputas, juna sinjoro. Eble, ili komprenos... kvankam mi tre dubas je tio ĉi: ne forgesu,
e en parolmaniero de franco kaj de anglo estas tia granda diferenco... Krom tio, vi, provia troa
ioneco, mi opinias, ne estas kompetenta juĝanto en la afero!.. Tial mi montros al vi tute kontraŭ-
n opinion de unu kompetentulo! En nia regimento, en la sesa voto estas kapitano Rjabkov. Li
stas homo de respektinda aĝo, sekve, ne knabo, kiel vi, ne junulo... nu, li havas emon lerni ĉion.
Ĝis li eraŭdos pri io nova, originala, li tuj aĉetas lernolibrojn kaj studas fervore. Tiamaniere li stu-
lis stenografion, mnemonikon, tre longan tempon li obstine sin okupis je spiritismo... kaj je ceteraj
tiablaĵoj... Vi vidas, juna sinjoro, ke li estas homo serioza, saĝa! Nu, li studis ankaŭ Esperanton,
-la leŭtenanto subite silentiĝis, kvazaŭ perdinte interligon de siaj pensoj, ruliniĝis kaj ekrapis
per la spado je la planko.
—Daŭrigu, daŭrigu, s-ro leŭtenanto,- diris grafino Irina, fikse rigardante la oficiron kaj for-
kuante ion de sia brusto.- Tio ĉi estas tre interesa!
—Kompreneble, li forlasis ankaŭ Esperanton...- per voĉo pli mallaŭta aldonis la leŭtenanto,
rdiĝante sur la ŝultro la portepeon.
—Nu, kion do parolis la kapitano?- demandis Olnjo, videble, ne kontentigita de lia parolo.
—La kapitano?- kun miro demandis la leŭtenanto, kvazaŭ ne komprenante, kion oni po-
stulas de li.- La kapitano... nenion parolis... li estas homo ne parolema...
—Sed vi volis pruvi, ke alilandanoj ne komprenos unu la alian, se ili parolos en Esperanto!-

diris Olnjo.

—Kiu?.. Ĉu mi?.. - ekmiris la oficiro. - Ni eĉ ne supozis...

—Ne, vi volis pruvi! Vi diras malveron!.. - laŭte, preskaŭ kriante, diris Olnjo, leviĝante de la ĉeĵo kaj aplaŭdante.

—Vi volis pruvi...

—Vi volis...

—Vi promesis, - jam kriis ĉiuj kaj laŭte ridis, ĝojante la malsukceson de la ~~la~~ leŭtenanto.

—Tamen, jam estas deka horo! - li diris multesignife kaj ekmarŝis tra la ĉambro.

—Sinjoro leŭtenanto ne povis pruvi, kion li promesis: liaj vortoj estas senargumentaj! - diris ĉeĵo, stariĝante, per voĉo trankvila kaj ne laŭta, tute ne atentante la oficiron kaj ĝoje rigardante en la okulojn de la ĉeestintoj, kiuj aprobe okulsignis kaj kapbalancis al li. - Sed mi ripetas, ke iuj ajn estus alilandanoj, ili nepre komprenos unu la alian, parolante en la lingvo internacia esperanto! Pro ke mi ne estu senbaza, kiel tiuĉi oficiro, mi turnos vian atenton al jena fakto: somere, antaŭ du jaroj en la fame-konata rusa ĵurnalo „Nedjelja" estis presita artikolo „La svedoj en Rusujo". En tiu ĉi artikolo oni rakontis, kiel du svedaj studentoj de Upsala universitato - esperantistoj, kiuj ne sciis eĉ unu vorton rusan, vizitis Odeson kaj dum longa tempo interparolis sole en Esperanto kun tieaj rusaj esperantistoj pri kia ajn temo, sentante neniun embarason!..

—Sekve, ili komprenis unu la alian?- demandis Julia Andreevna kun la okuloj brilantaj pro ĝojo.

—Ili komprenis!.. - laŭte diris Jeĉjo kaj sidiĝis sur sian molan apogseĝon.

—Brave, brave!..

—Brave, sinjoro profesoro!

—Hura!..

—Brave! - ekstondris laŭtaj voĉoj de ĉiuj flankoj, jus li sidiĝis.

—Kia li estas modesta, milda... ŝaĝa!.. - diris grafino Irina, kun entuziasmo rigardante Jeĉjon kaj facile karesante per la mano Memeka'on. - Kiaj ĉarmaj estas liaj kaŝtankoloraj okuloj!..

Dum la vespero ĉiuj libroj, kiujn alportis Jeĉjo, estis disprenitaj sen restaĵo kaj oni ree petis lin, ke li mendu ankoraŭ la librojn en pli granda kvanto.

VII.

Antaŭ kelkaj jaroj.

Andrej Romanoviĉ Veselov - la patro de Olnjo vidviĝis antaŭ dekses jaroj kaj nun, krom Olnjo, li havis nenian parencon. En la urbo li loĝis nur ~~la~~ unuan jaron, pli ĝuste unuan vintron, kaj printempe li intencis reveni en sian bienon Veselovo'n, kie li pasigis jam pli ol dek jarojn, nenien elveturante, krom malofte kaj mallongaj vojaĝoj en iun el la ĉefurboj.

Lia avo, ~~la~~ grafo Veselov, estis tre riĉa kaj meritoplena homo. Pli grandan parton de la vivo

li pasigis en eksterlando kaj dum sia juneco li servis en kortega gvardio. Krom Veselovo, kun pli ol okcent servutuloj, li posedis ankoraŭ riĉajn bienojn en la sudo; tamen la lastajn li preskaŭ neniam vizitadis kaj kontentiĝis je ricevado de enspezoj de ili, kiujn oni akurate sendadis al li. Post lia morto – la grafo dum ekscitiĝo sin mortigis el pistolo – ĉiujn riĉaĵojn heredis lia sola filo, la patro de Andrej Romanovič, kiu baldaŭ pro ia krimo perdis la grafan titolon. Post kelkjara mastrumado malgerta, dum kiu li seniĝis je ĉiuj bienoj, krom Veselovo, li, ĝuste en kvindeka datreveno de sia naskiĝo, ankaŭ sin mortigis, jetiĝinte dum promeno el boateto en la riveron.

Tiu ĉi tragedia morto de la patro neniom mirigis Andrej'on Romanovič, kiu tiam estis studento de Peterburga universitato. Ricevinte sciigon pri la morto de la patro, oni parolas, li ne forlasis la ĉefurbon, ne revenis hejmen por doni al la malvarma korpo senviva de la patro lastan kison, sed kunvokis siajn kolegojn kaj dibočis kun ili dum du tagoj.

– Leĝoj de la naturo estas enigmoplenaj, sed ne sanĝeblaj, – li poste parolis por sia pravigo. – Atavismo estas seriozaĵo!... Se la patro sindronigis, la avo sin mortpafis kaj, eble, la praavoj ankaŭ unu pendigiĝis, alia veneniĝis kaj tria tratranĉis per razilo sian gorĝon, do mia vivo ankaŭ sendube finiĝos de mia propra mano. Dum sorto ankoraŭ ne decidis, al kiu el ili mi devos imiti, mi penu preni de la vivo ĉion preneblan.

La universitaton li forlasis kaj, allogiĝinte je teatro, decidis sin dediĉi al la arto. En provincaj teatroj li havis sukceson, sed baldaŭ li estis devigita forlasi ankaŭ tiun ĉi karieron kaj transloĝiĝi en Veselovo'n, kiam malsaniĝis unu lia parenculino, kiu administris la bienon.

La granda domo komforta, konstruita ankoraŭ de la avo kaj delonge nevidita de li, ĝiaj riĉaj arĥivoj kaj grandaj provizoj'da libroj malnovaj, – ĉio tio ĉi forlogis la junan mastron. Kaj, anstataŭ obsezvado de grenkampoj, falĉejoj kaj brutaroj, li profundiĝis en memkleriĝon. Kun helpo de doktoro Ĥvatov – lia iama kolego je la lernado kaj plej intima amiko, – li ordigis la avan bibliotekon, kompletigis ĝin per verkoj de pli malfruaj verkistoj kaj scenelire pasigadis en ĝi tagojn kaj noktojn. Okaze trovinte en la arĥivoj kelkajn interesajn historiajn dokumentojn, proksime tuŝantajn reĝadon de Aleksandro I, li komencis grandan kaj seriozan laboron historian de tiu epoko. Kelkaj belaj rakontoj kaj poemoj ankaŭ aperis sub lia plumo dum tiu ĉi periodo.

Dum la juna bienhavanto laboris tiamaniere en la biblioteko kaj lia administrantino de la bieno malsanis, liaj enspezoj malgrandiĝis ĝis tia grado, ke, fine, ili ne estis sufiĉaj eĉ por kovri liajn ĉiutagajn modestajn elspezojn. Tiu ĉi cirkonstanco nepovis kaŭzi eĉ de okuloj de planka homo, kia estis la doktoro, kiu antaŭ nelonge ricevis oficon en najbara urbo kaj ofte viziadis la amikon.

– Vi devas edziĝi! – serioztone li diris al Veselov dum unu sia vizito. – Se vi daŭrigos vivi tiel sa-

me ankoraŭ unu-du jarojn, vi, kredu al mi, restos sen ĉio necesa, sen botoj kaj ĉapelo kun sola. Via biblioteko, ke diabloj ĝin preru! Pripensu tion ĉi, dum dixi et animam levavi, kiel paroliś antikvuloj-romanoj.

— Edziĝi? — Veselov ekkriis vigle. — Kial tiu ĉi penso neniam pli frue venis en mian kapon?

Kaj tiun ĉi penson li ekkaptis, kiel ekraptas dromanta homo preternaĝantan pajleron, ĉar efektive nur en edziĝo li povis ricevi savon de ĉiam pli kaj pli minacanta plena ruiniĝo de la bieno. De sia edzino estonta li deziris nek belecon, nek klerecon, nek ricêcon. Ŝi devis nur savi la bienon, zorgi pri ĝi kaj pri la edzo kaj liveri al li eblecon senmalhelpe sin okupi je la amataj laboroj.

En najbara vilaĝo Novoselka estis riĉa vilaĝano maljuna Sorohov, antaŭe posedinta butikon kaj dum la lasta tempo sin okupinta je arbarkomerco. Al liaj servoj Veselov sin turnadis ne unufoje dum la malfacila financstato, jen vendante al li ian arbaran parcelon de la bieno, jen prunteprenante de li ian monsumon. La maljunulo estis homo sagaca, afabla, sciinta bone sin teni ne sole en societo de komercistoj, sed ankaŭ meze de sinjoroj kaj bienhavantoj, kun kiuj li ofte havis interrilatojn. Hejme, kiel homo komerca, li estiś malofte kaj mallonge, senĉese jen veturante en urbojn, aŭ observante laborojn en arbaroj.

En la vilaĝo li havis grandan domon, laŭurbe meblitan kaj ornamitan, kelkajn ĉevalojn kontrolajn kaj brutaron, kiujn observadis kelkaj geservistoj. Malgraŭ liaj oftaj forestoj, hejme ĉio portis ĉiam postsignojn de rimarkinda ordo kaj bonordonemeco. Ĉiu afero en la masturno estis farata ĝustatempe kaj konvene, neniu el la geservistoj estis iam senlabora, sed ĉiu el ili de mateno ĝis nokto havis severe-difinitan taskon. La vivo de la domo se ne bolis, kiel akvo, do ĝi pasis almenaŭ laŭ precize ellaborita plano akorde kaj flue, malhelpata de nenio.

La familio de la maljunulo estis ~~mal~~granda. Ŝi konsistis nur el du virinoj, — unu filino kaj unu maljunulino, kiu, antaŭ longe akceptita de Sorohov en la familion, komence kiel ĉambristino, poste, plenumante vicon de specialaj servoj de tajloristino, vartistino, fine, fariĝis, post morto de la mastrino, ŝia anstataŭantino. Ŝia nomo estis Zinovia Vedeneevna. En la momento priskribata ŝi estis jam maljunulino kaduka, kiu pasigis tagojn en preĝado kaj legado de religiaj libroj en sia ĉambro, kiun ŝi preskaŭ ne forlasadis. Ĉiuj zorgoj pri la mastrumado kuŝis sur la filino de Sorohov — Nadeĵda Pavlovna, kiu ellernis neordinare-sukcese tiun ĉi arton de la maljunulino. Ŝi estis tridekdujara fraŭlino, kiu je nenio distingiĝis de samaĝaj virinoj vilaĝaj. Ŝiatempe ŝi havis multajn fianĉojn, sed sorto ne kunigis ŝin kun iu el ili. Ŝi estis nek bela, nek ne bela, altkreska kun dika vizaĝo kaj bone disvolvitaj manmuskoloj. Nek bone legi, nek skribi ŝi povis, sed anstataŭ tio neniu en la vilaĝo povis pli bone kaj pli lerte falĉi, rikolti kaj mastrumadi.

Veselov konis ŝin, ŝatis tiujn ĉi ecojn de ŝi kaj nun, kiam penso pri edziĝo tiom subite estis altrudita al li de la amiko, li decidis, ke pli konvenan edzinon, ol ŝi, li trovos nenie.

Kiam la doktoro sciiĝis la intencon de la amiko, li estis surprizita.

— Sevi serĉus bonan laboristinon, — li diris post longa pripensado, — mi sendube tuj aprobus vi-

an clexton, sed vi ne forgesu, ke vi bezonas ne laboristinon, sed edzinon. Ne sutor supra crepidam, - parolis antikvulo j-romanoj. Ne forgesu ankaŭ tion, ke ŝi estas malkleruline. Ĵnagu al vi, ki- an edukon ŝi povos doni al la infanoj, se vi havos ilin de ŝi? Kian influon?.. Vi diros, ke vi mem edu- kos ilin, sed vi mensogos, ĉar influo de patrino ne estas anstataŭebla. Vi instruos ilin, sed malbo- naj n heredojn la infanoj ricevos de ŝi kune kun patrinlakto kaj postsignoj de la malkvereco restos neelstrekeblaj en la infanoj malgraŭ via aŭtoritato, via instruiteco... Kun tia edzino estos riskople- ne aperi ie en societo; ĉiuj viaj konatoj povos tuj forlasi vin...

— Ĉu vi estos la unua el ili?

— Mi parolas ne pri mi. Sed vi estis ĝis nun akceptata à bras ouverts, kiel parolas francoj, de la guberniestro, nobelaro. Se ili sciiĝos pri via edziĝo je la vilaĝanino, ili tuj ĉesigos kun vi ĉi- uj n interrilatojn, ili fermados pordojn de siaj domoj antaŭ via nazo mem!..

La doktoro ĉiam antaŭe havis influon je Veselov, kiu ĉiam sekvis tuj liajn konsilojn, sed je tiu ĉi fojo li longe vane konvinkis la amikon, ke la simila edziĝo estas frenezeco, pašo danĝera. Veselov silen- te aŭskultis la flamajn parolojn de la amiko kaj restis nešanceliĝebla eĉ tiam, kiam la doktoro duonŝerce-duonserioze eksminacis disiĝi kun li por ĉiam.

Pasis kelkaj tagoj. La amiko repaciĝis. La doktoro ree venis en Veselovo'n por kelkaj tagoj kaj tiun ĉi cirkonstancon bonuzis Veselov por fine plikolarigi demandon pri la edziĝo. Li estis konvink- ita, ke Nadeĵda Pavlovna ne rifuziĝos pariĝi lia edzino, sed li tre timis la maljunulon, kiu estis tre obstina kaj povus facile dijekti ĉiujn planojn. Dum proksima dimanĉo oni decidis inviti en Veselovo'n la maljunulon por serioza konversacio.

Li venis vespere, en kaleŝo speciale sendita por li, parade vestita je moda surtuto, blankaj gantoj kaj oraj okulvitroj, kiujn li uzadis nur en plej gravaj vivokazoj. Antaŭe, kiam Veselov be- zonis je intervidiĝo kun Sorokov, li neniam sendis por li sian ĉevalon, kaj nun antaŭsento de io ne- ordinara, okazonta dum la vizito, igis la maljunulon strečiĝi. Li sciis, ke en la domo sinjora li povas renkonti homojn flankajn, - eble, altrangulojn kaj li nevolis montriĝi antaŭ ili malĝentileulo. Ve- selov, kiu estis en tiu ĉi tago en bonega humoro, renkontis afable la gaston en la antaŭĉam- bro kaj konduk is lin en la gastoĉambron, kie, kutime, estis neniu, krom la doktoro.

— Mi havas honoron prezenti al vi, - diris Veselov, - mian malnovan amikon - doktoron.

La gasto respektoplene riverencis al la doktoro, post kio ili ambaŭ intersanĝis manpremon. Ĉiuj sidiĝis en molajn apogseĝojn kaj en la ĉambro ekregis silento.

— Estas agrable kaj utile havi doktoron amiko, - la komercisto komencis, ordigante la okulvitrojn.

— Mi ne dirus tion, - gaje kaj ŝerce respondis la mastro. - Homoj de tiu ĉi profesio estas tiel danĝeraj, ke tre prudente agas tiuj, kiuj flankiĝas de ili eble plej malproksimen.

La doktoro ekridis, kvazaŭ la parolo tute ne rilatis al li, elprenis cigaron kaj diris:

— Ne sin ĝenu, mia amiko. Sans façon, sans gêne, - kiel parolas francoj. Daŭrigu, mi...

— Mi komprenas, ke mia parolo ne plaĉas al vi, sed ĉu ne vi mem parolis al mi ne unufoje, ke

mi ne mortos „sen via helpo"... Ĝustokaze, kiam mi lernis en la universitato, mi memoras, tie estis unu profesoro germano, tre interesa homo li estis. Malgraŭ sia longedaŭra vivo en Rusujo, li neniel povis venki kelkajn „malfacilaĵojn" de la rusa lingvo. Ekzemple, li ĉiam kunmiksis du malsamajn esprimojn: „dank' al" kaj „malgraŭ". Pro tio estis kurioze aŭdi, kiam li parolis al siaj studentoj: „tiu ĉi malsanulo, dank' al nia kuracado, mortis hodiaŭ", aŭ „tiu ĉi malsanulo, malgraŭ nia kuracado, saniĝis"...

La mastro kaj la gasto ekridis.

—De mia flanko al la dirita mi devas fari unu rimarkon, — diris la doktoro, naze ellasante ringojn de tabakfumo. — Ni doktoroj, ankaŭ ĉasistoj, estas en tiu ĉi rilato pli malfeliĉaj homoj. Oni rakontas pri ni tiom da nekredeblaj anekdotoj... Eble mia apudesto ĝenas vin? Mi tuj foriros. A la bonne heure! — kiel parolas francoj.

Kaj, fajfetante ian gajan melodion, la doktoro malrapide eliris.

—Ĉu li koleriĝis? — la gasto demandis.

—Kiu? Ĉu la doktoro?.. Neniam! Li estas tre stranga homo — li tute ne scias koleri, vere... Sed ni lasu la doktoron. Mi forgesis peti de vi pardonon, ke mi maltrankviligis vin per la sendo de la kalešo.

—Kian maltrankviligon vi aludas, sinjoro? Porviaj servoj mi estas preta ĉiam tage kaj nokte, — rediris la maljunulo, stariĝante kaj respektoplene riverencante al la mastro.

—Mi tre bezonas je vi... je via helpo...

—Mi ĉiam estas ĝoja servi al vi, sinjoro.

—Vi ne maltrankviligu pri tiu monsumo, mi petas, kiun mi lastfoje prunteprenis de vi...

—Pri tiu ĉi bagatelo vi vane, sinjoro, rememoras, — diris la maljunulo pli proksime almovante sian seĝon al la mastro kaj ruze ridetante.

Li jam delonge konis financstaton de Veselov, prunte donadis al li monon kaj pli ofte, anstataŭ mono, li ricevadis bonajn arbarparcelojn de la bieno. Li esperis, ke post iom da tempo tiamaniere trafos en liajn manojn la tuta bieno.

„Jen por kio li, karulo, invitis min", — ekpensis la maljunulo. — „Sajne, nun estas bona okazo por fini por ĉiam demandon pri la bieno... Mia antaŭsento neniam trompas min."

—Tiun ĉi monsumon mi repagos al vi baldaŭ... Mi esperas, ke baldaŭ mia mastrumado pliboniĝos kaj mi ne havos bezonon plu prunteprenadi...

„Tio ĉi estas malbona afo", — ekpensis ree la maljunulo ektusinte kaj per rapida movo liberiginte la dikan kolon de nekutima, premanta ĝin, amelita kolumeto de la ĉemizo. — „Kion do li volas de mi?"

—Vi scias, ke mi estas homo jam ne juna kaj soluto...

Ĉe tiuj ĉi vortoj la doktoro same malrapide, kiel li eliris, eniris en la ĉambron kaj, demande ekrigardinte la amikon, okupis sian seĝon.

—Mi estas ĉiam okupita... kaj mi scias nek mastrumi, nek... mi tute ne havas tempon. Oni rabas mian havaĵon, ruinigas la bienon...

—Vere,-diris la maljunulo, en la uzaj okuloj kies ree ekbrilis ia espero.—Vi diras veron.

—Ĉion tion ĉi mi konsideris delonge kaj nun mi havas nur unu eliron el la stato malfacila. La doktoro... mia amiko konsilas al mi, ke mi edziĝu...

—Donu Dio, sinjoro, sukcesON al vi en la intenco.„Bona edzino,-parolas malnova proverbo,—edzon trankviligos kaj lian havaĵon konservos".

—Mi estas malnova via konato kaj najbaro, Pavel Ivanič. Mia patro ankaŭ ĉiam uzis vi-ajn servojn kaj estimis vian familion. Ordinare en similaj okazoj oni alkuras al servoj de virino-svatistino, sed pardonu, mi petas, mi estas...

—Mi anstataŭas ŝin,-laŭte diris la doktoro, forlasante la seĝon kaj rektiĝante antaŭ la maljunulo.—Pavel Ivanič...

—Pardonu, sinjoroj, eble pro la maljuneco, eble pro mia malklereco, mi ja malofte estas mezze de homoj sagaj kaj instruitaj, sed mi ne povas kompreni, kian rolon povos ludi mi en la intencata edziĝo...-la maljunulo interrompis la doktoron.

—Volu aŭskulti, estimata Pavel Ivanič,-la doktoro daŭrigis.-Ĉar li estas edziĝonta, li nature hodiaŭ estas iom nervema, li alpasas al objekto de la konversacio ne ĝuste, sed ĉir-kaŭvoje. Kompreneble, ni pardonos al li tion ĉi. Kiel lia malnova amiko, mi aktutimiĝis ĉiam partopreni en liaj personaj aferoj, ankaŭ nun. Vi konas lin bone, li estas galant homme, kiel parolas francoj, senriproĉe-honesta homo, instruita kaj tia bonulo, kiujn oni povas nun malofte renkonti. Ĉiam okupita je siaj laboroj kabinetaj, li nek scias mastrumadon, nek havas tempon por tio,-alia afero estus, se li trovus edzinon spertan je tio, kiu prenus sur sin ~~ta~~ mastrumadon de la bieno. Kompreneble, fianĉinoj estas troveblaj multaj, sed neniu el tiuj, kiujn li konas, kontentigas la lastan postulon, krom, mi kuraĝas diri tion ĉi al vi bo-na fide, kiel parolis antikvuloj-romanoj, sincere, krom via filino-Nadeĵda Pavlovna, ki-es manon petos mia amiko... Jen estas mallongige la afero. Via filino estas fama mastri-ino, ŝi baldaŭ ordigus la bienon kaj per tio feliĉigus mian amikon.

La maljunulo ne atendis tian aferturnon kaj estis samtempe mirigita, tre kortuŝita de la honoro, elmontrita al li-simpla vilaĝano de la sinjoroj, kaj ofendita. Li longe povis respondi nenion pro emocioj, ekregintaj lin. Lia vizaĝo ruĝiĝis, sur la frunto aperis ŝvitgutoj, la okuloj, kiuj ankoraŭ antaŭ nelonge ruze briletis je atendo de ia bona profito ricevota, malluminiĝis kaj vagis konsternite tra la ĉambro. Fine, kolektinte fortojn, li eksparolis per voĉo tremanta, interrompa.

—Kaj mi-maljunulo?.. Mi ristos kun kiu?.. Zinovia Vedeneevna estas maljunulino kadukaj kaj ŝi apenaŭ moviĝas sen flanka helpo... Ne, sinjoroj! Mi tre dankas vin por la honoro,

sed mia filino ne estas taŭga por vi. Ŝi ja estas vilaĝanino, ŝi estis nenie, ŝi vidis nenion, ŝi eĉ paroli nescias kun noblaj sinjorvj.

Veselov enmiksiĝis en la interparolon. Li kune kun la doktoro argumentis kontraŭan. La maljunulo longe restis obstina kaj ripetis la samaan, fine, li svingis per la mano kaj diris:

—Demandu ŝin mem, ĉu ŝi deziros esti via edzino?.. Estu volo de Dio!..

Veselov promesis viziti Sorokhov'on morgaŭ tagmeze por prikulariĝi la aferon kaj ili disiĝis.

La doktoro rifuziĝis de la vizito kaj Veselov sola forveturis al la fianĉino. Al la difinita tempo en la domo de Sorokhov estis preparita tablo kun luksa manĝaĵo kaj vinoj. La mastrino estis vestita simple, sed kun bona gusto. La maljunulo malofte aperadis en la ĉambro, ne dezirante ĝeni per sia apudesto la interparolintojn. Kion ili parolis, kion ili interkonsentis-estas sekreto, ĉar Nadeĵda Pavlovna kaj Veselov mem poste neniam parolis tion ĉi al iu. La interparolo daŭris ĝis vespero. En la oka horo Nadeĵda Pavlovna alvokis la patron.

—Nu, kio estas, mia anĝelo? - li demandis tremvoĉe.

—Bonu min, paĉjo!.. - ŝi respondis. - Mi estas konsenta fariĝi edzino de s-ro Veselov.

La maljunulo eksploris, kiel inspano. Per varmaj kisoj li longe kovris la vizaĝon de la filino, kiu estis kortuŝita kaj, ĉirkaŭkaptinte la kolon de la patro, ankaŭ ploris.

—Dio vin benos, mia filino! - li diris. - Mi vin ne ĝenas. Vi jam estas ne malgranda knabino. Nur poste vi ne bedaŭru, ke vi faris tian paŝon...

De tiu ĉi tago Veselov ŝanĝis sian vivmanieron. La kabinetaj laboroj estis forlasitaj por tempo pli konvena kaj la tuta tempo estis dediĉata ĉiutage nur al vizitoj de la fianĉino. Li, kiel enamiĝinta junulo, eĉ por unu minuto dum siaj vizitoj ne forlasis ŝin kaj sencese fotografiis ŝin en diversaj pozoj kaj amuzis per ŝercoj, rakontoj.

Veselov rapidigis, ke oni ekle plej baldaŭ aranĝu la edziĝofeston. Sed Nadeĵda Pavlovna parolis, ke ŝi havas nenion preparita por tia soleno kaj ŝi volas, ke ĉio estu farita dece kaj konforme al la okazo. Veselov cedis al ŝia deziro havi por la soleno novan vestaĵon edziĝan, sed li insistis, ke la soleno estu ekle plej modesta, senbrua.

La riton je la gefianĉoj plenumis en la paroĥa preĝejo vilaĝa maljuna pastro. En la ĥorejo kantis sola psalmisto. Ĉio estis tro modesta, sed malgraŭ tio la preĝejo ne povis enspaci ĉiujn, kiuj deziris vidi la gefianĉojn: amasoj de vilaĝanoj, virinoj kaj infanoj plenigis tute la preĝejon, ankaŭ eĉ la tombejon.

El la preĝejo la geedzoj veturis en Veselovo'n. Sastoj forestis, krom la doktoro kaj kelkaj plej proksimaj parencoj de la fianĉino. Sen toastoj, sen paroladoj pasis la tagmanĝo, per kiu finiĝis la soleno.

VIII.

Daŭrigo de la antaŭa.

De la unua tago de sia vivo en Veselovo Nadeĵda Pavlovna sin okupis je

mastrumado kaj ŝi baldaŭ enkonduxis ĉien ordon kaj ĝustecon, kiuj estis famaj en ŝia hejmo.

Vekiĝinte frumatene de la tago servinta, Veselov estis mirigita, ne trovinte en la lito la edzinon. Fenestroj de la dormoĉambro, turnitaj al la ĝardeno, estis malfermitaj kaj en la ĉambron kune kun gaja birdkantado enfluis per larĝa ondo floraroma matena. La mateno estis bela. Akutimiĝinte frue ellitiĝi, Veselov rapide forlasis la dormoĉambron kaj venis en sian laborĉambron. Tie estis neniu, kvankam li tuj rimarkis, ke ies mano zorgema lasis tie siajn freŝajn postsignojn: sur la tablo ĉio estis ordigita, polvo, antaŭe dum kelkaj tagoj ne forviŝata, forestis kaj mere de la tablo, kontraŭ lia seĝo, estis metita en vazo kvarcvitra luksa bukedo dajus ŝirita siringo. Li eksiris en la manĝoĉambron kaj sur ĝia sojlo li renkontis servistinon-knabinon, portantan al li glason da teo kun lia amata almanĝaĵo.

Li ŝatis trinki unu glason da teo tuj post ellitiĝo, sed ordinare li devis longe atendi ĝin, ĉar plej ofte teo ne estis preparita por li ĝustatempe. Sed hodiaŭ, ŝajne, ne observis eĉ lian ellitiĝon. Li gaje ekkaresis je la kapo la knabinon, eltrinkis la teon kaj eksiris tra la domo por trovi ie la edzinon. Sed kiel ajn li venus, ŝi ĉie forestis, kvankam postsignoj de ŝia antaŭ nelonga ĉeestado ĉie estis klaraj. Mirigita, li malsupreniĝis en la ĝardenon kaj sur aleokurbiĝo li renkontis, fine, la serĉatan. Nadeĵda Pavlovna, vestita je blanka vestaĵo, portis en la mano verŝilon. Ŝia vizaĝo esprimis kontentecon kaj trankvilecon. Ekvidinte la edzon, ŝi konfuziĝis, forlasis la verŝilon kaj rapide alkuris al li.

—Vi jam ellitiĝis? – ŝi demandis, kisante lin. – Ĉu iu malhelpis al vi? Ĉu oni ankoraŭ ne alportis al vi teon? – ŝi daŭrigis esuperŝuti lin per la demandoj, dume ŝian vizaĝon atakis' zorgo kaj maltrankvileco.

Veselov sidigis ŝin sur benkon, trankviligis ŝin kaj esprimis sian miron, kiam ŝi havis tempon poz ordigi ĉion en la domo. Li ankaŭ aludis la siringbukedon trovitan kaj pli severe rimarkis, ke ŝi devas dormi pli longe kaj ne atenti ĉiujn liajn kapricojn.

—Sed vi tiel ŝatas florojn!... – ŝi diris. – Por mi estis vera plezuro kolekti la bukedon, baldaŭ eksploros astroj – plej amataj miaj floroj, mi jus admiris je ili, akvumante ilin. Bedaŭrinde, oni ne zorgis pri la florbedoj.

El la ĝardeno Veselov revenis en la kabineton por daŭrigi la antaŭ longe forlasitan laboron kaj Nadeĵda Pavlovna iris en la kuirejon, paŝtejojn, kampojn.

De tago al tago en Veselovo la vivo daŭris trankvile, sensanĝe, kvazaŭ nenio okazis en la familio. Veselov laboris, kiel ĉiam, li multe legis kaj ĝuste en horoj kutimaj trinkis kaj manĝis. Nadeĵda Pavlovna ĉiutage de mateno ĝis vespero laboris en la domo kaj en la bieno. La geedzoj vidis unu la alian nur en la manĝoĉambro. Jafoje, vere, ŝi vizitadis lin, senbrue paŝante por ne malhelpi lian laboron, en la kabineto. Tiam li ĝoje forlasadis la laboron kaj legis al ŝi ian novan sian verkon, pli ofte versaĵojn, kiujn ŝi preferis, aŭ amuzis ŝin per fortepianludo.

Antaŭ la vintro jam montriĝis bonegaj rezultatoj de la lerta mastrumado: anstataŭ kutimaj malprofitoj la bieno donis grandan profiton al Veselov. Nadeĵda Pavlovna, kiel bona anĝelo, enportis en Veselovo'n felicon kaj trankvilon.

Sed, kredeble, jam tiel estas aranĝita la mondo, ke kie ajn ekloĝus felico, ĝi estas ne longedaŭra. La sama okazis ankaŭ en Veselovo.

Enfino de la vintro Veselov subite eksentis iajn strangajn simptomojn de malsano. Ĉu prosenelira kabineta laboro konstanta, ĉu pro ia kaŭzo alia, li eksentis komence kapdolorojn, kiuj ofte faris ian ajn laboron neeble, poste dum vesperoj aperis al li halucinacioj. Sian malsanon li longe kaŝis de la edzino, kvankam de ŝia atenta rigardo estis neeble ion kaŝi. Ŝi delonge rimarkis strangan ŝanĝon en la edzo, sed ŝi timis demandi lin pri ĝia kaŭzo, kaj tre suferis. Samtempe mortis Zinovia Vedeneevna. Ŝia morto enportis en la domojn ambaŭ maljojon. Nadeĵda Pavlovna tiel amis kaj tiel estimis la maljunulinon, kiu delonge anstataŭis al ŝi la patrinon, ke, ŝajnis, kun ŝia perdo ŝi seniĝis je io plej valora en la vivo. La malsaneco de la edzo kaj la morto de la maljunulino turmentis la virinon, kiu nenie povis trovi konsolon.

Pavel Ivanič, restinte sola, tre sopiris je la filino kaj je la maljunulino. Fine, li trovis konsolon en dzinkado. Li ebria kelkfoje vizitis la bopilon, sed tiuj ĉi vizitoj finiĝis pace ĝis tiam, kiam li unu fojon venis ebria en la kabineton de Veselov kaj eldiris al li multe da malĝentilaĵoj kaj arogataĵoj. Veselov estis surprizita, sciiĝinte de la bopatro, ke li, t.e. Veselov ne amas la edzinon, ke li perforte forprenis de li la filinon kaj faris ŝin malfeliĉa, ke ŝi ne similas al sinjorino, sed nur al servistino. Veselov komence aŭskultis tiun ĉi babiladon de la ebriulo tolereme kaj indulge, sed kiam arogantecо de la bopatro transiris limojn de ĉia toleremo, li koleriĝis kaj forpelis la gaston, ordonante plu neniam akcepti lin. La skandalon vidis Nadeĵda Pavlovna; pala, kun la vizaĝo dikektita de timo, ŝi staris ĉe pordoj, ne povante decidi, ĉu la edzon, ĉu la patron ŝi devis preferi. Kiam ili ambaŭ malaperis post la pordoj, ŝi foriris en la dormoĉambron kaj ploregis ĝis la vespero.

Baldaŭ post tio ĉi ŝi eksentis, ke ŝi estos patrino. Tio ĉi tiel ĝojigis ŝin, ke ŝi tuj kuris al la edzo kaj sciigis al li la novaĵon. Bedaŭrinde, ŝi ne supozis, ke tiu ĉi ĝoja sciigo estis neĝustatempa. Kiam ŝi eniris al la edzo, li kuris tra la ĉambro, kiel freneza, turmentata de doloroj. Ekvidinte la edzinon kun ĝoja vizaĝo, li koleriĝis kaj kun pugnoj kunpremitaj alpaŝis al ŝi. Ne povante kompreni kaŭzon de lia kolero, ŝi almetiĝis tamen al lia brusto kaj delikate sciigis la novaĵon. Lia vizaĝo sereniĝis por unu momento, rideto jam estis preta forgliti de la lipoj.

—Bone!.. — li diris, sed preskaŭ tuj li aldonis sektone kaj minace: — Mi bezonas heredonton... filon! Ĉu vi aŭdas? Se vi naskos knabinaĉon... mi mortigos vin ambaŭ! Ne forgesu!..

Tiu ĉi neatendita minaco tiel influis la malfeliĉan virinon, ke ŝi preskaŭ svenis. Poste, povante nek dormi, nek manĝi, ŝi pasigis tri tagojn en turmentiga maltrankvileco. Dum tiu ĉi

tempo, timante eraŭdi de la edzo ripeton de la minaco aŭ ion malagrablan, Nadeĵda Pavlovna tute evitis renkonti kun la edzo. La stato de la virino plimalboniĝis ankoraŭ pro tio, ke ŝi absolute ne havis ian homon proksiman, kun kiu ŝi povus konsiliĝi aŭ dividi la malĝojon. Fine, ŝi ekmemoris pri la doktoro. Ŝi skribis al li, kiel ŝi povis, grandan leteron pri la suspektinda malsano de la edzo, pri lia ne malpli stranga konduto kaj petis lin, je signo de la amikeco al la edzo, forlasi ĉiujn aferojn kaj veni en Veselovo'n. La letero estis skribita, kompreneble, sekrete de Veselov kaj sendita en la urbon kuriere.

La doktoro ne prokrastis eĉ unu minuton. Li komprenis, ke en Veselovo okazis io malbona, ke lia amiko, kapabla pari malsaĝajojn neatenditajn, faris artifikajon.

Nadeĵda'on Pavlovna li trovis kun la vizaĝo malgrasiĝinta, havinta postsignojn de daŭraj larmoj; Veselov mem, kontraŭ sia kutimo, estis ekster de la domo.

Kun atento la doktoro aŭskultis sinceran rakonton de la virino pri la okazintajoj kaj li tiel trankviligis ŝin, ke en fino de la konversacio, daŭrinta pli ol unu horon, ŝia vizaĝo akceptis iom naturan, preŝiĝintan aspekton.

Kiam ŝi forlasis la doktoron, lia vizaĝo siavice fariĝis zorgataksita kaj malagrabla. Paŝante de unu angulo al la alia de la kabineto de Veselov, li longe konsideris planon de sia ŝajado rilate al la amiko. Ĵom post iom li haltis, jen ekrigardante disĵetitajn sur la tablo foliojn de manuskriptoj, skribitaj per nervema, nelegebla skribmaniero, jen glatigante sian griziĝantan barbon, kio ordinare estis signo, ke la doktoro trankviliĝas aŭ trovis elirejon el ia embaraso malfacila. Atendante aperon de Veselov, li, fine, duonkuŝiĝis sur molan apogseĝo kaj ekfumis unu el cigaredoj, kuŝintaj en bela bronza tablocigaredujo.

La cigaredo ankoraŭ ne estis finita, kiam en la pordoj aperis Veselov. Lia vizaĝo estis malserena kaj ŝveliĝinta, la okuloj - mallumaj kaj ĉiuj movoj nervemaj kaj malpaciencaj. Ekvidinte la doktoron, li estis tre surprizita kaj unu momenton li staris senvoĉe kaj senmove.

— Vi fumas malbonegan tabakon, - komencis la doktoro. - Mi fumis nur unu vian cigaredon kaj jam mi sentas kapdoloron.

Veselov alproksimiĝis al la doktoro. La amikoj interŝanĝis manpremojn kaj kisojn.

— Vi, doktoro, ĉiam venas neatendite kaj ĝuste kiam mi bezonas je vi, - diris Veselov.

— Tio ĉi tre ĝojigas min, mia amiko. Sed en kio mi povas esti utila al vi nun. Via aspekto...

— Mia aspekto, mi scias, estas tezura, - interrompis lin Veselov, - sed imagu kiajn dolorojn mi sentas dum lasta tempo!.. Kaj dum noktoj nun mi tute ne laboras... mi ne povas... diablajo ĉia aperas antaŭ mi...

La doktoro aŭskultis kun ŝajna trankvileco, nur muskoloj sur la vangoj, maltrankvile moviĝintaj, atestis, ke li estis tre malproksima de la trankvileco ŝajna.

— Vi devas pli multe promeni kaj vin ekzerci sur freŝa aero... - li diris same trankvile. - Ĵetu tute vian laboron kabinetan.

— Ĵetu, vi diras!.. - ekparolis Veselov, nervemе ekpaŝinte laŭlonge de la kabineto. - Vi ĉiuj doktoroj

estas tiaj... vi ne komprenas, kian plezuron oni ĝuas dum verkado!.. Vi ne scias, ke mia ĉefa laboro estas estas antaŭ nur duonskribita, kaj rakontoj... Interalie, mi hieraŭ finis unu mian rakonton. Mi tuj tralegos ĝin al vi...

– Bedaŭrinde, por tio mi nun ne havas tempon. Vi prenu ĝin kun vi, kaj poste vi tralegos ĝin ĉe mi...

– Ĉe vi?..

– Jes! Mi venis hodiaŭ por preni vin kun Nadeĵda Pavlovna en la urbon. Mi ĉi intence dungis por vi trion da ĉevaloj. Ili baldaŭ jam staros apud la perono. Kiaj ĉevaloj!.. Mi veturis ĉi tien nur du horojn. Morgaŭ vizitos min mia kolego doktoro Pavlov, – li estas, interalie, specialisto je nervmalsanoj... Ankoraŭ ĉiestos kelkaj aliaj inteligentuloj. Vi ne bedaŭros poste pri tiu ĉi vojaĝo, ĉar vi pasigos la tempon tre ~~gaj~~ gaje... Sed se vi daŭrigos pasigadi tagojn kaj noktojn je la skribotablo, vi frenezigos! Do vi preparu vin por la vojaĝo! Nun estas la tria horo, post duonhoro ni devos forlasi Veselovo'n.

Veselov eksprovis kontraŭdiri, sed la doktoro estis necedema, li ne volis prokrasti eĉ unu minuton.

Per pasoj malrapidaj, nevolonte Veselov iris al la edzino, kiun li preskaŭ tute ne vidis dum la lastaj tagoj, por sciigi al ŝi la postulon de la doktoro kaj por prepari ĉion necesan por la vojaĝo. La doktoro kunĝoja mieno glatigis sian barbon.

La ĉevaloj, kiel ventego, kuregis laŭ bona vintra vojo. Facila prosto agrable tiklis la vizaĝojn kaj sonorileto gaje sonoris sub la arko de la meza ĉevalo. La doktoro ŝercis dum la vojo kaj liaj akompanantoj forgesis siajn malsanojn kaj malagrablajojn.

La doktoro havis grandan loĝejon, unu ĉambro kies je tiu ĉi pojo estis destinita speciale por la geedzoj. La vesperon ili pasigis en ĉeesto de du junuloj – muzikamantoj kaj unu bankoficisto – pasia kolektanto de poŝtmarkoj. Ili estis oftaj vizitantoj de la doktoro kaj en lia apudesto eĉ Nadeĵda Pavlovna sin sentis bonege. Ili ludis je violonoj, kantis, multe ridis kaj antaŭ vespermanĝo aranĝis nedaŭran kartludon.

Matene zee venis Pavel Petrović – la bankoficisto, alportinta kun si grandan albumon da poŝtmarkoj. Neniam antaŭe vidinte ion similan, Veselov tre interesiĝis je tiu ĉi sporto kaj longe konversaciis kun li pri la kolektado, decidinte ankaŭ komenci la kolektadon. Antaŭ la vespero venis ankoraŭ kelkaj urbanoj – konatoj de la doktoro, inter kiuj superstaris Angelinov – juna komencanta poeto, havinta sendubaŭ talenton. Li deklamis antaŭ la ĉeestantaro kelkajn siajn belajn versaĵojn. Veselov siavice tralegis sian lastan rakonton. La vesperon oni pasigis eĉ pli vigle ol la antaŭan. Dum la literatura konkuro aperis maljuneta doktoro Pavlov. Li estis malalta kreska grizharulo kun plej serioza mieno. Dum la tuta vespero li sidis flanke de la gastoj kaj interŝangis nur iafoje kelkajn vortojn kun la mastro.

Antaŭ vespermanĝo doktoro Pavlov ien foriris el la gastoĉambro, sed lian foriron, kompreneble, neniu rimarkis. Post iom da tempo la doktoro alproksimiĝis al Veselov kaj invitis

en sekvi post si por kelkaj minutoj. En ne granda, sed komforte aranĝita kaj bele ornamita kaj meblita, kabineto de la doktoro, kien li enkondukis la amikon, lustro veršis abundan molan elektrlumon. Sur tablo kušis medicinaj iloj, apud kiuj klopodis doktoro Pavlov. Veselov ankoraŭ ne havis tempon sidiĝi sur seĝon, montritan de la amiko, kiam Pavlov faris gestonjestan kaj pervoĉo ne permesanta kontraŭdiri, tamen delikata kaj ĝentila, diris:

— Nun volu senvestiĝi, sinjoro!

Veselov humiliĝis kaj metis sian korpon je dispono de la doktoroj.

La doktoroj ambaŭ sin okupis je penega esplorado komence de la koro kaj pulmoj de Veselov, dume li, humile plenumante iliajn postulojn, jen detenadis la spiradon, jen spiris plenbruste, estis transportita en sia imago ien malproksimen kaj tute atentis nek multesignifajn rimarkojn, kiujn interšangĝis la kolegoj, nek rezultaton ricevotan de ilia laboro fervoza. Li tiel jam alkutimiĝis plenumadi ĉiuspecajn „kapricojn" de la amiko, kiel li ordinare nomis siajn zorgojn pri si, ke li opiniis, ke la afero ne povis esti alie. Profundiĝinte en siajn revojn, li ŝajne sidis senmove eĉ tiam, kiam la doktoroj finis la esploradon kaj ion priparolis flustre inter si.

— Ni finis! - diris la doktoro. - Nun vi povas vestiĝi.

Veselov ekrigardis lin per la okuloj mirigitaj, kvazaŭ vekiĝinte de agrabla dormo interrompita. Sed tiu komprenis tiun ĉi rigardon, kiel signon de antaŭsento de io malbona kaj rapidis konsoli lin per kelkaj vortoj mallaŭtaj. Pavlov stariĝis kontraŭ Veselov, largĝe dismetinte siajn piedojn, metis la manojn en poŝojn de sia pantalono kaj, fiksinte sian rigardon en liajn okulojn, laŭte eksparolis, malrapide kaj kiel eble, plej klare prononcante ĉiun vorton:

— Via koro laboras bone, viaj pulmoj ankaŭ estos sufiĉaj por via vivo. Sed la nervaro devas esti serioze kuracata. Se vi deziras eviti nedezirataj surprizojn aŭ liberiĝi vian amikon la familianojn de malagrablaj eble okazontaj, vi devas nun doni al ni ambaŭ promeson ĝuste plenumadi nian konsilon. Ĉu vi donos ĝin al ni?..

Ĉe la lastaj vortoj de Pavlov, Veselov eĉ ekstremis nevole. Tiel mistera kaj stranga kaj samtempe ofende-serioza estis la demando. Li eĉ ne havis tempon por konsideri, kion oni postulas de li, sed Pavlov per la sama tono kaj parolmaniero daŭrigis:

— Bonege! Vi promesas, - ja via silento atestas ĝuste tion. Alian konduton, kompreneble, mi ne atendis de vi... Vi alkutimiĝis al serioza labor kabineta, nu, - ĝi estas malutila por vi. Sed, ĉar mi scias, ke estas malfacile tuj forlasi kutimojn, kiuj ajn ili estas, mi ne malpermesas al vi ilin tute. Ĉiutage vi povas labori unu, nu, du horojn, sed ne pli multe!.. Jes, ne pli multe! Nu... Trinku iom da bona vino, promenu, vin ekzercu iamaniere en freša aero kaj ĉefe... ĉefe vi evitu ĉi tiun solecon! Jes!.. Vi penu, ke ĉiam estu apud vi ia „freša homo". Kiel aranĝi tion ĉi, mi ne parolos, ĝi estos tasko de via amiko, kiu helpos al vi ĝenerale realiĝi la konsilon.

Tiel finiĝis por Veselov lia kutima vivmaniero kaj komenciĝis la nova, ĉiu horo kies, alme-

kaŭ dum unua tempo, estis severe distribuita de la doktoro.

Veselov longe sentis ŝarĝon de laboro laŭ hortabelo, aranĝita de la amiko, tamen akrava la rigardo de la amiko, kiu longe ne forlasis lin, observis lin, ke la hortabelo estu ĝuste plenumita. Pli malfacila tasko de la doktoro estis trovi inteligentulojn, kiuj ĉiam vizitadus la domon de Veselov. Sed ĝi ankaŭ estis plenumita de li kun rimarkinda lerteco kaj pacienco. Li aranĝis en unu el multenombraj ĉambroj de la domo scenejon kaj invitis najbarajn instruistojn vilaĝajn, ankaŭ kelkajn siajn urbajn konatojn, partopreni en teatraĵoj, prezentotaj en Veselovo. Plimulto de ili restis en Veselovo kelkajn tagojn por lerni siajn rolojn, kiel estis kutimo de ĉiama ĉeestado en Veselovo de gejunularo, kiu post kelkaj jaroj fariĝis kutima kaj ne forprenebla apartenaĵo de tiea domo sinjora. Precipe multajn gastojn ĝi havis dum printempoj kaj someroj. Tiam ĉiu vaporŝipo, ĉiu vagonaro nepre venigis novajn gastojn al Veselov. Multajn el ili altiradis ne sole gastameco de la mastro kaj beleco ĉirkaŭ la biblioteko kaj partopreni en interesplenaj konversacioj kun Veselov, sed ankaŭ plena libereco, metita je dispono de la gastoj, kiuj pasigadis tempon en Veselovo laŭ sia plaĉo aŭ en ĉambroj kun libro en la manoj, aŭ je muziko, dancado kaj kantado, aŭ en la ĝardeno kaj grandega parko malnova, aŭ, fine, sur la rivero. La mastro ĉiam estis kun siaj gastoj jen tie, jen aliloke, arde partoprenante iliajn ludojn kaj distriĝojn. Neniu postulis de la gastoj, ke ili kunvenadu al teo aŭ tagmanĝo en fiksita horo, aŭ ke ili sekvu la hortabelon, plenumatan severe de la mastro,— en la manĝoĉambro ĉiam estis preta teo kaj manĝaĵoj kaj ĉiu ĝuis ilin, kiam li deziris kaj ĉiu, neniom sin ĝenante, povis gasti tie tiom da tempo, kiom li povis kaj volis. Veselovo vere estis tera paradizo por gejunuloj.

Bedaŭrinde, Nadejda Pavlovna ne ĝisvivis tion ĉi. Printempe, ĝuste post unua jaro post la edziniĝo, ŝi akuŝis. La naskprocedo estis daŭra kaj malfacila. La doktoro kaj akuŝistoj, ĉeestintaj la naskprocedon, faris ĉion eblan por plifaciligi la suferojn de la virino kaj savi la infanon, kiun vidi vivanta ili jam malesperis. Veselov, nenion sciante pri la danĝero, kiu minacis al la ido naskota, (tion ĉi oni kaŝis de li), maltrankviliĝis en sia ĉambro, tro longe atendante sciigon pri la naskiĝo. Li revis pri filo naskiĝonta kaj timis disreviĝon.

Noktmeze naskiĝis la infano. Ŝi estis tiom malforta, ke longajn penojn kaj multajn klopodojn devis uzi la doktoro antaŭe ol ekaŭdiĝis ĝia unua voĉo apenaŭ aŭdebla.

Tremo nerva trakuris tra la tuta korpo de Veselov, kiu per paŝoj neaŭdeblaj ĉiam marŝis tien kaj reen apud la pordo mem, kiam la ploro infana atingis subite lian orelon. Li, kiel frenezulo, jam kaptis per la mano tremanta ansoĉon de la pordo por eniri en la ĉambron de la edzino, sed tuj, konsiderinte ion, li iris en la kabineton, prenis revolveron kaj nur tiam enĝis al ŝi.

En la ĉambro estis mallume, ĉar lampo estis ŝirmita, ke ĝia lumo ne maltrankviligu la malsanulinon. Ŝi kuŝis duonsveninta pro granda perdo de sango kaj forto, super ŝi, klinigĝinte, staris la akuŝistoj. La doktoro tenis en la manoj malgrandetan ekzistaĵon, envolvitan

lajon kaj eligantan, malfortan plorkrion.

– Kiu ĝi estas?.. Ĉu knabo?.. Nomu lin Oliver ...– laŭtvoĉe diris Veselov.

– Vin, sajne, neniu vokis ĉi tien... All right,– kiel parolas angloj: Reiru, mi petas,– respondis la doktoro. – Vivenis ne ĝustatempe kaj maltrankviligas la virinon ankaŭ ŝian... filinon... – Baldonis, riĉante, ke liaj vortoj je tiu ĉi foje ne havas decan efikon.

– Filinon!.. – eksonis tondra voĉo de Veselov.– Mi tuj mortigos ilin ambaŭ...

– Kion vi faras?.. Frenezulo!..

Kaj antaŭe, ol la doktoro kaj la akuŝisto havis tempon por senarmiĝi lin, eraŭdiĝis paŝo-so, tuj post kiu sekvis terura krio de la virino kaj laŭtaj paŝoj de la forkuranta edzo. Feliĉe la vuglo trafis muron kaj ne malutilis al Nadeĵda Pavlovna. Tamen la ago freneza tiel efikis ŝin, ke ŝi longe ne povis rekonsciiĝi.

Veselov hontis je sia agaĉo kaj sin kaŝis ie de la amiko, kiu mem devis eĉ venigi pastron por bapti la knabinon. Li estis ŝia baptopatro kaj, invitita de li najbara komercistino, – Zoja Petrovna estis ŝia baptopatrino. Al la knabino oni donis nomon Olga, tiom similan al Oliver, ekstitan de Veselov mem por atendita filo.

Por la malfeliĉa doktoro aperis nova tasko urĝa. Ĉu pro la ektimo, ĉu pro ia kaŭzo alia, Nadeĵda Pavlovna ne povis liveri al sia ido eĉ unu guton da lakto. La doktoro, sciinta pri necesece de virina lakto por la infano, tute perdis kapon, serĉante mamnutristinon. Ĉiuj serĉoj de li estis vanaj, estis trovebla nenia virino sana, havanta bonan lakton superfluan. Fine, kon-vatis la knabinon ŝia baptopatrino. Ŝi rekomendis al la doktoro mamnutristinon, kiu loĝis en ŝia familio kaj jam dum du monatoj mamnutris ŝian filidon, kiun ŝi mem volis nutri pro-ramane. La nutristino, tuj venigita al la doktoro, montriĝis tute sana virino, forta kaj havanta abunde da lakto bonega. La saman tagon oni enloĝigis ŝin en la domo de Veselov. Ŝi baldaŭ alkutimiĝis al la knabino kaj examis ŝin, kiel sian propran filinon.

Pasiginte kelkajn semajnojn en lito, Nadeĵda Pavlovna jam tute resaniĝis kaj intencis jam foriĝi la nutristinon, sed ŝi baldaŭ malvarmumiĝis kaj tute neatendite, post unu semajno, mortis. Veselov tute perdis kapablon ion konsideri, li ploregis, kiel infano, ne for-lasante la mortintinon. Ree ĉiuj klopodoj pri enterigo de ŝi falis sur la doktoron. Veselov ne volis eĉ aŭdi, ke oni forveturigu la kadavron en la tombejon kaj petis, ke oni enterigu ŝin hejme en la ĝardeno. La doktoro telegrafis kelkfoje al la ĉefepiskopo, al la guberniestro kaj al aliaj gravaj personoj, petante permeson plenumi la deziron de Veselov. Fine, la dezirita permeso estis ricevita. Oni permesis enterigi la kadavron en la ĝardeno kondiĉe, ke su-per la tombo estu konstruita preĝejeto, kaj luksa ĉerko kun restaĵoj de Nadeĵda Pavlovna est-u enposita meze de granda ronda florbedo de astroj, kiujn tiom ŝi ŝatis,– ĝuste kontraŭ la balkono, nur je kelkaj paŝoj de la domo. Super la tombo oni ne faris kutiman tersurŝutaĵon, sed oni nur kompaktigis super ĝi teron, metis super ĝi dikan tavolon da bona tero kaj sen-interrompe plantigis ĝin per astrofloroj kaj peonioj. Poste Veselov metis meze de la florbedo mal-

endan lignan xrucon simplan xun la mallonga sursxribo grandlitera: „La edzino".

Pasis jaŭoj. Por konstrui preĝejeton super la tombo Veselov havis nek monon, nek deziron aj, xiel antaŭe, la izolita tombo ĉirkaŭata tradicie estis plen-plantata de la floroj, kiu ĵaluze aŝis en sia densa foliaro kaj diverskolora floraro la xruceton modestan, jam nigriĝintan kaj apenaŭ videblan de la balkono.

Post morto de Nadeĵda Pavlovna, šia patro vendis sian domon kaj teron kaj por ĉiam transloĝiĝis en Veselovo'n, xie li fariĝis nun administranto de la bieno. La maljunulo estis nekonsolebla pro la perdo kaj ĉiutage vespere kaj frumatene, kiam multĉenombraj loĝantoj e la domo ankoraŭ dormis aŭ forestis, oni povis vidi lin genuiĝinta apud la kara tombo. Liaj armoj ĉiutage abunde akvumis la teron kaj la xapo griza daŭre estis vidata kuŝanta sennove nter hela verdaĵo de la floroj.

Olnjo estis sola konsolo de la orfiĝintoj. La maljunulo-avo kaj Veselov pasigadis apud šia lulo multajn horojn liberajn kaj nur ĉe šia apudesto forgesis iom la perdon. Ŝi xreskis sana kaj beaa, ĝuante komunan amon. La nutristino tiel ekamis šin kaj tiel alligiĝis al ŝi, ke ŝi jam plue forlasis la domon kaj ĝis sia morto mem restis vartistino kaj gvidantino de la knabino. La doktoro ankaŭ forlasis la oficon, transloĝiĝis en Veselovo'n kaj observis senlace la infanon kaj la patron.

Por kontentigi la patron, kiu neniel povis alkutimiĝi al penso, ke la ido ne estas filo, la doktoro proponis dume nomi šin, kvazaŭ knabon, - Oliver kaj vestadi kaj eduki šin, kiel knabon. Tiu ĉi kuraĝa kaj originala penso tiel eksplaĉis al Veselov, ke li tuj realigis ĝin. Olnjo estis opiniata knabo. Ŝis dekkvar jaroj neniu, ne endediĉita en la sekreton, povis konjekti, ke sub la vira eksteraĵo de la vigla, ĉarma knabo estas kašata virineco.

Šia infaneco, riĉa je dolĉaj rememoroj, pasis kiel bela sonĝo. Ĉirkaŭita de ĉies amo kaj atento, ŝi neniam sentis mankon ian. Ŝia ĉambro enhavis tiom da ludiloj, donacitaj de la parencoj kaj konatuloj, ke ĝi estis pli simila al ludilmagazeno, ol al infanĉambro. Nur samreguloj n ŝi ne konis. Vere, iafoje vizitadis šin šia laktpatro, la filo de Zoja Petrovna, sed li estis tasto malofta en la domo, ĉar li estis knabo dorlotita kaj ne supiĉe ĝentila. Malgraŭ tio Olnjo tiom estis allogita de li, ke ŝi ĉiam estis ĝoja vidi lin kaj pacience toleris ofendojn kaj malĝentilaĵojn, iafoje kaŭzatajn de li. Pli malfrue li iom pliboniĝis kaj longe estis sola amiko de la knabino.

Ĉirkaŭ gastoj multenombraj de Veselov, seniĝi je kiuj li jam ne povis, postulis ĉiam pli kaj pli grandajn elsperojn, kontraŭ kiujn ne povis ensperoj de la bieno, malgraŭ ĉiuj penoj de la maljunulo kaj ~~de~~ la doktoro. Por helpi al li en tiu ĉi tasko, Veselov akceptis ian oficon en la distrikto. La ofico postulis de li malmulte da tempo, tamen ĝi enportis en lian vivon diversecon kaj donis monan profiton.

Veselov kun la amiko ne volis, ke la filino lernu ie en urbo; tio, laŭ ilia unuanima opinio, malutile influus ŝin kaj doloriginis ilin pro neevitebla disiĝo. Tial komence instruis ŝin la patro mem

kaj la doktoro kaj poste, kiam iliaj pedagogiaj kapablecoj montriĝis nesufiĉaj por tio, ili decidis ĉiuvintre triope translokiĝadi por tio en la urbon. Tie la knabino lernis lingvojn kaj studis aliajn lernobjektojn sub gvidado de fama malnova pedagogino Julia Andreevna, kiu ni jam havis felicon renkonti ĵus dum la unua leciono de Esperanto.

IX.

La malamiko.

Kiam la leciono finiĝis kaj ĉiuj ĉeestintoj komencis adiaŭi kun Julia Andreevna kaj reciproke unu kun la alia, la leŭtenanto iris en la antaŭĉambron kaj serveme helpis vestiĝi al la fraŭlinoj. Post ĉiuj li, kun speciala lerteco kaj braveco, kiel ŝajnis al ĵoĉjo, vestis Olnjon je ŝia pluŝa palto, borderita de nigre-bruna felo de siberia vulpo kaj metis super ŝia pela ĉapeto, kiun ŝi mem vestis antaŭ spegulo nerapideme kaj koketeme, kelkfoje ordigante sub ĝin la harojn, kiuj obstine elstariĝis el-sub ĝi, - molan baŝlikon kun eleganta malgranda ora kvasteto. Poste li iel nezorgeme submetis la ŝultrojn, sur kiujn la servistino surmetis lian ŝinelon, kaj, nek traigante la manojn en la manikojn de la ŝinelo, nek butonuminte ĝin, li delikate prenis Olnjon je la mano kaj, parante komunan riverencon al la mastrino kaj al tiuj el la gastoj, kiuj staris ankoraŭ apud ŝi, inter kiuj estis ankaŭ ĵoĉjo, ruze-mokeme ekrigardis en liajn okulojn, dande ekklakis per la sporonoj kaj foriris.

– Georgo, vi malvarmumos! – diris Olnjo. – Vi ne forgesu, ke nun estas vintro...

– Ĉu oni povas malvarmumi apud tia ĉarma fraŭlino?.. – li laŭte diris, interrompante ŝian parolon. Pluajn liajn vortojn oni jam ne povis aŭdi, ĉar la pordo jam fermiĝis post ili.

La koro de ĵoĉjo batis malsaneme en la brusto, kiam li eliris sur la straton. La vespero estis luna kaj frosta. La luno malavare verŝis sian lumon molan, malvarman, neĝo gaje knaris sub la piedoj. Sed ĵoĉjo rimarkis nek la lunon, nek la vigligan malvarmon vintran, nek la neĝknaradon. Liaj okuloj estis fiksitaj al la paro de la gejunuloj, kiuj iris je kelkaj paŝoj antaŭ li. Kvankam li devis iri hejmen tute en kontraŭan flankon de la strato, li sekvis dum kelka tempo post ili. La leŭtenanto iris brave elstariginte la brustON kaj alte levinte la kapon, Olnjo kuntiriĝis pro la malvarmo kaj proksime alpremiĝis al li. Li rakontis al ŝi ion, ŝajne, tre amuzan, ĉar la knabino ofte kaj gaje ridis respondeje liaj vortoj, kovrante sian vizaĝon per mufo.

Ĵli trairis kelkajn kvartalojn, ĉiam gaje interparolante, kaj malaperis post angulo de unu stratkruciĝo. Ĵoĉjo, atinginte la angulon, haltis kaj ne deturnante la okulojn de la paro, pliĝuste – de la knabino malproksimiĝanta, sin apogis je lanternkolono. Li nenion vidis, krom ŝia figuro, li nenion rimarkis. Preteririntoj kun miro rigardis la junulon, kvazaŭ ebrian, starintan, kelkaj ekrigardis lian ĉarman vizaĝon malgajiĝintan kaj pensoplenan, aliaj mokeme skuetis la kapojn al li kaj ion flustris. Unu maljunulino, rimarkinte lin, haltis kontraŭ li kaj, kunpremiĝante pro la malvarmo, facile tuŝetis lin je la mano.

—Ĉu vi estas malsana, kazulo? – ŝi diris kun kondolenco. – Kial vi staras tie, vi frostmortos... jen kia malvarmo estas hodiaŭ!

Jaĉjo rekonsciiĝis, kvazaŭ post longedaŭra dormado, ekstremis kaj malrapide ekpaŝis, malleviate laksapon, rekaptante nek preteririntojn, nek stratojn tra kiuj li iris. Se oni demandus lin, kion li sentis dum tiu ĉi tempo, Jaĉjo sendube hezitus respondi, ĉar lia sento estis tre komplikita kaj ne kutima prosia noveco. Li sentis malamon al la leŭtenanto, li opiniis lin sia malamiko kaj samtempe li sentis ankaŭ, ke li tuj kungojo helpus al li, se li bezonus je tia helpo, li sentis, ke ia forto nekomprenebla nepre igus lin sinjeti senhezite en akvon, se li ekvidus lin dronanta, aŭ enkuri en brulantan domon, se li sciiĝus, ke tie estas pereanta lia malamiko la leŭtenanto. Li sentis amon delikatan al la knabino, kiu tiel afable rilatis al li, kiu tiel akurate kaj zorgeme viziladis la lecionojn kaj elmontris esperon, ke post nelonge ŝi fariĝos flama kaj fervora samideanino. Li bedaŭris, ke tia bela kaj bona knabino simpatiis al la leŭtenanto, kiu sendube estis malamiko de Esperanto kaj arogantulo. Li bedaŭris, ke ŝi tiel konfidis al li, kaj ŝia gaja rido kaj ŝia alpremiĝado al la leŭtenanto, kiujn li longe observis, tranĉis lian koron, kiel akra tranĉilo.

Al ĉiuj tiuj ĉi sentoj aldoniĝis ankoraŭ unu, kiu estis pli turmentiga eĉ ol la lasta. Jaĉjo timis, ke li ofendis la leŭtenanton, kiam li, fervore defendante sian amatan ideon, elmontris la leŭtenanton en ĉeesto de la fraŭlinoj ridinda kaj malsaĝa. Ekmemorinte lian ruze-mokeman rigardon, kiun li fetis en la vizaĝon de Jaĉjo en la antaŭĉambro, Jaĉjo instinkte komprenis, ke la ofendo estis granda kaj ke la leŭtenanto ne pardonos ĝin.

„La leŭtenanto volis sin montri havanta ĝustajn informojn pri ĝenerala stato de Esperanto", – pensis Jaĉjo, – „li envias, ke mi, mizera, hontema seminariano, persono tute negrava kaj ne atentinda, jam varbis kaj allogis al siaj lecionoj tiom gravajn personojn, kiuj estis la grafinoj – fratinoj kaj Olnjo... kiun li amas sendube... Ĉu mi estas kulpa, ke li parolis kun aplombo pri la objekto, pri kiu li tute ne havis eĉ ideon? Ĉu mi povis silenti, kiam li kalumniis „mian" lingvon, kiam li tiel ironie-mokeme rigardis min kaj volis montri min ridinda knabaĉo, kiu propagandas ian sensencaĵon? Kion opinius pri mi Julia Andreevna kaj grafino Irina, kiu tre ŝatas min kaj kiujn mi ŝangos je neniu, kvankam al mi minacus kiaj ajn malagrablaĵoj, malfeliĉoj?.. Kaj Olnjo?.."

Jaĉjo klare prezentis al si ŝian belan vizaĝeton, gajajn, lernamajn okulojn, silkajn haretojn, kiuj ĉiam dissutiĝadis laŭ la sultreto de la knabino kaj ofte eĉ facile tuŝetis lian vizaĝon, kiam ŝi, dum la lecionoj, proksime kliniĝadis al li, aŭskultante atente ian lian klarigon.

„Ŝi estas mirinda knabino, ŝi estas ĉarma knabino!" – li pensis. – „Kur por kio ŝi tiel konfidas al li, al tiu ĉi malaminda leŭtenanto? Ĉu plačas al ŝi lia braveco, aspekto?.. Li ne estas inda je ŝi... Li estas sentaŭgulo, diboĉulo, kiel plimulto de oficiroj, kaj li malbone influas je ŝi. Mi iam avertos ŝin... Kial ŝiaj gepatroj kaj nia plej bona Julia Andreevna permesas al ŝi... En la sabato venonta mi venos al la leciono pli frue ol ĉiuj kaj havos konversacion kun

Julia Andreevna... Eble, ŝi ankaŭ la gepatroj de Olnjo ne rimarkas eĉ tion, kia nenobla sinjoro estas la leŭtenanto... Eble, estas ankoraŭ ne malfrue... Eble, la leŭtenanto ne havis tempon elmontri al la knabino sian malutilan influon; eble, oni facile forigos lin tute, ke li neniam kuraĝu plu intervidiĝi kun ŝi, iri kun ŝi je la mano...

Kaj ree la knabino sin prezentis al Jeĝjo tre klare. Li klare vidis ŝiajn rozkolorajn vangetojn, ruĝiĝintajn pro frosto kaj bele-elstariĝantajn el-sub la nigre-bruna pela kolumo, ŝiajn gajajn okulojn kaj elegantan malgrandan oran kvasteton, kiu balanciĝis malantaŭe sur ekstremaĵo de ŝia baŝliko.

„Kiel felica mi estus, se ŝi irus je la mano kun mi!.." - li pensis. -„Mi inde taksus ŝian konfidon... Mi parolus al ŝi..."

Sed Jeĝjo rememoris, kiel gaje ridis Olnjo, irante kun la oficiro kaj kovrante sian vizaĝon per la mufeto, kaj li nevole expensis:

„Ĉu ŝi enuus irante kun mi? Mi ne scias paroli amuzajn historiojn, mi ne scias ridigi... Ne! Ŝi ne enuus!.. Ŝi estas serioza knabino. Mi ne parolus al ŝi bagatelojn ridindajn, je kiuj estas tia lertulo la leŭtenanto... Mi parolus al ŝi pri „mia" lingvo, pri mia propagando de ĝi... „Propagando?.. Jes, propagando..."

Sed jus Jeĝjo expensis tion ĉi, io dolorige-ofende expikis lin je la koro mem kaj anstataŭ figuro de la knabino, kiu ĉiam staris en lia imago, antaŭ li aperis subite la leŭtenanto kun la alte levita kapo fiera, elstarigita antaŭen la brusto kaj moksema rideto sur dikaj voluptaj lipoj, eglitanta el-sub la longaj nigraj lipharoj.

„Por kio mi parolis tiel serioze kaj ofende?.." - Jeĝjo pensis. -„Mi ne povis silenti, vere... sed mi devis diri tion pli singarde me, pli ĝentile. Mi deziris, kontraŭparolante al la leŭtenanto, ne elmontri lin ridinda, - mi ~~donis~~ deziris alporti utilon al nia afero, mi deziris nur diri la veron... Kaj kio okazos, se la leŭtenanto decidos venĝi al mi?.."

Kaj unu post la alia malgajaj bildoj aperis en lia imago. Jen la estraro de la seminario jam sciiĝis, ke li rompas „la regularon de konduto de la lernantoj". Kaj antaŭ la okuloj de Jeĝjo jam estis la malgranda, en blueta kovrilo, libreto, kiun ricevas ĉiujare ĉiu seminariano antaŭ komenco de lernjaro, kiun oni devas scii parkere kaj en kiu tre klare kaj difinite estas antaŭvidita ĉio:

§11. La lernantoj ne devas viziti en la urbo privatajn personojn, krom siaj kolegoj kaj parencoj...

§18. Oni severege malpermesas al la lernantoj studi kiajn ajn lernobjektojn, krom tiuj, kiujn oni speciale instruas en la lernejo...

§31. La lernantoj ne povas promeni sur la kajo, bulvardoj kaj en stratoj ~~kun~~ kun fraŭlinoj, krom siaj plej proksimaj parencinoj...

Jeĝjo rememoris, ke ĉiu ne obeanta al la regularo estas forigata el la lernejo kaj li vidas sinjam forigita. Li devas reveni hejmen... Estas nepriskribebla malĝojo de la gepatroj... Ju-

lia Andreevna, adiaŭante kun li por ĉiam, ploras kaj bedaŭras, ke ŝi ne sukcesis perfekte ellerni la lingvon, kion ŝi promesis al iu... Grafino Irina estas ne malpli ĉagrenita de la okazintaĵo kaj ŝi plu jam ne sentas ravon al liaj kaŝtankoloraj okuloj, al lia mildeco, kio ĉiam kortuŝis lin... Olrjo estas ne konsolebla. Ŝi kulpigas enĉio la leŭtenanton kaj malpaciĝas kun li... Ĉiuj estas ĉagrenitaj, ĉiuj estas malĝojaj... Nur la leŭtenanto estas memkontenta: li rigardas ĉiujn mokeme, tordas siajn longajn nigrajn lipharojn kaj ekklakas per la spronoj.

Nokte jaĝjo sonĝis ankaŭ la leŭtenanton. Li subite enflugis tra fenestro en la gastoĉambron de Julia Andreevna dum leciono de Esperanto, kaptis per unu mano Olrjon kaj per la alia grafinon Irina'on kaj, laŭte svingante per flugiloj, kalkante per la spronoj kaj mokeme ridetante, flugis kun ili for el la ĉambro. Jaĝjo, malfacile spirante, kuris post li, penis forpreni la fraŭlinojn kaj kriis:

— Mi ne pardonos! Mi ne pardonos!..

Kun tiuj ĉi vortoj sur la lango li vekiĝis. Lia vizaĝo kaj kapo estis ŝvitkovritaj.

En malbona humoro, ĉiam antaŭsentante ion malagrablan, jaĝjo pasigis la tutan dimanĉon. Vespere li iris promeni sur la bulvardon kun sekreta espero en la koro renkonti tie promenantajn Julia'on Andreevna aŭ Olrjon, kiu, li sciis, iafoje promenis tie kun iu el la familianoj, kaj rakonti al ili siajn pensojn turmentigajn.

Sur la bulvardo, dank'al bela, senventa vetero, estis multaj promenintoj. Je ĉiu paŝo estis renkontataj gelernantoj de diversaj urbaj lernejoj, kiuj marŝis ĉiam ope kun gajaj vizaĝoj, patroj kun siaj filinoj-fianĉinoj, gejunuloj, infanoj. Jafoje jaĝjo rimarkis iun el siaj instruistoj. Sed kiel ajn atente rigardis jaĝjo la promenintojn, li vidis nek Olrjon, nek Julia'on Andreevna. Trairinte jam laŭlonge tien kaj reen la tutan bulvardon, jaĝjo malĝojigita, malleviinte la kapon, jam revenis hejmen, kiam li subite ekvidis unu konatan vizaĝon: renkonten al li iris kun ne bindita, evidente, freŝa franca romano en la subbrako grafino Eŭdoksio en luksa vintra vestaĵaro/ela, vastiganta, agrable tiklantan flarsenton, parfumodoron. Je ambaŭ flankoj de ŝi iris du junaj fraŭlinoj, ankaŭ riĉe vestitaj kaj tiaj ĉarmetaj, kiajn, ŝajnis al jaĝjo, li vidis neniam. Sed la fraŭlinoj tuj eksplaĉis al jaĝjo ne profesia ĉarmeco, ne prosiaj riĉaj ornamoj, sed pro tio, ke li tuj konjektis, ke tiuj ĉi fraŭlinoj estas tiuj nevinoj de la grafinoj-fratinoj, kiuj kun tia fervoro studis „lian" lingvon. La grafino rekonis jaĝjon kaj gaje ekbalancis de malproksime per la kapo, respondante lia respekto plena saluto. Jaĝjo kun ĝojo jam intencis tuj aliri al la grafino kaj eksparoli en „sia" lingvo por sciiĝi, kiel influos tio ĉi je la ĉarmetulinoj, sed en tiu sama momento antaŭ li, kvazaŭ el-sub tero, aperis danda figuro de la leŭtenanto.

La unua sento, kiun jaĝjo eksentis, kiam li ekvidis la malamikon, estis sento de malamo, de abomeno; la unua intenco de li estis tuj peti pardonon, peti ĝentile kaj sen humiliĝo, sed la leŭtenanton akompanis lia kolego-juna signojunkro kaj tiu ĉi cirkonstanco estis grava malhelpo por plenumi la intencon.

— Bonan tagon! — li diris kun malbona rideto, eltirante la manon al jaĝjo. — Ĉu vi promenas?

Tamen, vi ja ankoraŭ ne konas unu la alian. Tiu ĉi estas mia kolego - signojunkro Platonov, dŭinkemulo, batiĝemulo, flirtulo, unuvorte bonega kaj agrabla en ĉiuj rilatoj bravulo, - li daŭrigis montrante sian kolegon. - Kaj tiu ĉi juna homo, - li diris kun serioze - sarkasma zideto, montrante Joĉjon al sia kolego, - estas profesoro (li intence elparolis tiun ĉi vorton kun speciala akcento) de Esperanto...

— Profesoro ?.. Ĉu ?.. - diris Platonov, de la kapo ĝis la piedoj pririgardante la mizeran, konfuziĝeman figuron de Joĉjo per malestime - arogantaj okuloj. - Li estas knabaĉo, seminariano... kaj vi parolas profesoro !..

Joĉjo estis preta eksplori pro la neatendita, ne meritita ofendo kaj forkuri, sed liaj piedoj kvazaŭ ŝtoniĝis kaj ne moviĝis de la loko.

— Ĉu oni povas tiel paroli, sinjoro signojunkro ? Kion ni faros, se li tuj eksploros ?..

— Jes, jes... Efektive, mi faris nepardoneblan eraron ! Mi petas pardonon, sinjoro... Pardonu, mi forgesis vian nomon. Tamen ni iru, kial ni haltis ? - li aldonis, sin turnante jam al la leŭtenanto.

— Ni iru !

— Bone, bone, juna sinjoro ! - daŭrigis la signojunkro. - Ĉio estas bona, kio bone finiĝas. Sed ĉu vi scias, juna sinjoro, ke vi entreprenis tre riskoplenan aferon ? Ĉu vi scias, ke pro via kulpo, pro via infanaĵo povas suferi krom vi ankaŭ aliaj personoj, kiujn vi entiris senpripensite en vian rondeton ?.. Personoj, kiuj estas estimindaj kaj aparten-as al plej alta rondo de la urbanoj...

— Kiamaniere ?.. - Joĉjo hovis forton nur diri tiun ĉi vorton, terurigita de ĉio okazanta.

— Ha, kiamaniere ?.. Ĉu vi korespondas en via lingvo kun eksterlandanoj ?..

— Jes, mi...

— Bonege, juna sinjoro !.. Mi gratulas vin ! Sed vi prezentu al vi, ke en unu bela tago vi ricevos el eksterlando de via amiko tiea ian politikan proklamaĵon... Aŭ ankoraŭ pli simple : prezentu al vi, ke en unu bela tago via letero kun tia proklamaĵo de eksterlandaj sentaŭguloj, anstataŭ vi, trafos en manojn de tre scivolemaj sinjoroj ĝendarmoj... Ne forgesu, ke se iu unufoje estis en manoj de tiuj ĉi sinjoroj, tiu longe kuracos postsignojn de iliaj ungegoj sur sia felaĉo...

— Tio ĉi estas ne ebla !.. Tiaj sentaŭguloj, kiujn vi aludas, neniam estis kaj estos inter esperantistoj ! - diris kun entuziasmo Joĉjo, tremante pro ofendo, ĉagreno kaj indigno.

— Nu, ni danku Dion ! - la signojunkro respondis konsolige. - Interalie, juna sinjoro, permesu, mi donos al vi ankoraŭ unu demandon malmodestan : ĉu vi havas permeson de via lerneja estraro instrui la lingvon al junaj fraŭlinoj... ĉarmetaj ? Ĉu via inspektoro almenaŭ... Ĉu li scias pri viaj pedagogiaj talentoj ?

Joĉjo silentis.

— Ĉesu, Platonov ! Sufiĉe ! - diris la leŭtenanto, haltante antaŭ bierejo. - Ne timu, sinjoro pro-

resoro! Ĉe se oni ĉion sciĝos, oni nenion malbonan faros al vi, nur, eble, oni...

—Nur, eble, oni senigos vin je taymanĝo por unu tago!.. - aldonis la signojunkro, ekridante.

Nek aldonante ankoraŭ ion al la dirita, nek adiaŭante reun Joĉjo, la oficiroj ambaŭ, laŭte ridante, malaperis en la bierejo.

X.

Inter la amikoj.

—Nu, Georgo, ĉu vi estas kontenta? - diris la signojunkro, ĵus la amikoj sid-iĝis al tablo en la bierejo. - Nun la knabaĉo por longa tempo perdos ĉian deziron daŭrigi siajn lecion-ojn. Mi tiel timigis lin, ke nun li longe ne troros la vojon hejmen!

—Mi dankas vin, - memkontente respondis la leŭtenanto, - permesu ekpremi vian manon!

—Tio ĉi estas ne sufiĉa, s-ro leŭtenanto. Vi postulu ses botelojn da biero.

—Oho! Ĉu ne sufiĉos por ni du?..

—Ne. Vi diru al mi serioze, ĉu vi mem povus tiel konsterni la knabaĉon?.. - parolis la signo-junkro, versanta bieron en sian glason kaj fikse rigardante en la okulojn de sia kolego.

—Se mi povus, mi ne invitus vin...

—Porsano de via Olnjo! - diris la signojunkro, levante sian glason kaj ekzrapinte ĝin je glaso de la leŭtenanto. - Nun vi povas esti trankvila: la knabaĉo plu ne aperos inter viaj gekonatoj... Li nek ofendos vin plu, nek havos okazon intervidiĝi kun la knabino. Tamen, - li ~~diris~~ daŭrigis, per unu fojo eldrinkante duonon da la glaso, - tamen, se vi vidos, ke mia leciono estas ne sufiĉa por la knab-aĉo, mi plezure helpos al vi. En la kapo mi havas jenan planon mirind...

Sed li ne finis sian parolon, ĉar en tiu momento en la biercjon eniris lia estro, akompanata de du oficiroj, kiu malamis la signojunkron, kiel ankaŭ plimulto de oficiroj, kaj ĉiam evitadis lian ĉeeston. La signojunkro, kiu sciis kelkajn siajn kulpojn antaŭ la estro, tuj forlasis sian glas-on, leviĝis de la seĝo kaj, flustre, sin turnis al la leŭtenanto:

—Prunteedonu al mi, mi petas, cent rublojn... Morgaŭ mi redonos la monon, honora vorto de oficiro!

—Ĉe cent kopekojn mi ne havas!..

—Nu, kvindek rublojn!.. Hodiaŭ oni kartludos ĉe leŭtenanto Krutov. Mi sentas, ke hodiaŭ mi nepre gajnos...

—Vere, mi havas nenion!

—Nu, estu amiko, mi rapidas... Donu dudek rublojn!.. Honesta vorto...

La estro kun la oficiroj haltis apud najbara tablo. Li interŝanĝis saluton kun la leŭtenan-to, la samaan ankaŭ faris liaj akompanantoj. Dum ili salutis unu la alian, la signojunkro ne-rimarkeble foriris, malbenante la estron, kiu malhelpis al li, ankaŭ la leŭtenanton, de kiu li esperis ricevi hodiaŭ honorarion por la sukcese plenumita tasko.

Preterirante horloĝmagazenon, hele lumigitan de interne, Joĉjo, ĉagrenita kaj konsternita de la vortoj de la oficiroj, tute neatendite por si mem, ekrigardis tra fenestro de la magazeno. En la fenestro pendis grandega horloĝo, kiu montris la kvinan horon de vespero. Li haltis antaŭ la fenestro, ion konsiderante kaj subite lia vizaĝo lumiĝis kaj gajiĝis kaj li rapidege ekpaŝis reen tra la strato. Li estis en tia stato, kiam homo nepre bezonas dividi kun iu sian malĝojon, sed krom Julia Andreevna, li sciis tion, neniu en la tuta povus ĝuste kompreni lian malĝojon kaj doni al li konsolon. Ekvidinte ekrigardinte la horloĝon, Joĉjo rememoris, ke nun estis ĝuste tia horo, kiam la maljunulino estis hejme kaj akceptis vizitantojn.

La servistino, kiu malfermis por li la pordon, estis surprizita de la neĝustatempa, ne kutima vizito de Joĉjo kaj iom da tempo ŝi staris hezitante en la antaŭĉambro, konsiderante, ĉu ŝi devas aŭ ne devas raporti al la mastrino pri la vizitinto. La gastoĉambro estis kutime hele lumigita kaj el ĝi estis klare audebla solene-trankvila, tamen kun kelka nuanco de ĉagreno, voĉo de Julia Andreevna.

– Ĉu oni povas tiel skribi ?.. Ha, kion vi faris! Vi neniam ellernos la lingvon. Vi ne kunmiksas la lingvojn, – ŝi parolis, kliniĝinte super la tablo kaj korektante erarojn en kajero de Leskov. Ŝi tiel profundiĝis en sian okupon, ke ŝi tute ne rimarkis, kiel Joĉjo, mallaŭte paŝante tra la ĉambro, aperis antaŭ la tablo mem. – Rigardu, kion li faris, ĝoju!.. – ŝi diris, subite returniĝante al Joĉjo kun tia mieno, kvazaŭ lia vizito neatendita kaj neĝustatempa estis antaŭvidita kaj atendita de ŝi. – Mi ĉiam laŭdas Leskov'on, kaj li hodiaŭ faris en sia laboro tiom da eraroj nepardonebla j, ke mi tute nescias, kion mi devos nun fari. Rigardu, en sia franclingva laboro li skribis preskaŭ ĉie kv, anstataŭ qu kaj x, anstataŭ c!.. Jen estas influo de viaj lecionoj, mia kara amiko!.. Sidiĝu!.. Vi, s-ro Leskov, reskribu vian laboron kaj plu ne eraru, vi ĉiam memoru en kia lingvo vi skribas. Morgaŭ ni daŭrigos la laboron.

— Mi mem, – profunde ekspirinte, diris Joĉjo, – antaŭ nelonge faris ion similan dum leciono de latina lingvo. Mi skribis sur klastabulo „kaj li diksit eis", anstataŭ „et dixit eis"...

— Bone, bone! – ripoĉe balancante per la kapo kaj gaje rigardante Joĉjo'n, diris Julia Andreevna. – Kaj kio rezultis el tio ĉi ?

– La instruisto koleriĝis, ekkriis... la kolegoj ekridis, sed mi ĝustatempe komprenis mian neĝustan skribaĵon kaj tuj forviŝis de la tablo ĉion skribitan.

— Mi ĝojas vidi vin hodiaŭ, mia kara! – diris Julia Andreevna al Joĉjo, jus Leskov foriris, – Sed mi antaŭsentas, ke io okazis al vi. Vi estas tia pala, konsternita! Nur via lasta noto pri via okazinta ĵo dum la leciono de latina lingvo iom disblovis, mi rimarkis, ian vian malĝojon. Kio okazis al vi ?

– Kara Julia Andreevna! – diris Joĉjo, kortuŝita de la boneco de la maljunulino. – Krom vi, mi havas neniun... – Ŝi ekspalpebrumis konvulsie, sentante, ke larmoj tuj ekfluos torente el la okuloj.

— Mia infano! – diris Julia Andreevna, pli proksimi almoviĝante al la junulo kaj koncentriĝante je li tutan sian atenton. – Kio okazis? Estu sincera... Kredu, ke mi laŭforte...

—Kara Julia Andreevna! Ne nomu min plu, mi petas, s-ro profesoro... - Joĝo diris, interrompante ŝin kaj ne havante plu fortojn por deteni larmojn. - Oni mokas je mi, oni mokeme almomas min profesoro!... - Kaj kiam Joĝo iom trankviliĝis, vigligita de bonkoreco de Julia Andreevna, li rakontis al ŝi ĉion, kion li trasentis hieraŭ vespere post sia kunpuŝiĝo kun la leŭtenanto kaj pri la antaŭnelonga malagrabla renkontiĝo kun li kaj signojunkro Platonov.

Julia Andreevna silente aŭskultis sinceran, konfideman parolon de la junulo, nek interrompante ĝin, nek forturnante sian afablan, bonkorecan rigardon de lia emociita vizaĝo.

—Ĉu vi finis, mia kara? - ŝi diris, kiam Joĝo silentiĝis kaj, gaje ekrigardinte en la okulojn de Julia Andreevna, konteme malleviš sian ruĝiĝintan vizaĝon.

—Mi finis... - li diris mallaŭte kaj ekspiris plifacilige.

—Mi tre, tre dankas vin, ke vi sempere vin turnis al mi, ke vi sincere konfidis al mi viajn pensojn kaj sentojn. De la unua renkontiĝo kun vi, mi ekamis vin, kiel filon, kaj nun kun ĝojo mi vidas, ke mi ne eraris... ke vi estas inda je la amo.

Julia Andreevna prenis Joĝon je la mano, alproksimigis lin al si kaj kovris lian vizaĝon, kaj frunton per delikataj, varmaj kisoj.

—Vi estas ĉarma, bona knabo! Mi envias al via panjo, ke ŝi havas tian filon... Kaj ne sole mi, sed ĉiu, kiu konas vin, ŝatas vin... la grafinoj-fratinoj... Olnjo, ŝia patro... Ĉu vi ankoraŭ ne konas tiun ĉi noblan homon?.. Vi nepre devos konatiĝi kun li! Li delonge jam volas tion.

Ŝi interfingrigis la manojn kaj kelkfoje afable kaj konsolige ekbalancis per la kapo, kvazaŭ konsentante kun ĉio, jus eldirita de ŝi kaj konsiderante ion. Poste ŝi sin apogis je la tablo kaj, ion sulkiĝinte, eksparolis per vigla voĉo, ĉiu vorto kies, kiel mirakloparanta, sanига balzamo, nerimarkeble, sed sentige, penetris en la koron mem kaj en plej profundajn sekretejojn de la animo de la junulo kaj, mallaŭte kaj delikate iom post iom forigis lastajn postsignojn de la maljojo ankoraŭ antaŭnelonga.

—Al la leŭtenanto, mia kara, vi diris nenion ofendan, kaj tio, kion vi diris, estis vero... Via timo, ke niaj lecionoj de nun devos ĉesiĝi, ke vi aŭ iu ajn el ilia j partoprenantoj poras submetiĝi al danĝero, kiel aludis la signojunkro, estas, laŭ mi, antaŭtempa kaj senbaza. Mi ĉe okazo priparolos la aferon kun s-ro Veselov. Li konas vian inspektoron kaj, vi estu trankvila, li ĉiam scios forkonduki de vi fulmotondron ĝustatempe, jus super via kapo aperos ia nubeto minacanta. Estu tute certa pri tio, mia ĉarma, ke viaj amikoj neniam forlasos vin sendefenda. La malsaĝa ago de la oficiroj ankaŭ plu ne ripetiĝos, vi kredu al mi. Vi pardonu ilin grandanime kaj ne pensu eĉ pri ia venĝo. Tio gardu vin de tio ĉi. Per malbono, mia infano, vi neniam reparos per malbono. Ja fajron oni ja ankoraŭ neniam sukcesis estingi per petrolo. Vi estu afabla al viaj ofendintoj, kvazaŭ ili kaŭzis al vi nenian malbonon kaj, se vi havus okazon fari al ili ian gravan bonservon, tio ĉi estus laŭdinda... Kia devo, devo de kristanoj, estas pardoni niajn malamikojn, preĝi pri ili kaj bonfari al ili... Ŝajne, vi jam bone scias ĉion tion ĉi, ĉar viaj gepatroj edukis vin ĝuste kristane.

Ŝi ekspiris kaj ekrigardis la angulon, de kie milde rigardis la mildajn animojn bildo de la Savinto dormkronita. Jočjo ankaŭ turnis tien sian rigardon nevole, kvazaŭ pro sugestio kaj ili ambaŭ samtempe faris kruckosignon.

—Serĉu, mia ĉarma, ĉiam helpon de Li kaj vi neniam restos senigita je ĝi, - ŝi aldonis kortuŝita kaj forsvingis per la mano grandan larmon, kiu ekbrilis, kiel perlero, sur ŝia ekulo.

— La leŭtenanto ne estas kapabla fari al vi ian malutilon, - Julia Andreevna daŭrigis post nelonga paŭzo. - Vere, iafoje, eble, li mokos je iu kaj nur... Tiu ĉi sinjoro estas kun tre limigitaj kapablecoj.

— Kaj la signojunkro? - demandis Jočjo.

— Ho, li estas abomeninda junulo! - respondis Julia Andreevna. - Li estas filo de oficisto, kiaj gepatroj sciis nek eduki lin, nek influi lin, pro tio li provis lerni, sajne, en tiuj lernejoj de la urbo kaj nenie oni povis toleri lin. De ĉie oni pelis lin, kiel maldiligentan kaj arogantan junulon kaj skandalulon. Komencinte la militservon antaŭ nelonge, li trovis nenian simpation inter oficiroj, krom malamo, kiun elmontris al li jam multaj. Li aŭdis, ke li baldaŭ estos eksigita... Alie ne povas esti la afero. Li malhonorigas oficirecon per sia koruptemeco. Por kelkaj rubloj, iafoje por unu botelo da vino, li faros ĉion eĉ plej malnoblan, kion oni postulos de li. Jam kelkfoje li tiamanieze ofendis kelkajn personojn tute ne meritite, kiel ankaŭ vin...

— Ĉu la leŭtenanto koruptis lin? - diris Jočjo.

— Pri tiu ĉi demando ne povas esti du malsamaj opinioj.

— Sed, bona Julia Andreevna, kial la leŭtenanto tiel malamas min? Ankoraŭ tute ne konante min, kiam ni komencis tiam tie ĉi konversacion pri Esperanto, li kelkfoje penis elmontri min ridinda. Kio estas, laŭ via opinio, kaŭzo de tiu ĉi nekomprenebla, neklarigebla agado de li?

— Kio estas kaŭzo, mia kara? - diris Julia Andreevna, rektiĝante kaj sin apogante dorse je la seĝo. - Kio estas la kaŭzo? - ŝi ripetis, sulkigante la frunton. Ja ombro de malgajo travuris tra noblaj trajtoj de ŝia bona vizaĝo kaj kripligis ĝin. Estis evidente, ke tio, kion ŝi devis diri, estis tre neagrabla kaj doloriga por ŝi. Ŝi ree, kutime, interfingrigis la manojn sur siaj genuoj kaj, kun ekspiro - ekĝemo, mallaŭte, preskaŭ flustre diris: - Olnjo!..

— Ĉu Olnjo?.. - laŭte, eksaltante pro surprizo de sia seĝo, ekkriis Jočjo, je unua fojo nomante la knabinon je la nomo.

— Jes!.. - diris Julia Andreevna, evidente neniom surprizita de la neatendita emocio de la junulo. - Kompreneble, tio ĉi estas tre natura. Ŝi estas laktaj gefratoj - ilin ambaŭ mamnutris la sama mamnutristino, ili kune pasigis sian infanecon. Olnjo ja estas neordinara knabino kaj ŝi plaĉas al multaj junuloj...

Julia Andreevna ĉe tiuj ĉi vortoj esploreme fiksis sian rigardon al la kaŝtankoloraj ok-

aloj de Joĉjo. Joĉjo ruĝiĝis kaj malleviis la okulojn.

—Ĉio plua estaŝ jam klara por vi. Somere de nuna jaro la leŭtenanto paris al Olnjo edzeĝo-proponon...

—Kaj'?..

—Kaj li ricevis ripuzon.'

—Olnjo, - diris Joĉjo, kun speciala ĝuo laŭte kaj klare elparolante la nomon de la knabino, - Olnjo nepovis agi alimaniere.

—Vere. Ŝi estas ankoraŭ duonknabino - duonfraŭlino, ŝi ja estas ankoraŭ deksesjara! Krom tio s-ro Veselov - ŝia patro kaj la doktoro volas nenion aŭdi aŭ pensi pri ŝia edziniĝo. Ili ambaŭ mortos, se ili disiĝos kun ŝi. Nu, ili respondis al la fianĉo, ke li havu nenian penson pri la edziĝo, sed restu, se li volas, kiel antaŭe, ŝia amiko.

—Kaj Olnjo mem? Kiel ŝi rilatis al tiu ĉi decido de la patro? - demandis Joĉjo.

—Ŝi jam diris al vi, mia amiko, ke ŝi estas neordinara knabino: ŝi tre indiferente rilatas al siaj multenombraj flirtantoj, neniam preferante iun, sed ĉiam estante ĝentila kaj diskreta kun iu ajn pri siaj sentoj. Ŝi tuj submetiĝis al la decido de la patro kaj de la doktoro, sed la leŭtenanto ne perdas esperon iam atingi sian celon. Li zorgeme gardas la knabin on kaj... tre ĵaluzas ŝin al ĉiu junulo, kiu ajn li estus. Ĉu mi devas daŭrigi? Kun ĉio estas klara: vi aperis, la knabino forlogiĝis de la lingvo, kiun vi instruas... - ŝi silentiĝis por unu momento.

Ju eksonoriĝis.

—Ŝi senĉese parolas pri vi, pri la lingvo. Nature, ke la ĵaluzulo turnis al vi sian atenton...

—Danjo! - ŝi ekkriis al la servistino, kiu jus enlasis iun en la antaŭĉambron kaj fermis la pordon.

—La fraŭlino... Olnjo! - diris la servistino, enirante.

—Ha! Jen estas ankoraŭ unu vizito neatendita, - diris Julia Andreevna, leviĝante kaj ekpaŝante renkonten al la fraŭlino.

Joĉjo sekvis ŝian ekzemplon.

En la pordo ili renkontis Olnjon. Ŝi estis vestita hejme je simpla, sed bela vestaĵo mallonga rozkolora, kiu tre harmoniis kun ŝia vizaĝeto ruĝigita de frosto. Ŝiaj haroj silkaj, kutime, ne kunplektitaj, sed simple kunligitaj per roza rubando malantaŭe, estis ornamitaj je tiu ĉi kojo per unu malgranda basteto, alpinglita super la frunto.

—Kiel mi estas feliĉa hodiaŭ!.. Kiel mi estas feliĉa!... - ŝi laŭte diris, ridante Julia'on Andreevna kaj svingante en aero per la mano, en kiu estis ia paketo.

Ŝi amike premis la manon de Joĉjo kaj afable ekrigardis liajn okulojn.

—Fu!.. - ŝi diris, sidiĝante kaj malfacile spirante, - kiel mi laciĝis! Ĉu vi kredas, mi ĝis la domo mem kuris... La paĉjo diris, ke mi duonyu glitveturilon, sed al veturigisto ja mi devus pagi 40 kopekojn kaj por tiu ĉi mono mi havos ĉiun sendi eksterlanden kvar leterojn aŭ

dek poŝtkartojn, - ŝi senĉese babilis per sia voĉeto sonora, kiel per sonorileto arĝenta. - Hodiaŭ mi ricevis unu poŝtkarton ilustritan el Francujo de samideano Marcel Lucas kaj grandan leteron el Svedujo de fraŭlino Hilda Karlson. Rigardu, - ŝi sin turnis al Julia Andreevna kaj al Jeĉjo, - kia bela estas la poŝtkarto, sed mi preferas belajn vidaĵojn kolorigitajn de antikvaj ruinoj, apudmaraj urboj... Mi skribos al mia Marĉjo, ke li plu ne sendu al mi tiajn malspritajn poŝtkartojn...

- Ĉu jam amikiĝis kun via franca samideano? - ridetante, diris Julia Andreevna, admirante la ĝojan, feliĉan vizaĝeton de la knabino. - Ĉu jam nomas lin Marĉjo!

- Ho, jes! Marĉjo, Marĉjo, Marĉjo!.. Mi eĉ skribos al li jene: „Mia kara samideano Marĉjo!.. Ke li skribu al mi „Olnjo", mi nenion havas kontraŭ tio ĉi, ja ĉiuj min nomas Olnjo...

- Ho, Olnjo, Olnjo!.. - riproĉe diris Julia Andreevna. - Sed la leŭtenanto? Ĉu ja frenezigos pro jaluzo!

Julia Andreevna kaj Olnjo laŭte ekridis.

- Ĉio tio ĉi estas bagatelo, - la knabino daŭrigis gaje; - vi rigardu, rigardu, kion skribas al mi Marĉjo: „Mi kisas viajn manetojn kaj piedetojn!"

- Ho, mia Dio! Jen, oni tuj rekonas francan ĝentilecon!.. Malfeliĉa leŭtenanto! - diris Julia Andreevna.

- Mi jus ekvidos lin, mi tuj montros al li la poŝtkarton kaj tradukos tion ĉi, - diris Olnjo, ridante.

- Olnjo, vi estas senkora!

- Kaj pluajn leterojn mi ne tradukos al li, mi diros, ke li mem lernu la lingvon, se li volas scii, kion skribas al mi junulo j.

Kiam la poŝtkarto estis trarigardita de Jeĉjo kaj Julia Andreevna, la knabino elfrenis dikan koverton, en kiu estis letero de la svedino, ŝia fotografaĵo kaj luksa albumo da vidaĵoj de Kolmar — ŝia parenca urbo.

- Mi bedaŭras, - diris Olnjo, - ke mi nenion havas por sendi al Hilnjo intersanĝe. Ni havas nek albumojn kun vidaĵoj, nek poŝtkartojn de la urbo... Tamen estas malfrua horo, mi devas tuj rezervi hejmen por ne maltrankviligi la paĉjojn (Olnjo nomis la doktoron „paĉjo-doktoro", al kio ŝi alkutimiĝis de tiam, kiam ŝi komencis paroli). Kara Julia Andreevna, ĉu vi permesos, ke Danjo akompanu min ĝis la hejmo? Mi timas iri sola tra stratoj vespere...

- Danjo?.. - diris enpensiĝeme Julia Andreevna. - Ĉu Danjo?.. Ĉu li akompanos vin la juna homo? - ŝi ekrigardis komence Jeĉjon, poste la knabinon. - Kial vi nenion respondas? Ĉu stultokaze, mia kara, ne nomu lin plu s-ro profesoro...

- Mi neniam nomis lin... - Olnjo respondis, demande rigardante jen la mastrinon, jen Jeĉjon.

- Ni ĉiuj nomu lin de nun simple... Jeĉjo, li petas.

Jeĉjo ruĝiĝis.

– Mi konsentas je ĉio... – diris Olrjo, enmetante en paperpakaĵon la leterojn kaj fotografaĵojn. – Adiaŭ!

– Ĝustokaze, mia kara, mi petas, vi konatiĝu kojĝon kun via paĉjo... – diris Julia Andreevna, kisante la knabinon.

– Nepre, nepre. La paĉjoj ambaŭ delonge deziras tion ĉi.

– Nu, iru kun Dio! Saluton al la paĉjoj...

En la antaŭĉambro la servistino Danjo staris jam kun la pluŝa palto de Olrjo en la manoj. Julia Andreevna, kiu iris malantaŭe de Joĝjo, tuŝetis per la mano lian ŝultron kaj okulsignis al li, ke li vestu la knabinon.

Joĝjo konfuziĝeme kaj honteme prenis la paltON el la manoj de Danjo kaj etendis ĝin antaŭ Olrjo. La knabino turniĝis dorse al Joĝjo kaj etendis la manojn por vesti la palton, sed kiel ajn ŝi penus, ŝi ne povis enmeti la manojn en la manikojn de la palto.

– Pli malsupren, sinjoro! – flustris la servistino.

Joĝjo obeis. Kaj tuj unu mano de la knabino eniĝis en manikon, sed la alia ankoraŭ daŭrigis senhelpe moviĝi en aero.

– Vi tute ne scias vesti fraŭlinojn! – diris Olrjo, turnante la vizaĝon al Joĝjo. – Ĉu oni tiel vestas? – ŝi ekridis. – Mi hodiaŭ elartikigos la manon...

– Permesu, fraŭlino, – diris Danjo, prenante ŝin je la mano kaj direktante ĝin en la manikon.

– Ha, lasu, Danjo!.. Vi, eble, ankoraŭ volos veniĝi iun je helpo... Eble, vi iel vestos min hodiaŭ duope... – daŭrigis Olrjo, ridante, dum Joĝjo pur la manoj tremantaj senĉese movis la neobeantan manikon jen supren, jen malsupren, jen dekstren, jen maldekstren, – ĉiam maltrafe.

Julia Andreevna, rigardante lian fervoron, ridis ĝis larmoj. Ankaŭ ridis la servistino.

– Ĉu vi neniam vestis fraŭlinojn? Kia mallertulo vi estas... – murmuris Olrjo, ridetante, kiam la palto, fine, estis ĝuste vestita.

– Neniam... – mallaŭte kaj konfuziĝeme respondis Joĝjo. – Kie estas via baŝliketo?..

– La fraŭlino hodiaŭ venis sen la baŝliko, – diris la servistino, ankoraŭ ridante.

– Ĉu vi baldaŭ vin vestos? – 3erce – kolereme daŭrigis Olrjo. – Mi baldaŭ tute perdos pacienCON!.. Adiaŭ, kara Julia Andreevna, Danjo!

– Adiaŭ, kara mia!

– Adiaŭ, ĉarma fraŭlino!..

Kaj la pordo brue fermiĝis post la gejunuloj.

– Ĉu vi promenis iam kun fraŭlinoj?

– Ne... mi...

– Nu, ĉu vi vidis, kiel oni promenas kun ili?.. Je la mano?..

– Mi...

– Flekse vian manon jen tiel... Ne levu ĝin tro alte, mi vere rompos hodiaŭ miajn manojn... – ridante, instruis la knabino Joĝjon. – Jen tiel, bone!..

Ŝi alpremiĝis per la kapeto al lia ŝultro kaj ili ekpaŝis tra la strato ne lumigita.

XI.

Ĉu en sonĝo?

Saje babilante dum la tuta vojo, Olnjo kun sia akompananto trairis kelkajn stratojn kaj stratetojn hele lumigitajn kaj haltis ĉe perono de unu granda domo. „Ĉu ni jam venis? Ĉu jam finiĝis mia promeno kun la knabino mirinda?" – pensis Joĝjo kun bedaŭro, kiam Olnjo liberigis sian manon el lia mano kaj ekkonsciiĝis. La promeno daŭris ŝajnis al li unu bela sonĝo, post kiu devis sekvi, kiel supozis Joĝjo, realeco, senigita jet tiu ĉarmeco kaj fantazicco, kiujn li ĝuis ankoraŭ neniam. Sed li eraris. La bela sonĝo nur interrompiĝis por tempo nelonga por daŭri ankoraŭ dum longaj horoj en kondiĉoj de vivo tute nekutima, nekonata por li.

Pordisto, simple vestita, tuj malfermis la pordon kaj ĝentile helpis senvestiĝi al la gejunuloj en la antaŭĉambro.

– Ĉu la patĝo estas hejme? – Olnjo demandis, ordigante la harojn kaj ĉifitajn manikojn de la vestaĵo. – Ĉu li forveturis ien?

– Ne, praŭlino. Ambaŭ viaj patĝoj estas hejme, – respondis la servanto, gaje ridetante kaj ordigante siajn lipharojn.

– Bone. Ni iru!.. – kaj la knabino, kiel monta kapridino, rapide ekkuris supren laŭ larĝa panditpera ŝtuparo tapiŝkovrita.

Paŝante per unu fojo trans due-tri ŝtupoj, Joĝjo apenaŭ povis atingi ŝin sur supra placeto de la ŝtuparo, kie ŝi kunpuŝiĝis kun ia viro altkreska kaj korpulenta kun larĝa razita vizaĝo kaj bonaj bluaj okuloj, kiuj ĉiam agable ridetis tra okulvitroj.

– Ha, mia hirundo! – li diris agable, alpremante la knabinon al sia brusto. – Mi jam delonge atendas vin kaj ennuas sen vi kun la doktoro... Kie akompanis vin?..

La knabino ĉirkaŭprenis la patron (tiu ĉi estis s-ro Veselov) kaj karesis lin per la mano je la kapo kaj ĵe la kolo.

– Min akompanis hodiaŭ mia instruisto...

– Kia instruisto?.. – li interrompis la filinon, turnante la kapon al Joĝjo, ĉirkaŭrigardante lin de la kapo ĝis la piedoj mem kaj parante severe-seriozan mienon. – Kian instruiston vi trovis ankoraŭ?..

– Li estas mia instruisto... Nu, li estas tiu... vi scias... nia profesoro de Esperanto... Sed Julia Andreevna diris al mi hodiaŭ, ke de nun neniu plu nomu lin tiel, sed sim-

ple... Joĉjo...

La knabino konfuziĝis kaj kaŝis sian kapon sur la brusto de la patro.

— Ha-a!... - diris s-ro Veselov, ankoraŭ fikse rigardante Joĉjon, kiu ankaŭ konfuziĝis pro tio, ke la knabino nomis lin antaŭ la patro Joĉjo kaj pro severe-serioza mieno, kiu estis ankoraŭ sur lia vizaĝo. - Mi ĝojas, mi tre ĝojas, sinjoro... juna sinjoro... Ĵ Joĉjo... Mi delonge deziris konatiĝi kun vi.

Kaj s-ro Veselov, ĉiam ankoraŭ fikse rigardante kuntiriĝintan kaj ridinde-konfuziĝinan figuron de Joĉjo, jam gaje ridetante kaj eltirante al li sian grandan larĝan manon kun belaj fingroj muzikemaj, aldonis:

— Jen kiu delogis mian filinon!.. Jen kiu nebuligis la kapon de ŝi!.. Ne, ni izu! Ni estu amikoj...

— Paĉjo! - flustre parolis Olnjo, gaje saltante antaŭ ili, - li estas tia stranga, konfuziĝema. Hodiaŭ mi longe instruis lin... Imagu, li eĉ tute ŝŝ scias nek vesti pantalonojn, nek promeni kun ili je la mano...

— Tiu ĉi arto estas facile ellernebla. Atendu iom da tempo kaj sub via gvidado li baldaŭ fariĝos nerekonebla lerta kavaliro, flirtulo...

Ili eniris en la kabineton de s-ro Veselov.

Ĝi estis sufiĉe granda ĉambro, komforte meblita, en kies mezo staris bela skribotablo kun luksa skribilaro kaj kelkaj fotografaĵoj, inter kiuj Joĉjo tuj rimarkis portreton de Olnjo. Meze de la tablo en ordo severa kuŝis paperoj kaj kelkaj libroj. Du molaj apogseĝoj estis almovitaj al ĝi. Dekstre de la skribotablo, laŭlonge de muro staris du librobŝrankoj, el kiuj tra vitroj estis vidataj luksaj bindoj de enciklopedio kaj aliaj libroj. Laŭlonge de la muro kontraŭa staris granda tablo longa de simpla laboro, ĉirkaŭita de seĝoj kaj sur ĝi jam senorde kuŝis amasoj de paperoj, diversaj sennombraj albumoj, novaj libroj, dikaj ĵurnaloj kaj ĵus ricevitaj gazetoj vesperaj. Apud la librobŝrankoj staris granda leda kanapo.

— Jen estas mia laborĉambro, - diris s-ro Veselov, gaje ridetante. - Ni povas trovi tie, - li montris al Joĉjo la grandan tablon, - multajn interesajn por vi objektojn. La filino montros ĉion al vi.

— La paĉjo ne ŝatas labori je sia skribotablo, - diris la knabino, ĵus s-ro Veselov eliris el la ĉambro. - Ŝi estas tro malgranda por tio... Li ordinare laboras je tiu ĉi tablo granda, je kiu iafoje laboras ankaŭ mi kaj la paĉjo-doktoro. Sidiĝu!.. Jen estas lernolibro de Esperanto kaj aliaj libroj esperantaj. La paĉjo ion traduktas aŭ verkas en Esperanto, - ŝi aldonis kun serioza mieno, montrante paperojn de la patro.

La knabino almovis al la junulo albumon de familiaj fotografaĵoj, kie tutaj grandaj paĝoj estis okupitaj de portretoj de Olnjo de tiu epoko, kiam oni ankoraŭ vestis ŝin je knabaj vestaĵoj. Joĉjo kun miro rigardis jen la knabinon, jen la fotografaĵojn, ĉar li neniam vidis tian diversecon de fotografaĵoj de sama persono.

—En nia bieno Veselovo, kien vi sendube venos somere, – diris la knabino, kiu konjektis la pensojn de Joĉjo, – vere estas ajoj mirindaj, sed ĉio tiea ĉi estas bagatelo kompare kun ĉio, kion vi vidos tie. Tie ni havas grandegan domon, mi, kompreneble, havas mian ĉambron, kiu estas pli granda ol tiu ĉi kabineto kaj la kabineto tiea estas ne malpli granda ol la tuta loĝejo ĉeba. Krom ĉambroj ĝeneralaj tie estas „la ĉambro de Olnjo", loĝata de neniu, muroj kies estas tute ornamitaj de grandaj kaj malgrandaj fotografajoj de mi, komence de mia naskiĝo ĝis nuna jaro. En la kabineto de la paĉjo estas grandega biblioteko, enhavanta kelkajn milojn da libroj. La paĉjo-doktoro, kiu...

—Kio?.. Kion vi tie parolas?.. – subite ekaŭdiĝis post la dorsoj de la gejunuloj laŭta voĉo, kiu interrompis la knabinon.

—Ho! Kiel vi timigis min, paĉjo-doktoro! – ekkriis Olnjo, almetante la manojn al la brusto, kvazaŭ dezirante per tio trankviligi la koron maltrankvile ekbatintan.

—Pardonu... Daŭrigu, daŭrigu vian konversacion, mi plu ne malhelpos al vi, – pavlis la doktoro – la amiko de s-ro Veselov.

Li estis mezkreska dikulo, tute grizhara kun serioza, ĉiam pensoplena, mieno, kun grandaj okuloj ŝajne-ruzemaj kaj delikataj vizaĝtrajtoj.

—Bonjour! kiel parolas francoj, – li sin turnis al Joĉjo, premante lian manon malditetan inter ambaŭ siaj manoj molaj kaj dikaj, kiel kusenoj. – Kiel mi konjektas, vi estas tiu juna homo danĝera, kiu, pardonu min – mi estas medicinisto kaj mi akutimiĝis esprimadi miajn pensojn konforme al mia specialeco... Vi estas tiu junulo, kiu tiel fervore semas infekton, egale danĝeran por junuloj, ankaŭ por ni – maljunuloj?..

Joĉjo ruĝiĝis pro konfuziĝo kaj staris malleviute la okulojn.

—Vere, la infekto estas danĝera, – daŭrigis la doktoro, sidiĝante apud Joĉjo, kiu per peteganta rigardo petis helpon de la knabino. – Mia amiko – s-ro Veselov jam havis malfeliĉon infektiĝi, nun en la familio sola mi min detenas ankoraŭ de forlogiĝo je ideo de unu komuna lingvo, semojn kies vi nun semas.

—Kio detenas vin?.. – malkuraĝe demandis Joĉjo. Farante la demandon, li unumomente ekrigardis la doktoron kaj poste li ree mallevis la okulojn honteme.

—Mia kara, mi ja estas maljunulo. Estas hontinde, havante tian respektindan aĝon, kaj la senharajon preskaŭ tra la tuta kapo kaj la grizan barbon, ree, kiel antaŭ kvardek jaroj, preni lernolibrojn en la manojn kaj lerni diversajn deklinaciojn, konjugaciojn, – li respondis gaje kaj laŭte ekridinte bonanime. – Krom tio, – li daŭrigis post nelonge, – krom tio mi neniel povas kompreni, kian celon oni havas, varbante maljunulojn? Julia Andreevna, s-ro Veselov... nu, fine, mi, – ni ĉiuj jam sufiĉe vivis, ni ĉiuj jam estas maljunuloj, staranta per unu piedo en ĉerko... Kia utilo estos por la homaro, se ni ellernos la lingvon kaj hodiaŭ – morgaŭ mortos?..

– Li ĉiam estas kontraŭ ni!.. – Olnjo sin turnis al Joĉjo per mallaŭta ofendita tono, kva-

ĵaŭ tute forgesinte, ke la doktoro ĉeestis tie. - Antaŭe li parolis, ke esperantistoj estas tre malmultenombraj ankoraŭ, ke oni kun malfacileco povos trovi ie samideanon, ke estas pli facile trovi feliĉulon, gajnintan 200.000 rublojn, ol esperantiston. Kiam mi prezentis al li pruvojn de rapida disvastiĝado de la lingvo dum la lasta tempo, li jam plu ne kontraŭstaras, sed poste li trovis, ke Esperanto estas iom tre maldelikata lingvo, ke antaŭe oni devus pliboniĝi ĝin... nun estas nova preteksto - antaŭe ankoraŭ neniam aŭdita de mi: li jam estas maljunulo!..

Kaj alproksimiĝinte al la doktoro kaj ĉirkaŭkaptinte lian kolon, ŝi diris, ridsante kun larmoj en la voĉo:

— Vi scias, kiel mi amas vin, kara!.. Kial vi malgajigas min per tiaj vortoj kruelaj? Vi, ankaŭ la paĉjo, tute ne estas maljunuloj! Ĉu tiaj estas maljunuloj? Rigardu, via vizaĝo estas junaspekta...

— Ha, ĉu vi jam disputas? Mi ŝatas partopreni disputojn, - diris s-ro Veselov, enirante en la ĉambron kun cigaro en la mano kaj sidiĝante apud la doktoro.

— Ni parolas, ke la paĉjo-doktoro antaŭe parolis, ke Esperanton oni devas pliboniĝi... - diris sin turnis al la patro, kvazaŭ esperante trovi subtenon por si.

— Jes, jes... Pliboniĝi, vi parolas? Kion vi opinias pri pliboniĝoj necesaj en la lingvo? - s-ro Veselov sin turnis al Joĉjo. - Ni ofte tuŝetas tie ĉi la demandon, sed ni ĉiuj estas nur komencantoj, nenion legintaj en la lingvo kaj konantaj neniun samideanon, krom vi. Al mi' persone, ekzemple, ŝajnas tre maldelikata por ni rusoj, kompreneble, kombinaĵo de vortoj simila al la jena: mi dankas vin, ŝi petas vin, li ridas vin... Imagu al vi, ke ni ĉeestas en bona societo de inteligentaj fraŭlinoj kaj sinjorinoj, kiuj tute nenion aŭdis pri la bakitaĵo de estiminda Zamenhof, - ĉu ne trafus malagrable ilian aŭdosenton delikatan tiu ĉi senĉesa „svin"*) kaj ĉu ili povus bone sin senti en ĉeesto de similaj kunparolantoj?..

Joĉjo konfuziĝeme ruĝiĝis kaj ree ekrigardis Olnjon kun petego en la rigardo.

— Mi jam ne renkontis al vi, paĉjo, ke vi nur lokŝanĝu la vortojn, kiuj tiel konfuzas vin, t. e. ke vi parolu „mi vin dankas, mi vin petas" - kaj la demando estos sukcese solvita por ambaŭ flankoj: la bela lingvo restos netuŝita kaj nenies aŭdosento, krom ajn ĝi estus delikata, ne estos ofendita de „svin' aĵoj".

— Vi, mia kara infano, ĉiam solvas problemojn rapide kaj tre sukcese, sed mi volis pli frue aŭdi opinion de li... de via prof...

— Ha, ne nomu, ne nomu plu tiel lin! - Olnjo ekkriis, interrompante la patron. - Nomu lin simple...

— Pardonu!.. Sed mi preferus aŭdi opinion de Joĉjo pri la demando. Kion vi diros? - s-ro Veselov ree sin turnis al la junulo.

Legantoj jam aŭdis antaŭe, ke nia heroo estis junulo tre konfuziĝema kaj ne parol-

*) Ruse svinja estas porko.

ema. Li povis plezurege aŭskulti ĉĉ dum kelkaj tagoj ies ajn parolojn, konversaciojn, - sed kiam venis lia alterno ion paroli, li plej ofte tuj konfuziĝis, rugiĝis, pensoj intermiksiĝis en lia kapo kaj, anstataŭ iafoje atendata de li detala respondo, li liberiĝadis de la tasko malfacila per ne multaj vortoj nesignifaj.

„Ŝi, tiu ĉi bona knabino - Olnjo, - ja bone respondis", - li pensis hezite, melante en la poŝojn jen unu manon, jen la alian, kvazaŭ esperante trovi tie vortojn dirotajn. - „Kion ankoraŭ mi devas aldoni al la dirita? Kion oni bezonas ankoraŭ?"

— Laŭ mi, - post sufiĉe longa paŭzo li komencis malkuraĝe kaj mallaŭte, - laŭ mia ~~opinio~~ opinio... mi tute ne scias, kion ankoraŭ oni povas aldoni al la respondo de...

Je ~~[illegible]~~proksime, ŝajne, en najbara ĉambro eksonis mallaŭta melodia sonorileto kaj ĉiuj stariĝis rapideme. Joĉjo decidis, ke lia tasko malfacila estas finita kaj ke estas superflue aldoni ion ankoraŭ al tio, kion li ĵus diris.

— Ni iru vespermanĝi, sinjoroj, - diris s-ro Veselov, invitante per rigardo la doktoron kaj Joĉjon kaj prenante je la mano la filinon, kaj ne rapide foriris. La doktoro proponis sian manon al Joĉjo. Ŝli iris paŝo post paŝo post la unua paro silente, dume la patro, kliniĝinte al la orelo de la filino, longe ion flustris. Responde ŝi gaje ridetis kaj kelkfoje rerigardis la junulon. Lia konfuziĝo ĉiam kreskis, li sentis, kiom ridinda nun li ŝajnis al ĉiuj.

En la manĝoĉambro oni sidigis Joĉjon inter Veselov kaj la doktoro kaj Olnjo prenis devon de mastrino, disveršante kaj dismetante manĝaĵojn. Antaŭe ol sidiĝi sian lokon, Joĉjo iom da tempo hezitis, vidinte, ke neniu preĝis, aŭ almenaŭ faris krucosignon antaŭ la vespermanĝo, kvankam en la ĉambro estis ikonoj. En lia animo dum tiu ĉi momento estis kaŝita kaj vigla batalo: ĉu li devas, laŭ sia hejma-parenca kutimo, preĝi, ĉu, sekvante ekzemplon de la konatuloj, tiom inteligentaj, sidiĝi al la tablo ne preĝinte? Li rememoris admonojn de sia patrino, ke li neniam hontu konfesi aŭ elmontri al iu ajn, ke li estas kredanta kristano, ke neniu tiun ĉi emon mallaŭdos, kaj, fiksinte siajn belajn kaŝtankolorajn okulojn al la ikonoj, li respektoplene, nerapidante, faris kelkfoje krucosignon. Kiam li, rugiĝante, ekrigardis la vizaĝojn de la sidintoj, sur ili, al sia miro, li rimarkis nek ian moknideton, nek okulsignon mokeman, - kontraŭe, la vizaĝoj de ĉiuj estis seriozaj kaj pensoplenaj.

Dum la vespermanĝo ŝercoj senĉese ŝutiĝis de lipoj de la najbaroj de Joĉjo. Estis tre gaje, sed li, kutime, silentis, nur iafoje ekridante aŭ balancante per la kapo (kiam ia demando estis turnita al li), kio devis signifi, ke li estas konsenta. Olnjo kaj la doktoro fervore metadis plej grandajn kaj plej bonajn pecojn sur lian teleron, alparolante ĉiufoje, ke li devas pli multe manĝi por plidikiĝi.

Post la vespermanĝo s-ro Veselov ien foriris, Olnjo daŭrigis klopodi en la manĝoĉambro kaj Joĉjon la doktoro kondukis en la gastoĉambron. Sidiĝinte sur molan kanapon, la doktoro ekfumis cigaredon kaj, atente pririgardante la junulon, kvazaŭ li neniam vidis lin pli frue komencis:

—Ĉu vi havas en la urbo konatulojn, krom viaj nunaj lernantoj? Ĉu vi vizitas ilin? Mi remarkas, ke vi nenie estis en societo, pro tio vi estas tro konfuziĝema. Juna homo, vi devas pli ofte viziti societon! Mi scias, ke plimulto de lernantoj estas senigita je ebleco pariĝi, sed kiu havas tian eblon, tiu devas bonuziĝi. Ŝi povas havi gravan signifon por via estonteco. Kaŭ mi, estas necese por vi pli ofte viziti tiun ĉi domon gastaman kaj somere nepre pasigi kelkajn semajnojn en la bieno de s-ro Veselov. Cetere, la somero estas ankoraŭ malproksima, baldaŭ venos Kristnasko... Ĉu vi povas resti por la festo en la urbo? S-ro Veselov kun Olnjo kutime entreprenas ~~mul~~ maskobalon, vojaĝon al ĉirkaŭaĵoj de la urbo... Unuvorte, tie ĉi estos tre interese. Vi havos okazon konatiĝi kun multaj gejunuloj kaj lerni sintenadon. Se via intenco resti en la urbo dum la festoj kaj partopreni ĉiujn ĉi festajn amuzojn renkontus malhelpon de via lernija estraro, - ilin forigus facile s-ro Veselov, kiu konas ĉiujn viajn instruistojn kaj la inspektoron, - kaŭ lia peto mi hodiaŭ faras al vi' tiun ĉi proponon, kiun li delonge jam pripensis kun la filino, ankoraŭ ne konante vin persone.

—Ĉu vi restos?..

Joĝjo ekstremis, subite ekaŭdinte ĉarman voĉon de Olnjo, kiu staris dum la monologo ne rimarkita de li post lia dorso.

—Ĉu vi ne forvetturos hejmen?.. - la knabino daŭrigis, alpremiĝante al la doktoro kaj fikse rigardante la junulon.

—Pri tia feliĉo mi revis neniam... vi estas tro bonaj, - Joĝjo respondis. - Sed ĉu mi ne malĝojigos la gepatrojn? Ili kutimis modeste renkontadi la feston en ĉeesto de ĉiuj siaj infanoj. Krom tio... ili estas ne riĉaj kaj ĉiu rublo estas tre valora por ili... Dume, se mi restus en la urbo, ili devus pagi por mia loĝejo kaj nutrado superfluan monon...

—Vi loĝos en nia loĝejo, senpage, - Olnjo rapidis konsoli la junulon. - La paĉjo estos ĝoja al tio. Al viaj gepatroj vi skribu, ke al vi ni proponis la loĝejon kaj gastamon kun permeso de via estraro... Eble, vi eĉ aldonos por ilia konsolo ian mensogaĵon malgrandan?.. Ekzemple, ke vi esperas dum la festoj ion perlabori per lecionoj por helpi al ili'... Ni ne kutimis mensogi, sed por trankviligi ilin... Paĉjo-doktoro! - Ŝi demandis lin, karesante per la mano lian ŝultron, - kion vi opinias pri tio ĉi?

La doktoro ekrigardis ilin ambaŭ, kvazaŭ penante tralegi sur iliaj vizaĝoj, kion ili pensis, ordigis sur sia brusto oran horloĝĉenecton kaj diris malrapide, laŭte kaj klare:

—Ĉu mensogi? Laŭ mi, vi ne devas mensogi! Mensogo ĉiam restos mensogo, kiel ajn belajn celojn ĝi havus kaj, kiel tia, ĝi estas ĉiam abomena.

Olnjo ruĝiĝis pro honto kaj petis pardonon, ke ŝi tiom ne pripensite donis al Joĝjo sian konsilon. La konversacio daŭris ankoraŭ dum duonhoro. Joĝjo promesis ree viziti la familion post tri tagoj, al tiu tempo li devis pripensi la proponon kaj sciigi sian decidon, ke la mastro povu ĝustatempe ricevi permeson de la inspektoro de la seminario.

XII.

La akcidento.

En la sabato servinta en la horo xutima Julia Andreevna xaj xelxaj sami-deanoj, venintaj al la leciono, longe vane atendis Joĉjon. Ŝis nun li ĉiam estis akurata, tial lia neatendita foresto estis temo de longa konversacio de la ĉeestintoj. Oni faris plej diversajn supozojn xaj, fine, decidis, xe la instruisto subite malsaniĝis, xaj disiris.

Sed Joĉjo estis sana, li nepre vizitus la xuxvenon, se ne okazus al li io tre grava, havinta grandajn sekvojn por lia estonteco.

Revenite el la lernejo, en tiu tago Joĉjo trovis leteron de Olnjo. Ŝi petis, xe li tuj post tagmanĝo venu al ŝi xaj akompanu ŝin al urba malsanulejo, xuŝinta sur rando mem de la urbo. Olnjo devis viziti unu konatan fraŭlinon, kiu havis en la urbo neniajn parencojn xaj nun estis resaniĝanta. El la malsanulejo la gejunuloj ambaŭ devis tuj veni al Julia Andreevna.

—Ni malfruiĝos! — Olnjo diris kunĉagreno en la voĉo, jus venis Joĉjo. — Dum du horoj mi jam atendas vin xaj nun estas jam malfrume en la stratoj.

La knabino pro ĉagreno estis xolerema.

Joĉjo petis pardonon, li asertis, xe li hejme ne prokrastis eĉ unu minuton, xe xuen li — tia fidinda akompananto — ŝi povas timi nenion eĉ nokte xaj, fine, iom post iom li tute tranxviliĝis la xnabinon. Post xvaronhoro ŝi kun bona ridetanta vizaĝeto aperis antaŭ li, vestita por la promeno. Haltinte en la antaŭĉambro antaŭ la junulo, ŝi xoxeteme demandis:

—Ĉu mi estas bela fraŭlino?.. — xaj, ne ricevinte respondon, ŝi aldonis: — Ni iru!..

Joĉjo ne sciis, kion respondi, tiel neatendita estis la demando. Li belan, pliĉarman knabinon li eĉ neniam sonĝis, sed konfesi je tio ĉi antaŭ ŝi li ne havis kuraĝon.

Ili iris silente la mano je la mano. Estis frosta vespero. Neĝo knaris sub la piedoj xaj brilis, kiel diamantoj. Trairinte unu komerĉan straton xaj komercan placon, la gejunuloj baldaŭ eniris straton malriĉan kun mizeraj domaĉoj xaj longaj lignaj barilo j, pez kiuj estis baritaj legomejoj, kiuj tiriĝis tie ĉi je ambaŭ flanxoj laŭlonge de la strato. Ĉio — la domaĉoj, neĝo ne forbalaita de trotuaroj, sed amase kuŝinta ĉie, eĉ renkontataj mizere xaj malriĉe vestitaj, — ĉio atestis, xe ili ĉiam estis pli xaj pli for de la centro de la urbo, xe ili alproksimiĝis al la antaŭurbo. Krepusko rapide densiĝis, jam estis neeble pro malluxo vidi vizaĝojn de irintoj de kontraŭa flanko de la strato mallarĝa, tamen neniu rapidis bruligi stratajn larnternojn, sendube, pro ekonomio de petrolo xaj ĉefe pro konvinkiĝo, xe ili, pro sia malriĉeco xaj kummalfortikeco ne multe dispelos noktan malluxon de la strato. Kiam la gejunuloj renkontadis ebriulojn, ĉifonvestitajn homojn suspektindajn, Olnjo pli proksime alpremiĝadis al Joĉjo, fermis la okulojn xaj la orelojn, se est-

is aŭdata insulto aŭ kantado cinika. Por mallongigi la vojon kaj pli baldaŭ atingi la celon, ili plirapidigis sian paŝadon. Estis jam preskaŭ tute mallume kaj senhome en la strato, kiam ilian atenton subite altiris unu knabaĉo de dektri jaroj proksimume, ĉi-post vestita, kun maldelikataj gestoj kaj aroganta rigardo, konduksinta je la mano an-taŭ ili mem belvestitan knabeton kvarjaran. La knabeto estis bele, eĉ lukse vestita kaj, kiel ili tion sukcesis vidi, ĝuste preterirante lumigitajn fenestrojn de ia drinkejo, tenis en unu maneto pecon da nigra pano, kiun li de tempo al tempo metadis al la buŝo, la alia mateto estis forte kunpremita en la mano de la knabaĉo-ĉifonulo. La vizaĝ-eto, rugiĝinta pro la frosto, havis postsignojn de antaŭnelongaj larmoj kaj estis tiom ĉarma kaj belaspekta, ke Olnjo ekkriis nevole:

—Kia bela infano li estas! Mi kisus lin plezurege.

La knabaĉo, rimarkinte, ke la gejunuloj atentis lin, haltis kaj ĵetis al ili arogant-an, plenan de malestimo, rigardon. Sed tuj, kvazaŭ konjektinte ion, li ektremis la knab-eton tiom rapide, ke li apenaŭ povis sekvi lin, kurpaŝante per siaj malgrandaj piedetoj. Post ili Olnjo kun Joĉjo sekvis paŝo post paŝo. Olnjo bedaŭris, ke tia anĝeleto bela estas vart-ata de tia abomena kaj malpura knabaĉo, sed Joĉjo eksuspektis en ĉio tio ĉi ian malbon-an artifikon.

—Kien vi konduktas la knabeton? – Joĉjo demandis, fine, la knabaĉon, kiam li vee haltis por doni iomam ripozon al la etulo.

—Tien, kien mi devas konduki lin! – tiu respondis al li malĝentile.

—Kies li estas la filo? – Olnjo demandis siavice.

—De la patrinaĉo!... – la knabaĉo ekridegis. – Nu, iru, bovido, pli rapide, – li ekkriis minace al la knabeto, – alie mi vee ekbatos vin je la vizaĝego!...

—Mi timas... Miaj pi... pied... piedetoj!.. Kie estas la panjo?.. Panjo!... – li eksploris subite, ne deziranta moviĝi pluen.

—Aŭskultu, karulo! – Joĉjo diris. – Diru al mi tuj, kies li estas infano kaj kien vi konduktas lin, se vi ne diros, mi tuj invitos policiston!.. Li staras proksime de tie ĉi post la stratangulo.

La lastaj vortoj havis neatenditan efikon: la knabaĉo tuj forlasis la knabeton kaj mal-aperis en la mallumo. La gejunuloj staris hezite meze de la dezerta strato malluma an-taŭ la infano. Olnjo sin ĵetis al la etulo kaj kovris lian vizaĝeton per kisoj. Liaj manetoj estis malvarmaj kaj malsekaj pro larmoj, kiujn li senĉese višis per ili.

—Kion ni faros nun? – ŝi demandis Joĉjon, kiam la knabeto, ĝojigita de la karesoj ĉesis plori kaj konfideme alpremiĝis al Olnjo. – Kien ni metos lin?

—Sendube li havas ie en la urbo la gepatrojn, – diris Joĉjo, sentante, ke li vee ĉagrenas sian ĉarman kunulinon, kiu pro la akcidento jam ne povos plenumi sian celon – viziti la malsan-ulejon. – Ni demandu lin pri tio kaj, se ni ne ricevos ĝustan respondon, ni devos tuj venigi lin en policejon.

Je ĉiuj demandoj de la gejunuloj pri nomoj de la gepatroj, aŭ de la strato, en kiu ili loĝas, la knabeto aŭ tute silentis, aŭ donis respondojn malkompreneblajn, neĝustajn kaj ridindajn.

– Kion ni faros nun? – Olnjo ree demandis riproĉroĉe Joĝjon. – Ni devas rapidi en la malsanulejon, kaj kien ni iros nun kun li?.. Li frostmortos... Kiu scias, kies li estas infano? Por kio vi timigis tiun knabaĉon... forkurintan?.. – ŝi murmuris malkontente, tamen senĉese karesante la infanon.

– Laŭ mi, li estas knabo el iu bona, riĉa familio, - pri tio atestas lia vestaĵo kaj eksterajo. Kiu scias, ĉiele, iu forŝtelis lin kaj nun liaj gepatroj serĉas lin kun malespero?.. Ni venigu lin en policejon.

Preterveturinta glitveturilo haltaŭ venigis tien la trion. La knabeto dum la vojo estis tre gaja, sciiĝinte, ke oni veturigas lin hejmen al la panjo.

Dejorinta policoficiro afable renkontis ilin, tuj konjektinte, ke la knabeto venigita estas ĝuste tiu, kiun oni senrezultate serĉis jam dum du tagoj. Li tuj telefonis ien, sidigis la gejunulojn kaj ili ankoraŭ ne finis sian rakonton pri la trovitaĵo, kiam en la ĉambro aperis malgracile spiranta bela altkreska viro en oficira vesto uniforma.

– Vladĵo! Mia kara Vladĵo, ĉu vi estas ankoraŭ vivanta? – li ekkriis, sinjetante al la knabeto, pace dormetinta en brakoj de Olnjo, kaj ŝutante varmajn kisojn sur lian vizaĝeton kaj manetojn. – Ĉu mi ne sonĝas?.. Ne!.. Jio ĉi estas li, mia karulo...

La infano extremis pro neatenditeco kaj ĝojo kaj kun laŭta kriĉo delikata eltiris renkonten al li la manetojn. Nur preninte la infanon kaj iom trankviliĝinte pro emocioj, la patro feliĉa kvazaŭ rimarkis la trovintojn.

– Mi konjektas, kara fraŭlino, – li diris al Olnjo, ke vi savis la infanon. Diru al mi vian nomon, ke ĝi por ĉiam engravuriĝu en mia memoro.

Olnjo sin nomis kaj modeste klarigis, ke ne ŝi, sed Joĝjo estas la savinto. La oficiro riverencis kaj premis dankeme la manojn de ili ambaŭ.

– Kiu ajn vi estus, karaj savintoj, mi devos inde rekompenci vin. Bonvolu sekvi kun mi! La patrino malfeliĉa... ne! Kun ŝi estas pli feliĉa ol iam... Ŝi atendas nin. Volu, miaj karaj, sekvi post mi: apud la perono nin atendas ĉevaloj.

Ne ĉesante kisi la feliĉan infanon, la ne malpli feliĉa patro transdonis lin en brakojn de servosoldato, starinta apude. La lasta per mano kutima kovris lin kun la kapo per dika ŝnola ŝalo kaj malaperis post sia sinjoro. Olnjo kun Joĝjo sekvis post ili.

Apud la perono staris kalesko kovrita en kiun tuj sidiĝis la oficiro kun la soldato kaj por la gejunuloj tuj estis postulita speciala glitveturilo dungita. Apenaŭ ili sidiĝis, la ambaŭ glitveturiloj kun rapideco de birdo, kiu subite eksentis liberon post longa malliibereco, ekveturis tra stratoj senhomaj.

Olnjo estis tre gaja dum la vojo kaj ŝi jam ne ruĝfoje dankis Joĝjon, ke li liberigis ĝustatempe de la knabaĉo la infaneton. Ŝi jam ne koleris je la junulo, ŝi jam ne bedaŭris la viziton

ne plenumitan. Ŝian babiladon ĵoĉjo aŭskultis silente, antaŭsentante ion nebonan de la ro-
manĉo nova, kiu atendis lin. Li preferus sidi hejme... li ankoraŭ ne alkutimiĝis al ĉees-
to de altrangaj personoj.

XIII.

Pluaj detaloj.

Post kelkminuta preneza galopado la glitveturiloj haltis en unu el la
ekstratoj antaŭ luksa perono de neĝranda ducetaĝa masonita domo. Oni afable ren-
kontis la gejunulojn, helpis al ili formeti superajn vestaĵojn kaj kondukis ilin al hele lumigita
per lumo elektra ŝtuparo, kie atendis ilin malaltkreska maljuna virino nigre vestita.
Ŝiaj okuloj estis postploraj, blanka naztuko, kiun ŝi tenis en la mano kaj de tempo al tem-
po almetadis al la vizaĝo, videble, por foriga ankoraŭ ian neatenditе aperintan lazmon,
ankaŭ atestis, ke ŝi ploris antaŭ nelonge. Ŝi salutis la gejunulojn kaj ekkisis kelkfoje je la
lipoj Olnjon. Poste, konduktinte ilin en lukse meblitan gastoĉambron, ŝi sidigis ilin je tab-
lo en molajn velurajn seĝojn kaj eksonorigis mallaŭte. Preskaŭ samtempe servistino al-
portis kaj metis antaŭ ili teon.

—Volu trinki, miaj karaj, varmiĝu! Ŝajne, vi malvarmiĝis, - diris la maljunulino. —
Kia feliĉa okazintaĵo! Anĝelo gardanto mem, mi kredas, sendis vin por savi la infan-
on, - ŝi daŭrigis, farante krucosignon kaj viŝante la okulojn per la tuko. — Ni jam estis perd-
intaj preskaŭ ĉiun esperon iam revidi lin karan!... Ni povis nek manĝi, nek dormi dum
tuta tiu ĉi tempo, li ja estas sola mia nepo... amata. Ni trovis solan konsolon en preĝado...
kaj Dio, videble, aŭdis mian preĝadon, sendis vin karajn por 'savi la nepeton. La patrino
malfeliĉa pro la malĝojo malsaniĝis kaj doktoro trovis ĉe ŝi tre seriozan nervomalsanon...
Nun ŝi, dank' al Dio, estas tre feliĉa, eble, tiom feliĉa, kiom neniam. Ĝis ŝi transviviĝos kaj
supiĉe ĝuos ja la apudesto de la infano, ŝi alvokos vin; ŝi ordonis, ke oni ne lasu vin antaŭe, ol
ŝi konatiĝos kun vi kaj inde dankos vin.

Ĵoĉjo apetite trinkis la varman teon odoran, almanĝante dolĉajn molajn bulkojn, sed
Olnjo, ŝajne, eĉ ne tuŝetis sian glason. Ŝi atente aŭskultis la maljunulinon, ne fortirante si-
an rigardon de ŝia bona, sulkita vizaĝo.

—Sed kiamaniere vi perdis la knabeton? - Olnjo demandis, kiam la maljunulino
silentiĝis. — Ĉu li mem... sola foriris sur la straton?..

—Sola, sola!... Li ĉiutage promenis post tagmanĝo dum unu horo kun la vartistino-
fraŭlino. En tiu tago... ĝi okazis antaŭ du tagoj, Lubnjo - ĝi estas nomo de la vartistino
- kutime vestis lin kaj kia peko!... Ŝi lasis lin por unu minuto en la vestiblo... ŝi iris en sian
ĉambron por ordigi sian hararanĝon. Videble, ŝi forestis pli longe, ol decis kaj al la knabo
tedis atendi ŝin. La pordo estis fermita, li ne havis forton malfermi ĝin kaj li, evidente,

ris en la kuirejon, de kie sen ia malhelpo li eliris sur la korton kaj de tie en la straton... Kiam Lubrjo revenis en la vestiblon, la knabo tie jam forestis: Ŝi ekkuris tra la ĉambroj, en la kuirejon, en la korton, sed nenie li estis kaj neniu vidis lin. Kun ploregoŝi reiris hejmen, al la patrino kaj sciigis al ŝi pri la malapero de la knabo. La patrino tuj svenis... La kolonelo - li estas la patro de la knabo - tiam forestis. Kion fari? Feliĉe, mi ne perdis spiritĉeeston kaj tuj sendis la servosoldaton por tuj venigi lin hejmen. La patro anoncis pri la perdo en la polico, avertis siajn soldatojn, ke ili observu sur la stratoj aperon de la knabo, kies eksteraj signoj estis sciigitaj al ĉiuj. Pasis unu horo, du de atendado streĉita. Ĉiu sensignifa ekbato de ekstere, ĉiu telefonsonoro, pordknaro devigis nin ekstremi je espero ŝangi la malĝojon je ĝojo, sed iom post iom la espero malaperis, cedante sian lokon al malespero. Venis vespero, nokto... sed neniu pensis pri dormo. Teruraj estis superoj de la patrino: antaŭ nelonge ŝi aŭdis de iu, ke en la urbo estis kelkaj okazoj de ŝtelado de infanoj, ke iu bando de sentaŭguloj tiamaniere varbas estontajn burleskulojn kaj arlekenojn por cirkoj... ke la infanojn oni turmentas terure por atingi flekseblecon en iliaj artikoj... kaj la malfeliĉulino jam antaŭsentis, ke oni jam turmentas tiamaniere ŝian solan idon. Dum la tuta nokto, ankaŭ dum la tago sekvinta neniu alportis ian sciigon konsolan, - eĉ, kiel intence, neniu vidis la knabon en stratoj... - la maljunulino silentigis kaj kelkfoje viŝis denove la okulojn malsekajn.

— Vi ne ploru, kara! - diris Olnjo. - Mi nun bedaŭras, ke mi igis vin rakonti ĉi tion kaj per tio liveris al vi la maltrankviligon.

— Vi estas tre bona, mia infano. Por via kondolenco kaj la savo de la knabo vin rekompencos la Sinjoro... Pro la malĝojo ni ĉiuj estis ne rekoneblaj: ni evitis rerikonti unu la alian en la domo, interparoli... Kaj hodiaŭan tagon mi neniam forgesos. Mi sidis apud lito de la malsanulino. Ŝi dormis post daŭra sendormeco, kvankam la dormo estis maltrankvila, ofte trarompata... Mi sidis apude kaj pregis... Ĉiuj esperoj je homoj estis perditaj, restis tamen espero je helpo de la Reĝo Ĉiela. Subite terura, daŭra sonorado de telefono, kiel tondro trakuris tra la ĉambroj, poste ĝi ree ripetiĝis kaj ree, ĉiam kun nova persisteco. Mi ekstremis, la koro ekbatis, kiel birdeto timigita, neatendite ree naskiĝis la espero... La malsanulino ankaŭ malfermis la okulojn kaj, penante leviĝi de la lito, sencele vagis per la rigardo tra la ĉambro kaj demandis: „Kio okazis?.. Ĉu oni lin trovis?.. Kie?.. Kial vi silentas, parolu, ne turmentu min..." Ĉe la telefono estis aŭdata neklutime laŭta parolo de la kolonelo... Kaj mi ankoraŭ ne havis tempon por klariĝi al mi, ke ĝi estas de la telefono, ke per ĝi parolas la filo, ke mi devas tuj konsoli la malsanulinon, - kiam la pordo kun bruo malfermiĝis kaj sur ĝia sojlo aperis la kolonelo ridetanta, ĝoja. Li nenion diris, sed kelkfoje farinte krucosignon per la mano tremanta, ekkisis min kaj poste la edzinon... kaj nur post tio li diris malrapide, sed klarvoĉe: „La Sinjoro indulgis vin! Vladĉjo, nia kara Vladĉjo estas trovita... sana kaj sendifekta. Oni jus telefonis el la

policejo. Paro de iaj inteligentaj gejunuloj venigis lin tien..." Ĉion ceteran vi scias pli bone ol mi, - ŝi aldonis post paŭzo. Nun diru vi, miaj karuloj, kiu vi estas kaj kiamaniere vi trovis la knabon? Mi ne scias eĉ viajn nomojn.

Olnjo ĉion detale rakontis al la kortuŝita maljunulino, pro kio Joĉjo sin sentis ne-eutime senĝena kaj gaja. Lia samideanino parolema malkaŝe eĉ tuŝetis en la konversacio demandon pri sia lingvo mirinda, pri ĝia celo kaj eloxvente rakontis ĉion pri la kunvenoj ĉiusabataj ĉe Julia Andreevna por perfektiĝi en la lingvo. Joĉjo aŭskultis ŝin kun scivoleco nekaŝata, kvazaŭ ĉion, kion ŝi parolis al la maljunulino, li aŭdis je unua fojo. Kun miro aŭskultante la entuziasman parolon de Olnjo, Joĉjo konstatis, ke li havus nek kuraĝon, nek scion tiel simple kaj konvinkeĝe paroli al la tute nekonata homo pri tio, kio estis lia plej grava vivcelo, plej amata okupiĝo kaj sekreto profunda de ĉiuj aliaj konatoj.

Pro sia naiveco Joĉjo jam antaŭvidis rezultaton de tiu ĉi prediko de la knabino. Li jam antaŭsentis - tio ĉi ŝajnis al li tiel natura kaj neevitebla, - ke la maljunulino tuj ekinteresiĝos je la lingvo, ankaŭ la kolonelo kaj lia edzino, ke ili baldaŭ pariĝos fervoraj adeptoj de la lingvo kaj ke la rondeto samideana nun ĉiam grandiĝados senintermompe en la urbo.

En la fino de la parolo de Olnjo en la ĉambron eniris la kolonelo.

– Ni iru, - li diris, - la patrino, kiu nun supiĉe trankviliĝis, malpacience atendas vian venon.

La gejunuloj troviš ŝin kuŝanta en granda ĉambro komforta. Ŝi estis nevrdinare bela virino de tridek jaroj proksimume. Ŝia antaŭnelonga malfeliĉo restigis klarajn postsignojn sur la vizaĝo delikata. Kun forto ŝi premis dankeme la manojn de ambaŭ gejunuloj kaj longe kisis kaj karesis Olnjon je la kapo, post kio la lasta estis devigita je tria fojo detale rakonti la historion de la vespera aventuro. Dum ŝi parolis, la juna virino feliĉa gaje ridetis kaj ne deturnis de la knabino siajn okulojn, plenajn de amo kaj danko. Kiam la knabino ankaŭ je tiu ĉi fojo ekstuŝis demandon pri Esperanto, Joĉjo kolereme ekrigardis ŝin kaj faris per la mano malkontentan geston. Responde ŝi nur ekridis kaj malkaŝeme klarigis al la aŭskultantoj, kiom timema kaj silentema estis li – la ĉefa heroo de la okazintaĵo kaj entuziasma semanto de esperanta propagando en la urbo.

– Kompreneble, ĉio tio ĉi estas bona, - diris la kolonelo ekspirinte, kiam la knabino silentiĝis, – sed bona, ja oni parolas, estas nur tio, kio bone finiĝas. Vi estas trojunaj kaj allogemaj kaj mi timas, ~~xxx~~ pro amo, kiun mi sentas al vi, ke la lingvo laŭdata de vi malutilos al vi. Ankaŭ estus pli bone, se vi evitadus viajn opajn kunvenojn dum vesperoj. Se pri tio sciiĝos por ĉe, ĝi ne laŭdos vin... Kaj viajn kunvenojn oni facile povas opinii sekretaj. Sciigu tiun ĉi averon al viaj gesamideanoj. Mi ripetas, ke mi timas pri via plua sorto!

Estis jam la tria horo post noktmezo, kiam, akompanataj de ĉiuspecaj bondeziroj kaj

kenoj de la geedzoj felicigitaj, la gejunuloj forlasis la ĉambron. Antaŭ la foriro la ~~xxxxxx~~ mastrino petis, ke Olnjo akceptu, kiel memorajon pri la konatiĝo, beletan skatoleton kun arta juvelajo kaj ĵoĉjo, malgraŭ longa kaj obstina rifuziĝado, estis devigita preni de la kolonelo kun centrublan banknbileton. La gemastroj tre petis, ke Olnjo vizitadu ilin kaj ili esperis vidi ŝin dum la festa proksimiĝanta. Kiam Ĵoĉjo, jam tute vestita, je lasta fojo expremis la manon de la mastro, tiu eltiris al li sian vizitkarteton kaj aldonis:

— Se vi iam bezonos je flanka helpo, vi turnu vin senĝene al mi. Memorante vian bonfaron al ni, mi ĉiam uzos ĉiujn penojn por bonservi kaj esti utila al vi.

Sur la karteto Ĵoĉjo traleqis grasliteran presitajon: „Nikolaj Fedorovič Novickij. La kolonelo de 114 regimento." Sur la dorsa flanko de la karteto per grandlitera legeb-la skribmaniero estis farita la noto: „Posedanton de tiu ĉi karteto oni devas akceptadi sen speciala raporto al mi".

La sama glitveturilo rapidege alveturigis la junajn samideanojn al la loĝejo de Veselov. Dum la vojo Olnjo estis tre ĝoja kaj ridis senĉese.

— Kiel mi estas kontenta je la akcidento kaj la nova konatiĝo! — ŝi diris, forlasante la glitveturilon. — Ni tre dankas vin...

Ĵoĉjo akompanis la fraŭlinon ĝis la pordo mem. Li ekzonoriĝis kaj, nur kiam ŝi malaperis post la pordo, li gaje ne rapidante eliris hejmen tra tute dezertaj stratoj dormantaj. Plej diversaj pensoj svarmis en lia kapo, sed superregis ĉiujn ilin memkontenteco okaze de la ekzero de la infano kaj admiro je la nobla familio de la kolonelo.

XIV.

Konvena konsiloj.

Revenante hejmen malfrue, restajon de la nokto Ĵoĉjo pasigis sendorme. Vere, li dormis, sed la dormo ne estis fortikiganta, sed maltrankvila, inkuba, premanta, pro kio li sencese vekiĝadis. Proporta impreso de la travivitaj okazintajoj jen li songis, ke la kolonelo protektas la kursojn de Esperanto, ke neniu plu kuragas moki aŭ kritiki lian amatan Esperanton, ke la lingvo, dank' al klopodoj de la kolonelo, jam estas enkondukita en ĉiujn lernejojn de la urbo kaj Ĵoĉjon, kiel spertulon kaj kompetentulon, oni ne cedante unu-al la alia invitas jen esti hejma instruisto de ĝi, jen gvidi esperantajn kursojn, jen — la lingvo estas malpermesita, kiel danĝera ilo de politika propagando, Ĵoĉjo mem estas metita en ian malliberejon kaj Olnjon oni disigas kun la patro kaj la doktoro kaj ekzilas en Siberujon, jen — la kolonelidzino, veninta speciale al Ĵoĉjo, petegas lin serĉi ŝian malgrandan filineton ankaŭ ien malaperintan kaj promesas al li por la konservo ian riĉajon rabelan, jen —, fine, oni eksigis lin el la lernejo profita forlogiĝo je Esperanto kaj lia patrino „Sen titolo".

pro tiu ĉi malfeliĉo malsaniĝis kaj mortis.

. Nur matene saniĝa dormo ĉirkaŭkaptis lin kaj forpelis la songojn inkubajn. Li elvitiĝis malfrue, kiam en ĉiuj preĝejoj liturgio jam estis finita. Lia humoro estis malbonega; la kapo doloris, ankaŭ doloris la koro, kvazaŭ antaŭsentante ion malbonan. Li estis tute ne kapabla fari ion kaj, por distriĝi kaj riceviplifaciligon, li decidis tuj viziti Julia'on Andreevna.

. La maljunulino, feste vestita, antaŭ nelonge revenis el preĝejo kaj pro tio estis en bonega, festa humoro. Lia vizito ne atendita kaj ne gustatempa de Joĝjo surprizis ŝin, pro kio ombro de maltrankvileco tuj traŭris tra ŝiaj ĉarmaj trajtoj.

—Kio okazis al vi? – ŝi demandis, renkontinte Joĝjon en la antaŭĉambro. – Ĉu vi estas sana? Ni hieraŭ longe atendis vin kaj decidis, ke vi malsaniĝis. Hodiaŭ en la preĝejo mi intence aĉetis kaj sendis al altaro prosanan prosforon pri vi. Memorfere, vi estas pala, kiel malvivulo! Kio okazis al vi?

. Joĝjo, kiel li povis, trankviligis la bonan maljunulinon kaj poste detale klarigis al ŝi kaŭzon de sia vizito tro frua. Kiam li rakontis al ŝi ĉion senkaŝe, ŝi profunde ekspiris kaj diris:

—Vi faris la agon laŭdindan, savinte la knabon. Mi kredas, ke la Savinto Mem sendis vin por fari ĝin. Mi bone konas la kolonelon, kiu estas fama bonfaranto kaj honora membro de multaj urbaj institucioj, ankaŭ de via seminario. Estante homo nobla kaj bonintenca, li ne pretere lasis la okazon forfaveri vin je la danĝero, eble, efektive minacanta al ni. Ni devas esti pli singardemaj. Sed ni nek ĉesigu niajn okupojn je Esperanto, nek multenombre kunigadu al la kursleciono j. Mi jam ĉion pripensis. Kiel vi scias, pli serioze studas la lingvon Olinjo, Leskov kaj, se mi ne eraras, mi. Ni, laŭeble, senĉese kun via helpo daŭrigos min perfektigi en la lingvo, vi, ja mi esperas, kiel antaŭe, vizitados min. Al Olinjo helpos lia patro, ankaŭ vi, ofte estante en ilia domo, kaj Leskov estas tia kapabla junulo, ke sen fianka helpo li povos plene eksplodi la lingvon, kiun li amas senmezure. Pri la ceteraj okazaj vizitantoj de la kurso mi ne bedaŭras, ĉar mi ne esperas, ke ili estos kapablaj restu fidelaj kaj veraj esperantistoj. Mi bedaŭras nur, ke niaj familiaj, pure amikaj ĉiusabataj kunvenoj, al kiuj mi tiel alkutimiĝis, ne plu daŭros, sed kiun fari? Ni elektu el la du malbonoj tiun, kiu estas pli bona.

Joĝjo kun sopiro aŭskultis la maljunulinon, kiun li delonge amis, kiel sian patrinon. Li estis tute certa pri tio, ke la interrilatoj tiom parencaj restos la samaj ĉi post ĉesigo de la kursoj, ke li, pro tiu ĉi ŝanĝo, tuj liberiĝos de siaj ĉiamaj timoj pri sia sorto, tamen li bedaŭris la ĉesigon de ili. Ŝajnis al li, ke li kun ili perdas ion plej karan, anstataŭeblan de nenio. Lian sopiron rimarkis Julia Andreevna.

—Ĉu vi estas premita de io, mia kara? – ŝi demandis. – Ĉu mia plano tiom ĉagrenis vin?

—Ho, ne! Tute ne! – la junulo ekkriis kun ardo. – Vi ĉion pripensis bonege, ni sekvu ne plankŭante laŭ tiu ĉi plano. Mi nur rememoris subite niajn unuajn kunvenojn kaj mia koro

kaj tuj premiĝis doloriĝe en la brusto, kvazaŭ mi seniĝis je io kara... parenca...

Ŝi alproksimiĝis al Jeĝjo, prenis lian kapon per la ambaŭ manoj kaj kelkfoje ekkrisis ĝin.

— La saman, kiu imagu, travivas mi, mia kara infano amata! Ĉu ne atestas tio ĉi pri tio, ke niaj animoj — la via kaj mia — estas parencaj? — Ŝi daŭriĝis, karesante patrine la knabon.

Ju ekprapis je la pordo. Jeĝjo ekstremis kaj ekpensis:

„Kio ĝi estas? Ju venis... Ĉu Olnjo?.. Kiel ĝustatempa nun estus ŝia veno!"

Julia Andreevna, eliriinta malfermi la pordon, baldaŭ revenis. Traleginte demandon sur la vizaĝo de Jeĝjo, ŝi sciigis, ke tio estas la servistino, revenintа de siaj parencoj, kaj ŝi denove sidiĝis kontraŭ la junulo sur sian seĝon.

— S-ro Veselov parolis al mi, ke li komisiis al vi traduki iun sian rakonton rusligvan, — ŝi rekomencis.

— Jes! Tio ĉi estas bela rakonto, mi komencis traduki ĝin, sed mi ankoraŭ ne havis tempon por fini ĝin.

— Bravo! Mi esperas, ke la traduko estos ne malpli bona, ol la originalo. S-ro Veselov diris, ke li ankoraŭ intencas prepari kelkajn rakontojn por via tradukado. Kvankam li provis antaŭ nelonge verki originale en Esperanto, sed li sentas, ke la provo estas ankoraŭ antaŭtempa, ĉar li ankoraŭ ne sufiĉe posedas spiriton, kiel oni ĝin nomas, de la lingvo. Kaj ĉu vi jam havas ian pseŭdonimon por subskribado de viaj similaj laboroj ankaŭ?

— Ho, jes. Mi subskribas tiajn rakontojn: „Duope".

— Bonege. Mi ankoraŭ demandos vin, ĉu vi mem verkas originale en nia lingvo?

— Mi verkas... Sed, vere, mi estas malbona verkisto!...

— Kaj ĉu viaj rakontoj estas presataj?

— Nur unu...

— Vi devos tralegi ĝin al mi. Ĉu ne?.. Mi imagas, ke ĝi estas io ĉarma, kortuŝa. Mi tre ŝatas literaturon, precipe versaĵojn kaj vere mi ripozas animе, kiam mi pasigas tempon ĉe S-ro Veselov dum lia legado. Li estas rimarkinda lektoro, ankaŭ neordinara poeto. Ĉu vi verkas versaĵojn?.. Interalie, mi tute forgesis sciigi al vi jenon: S-ro Veselov vizitis ek-inspektoron de via lernejo kaj ricevis de li permeson, ke vi povu pasigi la festojn alproksimiĝantajn en lia hejmo, kiel gasto. Mi tre ĝojas pri tio. En rondo de lia familio vi ne sentos enuon, sed kiom da bonaj impresoj, impluoj vi povos ĉerpi dum tiu ĉi tempo, mi vere envias al vi. Mi tre plaĉas al s-ro Veselov, li tion diris al mi malkaŝe. Li kun la doktoro kaj, kompreneble, kun proksima partopreno de Olnjo prilaboras vastan programon de estontaj festaj soleno j, en kiuj vi estos ĉarma partoprenanto. Ĉu Olnjo ankoraŭ nenion parolis al vi pri tio? Sekve, ĝi estas ankoraŭ sekreto por vi, kaj mi ne diros detalojn. Mi nur diros, ke dum la festoj estos tre, tre gaje.

— S-ro Veselov estas tre bona kaj mi tute ne scias, kiamaniere mi povos iam danki lin-

por liaĉiama afableco kaj bono.

— Tiu ĉi homo, mia kara, delonge kutimis pari bonon kaj sole bonon al ĉiu homo, kiu ajn li estus, kaj tute ne kutimis akceptadi ies dankon. Se vi nur vidus, kiom da zejun-uloj gastas ĉe li somere. Ili gastas iafoje longan tempon kaj mi ne scias, ĉu multaj el ili sciis siatempe elmontri al li ducan danksesprimon.

— Mi volus donaci ion al li...

— Ĉu por la festo?.. Atendu iom da tempo, tion vi faru pli bone post la gastado, - cetere, tio ĉi estas mia opinio privata kaj vi agu, kiel tio plaĉas al vi.

— Ne, mi nepre sekvos vian konsilon.

— Kion vi deziras donaci al li? Ĉu vi jam havas ion por donaci?

— Ne. Mi volis peti de vi konsilon, kia donaco estos pli konvena por li. Mi ĝin aĉetus...

— Mi ne scias tute, kion respondi al vi. Se vi aĉetos ian bagatelaĵon, do s-ro Veselov posedas ilin jam grandnombre kaj la via nepre perdiĝos inter ili kaj tial ĝi estos tute ne distinĝiĝa de ceteraj, similaj aĵoj, kaj baldaŭ forgesita. Krom tio, ĉu vi havas por tio monon superfluan?..

— Ho, mi estas de la tago hieraŭa ridulo! - ĵetĵo ekkriis fanfarone. - Mi forgesis diri al vi, ke la kolonelo, malgraŭ mia longa kaj persista rifuzado, donacis al mi cent rublojn. Jen kian grandan monsumon mi havas!..

— Bone!.. Vi volas aŭdi mian konsilon pri konvena ujo de la mono... Mi ne ŝatus aŭdis de vi, ke vi jam gepatroj estas ne riĉaj, ke ili ofte bezonas mizeron kaj ĉiu kopeko estas valora por ili kaj ekonomie elspezata de ili. Mi ripetas, ke s-ro Veselov'on vi ne miriguus, ĉe se vi aĉetus por li ian objekton pli multekostan, ol tuta via nuna kapitalo, - kaj estus tre ĉarme, se vi sendus la monon al viaj gepatroj anstataŭ la festoj, kiel donacon... anstataŭ vi mem!..

— Kial, kara ge Julia Andreevna, viaj konsiloj ĉiam estas tiel bonaj kaj... simplaj? Kial tiu ĉi penso simpla pli frue ne venis en mian kapon? - ree ekkriis ĵetĵo, ravita de la propono. - Ke la donaco ne malfruiĝu, mi hodiaŭ sendos ĝin poŝtmandate. Kiel ili ĝojos je tiu ĉi monsumo! Kiel bone ĝi efikos je ili dum mia festo dum la festoj!.. Mi dankas vin, mia bona konsilantino!

— Jes, ankaŭ laŭ mia opinio, ili estos kortuŝitaj de la donaco, sed pli ol ili estos kortuŝita de via ago s-ro Veselov kaj precipe, mi esperas, la kolonelo, se, kompreneble, ili iam sciiĝos pri ĝi.

Longe ankoraŭ daŭris la konversacio senĝena, amika, dank' al kiu ĵetĵo revenis hejmen ĝoja, trankviligita kaj feliĉa.

La saman tagon li forsendis la monon, sciigante al la gepatroj malkonsige la fonton, el kiu ĝi estis ricevita.

XV.

Antaŭfestaj preparoj.

Estis alproksimiĝanta Kristnasko. Ĉie estis rimarkeblaj antaŭsignoj de la festo: en fenestroj de magazenoj aperis riĉaj sortimentoj de donacoj kaj ĉindiĝe-brilantaj per oro kaj arĝento ornamaĵoj por kristnaskaj abioj. En gajaj vizaĝoj de infanoj kaj gejunuloj, promenintaj tra stratoj estis klare videbla antaŭĝuado de la gaja libertempo proksimiĝanta. Nur Joĉjon ĝi ne ĝojigis. De la aŭtuno mem sin fordonінte al Esperanto, poste al la konatiĝoj, li vivis ĝis la lasta tempo ekskluzive per interesoj de sia amata afero, malpacience atendante sabatojn, kiuj nerimarkeble-rapide pasadis unu post la alia. Ĉiam prizorgante venontajn lecionojn sabatajn, revante pri renkontoj dumilli, Joĉjo tre malmulte zorgis pri siaj devoj de lernanto. Nerimarkeble li perdis intereson al studataj lernobjektoj, malmulte dediĉis al ili atenton kaj laboron kaj rezultato de tio ĉi jam montriĝis: Joĉjo preskaŭ nenion sciis el la ellernita kaj estis riceventa al la festoj bileton kun kelkaj ne kontentigaj notoj, kio antaŭe okazis ankoraŭ neniam. Pli malfacila por li kaj pro tio pli malŝatata de li estis fiziko. Antaŭ kelkaj tagoj antaŭ la festo la instruisto eĉ diris al Joĉjo:

– Vi, juna sinjoro, scias tute nenion kaj nenion vi volas kompreni kaj studi. Se tio ĉi daŭros tiel, vi restos en la sama klaso por dua jaro.

Konsternita de tiu ĉi neatendita averto, Joĉjo malgaje revenis el la lernejo, malbenante la instruiston, bedaŭrante la tempon perditan kaj antaŭsentante, kiel li malĝojigos la gepatrojn, kiam ili sciiĝos pri liaj malsukcesoj en la lernado.

Sed estis perdite multe da tempo kaj reboniĝi la aferon nun ŝajnis al Joĉjo tasko supernezura kaj ne laŭporta. Li konsolis sin, ke la gepatroj havos nenian malproksiton, eĉ se li estos restigita por dua jaro en la sama klaso, ĉar li jam redonis al ili per unu fojo elspezojn de ili, sendinte al ili la centrublan bankbileton. Krom tio Joĉjon ĝojigis la proksima transloriĝo al Veselov'oj kaj, sin fordonінte kun nova energio al esperanta agado, Joĉjo penis tute forgesi la malagrablajojn, kiuj ĉiam persekutis lin en la lernejo.

Dum du vesperoj Joĉjo penene traduktis la rakonton de s-ro Veselov. Kvankam ĝi estis facila por traduki, tamen por tiu ĉi laboro li uzis tre multe da energio kaj atento, ĉar li volis, ke la traduko estu samtempe eble plej preciza, klara kaj konstila. Kiam ĝi estis tute preta, Joĉjo preskaŭ tiom da tempo uzis por netskribi ĝin. Kun la laboro li rapidis, ĉar li deziris eble plej baldaŭ kunvidiĝi kun la familio gastama, sed izi tiel sen la manuskripto preta li ne volis por ne elmontri sin, antaŭ Veselov laborema, malditigentulo kaj mallaboremulo.

Joĉjon renkontis Olnjo. Ŝi kutime estis nekontenta, ke li delonge ne vizitis ilin kaj ion

murmuris duonvoĉe dum ŝi konduksis lin en la laborĉambron de la patro. Tie je la granda tablo konata krom la mastro kaj la doktoro neevitebla estis la leŭtenanto kaj ia nekonata viro de kvindek jaroj proksimume kun tute senhara kapo, grasa kolo kaj granda ventro, kiu, ŝajne, eĉ malhelpis al li sidi je la tablo. Malgraŭ sia dikeco, li estis homo tre morigĉema kaj gaja. Li, kiel Joĉjo poste rimarkis, estis ŝerculo kaj ridemulo, pro kia lasta emo la vangoj dikaj kaj la ventro tremetis ĉe ĉiu nova rideksplodo. Li estis malnova amiko de s-ro Veselov — ĵurnalisto kaj fama verkisto Kleverov-Ĉagin.

Joĉjo nun vidis la leŭtenanton je unua fojo post la memorinda renkontiĝo kun li en la bulvardo, dum kiu li devis toleri tiom malĝentilan kaj ne merititan ofendon. Sento de venĝo, de malamikeco ekbrulis en lia brusto, kiam li ekvidis la malamikon, sed kaj li rememoris la bonan konsilon de Julia Andreevna, kiu estu pardonema al la oficiro, ke oni neniam povos ekstermi malbonon per malbono kaj, uzinte grandan penon, li ver-kis en si tuj senpostsigne la malamikecon.

Joĉjo salutis la ĉeestantojn, kiuj ĉe lia apero ŝanĝis nek sian interparolon, nek pozojn. Nur la mastro vigle starigis kaj, premante amike lian manon, laŭte, bonanime kaj kun ne kaŝata riproĉo diris:

— Ne bone, estas ne bone, juna homo, vi tute forgesis viajn promesojn!.. Ŝajne, vi ĉiujn jam konas, krom tiu ĉi dikulo, — li montris la ĵurnaliston, kiu forlasis la ~~intim~~ kunparolantojn kaj eltiris al la junulo sian grasan kaj dikan manon, — kunli vi tuj konatiĝos.

— Mi petas, mia amiko, lasi vian mokadon, — tiu respondis serioztone, — ĉu mi memorigeze estas tia dikulo?.. Vi, mi vidas, neniam vidis verajn dikulojn, antaŭ kiuj mi ŝajnas veze mal-dikulo!.. — kaj li eksplodis per laŭta rido daŭra.

— Ekzemple, monahojn de Lavra!.. — la leŭtenanto aldonis.

Ĉiuj aliĝis al ĉiam ankoraŭ ne silentiĝanta rido de la ĵurnalisto, kiu apoginte malan-taŭen je dorsa flanko de la apogseĝo sian kapon kaj elstariginte antaŭen, kiel monton, la ventron skuiĝantan, laŭte kaj, ŝajne, tute senkaŭze laŭte ridegis:

— Ha-ha-ha!.. Ho-ho-ho!..

Dume Joĉjo premis amike la manojn de la doktoro kaj de la leŭtenanto, inter kiuj li post tio okupis seĝon.

— Quid novi? kiel parolas... — komencis maldiligente la doktoro, atente rigardante Joĉjon, sed tuj, rimarkinte en lia mano la manuskripton, li plivigliĝis kaj seivoleme demandis:

— Kio ĝi estas?.. Ĉu vi intencas regali nin per io nova?

— Ĝi estas la rakonto de s-ro Veselov...

— Kia? — demandis la leŭtenanto, — eltirante la manon al la manuskripto.

Joĉjo senvorte enmanigis al li la manuskripton. La leŭtenanto ekrigardis la kajeron kaj, sulkiginte la vizaĝon kaj ekskuinte la kapon, tuj redonis ĝin al Joĉjo, aldonante:

– Ni petas, liberiĝu min. Mi esperis, ke ĝi estas skribita ruslingve. Ĉu s-ro Veselov jam verkas originale en... en tiu ĉi lingvaĉo? – li diris kaj, leviĝinte, li alproksimiĝis al Olrjo, premis ŝinjc la manon kaj ion explustris al ŝi. Responde ŝi longe nee balancis per la kapo, poste, parinte malkontentan mienon, ŝi forlasis kun li la ĉambron.

– Vi havas tre belan skribmanieron, – la doktoro diris al Jorjo, foliante la kajeron.

– Ha, vi alportis la traduxon! – Veselov diris kaj, montrante al la dikulo la manuskripton, li aldonis: – Jen estas traduko de tiu mia rakonto.

– Ĉu en Esperanto?.. Hm... Efektive, multajn vortojn mi tiuj rekonas, ne lernante ĝin... Kaj kiu faris la tradukon?

Veselov per la mano montris Jorjon kaj aldonis:

– Tiu ĉi pioniro kaj varmega propagandisto de la lingvo en nia urbo.

La dikulo iom da tempo rigardis jen la junulon, jen la manuskripton. Post formet- inte ĝin, li kunmetis la manojn sur la ventro kaj, ludante per dika horloĝĉeneto, kiu kuŝis sur ĝi, eksparolis malrapide, malrigle:

– Jes... Parolante serioze, mi devas konfesi, ke la ekpensajo de la doktoro Varsovia estas atentinda kaj subteninda. Ĝi povas alporti sendubaŭ utilon almenaŭ... al tiaj junul- oj. Ili trovos en ĝi agrablan amuzaĵon, eblon interesiĝi kun eksterlandanoj kaj ĉefe... ĝi fortiros ilin de amuzaĵoj nekonvenaj al ilia aĝo kaj, bedaŭrinde, nun tre disvastigitaj. Inter nia junularo ĝenerale... Rigardante la manuskripton, mi konstatas, ke vi, jun- na sinjoro, posedas belan skribmanieron. Mi povus volonte liveri al vi laborenspezon, se vi konsentus je miaj kondiĉoj... Ĉu vi povas skribi nete miajn manuskriptojn pres- otajn?

– Sed, ŝajne, estus pli oportune por vi, se vi havus tian skribiston pli proksime de vi... en la urbo? – demandis Veselov.

– Ili jam tedis al mi – tiuj ĉi miaj ĉeĥurboj gestudentoj! – la dikulo respondis, malespe- re ekskvinginte per la mano. – Se vi scius, ~~kom~~ kiom da mia sango ili ekfektis! Ili pos- tulas bonan pagon, sed la taskon ne volas ĝuste plenumi. Ĵaĝe ili tiel kripligas manus- kripton, ke ĝi tute ne similas al la originalo!... Kiom vi volus ricevi por ĉiu folio retskrib- ita de vi?.. – tute neatendite li sin turnis rekte al Jorjo.

– Mi tute ne scias... Mi neniam... – Jorjo respondis, kutime ruĝiĝante pro io.

– En la ĉeĥurbo mi pagas al studentoj po 15 kopekoj...

– Ne ofendu, la junulon, – enmiksiĝis s-ro Veselov.

– Por kio ofendi? Ĝi estas bona perlaboro: dum nenu tago li povos perlabori kiom? Ĉu vi kalkulis?..

– Tre malmulte, – diris s-ro Veselov.

– Sed tio ĉi kontentigas ĉeĥurban junularon, kiu...

— Atendu, kara amiko, — interrompis lin s-ro Veselov. — Unue mi scias, ke neniu skribos al vi pli ol 15 kopekoj, due - oni ĉiam ĉagrenas vin per neĝusta retskribado kaj, eble, neĝustatempa, tial vi fiksu pli altan pagon kaj estu certigita, ke la tasko estos ĉiam akurate plenumota de tiu ĉi juna sinjoro, mi tion garantias.

— Pli altan pagon mi ne povas pagi...

— Ĉu? .. Se vi volas, ni laboros por vi por la duobligita pago, alie...

— Ili tute ne altrudas la taskon al vi... Mi parolas kun la junulo.

— Ni laboros kune...

Joĝjo tre bedaŭris, ke s-ro Veselov enmiksiĝis en la kontraktadon kaj timis, ke la dikulo fin-fine sangos sian intencon kaj li seniĝos je la neatendita perlaboro, kiu liveros al li konstantan enspezfonton. Li jam estis preta deklari, ke li laboros eĉ po 10 kopekoj, kiam de ie ŝteliris al li Olnjo kaj, delikate premante lin je la mano, eksplodris je lia orelo:

— Vi enmastiecu... Iru kun mi, ni priparolu kelkajn gravajn demandojn.

— Kien vi? — la dikulo demandis Joĝjon forirantan. — Ĉu vi ne deziras preni sur vin la taskon proponatan?..

— Ne, mi tre dezirus kaj estas preta konservi al vi eĉ... — komencis Joĝjo, haltante kaj fikse rigardante la dikulon.

— Bone. Ili iru!.. Ili havas pli interesan por ili aferon, — interrompis lin s-ro Veselov. — Ni sen li pinos la aferon komencitan.

— Prikio vi marĉandas? — la knabino demandis, konduktante Joĝjon ien tra la manĝoĉambro.

— La ĵurnalisto proponas al mi skribi laboron, sed via paĉjo ▬ volas, ke mi ▬▬▬ ne laboru tiom malkare, li postulas, ke tiu almenaŭ duobligu la pagon... Mi timas, ke mi seniĝos je la perlaboro ŝatinda.

— Ni ne ŝatas kleverov-Ĉagin'on, — ŝi respondis. — Li estas avarulo. Antaŭ nelonge monatoj, kiam mi estis kun la paĉjo en la ĉefurbo, li eĉ ne aĉetis por mi ĉokoladon... Kian laboron li proponis al vi?

— Skribi nete liajn verkojn presotajn.

— Vi ne prenu la laboron. Ŝi estas, mi scias, enuiga kaj postulos de vi multe da labora kaj tempo. Kiam - do vi laboros poz Esperanto?..

— Mia opinio estas tute kontraŭa: mi povus skribi por li dum nokto j. Mi tre dezirus havi ian enspezfonton.

— Tiam la paĉjo ĉion aranĝos plej bone. Li konas delonge la ĵurnaliston, li scias lian avarecon kaj atingos kontrakton profitdonan por vi... Sed ni lasu tiun ĉi enuigan temon; vi, ŝajne, ankoraŭ neniam estis en mia ĉambro?

Dirinte tion ĉi, la knabino malfermis la pordon kaj konduk is la junulon en negran-

- dan
- ordi
- lezt
- aj, s
- sim
- čizk
- ajn
- etaj
- lito
- par
- aro,
- Jo
- ate
- apu
- —K
- —J
- —M
- ekse
- por
- vi p
- —Su
- —k
- čam
- mu
- vi'sc
- ser
- Ĉi
- os c
- os e
- To
- Si
- fol
- —
- pra
- gi g
- ada

dzn, tamen tre luman kaj komforte-aranĝitan ĉambreton. En ĝi registia pureco kaj ordo, ke joĉjo haltis hezite meze de la ĉambro, timante rompi ilin per ia sia movo mal-bela. Kontraŭ la fenestro, ŝirmita de la suno per maldikaj neĝblankaj kurtenoj muslin-aj, staris negranda skribotablo, ornamita de bela skribilaro, albumoj kaj leksaĵetoj; simetrie dismetitaj. Sur la muro pendis du grandaj portretoj de ia viziro kaj de Olnjo, ĉirkaŭ kiuj estis metitaj pli malgrandaj fotografaĵoj, inter kiuj Joĉjo tuj rekonis kelk-ajn de s-ro Veselov, la doktoro, la leŭtenanto kaj Julia Andreevna. Sub la portretoj staris bel-etaj bretaroj kun plej amataj libroj de la knabino, kaj laŭlonge de alia muro staris ŝia lito, kovrita per rozkolora atlaskovrilo kaj ŝirmita per silka ŝirmilo, ornamita de ja-panaj desegnaĵoj. Apude starintaj pianino, komodo kaj kelkaj molaj seĝoj estis la mebl-aro, kiu kompletigis ornamaĵon de la ĉambro.

Joĉjo neniam antaŭe vidis ion similan kaj staris, kvazaŭ ensorĉita, senmove kaj longe atente ĉirkaŭrigardis la ĉambron. Fine tio tedis al Olnjo. Ŝi ekridis kaj, montrante seĝon apud la tablo, diris:

– Kial vi rigardas tiom strange? Kvazaŭ vi timas ion...

– Jes mi timas, mi timas rompi belecon de via ĉambro...

– Ne timu, sidiĝu! Ŝi estas plej ordinara ĉambro. En Veselovo - nia bieno - mi havas ekstere luksan ĉambron, sed tiu ĉi havas nenion neordinaran. Mi alvokis vin por anonci al vi, fine, ke la afero, ekspensita de ni delonge estas farita: oni permesis al vi pasigi la festojn en nia loĝejo. Ĉu vi ĝojas?..

– Mi timas eĉ pensi pri tia feliĉo! Sed mi ĝenos vin ĉiujn...

– Kiamaniere?.. Kia ridinda vi estas! – Olnjo gaje ekridis. – Vi ĉion timas: vi timas eniri mian ĉambron, vi timas pensi pri enloĝiĝo ĉe ni... Mi estas vizivo, sed mi, kredu al mi, havas pli multe da kuraĝo kaj sentimeco, ol vi – viro. Kiel vi povos ĝeni nin? Vi bone pripensu jenon: ni, vi scias, kutimis vivi en homtumulto kaj ju pli multe da homoj estas kun ni, des pli bone ni sentas nin, precipe la patĝo. Bedaŭrinde, nur apartan ĉambron por vi ni ne havas tie ĉi. Tamen vi dormos en la laborĉambro de la patĝo sur la leda kanapo kaj laboros vi pok-os en la sama ĉambro, aŭ tie ĉi en la mia, se tio plaĉos al vi. Ĉambron apartan vi hav-os en Veselovo, kiam vi venos tien dum la somero... Mi tre ĝojas, ke vi estos partoprenan-to de la festaj amuzaĵoj, kies plano estas jam ellaborita, mi tuj sciigos ĝin al vi.

Ŝi facile, kiel hirundo, forsaltis de la seĝo kaj elprenis el la ŝranko grandan paper-folion.

– Jen, rigardu, – ŝi diris, dismetinte la folion antaŭ Joĉjo sur la tablo kaj kliniĝinte tre proksime al li, – jen estas la plano. En ĝi io ne plaĉas al mi kaj vi, eble, helpos al mi pliboni-ĝi ĝin. Atendu, vi ne tion rigardas, jen tie ĉi estas ĝia komenco. Ni komencos la festoj-adon per esperanta vespero. Kontraŭ tio estas la patĝo-doktoro kaj la... leŭtenanto, sed

kun via helpo mi venkos tiun ĉi malbelpon, ni devas esti persistaj. La vespero estos aranĝ-
ota ĝuste la 25-an de Decembro en la laborĉambro de la patrejo. Por tiu ĉi tago oni elport-
os de tie la grandan tablon, la kanapon kaj kelkajn aliajn grandamplekasajn mebl-
ojn kaj anstataŭ ili oni starigos tie mian pianinon. Ĉiuj niaj konatuloj - samideanoj
partoprenos la festenon, sed kromili, kompreneble, ĉeestos multaj aliaj personoj, eble
ĉi tiuj, kiuj ĝis nun malamike rilatas al nia lingvo. Ni penu porte impresi je ili kaj
montri, ke Esperanto ne estas amuzajo de homoj senlaboraj, sed io pli serioza kaj ve-
ra kaj sola solvo de problemo de lingvo internacia. La muron kontraŭ la enirpordo
ni beleornamos per abiburĉoj kaj ie alimaniere - tie estos nia ekspozicieto espe-
ranta. En centro de ĝi ni metos portreton de D-ro Zamenhof, sub ĝi - la himnon kaj
kelkajn plej belajn kaj interesajn eksterlandajn poŝtkartojn. Sur la tablo sube starig-
ota ni dismetos ĉiujn esperantaĵojn, kiujn ni havas. Nun ni penu prilabori, fine,
esperantan parton de la vespero. Nature ni komencos ĝin per kantado de la himno,
kiun ĥore plenumos ĉiuj ĉeestontaj samideanoj. Ŝajne, ni parostion sen granda
malhelpo, ĉar niaj basvoĉoj - la patrinaj ambaŭ multe povos helpi al ni en tiu ĉi taske.
Poste sekvos parolo de la patrino pri neceseco de Esperanto, Julia Andreevna tralegos rus-
lingve sian verkon pri signifo de la lingvo por gejunularo lernanta, poste... jen ni
ne decidis ankoraŭ kiu sekvos post ŝi. La patrino parolas, ke tuj devos sekvi via parolo...
Ĉu vi parolos? Pri kio?..

- Mi ne scias... Mi neniam parolis antaŭ multenombra aŭskultantaro...

- Ĥa-ĥa-ĥa!.. Li ree timas!.. Mi antaŭsentis tion ĉi, - Olinjo respondis. - Ne, al
mi tedis jam via ĉiama silentado, je tiu ĉi fojo vi nepre devos ion paroli! - ŝi aldonis
per tia tono, je kiu kontraŭdiri joĉjo havis nek sufiĉan kuraĝon, nek forton. - Ĵis la-
sta tempo vi estis sola reprezentanto de la lingvo en la urbo, ĝia unua pionizo kaj
ĉu estus konvene, se, malgraŭ tio, vi eloxvente silentus dum la festeno? Vi devas fi-
zi, ke dank' al vi kaj sole dank' al vi la lingvo ricevas disvastiĝon en la urbo...

Joĉjo je unua fojo aŭdis de la knabino similan parolon fortan kaj li komprenis, ki-
om ridinda li estis menagere pro sia kutima konfuziĝemo. Por pliboniĝi iom la staton
stultan en kiu li troviĝis, li exparolis:

- Pardonu min... Mi tute ne volis ĉagreni vin per la rifuzo, sed ĉu mi estas kulpa, se
iafoje kontraŭ mia volo... kontraŭ mia deziro mi estas timema, konfuziĝema...

- Vi devas ŝanĝi vian karakteron, fariĝi viro en ĝusta signifo de tiu ĉi vorto!..

- Tion ĉi estas facile paroli... - profunde ekspiris Joĉjo, - sed fari...

- Se mi nur petos vin pri tio, mi scias, vi faros tion... Ĉu pro mi... pro mia peto vi penos
ŝanĝiĝi?..

„Ho, pro vi vi mi faros ĉion!" - li expensis, amadmire ekrigardinte la ĉarman vizaĝeton

de la knabino kun la vangetoj rugiĝintaj pro emocio kaj silkajn hazetojn, kiuj falis de la kapo kaj dissutiĝis tra la ŝultretoj.- „Laŭ via ordono mi jetos min en riveron, en dom-
on Erulantan..."

– Kial vi silentas ?.. Diru mi sincere, kion vi pensas nun ?

– Pro vi mi faros ĉion !.. – li nur povis respondi.

– Dankon ! Sekve, vi parolos dum la vespero ?.. Kiel mi ĝojas ! Pri kio vi deziras paroli ?..

– Mi tute ne scias... Eble, pri nuntempa disvastiĝo de la lingvo en la mondo...

– Brave !.. Mi tuj notos tion ĉi en la plano, – ŝi ĝoje ekkriis, prenante krajonon. – Sed, ĉar via parolo estos riĉa je fakto j kaj pli konvinkiga, laŭ mi, vi devos paroli unua. Post vi parolos la pačjo, Julia Andreevna... Ĉu vi ne protestos ?

Jočjo sentis, kvazaŭ in porta, potenca subite metus ĉirkaŭ lia kolo ŝnuron kaj iom post iom ĉiam kuntiris ĝin. Li sentis, ke li devis protesti, ripuziĝi, sed ankaŭ samtempe li sentis, ke lia volo estis paralizita, ke li devis nur obei al la knabino.

– Protesti estas senutile... mi promesis al vi... Mi ĝuste plenumos la promeson.

– Kiel mi ĝojas, ho, kiel mi ĝojas !... Ni finu pli rapide la programon ! Ja krom ĝi ne havas multajn demandojn solvotajn. Bonege, bonege !.. Post Julia Andreevna... mi...

– Nun venis mia alterno, ke mi petu vin, – Jočjo interrompis ŝin.

– Petu. Kion vi volas ? – ŝi diris, levante la kapon de la folio, kaj ŝiaj okuloj ekbrilis.

– Vi parolu ne post Julia Andreevna... sed tuj post mi...

– Sed mi tute ne intencas iom paroli, mi simple ludos je la pianino kelkajn muzikaĵojn plej ŝatatajn de mi, kies ruslingvan tekston vi tradukos, ke la patro akompanu en nia lingvo...

– Mi tion ne sciis... Tamen vi plenumu la ludadon post mi... mi tion deziras. Krom tio la vespero havos tiamaniere pli da diverseco : ja paroloj servontaj senintermetu unu post alia povos nur enuigi ĉeestantojn.

– Kia postulema vi estas !.. – Olnjo diris ridetante kaj minacante al Jočjo per la fingreto. – Tamen mi plene aprobas vian rimarkon kaj tuj faros la ŝanĝon en la plano. Bone, bonege ! – ŝi parolis, ree klinigante super la paperfolio kaj korektante la planon. – Kio sekvos plu ?.. Plu, laŭ mia supozo la pačjo legos sian rakonton, tradukitan de vi, poste vi aŭ la pačjo-doktoro tralegos la saman rakonton en la originalo... Poste sekvos dancoj kaj la vespero finiĝas. Sed mi donos ankoraŭ unu demandon al vi : ĉu ekzistas dancoj esperantaj ?.. Speciale uzataj de esperantistoj ?..

Ju malaŭte ekrapis je la pordo.

– Eniru ! – diris Olnjo, ordigante super la frunto senordiĝintajn buklojn.

En la ĉambron rapidege eniris la leŭtenanto. Li spiris malfacile, lia vizaĝo estis

zuĝega kaj ŝvitkovrita. Rimarkinte Jocjon, li tuj paris malkontentan mienon kaj fetinte al li, kiel ŝajnis al Jocjo, malamikan, plenan de malestimo rigardon, diris, brave rektiĝinte kaj ekstinte per la spronoj:

– Mi petas pardonon, Olnjo! Mi venis neĝustatempe... mi malhelpis al via agrabla...

– Kia absurdo! – ŝi respondis. – Tute ne, ni jus finis ĉion... en la plano. Vi, ŝajne, laciĝis, sidiĝu. Ĉu vi sukcese plenumis la taskon?

– Jes, mi laciĝis diable! – la leŭtenanto respondis, malzorge sidiĝante kaj sin apogante je la sabro. – Ĉu mi povas, fraŭlino, ekfumi en via ĉambro? – li demandis, malfermante arĝentan cigaredujon kaj eltirante ĝin al Jocjo.

– Dankon. Mi ne fumas... – tiu respondis, nee ekbalancinte per la kapo.

– Georgo, permesu, mi fumos kun vi! – Olnjo diris, ridetante kaj prenante unu cigaredon. – Nur vi ne diru al la paĉjo-doktoro, ke mi fumas! – ŝi tuj aldonis, minacante per facila gesto de la mano kaj ruze ridetante al Jocjo. – Rigardu, kiel lerte mi fumas!..

Sed, ellasinte tra la nazo unu pojon strion da tabakfumo, ŝi ektusis kaj forĵetis la cigaredon.

– Mi poste ĝin fumos... – ŝi diris, viŝante la okulojn larmoplenajn. – Nun, Georgo, rakontu viajn novajojn.

– Novajoj estas neniaj, sed la taskon mi plenumis sukcese, kvankam mi elspezis amason da mono. Kiel intence, mi renkontis nenian fiakriston kaj kuris tra la urbo, kiel frenezulo, el unu strato en la alian kaj pro rapideneco mi eĉ ne faris saluton al la kolonelo...

– Kia kuraĝa nun vi estas!.. Sed kio atendas vin rekompence por via senatenteco?..

– Nenio! Li, ŝajne, eĉ ne rimarkis min... Nu, mi vizitis kvin perukistojn kaj nur la lasta konsentis servi al ni dum tri tagoj...

– Dum tri tagoj?.. Georgo, ĉu vi frenezigis?.. Ĉu ni tiom longe daŭrigos nian maskiĝadon?

– Ĝi daŭros, kiom vi volos, sed oni postulas la saman pagon por unu tago, por du aŭ tri tagoj, – nu, mi prefetis la lastan. Vere, li estas ne tre sperta en sia arto, sed ĉiuj pli bonaj perukistoj estas delonge okupitaj je preparado al la festoj kaj estas dungeblaj por nenia orasnaso. Kun mi devos nur dungi ĉevalojn por niaj maskvojaĝoj. Kiom da partoprenantoj ni havos?

La pordo malfermiĝis kaj en la ĉambron eniris s-ro Veselov.

– Mi delonge vin serĉas, – li diris al Jocjo, – ni iru!.. Mi aranĝis la aferon profitdone por vi...

– Ĉu vi, paĉjo, ne povas iom atendi? – Olnjo ekpetis. – Ni tre baldaŭ venos kune, fininte la planon...

– Ha, la plano?.. – Veselov rimarkeble vigliĝis. – Tio ĉi estas bona, ke vi zorgas pri ĝi. Ĉu tio

Ĉi estas ĝi? - li diris, prenante la folion. - Bonege... Bonege! - li ripetadis, aŭskultante klakojn de la filino kaj kun gaja rideto balancante jese per la kapo. - Vi... juna homo...

- Paĉjo, nomu lin Joĉjo, mi petas! - interrompis lin la knabino.

- Vi, Joĉjo... elektis bonan temon por la parolo. Tamen ni havos ankoraŭ neniun okazon por priparoli tion ĉi. La programo estas aprobinda kaj, se ĝi estos ĝuste plenumita, havos sendube sukceson. Ni iru! Oni atendas nin. - Li gracie proponis la manon al la filino kaj majeste ekpaŝis kun ĝoje flustrante al ŝi. La leŭtenanto sekvis post ili, glatigante la liphararojn kaj Joĉjo iris lasta, felica, ĝojigita kaj samtempe premita de ĵaluzo al la oficiro kaj ĉe al la mastro.

- Mi estas devigata, juna homo, pagi al vi po dudek kvin kopekoj por ĉiu folio skribota, - la dikulo komencis, ĵus ĉiuj sidiĝis al la tablo. - La kondiĉoj estas bonegaj por vi kaj tro bankrotodoraj por mi! - li profunde ekspiris malĝoje, kvazaŭ iu jus forprenis de li monujon. - Sed, mia kara, mi avertas vin, se vi ne volas tuj seniĝi je la laborenspezo, ke vi devas esti ege plej akurata skribisto. Diru al mi vian nomon kaj adreson, mi petas. Post unu semajno vi ricevos manuskripton net e skribotan.

Joĉjo estis ravita de la enspezo ricevota kaj ne sciis, kiel inde danki li devas s-ron Veselov-on kaj la dikulon.

- Ne danku min, - diris s-ro Veselov, premante la manon de Joĉjo, - mi uzis ne multajn klopodojn.

- Se vi solaĵus la kondiĉojn kun mi, - aldonis la dikulo, - mi, parolante malkaŝe, neniam donus al vi pli ol 15 kopekojn.

- Sed mi konsentus labori ĉe po 10 kopekoj! - Joĉjo diris, ridante.

Ĉiuj ekridis. La dikulo malespere ekskvingis per la manoj kaj riproĉe balancis per la kapo al s-ro Veselov.

- Ĉu vi aŭdas, amiko, kiel oni surprizis min? Oni laborus por mi po 10 kopekoj kvj vi. igis min pagi preskaŭ trioble...

- La diferenco havas neniam signifon por vi. Vi drinku de nun nur naŭ glasetojn da konjako ĉiutage anstataŭ kutimaj dek kaj vi ne sentos ian rimarkindan plifaciligon de via monujo, - sed por la junulo, kiu ĉiam havas elspezojn por korespondado, ĝi havas grandegan signifon, - diris respondo s-ro Veselov. - Sed sufiĉe! Oni petas, ke mi nun tralegu la rakonton jus tradukitan en la lingvon...

- Paĉjo! - ekkriis Olinjo, - sed vi promesis tralegi ĝin dum la vespero...

- Tiam mi tralegos ion alian... tradukotan. Sed hodiaŭ mi volas konsoli mian amikon ofenditan per la lego en la lingvo nekonata por li, kio, mi esperas, redonos al li trankvilecon jus perditan kaj emon al daŭra dormado, alie li de nun tute perdos dormokapablon.

S-ro Veselov ektrinkis unu plenbuŝon da ruĝa vino el glaso, staristaŭ antaŭ li kaj, ĉir-

kaŭrigardinte ĉiujn sidintojn, metis antaŭ ili sur la tablon la originalon kaj, per voĉo laŭta, klara, komencis:

— Tio ĉi estas mia originala rakonto, jus tradukita en la lingvon internacian de mia komuna konato - junulo ĵoĝjo. Mi petas unu minuton da atento. La rakonto havas titolon: „Homo bojanta".

XVI.

Homo bojanta.

Jenan akcidentaĵon rakontis al mi mia najbaro x., revenante kun mi el ĉasado dum la printempo pasinta.

Tiu ĉi okazis antaŭ longe, ankoraŭ dum tagoj de mia studenta juneco. Unufoje antaŭ Kristnasko tute okaze mi konatiĝis en Moskvo kun unu provinca bienhavanto, kiu montriĝis mia parenco malproksima, pri kies ekzistado mi ankoraŭ aŭdis neniam. La parenco estis jam homo ne juna, sed tiom simpatia, simplanima kaj bonkora, ke mi baldaŭ eksamis lin kaj, ne dezirante ofendi „la nove-trovitan onklon", kiel mi ŝerce lin nomis, konsentis akompani lin hejmen kaj pasigi en lia familia rondo la feston alproksimiĝantan. La bieno kuŝis en unu el niaj ankoraŭ nun multenombraj „ursaj anguloj", malproksime de fervojo, mezе de netraireblaj arbaroj kaj montoj en unu el nordaj gubernioj. Plej proksima fervojstacio kuŝis je 80 verstoj de la bieno kaj poŝtejo ankoraŭ pli malproksime kaj de tie oni liveradis korespondaĵojn al la onklo nur unu-du fojojn ĉiumonate. Ĉirkaŭaĵoj de la bieno estis pitoreskaj kaj abundis je sovaĝaj bestoj kaj je ĉasaĵo ĉiuspeca.

La bieno estis nomata Okulĉiha. Ĝi staris sur monteto kaj de ĉiuj flankoj estis ĉirkaŭita de malluma j arbaroj abiaj. Estante bonearanĝita, ĝi liveris al la onklo enspezojn plene sufiĉajn por ekzistado de lia ne multenombra familio, en kiu li havis nur la edzinon kaj filinon Z., malsaneman fraŭlinon de tridek jaroj, kiu preskaŭ neniam forlasis sian ĉambron kaj dum mia gastado en Okulĉiha nur du fojojn ĉeestis ĉe la tablo familia.

La geonkloj ne havis kutimon vizitadi najbarojn, ankaŭ gastigi ilin, tial vivo en ilia granda domo, simila al lukse-aranĝita malliberejo, estis enuiga. Nek politiko, nek literaturo, nek ia alia arto aŭ scienco interesis ĝiajn loĝantojn - kies pruvo estas tio, ke, post longa serĉado tra la tuta domo, mi sukcesis trovi nur tri librojn antikvajn, eldonitajn ankoraŭ antaŭ pli ol cent jaroj kaj duone pormanĝitajn de musoj.

Mi estis devigita pro senokupeco tro frue enlitiĝadi kaj malfrue ellitiĝadi. Ekster la lito la vivo konsistis eksklузive el manĝado kaj trinkado. Matene - jus mi ellitiĝis - min

atendis varmaj bakaĵoj kun kazeo kaj butero, tiom bongustaj, ke mi, šajne, en la urbo neniam manĝis ion similan, post nelonge sekvis kafo kun dolĉa sekigitaĵo. Oni tagmanĝis proc-je la dua horo - kaj poste „ripozis" dum du horoj proksimume, t.-e., parolante pli simple, oni dormis. Mi havis nek emon, nek kutimon al tia ripozo kaj, dum oni dormis, mi diligente serĉis tra la tuta domo ion legindan aŭ atentindan, sed, kiel mi jam diris, libroj kaj gazetoj ne estis šatataj en la domo kaj miaj serĉoj estis preskaŭ tute vanaj. Je la kvara horo oni trinkis teon kaj ree manĝis ion bongustan kaj je la oka - vespermanĝis kaj enlitiĝis.

Komence mi plezurege, post la urba nesufiĉa nutrado, formanĝadis grandnombre la manĝaĵojn abundajn kaj bakaĵojn bongustajn, sed post kelkaj tagoj tiu ĉiutaga senlaboreco kaj supersatiĝo fariĝis abomenaj kaj mi ekenuis je la urbo, je libroj, je kolegoj. Kelkfoje eĉ venadis en la kapon penso forkuri, sed la onklo postulis, ke mi pasigu nepre la tutan festan forpermeson kaj la onklino parolis, ke mi ankoraŭ ne sufiĉe dikiĝis post urba malsatado, - post tiaj argumentoj, ĉiutage aŭskultataj, mi devis humiliĝi kaj toleri.

Ĉiutage post tagmanĝo, kiam la geonkloj kutime dormis, mi senlabore marŝis tra ĉambroj de la domo jen rigardante je ceriza fojo jam delonge konatajn antikvajn, nigriĝintajn portretojn de iaj iamaj gravaj personoj, kiuj pendis sur muroj de granda, preskaŭ neniam vizitata de iu, salono, jen [illegible] simple atentante nenion, senpacience atendante ellitiĝon de la genaljunuloj.

Unufoje, antaŭ du aŭ tri tagoj antaŭ mia forveturo, mi, ĝuante tombejan silenton de la domo, kutime esploris ĉiujn portretojn, mezuris kelkfoje per miaj paŝoj ĉiujn ĉambrojn laŭlonge kaj laŭlarĝe kaj post tiu ĉi laboro fervora eliris en la korton. Estis frosta, tamen senventa vespero. La aero estis senmova kaj arboj dandis per sia pruinornamo. En la korto mi renkontis konatan figuron de kortisto Stepan, kiu je tiu ĉi foja, malgraŭ sia ĉiama malafableco kaj neparolemo, ĝentile salutis min kaj tuj eksparolis:

— Ĉu vi intencas promeni, sinjoro?.. Post bruplena urba vivo, tie ĉi vi, kredeble, enuas, kiel en malliberejo. Mi miras, ke via onklo nek donas al vi ĉevalojn por veturi al najbaroj, nek iras kun vi por ĉasi. Vi estas homo juna... Proksime estas bienhavantoj en kies familioj estas gejunuloj, en la arbaroj estas nekalkulebla nombro de bestoj kaj ĉia ĉasaĵo... Tro avara fariĝis via onklo!..

— Eble, malproksime estas la bienoj, aluditaj de vi? - mi demandis, ĝojigita de lia parolemo kaj simpatio.

— Ne! Bieno Dor, ekzemple, apartenanta al s-ro Ĥoĥotov, kuŝas nur je 15 verstoj, ankaŭ ne pli malproksime loĝas s-ro Mironyĉ... Niaj ĉevaloj post unu horo venigus vin tien, je dio!.. Kaj kia gajeco estas nun tie! Ĉiutage kunventuras gastoj - gejunularo,

estas aranĝataj dancoj, masxiĝoj... Nur vi ordonu, oni tuj enjungos paron da bonaj ĉevaloj! Ne timu la onklon!.. Li, ekde, poste iom murmuros... La ĉevaloj ja delonge staras senlabore...

— La propono estis alloga, tamen mi ne kuraĝis konsenti ĝin.

— Se vi timas veturi tien, vi veturu almenaŭ en Novosjelka'n... Ĝi kuŝas nur je du verstoj de tie ĉi. Tie estas unu bonega juvelo, kiel vi, instruita, s-ro Vasiljev – via samaĝulo. Liaj gepatroj estas komercistoj. Ili komercas en la urbo kaj plej ofte loĝas en Novosjelka, kie ili ankaŭ havas magazenon.

— Ne!... Mi ne bezonas je la ĉevaloj. Se vi detale rakontos al mi, kie kuŝas la vojo al la vilaĝo, mi plezure piediros tien. Vi ja parolas, ke ĝi estas proksime...

— Tre proksime... Vi iru jen laŭ tiu ĉi vojo, dekstre kuŝanta; ĝi alkondukos vin ĝuste al la vilaĝo. Komence vi trairos jen tiun, klare vidatan de tie ĉi, arbareton, poste vi malsupreniĝos, transiros riveron, ~~transiros~~ supreniĝos sur bordon kontraŭan kaj de tie jam estos vidata la vilaĝo... La vojo estas mallonga kaj simpla...

Mi dankis Stepan'on kaj tuj eliris laŭ la direkto montrita. La vojo estis ne larĝa, sed bone piedbatita de ĉevaloj kaj glatigita de glitveturiloj, tial ĝi estis oportuna por piedirado. Mi iris malrapide, kun scivolo rigardante belajn pejzaĝojn nekonatajn, kiuj unu post la alia disvolviĝis antaŭ mi. La aero senmova estis tiel silenta, ke en ĝi estis klare aŭdebla ĉiu sono subita, ĉi plej malalta de galantaj negoculetoj de larĝaj abiskrankoj, kiuj, kiel arkaĵo, etendiĝis super la vojo de ambaŭ flankoj. Mi estis kontenta je la promeno kaj bedaŭris nur, ke pli frue mi neniam entreprenis similan distriĝon. Saĝe fajfetante iun melodion, mi prezentis al mi, kiel estos surprizitaj miaj geonkloj, kiam ili post la „ripozado" sciiĝos pri mia „forkuro", kiel maltrankviliĝos la onklino, kiel murmuros kutime la onklo. Mi jam antaŭĝuis ilian malpaciĝon, aperontan nun neeviteble kaj penis diveni, ĉu la onklo mem venos en la vilaĝon por revenigi min hejmen, ĉu li sendos kuntiu ĉi celo ĉevalon, – kiam mi ekaŭdis neklarajn, izolitajn de ie malsupre ekkontenton al mi sonojn enigmoplenajn, kiuj trarompis la silenton reĝintan. Kvankam ili estis neklaraj kaj malalta, tamen ili tuj haltigis min nevole kaj igis aŭskulti ilin atente. Dum kelka tempo mi staris senmove kaj detenante spiradon, sed tamen mi sukcesis nek kompreni ilin, nek diveni ilian fonton. „Eble, tie proksime post la arbareto kuŝas ia vilaĝo kaj mi aŭdas de tie irantajn kriojn de infanoj, ludantaj sur strato, miksitajn kun hundobojado?" – mi fine decidis kaj daŭrigis la promenon. Tamen, farinte kelkajn paŝojn, mi ree haltis mirigita: la sonoj ne similis al infankrioj ordinaraj kaj ĉiam plilaŭtiĝis, kvazaŭ alproksimiĝante al mi el-post kreskaĵdensejo de junaj akerj, flanke starintaj. De tiu ĉi loko la vojo estis krute malsupreniĝanta de la monteto al la rivero, kiun aludis Stepan, kaj

mi pli rapide ekpašis al ĝi, esperante, atinginte ĝian bordon, liberan de arbokreskaĵaro, trovi direkton de la enigmoplenaj sonoj. Sed mi ne havis tempon pari ankoraŭ dekon da pašoj, kiam mi estis devigita ree halti. Kaj ĵus mi haltis, mi klare ekaŭdis voĉojn... Kiuj apartenis sendube nek al infanoj, nek al ia besto, sed ĝuste al homo matura, plenaĝa, kiu iris el-post la densejo ĝuste al mi sur la vojon... Basvoĉe bojante.

„Sendube li estas ia frenezulo", – mi ekpensis, sentante, kiel sango alfluis al la vizaĝo, – „dum li ankoraŭ ne ekvidis min, mi forkuru reen-hejmen".

Sed ne pasis eĉ unu sekundo, kiam, dismetante per ambaŭ manoj neĝokovritajn arbobranĉojn, aperis en kelkaj pašoj dekstre de mi malaltkreska vilaĝano, tute kovrita de neĝo. Li iris neniam haltante kaj ne rapidante, tute sen vojo tra neĝo profunda, malleviante la kapon kaj senĉese laŭte bojis hunde. De la unua rigardo mi tuj rekonis lin, li estis kamenhejtisto de la onklo – Danilo Kukuškin. „Sed kio okazis al li – al tiu ĉi vilaĝano modesta kaj obeema servanto de la onklo? Ĉu li estas ebria kaj nun intence venĝi je mi ĉan ofendon, kaŭzitan al li de la onklo?.. Ĉu li freneziĝis?.." – mi ekpensis. Mi volis krii, sed en la buŝo estis seke, kiel en rivereto senakviĝinta dum somera senpluva, kaj eĉ mankis forto por la krio. Teruro kripligis mian vizaĝon, kiam mi ekvidis, ke li iris ĝuste al mi kun dika bastono, kun branĉtuberoj, en la mano.

„Li nepre mortigos min!..." – mi tuj ekpensis kaj, kiel frenezulo, mi ekkuris antaŭen al la rivero, tamen penante ekaŭdi, ĉu li persekutos min.

Mi kuris kun rapideco terura kaj post nelonge mi estis jam sur la ponto. Ŝajnis al mi, ke neniu kuris post mi, ke la danĝero preteriris kaj mi, min apogante pro emocio kaj laceco je pontbalustrado, rerigardis.

Kukuškin staris senmove sur la vojo, ĝuste tie, de kie mi ekkuris, kaj daŭrigis la bojadon. Mi trankviliĝis kaj viŝis ŝviton, fluintan de la vizaĝo. Subite ekaŭdiĝis mallonga ekpafo. Kukuškin tuj ĉesigis la bojadon kaj rerigardis la arbodensejon.

– Kie li estas? – mi demandis lin de tie mallaŭte.

– Li forkuris!.. – respondis Kukuškin. – Sed ni sekvu post li'... li ne evitos niajn manojn! – li ekkriis kaj ree ekbojis.

„Li ne estas sola"... – mi ree ekpensis, maltrankviliĝinte. – „Kiun-do ili celas?.. Ĉu vere min?" Kaj kolektinte ĉiujn fortojn, kiuj ankoraŭ estis en mi, mi ekkuris sur la monton – la kontraŭan krutan bordon de la rivero. Atinginte ĝian supraĵon, mi ree rerigardis. Kukuškin ankoraŭ staris sur la sama loko kaj bojis.

Nenion povante kompreni, mi malrapide alproksimiĝis al Novosjelka, kies tegmentoj jam proksime blankiĝis antaŭ mi. Mi jam eniris en la vilaĝon, kiam ia vilaĝano juna, feste vestita, elveturanta el ĝi en bona urba glitveturilo, haltigis antaŭ mi sian ĉevalon. Montriĝis, ke li ofte vizitadis la onklon kaj eĉ iam vidis min en Okulĉiha.

Li proponis al mi siajn konservojn, je kiuj mi tuj konsentis, kaj veturigis min hejmen.

Dum la vojo mi rakontis al la vilaĝano la okazintaĵon enigmoplenan, kiu kaŭzis al mi tian timon. Tiu, responde, gaje ekridis kaj klarigis al mi, ke tio estis kutima tie ĉi časmaniero je lupo. Mi longe ne povis kredi al li kaj penis pruvi, ke oni časis ne je lupo, sed ĝuste je mi:

— Mi ja klare aŭdis, kiel unue el ili demandis: „Kie li estas?.." Se oni časus je lupo, li demandus: „Kie ĝi estas?.."

— Ne, sinjoro, tio ne povas okazi. Tie ĉi vagas multege da lupoj, nun estas ĝuste sezono, kiam ili vagas popare. La časistoj kredeble mortigis lupinon kaj persekutis ŝian kunulon... jen tial oni parolis „li".

Kiam ni venis la lokon „danĝeran", la vilaĝano haltigis la čevalon kaj montris al mi sur la neĝo klarajn postsignojn de lupo, kiuj iris de la arbodensejo laŭlarĝe de la vojo kaj apud ili postsignojn de la časistoj.

Nur tiam ĉiuj miaj duboj estis dispelitaj.

La onklon mi trovis en la korto, kie amasiĝis servantoj kaj vilaĝaj infanoj ĉirkaŭ du grandaj mortigitaj lupoj, jus alveturigitaj.

La geonkloj, kompreneble, ankoraŭ ne rimarkis mian „forkuron". Dum la vespera tetrinkado mi tamen rakontis al ili la aventuron. Ili, aŭskultante min, longe ridis ĝis lazmoj kaj ankoraŭ pli longe moketis je mia malkuraĝo kaj timemo.

XVII.

Leciono de propraj nomoj.

Je atendado de la ~~sukcesonta~~ proksimaj ferioj kaj translokiĝo al Veselov'oj, kiun Joĵjo atendis malpacience kaj ne sen kora tremetado, li laboris senlace jen preparante la parolon, jen tradukante novan rakonton de s-ro Veselov, jen, fine, neteskribante jus ricevitan manuskripton de la žurnalisto-dikulo; du-trifoje li eč pasigis tutan nokton je la laboroj. Ĝuste tiel li pasigis ankaŭ la lastan nokton, t.-e. antaŭ la 21a de Decembro.

Estas neeble precize formuli tion, kion sentis Joĵjo, rapidante vespere de tiu ĉi tago al sia nova loĝejo. Oni povas nur diri, ke en lia animo estis je tiu ĉi foje ia malpleneco: soifo de novaj impresoj en tiom ankoraŭ nekutima por li medio alternis kun timo, ke li, eble, šargos la familion, ke lia ĉiama ĉeesto ĝenados la familianojn, sed tiujn ĉi sentojn superregis sopiro je la hejmo, je la gepatroj.

En la vestiblo Joĵjo kunpuŝiĝis kun s-ro Veselov, kiu vestiĝis je pelto kaj instencis ien foriri.

— Ĉu vi alportis ĉion tion ĉi sen ies helpo? — li demandis, gaje ridetante kaj amike

premante lian manon. – Vi estas bravulo. Nur, ŝajne, vi alportis multe da tute superfluaj aĵoj. Lasu ĉion tie ĉi, la filino jam delonge atendas vin.

Farinte kelkajn paŝojn al la ŝtuparo, ĵetĵo haltis kaj aŭskultis: de supre aŭdiĝis muziko. Jen plilaŭtiĝante, jen mallaŭtiĝante verŝiĝis seninterrompe malproksimaj sonoj de melodia muzikaĵo, jen eniganta en animon mildecon kaj kortuŝecon, jen vekante estre-potence energion, kuraĝon. La junulo staris ravita, ĉion forgesinte kaj ĝuis senton ankoraŭ neniam sentitan: la muziko nerimarkeble transportis lin ien malproksimen for de la mondo reala en mondon de sorĉaj revoj kaj songoj. Li rekonsciiĝis nur tiam, kiam ies mano de malantaŭe facile tuŝetis lian ŝultron. Ekzemplo, li rerigardis, – apud li staris la doktoro.

– A quoi pensez-vous? – kiel parolas francoj. Ĉu vi ŝatas muzikon, mia juna amiko? – li diris.

– Ne... Ali ne scias... Sed tiu ĉi muzikaĵo... – ĵetĵo balbutis konfuziĝeme.

– Vere, Olnjo je tiu ĉi fojo ludas mirinde. Tamen kial ni staras tie ĉi? Allons!..

Ili kune leviĝis laŭ la ŝtuparo, preskaŭ je ĉiu paŝo haltante kaj aŭskultante la ĉiam pli klare aŭdiĝantajn muziksonojn mirindajn. La doktoro iris sian ĉambron kaj ĵetĵo senbrue ŝteliris tra la duonfermita pordo en la ĉambron de la knabino. Sed lia singardo estis tute superflua, ŝi estis tiom profundiĝinta en la muzikludadon, ke, ŝajne, ne eraŭdus, eĉ se oni enrajdus en la ĉambron. Haltinte post ŝia dorso, ĵetĵo longe admiris la muzikaĵon kaj la belan muzikantinon. Ŝi estis vestita simple je grizeta hejma vestaĵo kun blanka antaŭtuko kaj ŝiaj silkaj haroj je tiu ĉi fojo estis plektitaj en unu harligon, kiu kuŝis laŭlonge de ŝia dorso.

Sed subite eksonis lasta akordo kaj mallaŭtiĝis. La knabino fermis la notfolion, ekspiris plenbruste kaj klinis la kapon super la klavaro. Post unu momento ŝi rektiĝis, ordiĝis la harojn super la frunto kaj rerigardis.

– Mia Dio! – ŝi ekkriis mirigita. – Mi ne ~~suspektis~~ supozis eĉ, ke iu estas en la ĉambro. Kial vi staras tie? Ĉu vi antaŭ longe venis ĉi tien?..

– Antaŭ longe... – ĵetĵo diris, salutante la knabinon kaj sidiĝante apud ŝi. – Via muzikludado ĉarmis min... Dum vi ludis, mi, kiel ensorĉita, staris, forgesinte kiu mi estas kaj kie mi estas. Kio estas la muzikaĵo ludita?

– Ĉu vere la muzikaĵo tiom plaĉas al vi? Ĝi ludis ĝin penseme ... ĝi estas nia himno – „Espero" en muziko de Svedo Adelsköld.

– Kiel? Ĉu nia himno?.. – ĵetĵo ekmiris. – De kie vi akiris ĝin?

– La patro antaŭ nelonge ricevis ĝin el eksterlando.

– Nun mi ĉion komprenas: la komponisto sukceris en la muzikaĵon enmeti, tiel diri, animon de la genia versaĵo kaj per la melodio supertera transdoni ĝuste ĝian entuziasma-

mon. Neniam ankoraŭ ia muzikaĵo tiel kortuŝis min.

La knabino rigardis la gaston, ne retirante sian rigardon. Estis rimarkeble laŭ ŝia vizaĝeto entuziasmiĝinta, ke ŝi ankaŭ ricevas ĝuste la saman impreson de la muzikaĵo.

– Eble, ĝi tiel influas nin ambaŭ, ĉar ni komprenas ĝian sencon internan. Ni vidos, kiel ĝi influos flankulojn, personojn, kiuj tute indiferente rilatas al ideo de nia lingvo... mi ludos ĝin dum la vesperfesteno.

– Mi jam antaŭe diros, ke ĝi forte impresos ankaŭ ilin : la doktoro longe admiris vian ludadon...

– Ĉu ? La paĉjo-doktoro ? Ĉu li ankaŭ estis tie ĉi ?

– Li ne estis tie ĉi, sed li longe kune kun mi aŭskultis la muzikaĵon de la ŝtuparo.

– Tio ĉi estas agrabla novaĵo : la doktoro ĝenerale ne ŝatas muzikon...

– Ĉu same, kiel ankaŭ nian lingvon ?

– Kiel ?.. Kontraŭe, dum lastaj tagoj li faris grandan progreson en tiu ĉi rilato...

– Kiu ? – ĵetĝo demandis. – Pri kiu vi parolas ?

– La paĉjo doktoro ! Nia doktoro... Lin, ŝajne, tre influis longa diskutado, de la paĉjo kun tiu dikulo, kiu havis lokon dum tiu vespero, kiam la paĉjo legis la rakonton, tiom bele tradukitan de vi ... Cetere vi mem tiam ĉeestis.

– Eble oni diskutis post mia foriro, sed mi tion ne memoras.

– Efektive, vi tiam jam forestis. Oni ektuŝis demandon pri nia lingvo. La paĉjo defendis ĝin kun propra al li ardo kaj konvinko, – rezulte la dikulo de sia flanko esprimis sian opinion, ke en estonteco ne malfacilsima la lingvo havos firmantan pozicion, kiel ligilo de tutmonda proletariaro, ke tiam aŭ similan opinion li eĉ ne unufoje aŭdis de instruitaj ĉefurbaj ... .

– Nu ? Kaj la doktoro ?.. Kion li diris ?

– Kutime li parolas aŭ nenion, aŭ tre malmulte, – li preferas en tiaj okazoj silenti...

– Sed vi diris, ke li post tiam pli favore rilatas al la lingvo ?..

– Li, ŝajne, volas serioze studi ĝin... Almenaŭ antaŭ unu tago dum tagmanĝo, kiam la patro diris al iu el ĉeestintoj, ke inter esperantistoj nun ofte estas renkontataj kuracistoj, ke la aŭtoro mem de la lingvo estas ankaŭ kuracisto, la doktoro, tute neatendite por mi, sciigis, ke li entreprenos korespondadon en Esperanto kun alilandaj samprofesianoj...

– Kiel mi ĝojas, kiel mi ĝojas ! Nun tuta via familio estas esperantista !

– Jes, nia iniciativo havas sukceson... kaj havos ĝin nepre... Tamen, pardonu. Mi esperas, ke vi hodiaŭ tute transloĝiĝis al ni. Mi tiel allogiĝis je la muzikaĵo, poste je la konversacio, ke mi tute forgesis, ke vi, eble, volas trinki, manĝi... Ni iru en la manĝoĉambron.

Ne ricevinte de la junulo ian ripuzon, ŝi ekkuris for, invitinte lin per rigardsigno, ke li

sekvu post ŝi.

– Hodiaŭ mi estas mastrino, – ŝi diris, almovante al Jorĝjo teglason kaj, cirkaŭrigardinte, kvazaŭ timante, ke iu flankulo ekaŭdos ŝin, parolante seriozan micnon, ŝi aldonis serioztone:

– kaj dum mi estas sola, mi devas serioze paroli kun vi pri io...

Jorĝjo extremis, kiel expikita, kaj milo de plej malsanaj antaŭtimoj subite trakuris en lia kapo.

„Ĉu oni jam sangis sian decidon pri mia gastado en ilia hejmo dum la festoj?.. Ĉu ekzistis ia malagrablajo pro nia esperanto-kurso?.. Ĉu la leŭtenanto, kiu jam kelkfoje en mia ĉeesto ion flustris sekrete al Olnjo, iee entreprenas ion kontraŭ mi..." Kaj centoj, miloj de similaj supozoj kun rapideco de fulmo anstataŭis dum unu momento unu la alian. Kredeble lia vizaĝo, pro la neatendite serioza paroltumo de Olnjo kaj pro la travivataj antaŭtimoj, estis stulta kaj ridinda, ĉar ŝi, tuj, ekrigardinte lin, ne povis plu konservi la seriozecon kaj laŭte ekridis:

– Ĉu vi jam ektimis?..

Li sincere sciigis al la knabino siajn timojn. Responde, ŝi ekpensis iee fariĝi serioz-miena, kio je tiu ĉi fojo jam ne havis prosperon, kaj daŭrigis jam kun ne kaŝata du-onrido:

– Fu! Tute ne eble estas paroli kun vi pri seriozaj aferoj! Tamen vi atentu la dirot-an... Ni, t.-e., mi kaj vi, kiel vi sendube scias, havas niajn proprajn nomojn. Ĉu tiel?..

Jorĝjo jese ekbalancis per la kapo, tute ne komprenante, kion ŝi volas diri per tio. Ŝi do daŭrigis:

– Malgraŭ tio vi, kiel mi rimarkas, ankoraŭ neniam nomis min je la nomo. Sekvante vian ekzemplon, mi penis fari same. Sed tio ĉi estas ne natura kaj ĝi ne devas plu daŭri. Ĉiuj miaj parencoj kaj konatuloj nomas min Olnjo, eble, vi ankaŭ povus nomi min tiel?.. De mia flanko, mi nomus vin... Josefĉjo... – ŝi ruĝiĝis kaj, farinte demandan mi-enon, eksilentis.

Jorĝjo hezitis ion respondi, kvankam tia surprizo tre kortuŝis lin.

– Respondu ion, kial vi ĉiam silentas? – ŝi daŭrigis post unu sekundo kun seriozeco antaŭa.

– Olnjo!... – li diris, – mi estas tre kortuŝita de via afableco...

– Josefĉjo, – ŝi interrompis lin, – ne trograndigu...

La konversacio estis interrompita de bruo de ies alproksimiĝintaj paŝoj. En la ĉambron eniris la doktoro kun tri nekonatuloj.

XVIII.

El la taglibro.

La 23-an de Decembro jaĉjo sxribis en sia taglibro:

„Esperanto!.. Por mi ĝi estas ia sorĉaĵo,-vere!.. Dank' al ĝi kaj sole al ĝi mi nun loĝas en la frenda familio-alte inteligenta, kiu tamen rilatas al mi, kiel al sia parenco, samfamiliano; dank' al ĝi mi senĉese ĝuas plezurojn, kiujn mi eĉ songis neniam. Nur nun mi sperte sciiĝis, kia nobla kaj bonega estas s-ro Veselov, kia modesta kaj servema estas la doktoro kaj samtempe sentime zorgema pri Olnjo kaj sia amiko, kiu, kiel mi vidas, eĉ unu paŝon ne faras ekster lia gvidado. Kaj Olnjo?.. Ho, ŝi, ŝajne, estas plej kara ekzistaĵo por mi en la mondo!.. Dum tiuj ĉi tagoj mi alkutimiĝis ĉiam esti kun ŝi kaj eĉ malloza foresto de ŝi el la domo igas mian koron bati malsaneme. Ŝi ĉiam estas tiel komplezema, afabla kaj milda, ke, ŝajne, en la tuta mondo ne estas renkontebla alia tia knabino...

Mi laboras fervore. Tage mi laboras en ŝia ĉambro, kie neniu malhelpas kaj kie estas ĉiam sentata speciala afluo de energio kaj krea inspiro. Mi jam verkis mian raporton, nun mi komencis unu verkon originalan - mian unuan „planon", sed tio ĉi estas dum sekreto... eĉ por Olnjo. S-ro Veselov trovis mian raporton bona, li konsilvenis korektis ĝin kaj por tio aldonis al ĝi „pure literaturan stilon". Multe mi skribas por la dikulo kaj esperas dum la festoj perlabori sufiĉe da mono. Nur tiu ĉi laboro ne plaĉas al Olnjo: la knabino opinias, ke la laboro estas tro malfacila kaj postulanta de mi tro multe da atento kaj energio,-sed ŝi tion opinias, ĉar ŝi ne scias tiun mizeron, ne scias tion, kiel valora por mi estas ĉiu kopeko perlaborita. Kompreneble, mi ne mallaŭdas ŝin pro tio. Mallaŭdi aŭ juĝi Olnjon?..-ĝi estus frenezaĵo!..

Nun estas malfrua nokto. Ĉiuj en la domo dormas, nur sola mi skribas ankoraŭ. Ŝi dormu trankvile, precipe Olnjo!.. Ŝi, karulino, travivis dum la tago pasintan tion da malĝojoj kaj malagrablaĵoj, ke la dormo trankvila nun por ŝi estas bezonega plio,l al iu ajn alia. Kontraŭe, mi hodiaŭ estas „heroo de la tago" kaj sentime feliĉa, ke mi sukcesis forigi ĉiujn ŝiajn malagrablaĵojn, malĝojojn kaj tiamaniere almenaŭ iom repagi al ŝi por ŝia ĉiama atento kaj zorgoj pri mi... Sed por memoro, mi penos ĉion detale engravuri en la taglibro.

Hodiaŭ mi vekiĝis malfrue kaj kun maltrankvila sento en la brusto, pli ĝuste, kun neklara antaŭsento de ia malbona okazontaĵo. Similaj antaŭsentoj min trompas neniam. En la manĝoĉambro estis neniu. Teon kaj matenmanĝon donis al mi servistino. Mirigita je nekutima foresto de la knabino, mi demandis la servistinon pri tio kaj ricevis respondon kompremantan, ke frue matene venis la leŭtenan-

to, kiu havis mallongan interparolon kun la knabino, post kio ŝi ĉesporizis kaj revenis hejmen post duonhoro malĝojiĝinta, rifuziĝis de la teo kaj izoliĝis en sia ĉambro. Mi tuj forlasis la manĝoĉambron kaj rapidpaŝe eksiris en ŝian ĉambron. La pordo estis fermita. Mi malaŭte eksprapis je ĝi.

— Joseĥĵo! — la knabino ekkriis, ĵus ŝi ekvidis min, — mia kara Joseĥĵo!..

Tiu ĉi alparolo neatendita tiel kortuŝis kaj samtempe konfuzis min, ke mi, kompreneble, neniam forgesos ĝin...

La vizaĝo de la knabino estis pala kaj portis klarajn postsignojn de larmoj antaŭnelongaj kaj daŭraj, tamen tiu ĉi cirkonstanco ne malhelpis al ŝi resti bela kaj ĉarma, kiel ĉiam.

— Kio okazis, Olnjo? — mi demandis.

— Granda malĝojo!... Niaj amuziĝoj dum la festoj ne estas efektivigeblaj — la kolonelo arestis la leŭtenanton. Georgo malfeliĉa vizitis min prumatene por sciigi la malagrablaĵon — lia aresto komenciĝas de hodiaŭ kaj daŭros tri tagojn... sen lia partopreno ni povos aranĝi nenion. Georgo petis min esti pli trankvila, li konsolis min, ke la amuziĝojn ni aranĝos post lia liberigo... Tion ĉi, tion mi scias bonege, li parolis nur por trankviligi min. Ĉiuj niaj planoj rompiĝis!... Tuj post lia foriro venis en mian kapon penso tuj viziti la kolonelon kaj peti lin pri indulgo de la junulo. Mi kredis, ke tiu ankoraŭ ne forgesis sian promeson konservi al mi por la savo de lia fileto. Sed, hore, la kolonelo montriĝis je tiu ĉi unua fojo homo malĝentila: li eĉ ne akceptis min... La servosoldato, malfermінta al mi la pordon, anoncis, ke la sinjoro hodiaŭ neniun akceptas kaj la sinjorino ankoraŭ ne elliteriĝis pro la frua horo. Mi ne kontentiĝis je tiu ĉi sciigo kaj, kiel mi sciis, mi persistis, ke la soldato iru tuj al sia sinjoro kaj diru al li, ke la fraŭlino, kiu antaŭ nelonge savis la knabeton, havas akran bezonon je li kaj devas tuj vidi lin. La soldato, post iom da hezitado, iris al la kolonelo, sed baldaŭ revenis kaj sektone kaj kategorie anoncis, ke la sinjoro estas okupita kaj ne povas akcepti iun ajn... Pro la tagreno mi eĉ eksploris kaj forlasis la domon negastaman, nedankeman... Kion ni faros nun, Joseĥĵo?..

— Mi pripensu la aferon kaj poste petu konsilon de la pliaĝuloj, kiam ili revenos hejmen, — mi diris, penante aldoni al mia tono aŭtoritatan nuancon, dume en mia kapo jam maturiĝis penso pri la heroaĵo farota. Interŝanĝinte ankoraŭ kelkajn frazojn ĝeneralajn, negravajn kun la knabino, mi forlasis ŝin, ĉar ŝi sentis kapdoloron kaj bezonis ripozon kaj absolutan trankvilon.

S-ro Veselov kaj la doktoro forestis, neniu povus malhelpi al mia skriblaborado rektima, kiun mi intencis daŭrigi en la laborĉambro de la mastro, sed la penso, eniĝinta en la kapon, kiel najlo enbatita, koncentrigis cirkaŭ si tutan mian atenton, pro kio mi estis

ne kapabla daŭrigi pluan verkadon de la rakonto originala. Mi formetis ĝin kaj komencis la tradukadon, ĝi ankaŭ ne estis daŭra kaj estis baldaŭ anstataŭita de netskribado de manuskripto de la dikulo. Sed tiu ĉi estis tre enua kaj tro nelegeble skribita, - post kelkaj minutoj mi formetis ankaŭ ĝin. Mi sentis, ke mi tute ne estos kapabla jon laborĝuste ĝis kiam mi plenumos la planon akceptitan. Komence mi decidis atendi revenon de iu el la paĉjoj, sed pro senokupiteco la tempo pasis turmentige - malrapide kaj ĉiu minuto ŝajnis eterneco ... kaj post kelkaj minutoj de atendado mi jam rapideme iris tra strato al la domo de la kolonelo. Sed mi forgesis unu detalon, kiu havis plej bonajn sekvojn: forlasante la hejmon, mi renkontis en la vestiblo leterportiston. Inter amaso de korespondaĵoj, alportitaj kaj adresitaj je nomo de s-ro Veselov kaj Olnjo, estis ankaŭ unu letero je mia nomo. De unua rigardo, laŭ skribmaniero de la adreso, mi konjektis, ke ĝi estis skribita de la panjo. La koro ĝoje ekbatis en le, frusto, ekflovetis de la letero io parenca kaj pensoj uragane ekfluĝis en la malproksimaĵon. Granda estis tento - mi volis tuj trafegi la leteron, antaŭsentante, ke ĝi estas interesplena, tamen mi metis ĝin en poŝon ne legante, kvazaŭ timante prokrasti la intencon.

Mia kutima konfuziĝemo tuj foje ien forfluĝis kaj mi mem poste multe miris je mi, kiam mi, haltinte antaŭ pordo de la loĝejo de la kolonelo, kuraĝe kaj trankvile ekpremis butonon de elektrosonorileto.

La pordo tuj malfermiĝis kaj sur la sojlo aperis altkreska figuro de servosoldato. Li ne enlasis min ankoraŭ, sed staris antaŭ mi, tenante per la mano la pordon duonmalfermitan.

— Ĉu mi povas vidi sinjoron kolonelon? - mi demandis.

— Ne, lia kolonela moŝto ordonis neniun akcepti hodiaŭ ... - tiu respondis malatente, intencante jam fermi la pordon antaŭ mia nazo mem.

— Sed <u>min</u>, - mi faris akcenton je la lasta vorto, - mi esperas, li akceptos ... Ĉar mi havas por tio specialan permeson de li mem, - mi diris, eltirante al la servisto mirigita la vizitkarteton.

La soldato tralegis la subskribon de la kolonelo kaj ekrigardis min malkonfideme de la kapo ĝis la piedoj.

— Eniru! - li diris post rimarkebla hezitado minuta. - La sinjoro vere hodiaŭ estas okupita kaj neniun akceptas ... Eble, mi povos raporti pri vi al la sinjorino?..

— Mi nenion havas eĉ kontraŭ tio ĉi ...

— Sidiĝu! Mi tuj ...

Mi ordigis la harojn antaŭ granda spegulo kaj scivole rigardis la antaŭĉambron. Ĝuste aranĝitan. Kvankam mi jam estis tie ĉi dum la nokto memorinda, sed, pro mul-

teco de impresoj, mi tiam nenion rimarkis; eble, tiam malhelpis al tio ankaŭ la malpura horo. En la loĝejo estis silento de nenio rompata kaj mi, tute certa pri sukceso de mia vizito, ankoraŭ ne perdante la kuraĝon, pašis senbruce tra la ĉambro, ordigante en la kapo ĉion dirotan. La soldato revenis kaj, redonante ĝentile la karteton, proponis al mi demeti mian palton.

– La sinjorino deziras vidi vin, – li diris. – Bonvolu, juna sinjoro, iri post mi en la gastoĉambron.

Mi sekvis. Trairinte du ĉambrojn, ni haltis en la tria – vasta, luma kaj lukse meblita.

– Sidiĝu. La sinjorino tuj venos...

Mi sidiĝis sur seĝon, starintan apud fenestro kaj atente esploris internan ornamaĵon de la ĉambro. Sed tempo pasis kaj neniu venis al mi. Mi jam kelkfoje atente traigardis ĉiujn pentraĵojn, pendintajn sur la muroj en dikaj kadroj origitaj, kalkulis seĝojn molajn kaj tablojn de la ĉambro, sed mi, kiel antaŭe, restis sola en la ĉambro. Atente aŭskultante ĉiun eĉ plej malgrandan bruetон, mi ekvenis kaj ekpensis, ke la sinjorino, kredeble, forgesis pri mia veno. Feliĉe, ĝuste tiumomente mi rememoris pri la letero, kušinta en mia poŝo. Por plimallongigi la tempon, mi ŝiris la koverton kaj per la manoj tremintaj pro emocio malfaldis la leterpolion. Estis kortuŝe legi simplajn kaj iritajn de patrina koro mem sciigojn, kiel surprizis la gepatrojn mia monsendo. Ili neniam atendis tian donacon kaj dankis min... Malfeliĉuloj! La monsumo sendita estis por ili riĉaĵo. Sed malgraŭ la donaco, ili estis malĝojigitaj de mia decido pasigi la festojn ĉe Veselov'oj, – mia foresto hejme estis akre sentata de ili. En fino de la letero la patrino aldonis: „Saluton la gesinjorojn, donintajn al vi la rifuĝejon gastaman kaj penu meriti per io ilian amon kaj zorgojn pri vi. Sardu vin Dio! Ne forgesu Lin. Mi timas, kevi, dank' al viaj novaj konatuloj, forgesos Lin. Nunaj inteligentuloj estas nereligiemaj homoj kaj mi volus, kevi flankiĝu de tiaj homoj..."

La lastaj vortoj, kiel tranĉilo, ekpikis mian koron.

„Kara, ĉarma panjo", – mi ekpensis, kisante la leteron, – „kiom zorgema, antaŭvidema kaj prava vi estas!..."

Ĝuste en la tuta loĝejo de s-ro Veselov mi nenie vidis ian ikonon, krom tiu, kiu estis en la manĝoĉambro kaj alia – malgranda, kiu pendis super la lito de Olejo. Neniam mi ankaŭ vidis, ke iu el la familianoj preĝus antaŭe ol sidiĝi al tagmanĝo, aŭ fininte ĝin. Mi tuj rememoris akre, kiel komence malagrable influis je mi tiu ĉi cirkonstanco kaj kiel poste-post unu-du tagoj – mi jam alkutimiĝis al tio ĉi kaj ofte, sekvante ilian ekzemplon, mi mem ne preĝis eĉ antaŭ dormo. Kaj, malgraŭ granda distanco, kiu disigis nin, la koro de la panjo jam antaŭvidis, sentis mian kuraĝmankon. Ĉi ne eraris, ke mi – šia filo – iom post iom fariĝis senreligiulo...

Senĉese relegante la karan leteron, mi ĉiam pli kaj pli bedaŭris anime pri miaj konat-

uloj senzeligiaj, xaj mia konscienco senindulge riproĉis min je imitado al ili. Rezultate, mi decidis plibonigi de nuna tago xaj, akceptinte tiun ĉi decidon, mi instinkte ekrigardis angulon de la ĉambro xaj tie, ho ĝojo, estis ore-ornamita ikono de la Dipatrino kun kolorvitra lampeto, brulinta antaŭ ĝi. Mi ne esperis trovi ĝin en tiu ĉi domo, kies la gemastroj ankaŭ estis inteligentuloj, xaj tiu ĉi trovo de ĝi tiom forte impresis je mi, ke mi tuj forlasis la seĝon xaj, kun larmoj, de ie aperintaj sur la vangoj, genuigis respektege antaŭ tiu, kiu delikate tenis en siaj brakoj patrinaj la Dieedan Infanon xaj rigardis min milde xaj favore de la ikono.

Mi preĝis fervore, tutanime, ĝuste tiel, kiel instruis min antaŭ longe la panjo, tute forgesinte kie mi estas xaj kion mi atendas. Ĉu longe daŭris la preĝado, mi ne memoras, mi ne scias, mi nur scias, ke dum ĝi subite senbrue malfermiĝis pordo xaj antaŭ mi aperis la konata sinjorino kun beleta knabeto, kiun ŝi tenis je la mano.

Ekvidinte min en tiom nekonforma xaj neatendita stato, ŝi haltis senmove en la pordo xaj mi, konfuziĝita xaj ankoraŭ ploranta, rapide rekonsciiĝis xaj sinordigis konsternite.

— Ĉu mi malhelpis al vi? - ŝi demandis min afable xaj kondolence, kiam mi ekvidis ŝian manon, eltiritan al mi. - Evidente ia malfeliĉaĵo okazis al vi?..

Ŝi sidigis min sur seĝon apud si xaj karese demandis min pri kaŭzo de mia ploro xaj de la vizito. Mi sincere, nenion kaŝante, rakontis al ŝi pri la panjo, pri la letero, kiun mi ankoraŭ tenis en la mano, tremetinta pro emocio xaj, fine, pri la celo de mia vizito. Mi parolis longe xaj detale, kvazaŭ timante forgesi eĉ unu detalon negravan xaj ŝi silente aŭskultis min, karesante per la mano la kapeton de la fileto xaj ne forturnante de mi sian afablan rigardon.

Profunda ekspiro elfluigis el ŝia brusto, kiam mi silentiĝis. Ŝi ne tuj respondis, sed dum kelkaj sekundoj ion pripensis penege.

— Mi nenion audis pri la vizito de la fraŭlino, kiun vi ĵus aludis. La kolonelo dum lastaj tagoj efektive estas tre okupita xaj pro tio li ordonis neniun akceptadi el privataj vizitantoj, sed sekisciis, ke ŝi - tiu ĉarma fraŭlino, kiu savis nian karuleton, - bezonas je lia helpo, li sendube tuj akceptus ŝin. Ni ne kutimis tiom baldaŭ forgesi konservojn, faritajn al ni"...

Evidente, la servosoldato, kutiminta ĉiam tro precize plenumadi ordonojn de la estro, eĉ tute ne sciigis lin pri ŝia vizito. Tamen ne ĉio ankoraŭ estas perdita. Se li ne liberigis la leŭtenanton laŭ ŝia peto, li faros tion, se estos eble, laŭ la via... Sed mi avertas vin, ke mi neniam zilaton havas al oficaj aferoj de la edzo, tial mi ne povas tuj garantii al vi, ke la leŭtenanto estos pardonita... Ni iru en la laborĉambron de la kolonelo! Cetere, mi sola iros tien xaj ĉion klarigos al li, - atendu ĉi tie iom da tempo.

Kaj ŝi malaperis, konduksante je la mano la filon, kiun kiu nun ŝi, ŝajne, jam plu ne deziris. Restinte sola, mi triumfis, antaŭvidante plenan sukceson de mia plano kuraĝa xaj senlieman ĝojon de Olnjo.

Mallaŭta sprontintado, alfluginta al mi tra najbaraj ĉambroj, tremigis min, ĉar ĝi signifis alproksimiĝadon de la kolonelo mem. Akompanata de la edzino kun la fileto, li rapidĉeme eniris la ĉambron, tenante en la mano paperon. Vestita je parada uniformo, li estis belstatura kaj tre imponanta. Se mi renkontus lin tia ie en strato, mi ne rekonus lin. Lia vizaĝo estis serioza kaj ĉagreniĝo estis rimarkebla en liaj bonaj okuloj, rigardintaj el-sub densaj brovoj tra okulvitroj.

Afable preninte mian manon, li sidigis min kaj, starante antaŭ mi, diris:

— Unue, mi petas pardonon de la fraŭlino, ŝi diru ĉi tion al ŝi. Mi estas oficiro kaj ĉiam honeste plenumas miajn promesojn, sed je tiu ĉi fojo okazis ia malkompreniĝo, — oni tute ne sciigis min pri ŝia veno. Kompreneble, mi penos elaĉeti iamaniere mian kulpon antaŭ ŝi...

Li silentiĝis kaj, kuntirinte la brovojn, iris du-tri fojojn laŭlonge de la ĉambro, kvazaŭ pripensante ion.

— Mi ĝojas, ke vi, savinto de mia filo, estas tiom noblaj homoj... Tio ĉi, kompreneble, ne povis okazi alie, — sed min speciale ĝojigas tio, kion mi jus sciiĝis de la edzino: estas laŭdinde, ke vi estas homo tiom religiema kaj tiom amanta la gepatrojn. Viaj gepatroj povas fieri je vi, jes!.. Ĉio tio ĉi, kune prenita, igas min kontentigi vian, kaj tiun de la fraŭlino, peton pri pardono de la leŭtenanto... Li tuj estos liberigita!... Sed diru al mi, ĉu li estas via amiko?

— Ne! — mi respondis senhezite. — Kontraŭe, li estas mia malamiko...

— Eble, li estas via parenco? — la kolonelo eksmiris.

Mi klarigis, kiel mi povis, ke li estas nur lakta frato de Olnjo.

— Estas bedaŭrinde, — sulkante la frunton, li respondis, — ke tia ĉarma, afabla fraŭlino kontas tian malnoblan junulon. Li meritis la punon kaj mi neniam... neniam pardonus lin, se pri tio eĉ petus ia altrangulo!.. Mi tuj donos ordonon, ke oni liberigu lin. Saluton al la fraŭlino. — Kaj ekzrapinte per la spronoj, li foriris.

En la manĝoĉambro estis preta teo, sed, malgraŭ petoj de la sinjorino, mi rifuziĝis de ĝi, pretekstante je mankro de tempo kaj deziro eble plej baldaŭ konsoli la knabinon.

La sinjorino, ne disiĝante kun la knabeto, akompanis min ĝis la vestiblo, kie, antaŭ foriro mem, la knabeto eltiris al mi ian koverton. Mi rifuziĝis preni ĝin, sed, fine, mi devis cedi iliajn petojn. Mi estis tiom okupita je penso plej baldaŭ ekvidi Olnjon kaj ĝojigi ŝin, ke mi tute ne atentis ĝin, rapidmove metinte ĝin en poŝon.

Mi, kiel freneza, rapidis hejmen tra stratoj, riskante je ĉiu paŝo faligi iun el preterirantoj, aŭ fali mem. Ruĝiĝinte kaj spiregante mi jam estis leviĝanta laŭ la ŝtuparo, kiam subite antaŭ mi aperis Olnjo. Ŝi estis palvizaĝa kaj malgaja. Rimarkinte mian ekscitiĝon, ŝi silente kun miro ekrigardis min. Kaj mi, ankaŭ silente, prenis delikate ŝin je la mano kaj suprenkonduksis.

– Kiel vi estis, Josefĉjo ? Kio okazis ?.. Rigardante vin, oni povas supozi, ke vi gajnis ducent milojn da rubloj, - ŝi diris.

– Mi gajnis pli multe !.. Mi gajnis liberigon de la leŭtenanto !..

– Ĉu ?

– Vere !

Kaj mi rakontis al ŝi ĉion okazintan, prisilentinte tamen pri la letero kaj pri la preĝ-ekstazo. Aŭskultante min, la rnabino ploris pro ĝojo, ke la festaj amuzoj nun estas efektivigeblaj.

– Kiel mi ĝojas, kiel mi danras vin ! - ŝi parolis ravita. – Mi neniam, neniam forgesos, Josefĉjo, vian konservon, ankaŭ, mi esperas, la leŭtenanto.

Dum la tagmanĝo ĉiuj parolis nur pri mi kaj pri mia heroaĵo, prokio mi konfuziĝis senĉese. Vespere venis la leŭtenanto. Li estis ankaŭ tre gaja. Li estis tre afabla kaj atenta al mi, kiel neniam antaŭe. La tutan vesperon ni pasigis en babilado kaj ŝercado.

Rigardante niajn feliĉajn vizaĝojn, estis malfacile konkludi, kiu el ni estis plej feliĉa dum la tago, kvankam miksentis, ke tia estis mi – ĉar mi faris gravan konservon al mia malamiko.

Tamen konscio, ke mi <u>perdis</u> la tagon, ĉar mi, kontraŭ mia kutimo, dum ĝi neniom laboris, premegis min kaj ĉi premegas nun."

XIX.

<u>Pluaj paĝoj de la taglibro.</u>

La 4-an de Januaro.

„Post du tagoj, matene, mi jam devos forlasi la gastaman familion de Veselov'oj ! Tiu ĉi penso, kiel pikilo de serpento, senĉese pikas dolorige la koron. Dum la festoj mi tiel alkutimiĝis kaj alligiĝis al la familianoj, ke mi tute ne povas prezenti al mi, kiel mi vivos plu, ~~kun~~ havante eblon nek vidi ilin ĉiam, nek oftevizitadi ilin. Tamen ni vidos, kio estos ! – dume mi, malgraŭ jam malfrua nokta horo, nepre devas almenaŭ ĝenerale engravuri por bona memoro en la taglibro kelkajn ĉefajn impresojn de la tagoj pasintaj.

Dum lastaj tagoj mi tute maldiligentiĝis – mi eĉ nenion skribis en mian taglibron, kiun mi delonge alkutimiĝis kompletigadi akurate de tago al tago.

La 25-an de Decembro, dum la familianoj ankoraŭ dormis, mi frumatene iris en proksiman preĝejon por ĉeesti tie fruan liturgion. Ĝojaj festaj himnoj, belege kantitaj de bona ĥoro, igis min pense transportiĝi en nian malproksiman preĝejon vilaĝan. La lasta tute ne havis ĥoron, sed nur unu kantiston - maljunulon psalmiston kun raŭka voĉo, tamen dum festoj sur la ĥorejon kuniradis la instruisto, kelkaj vilaĝanoj, knabinoj kaj infanoj, kaj niaj kantistoj - amatoroj, kiel ili sciis kaj povis, laŭ mi, pli konvene, pli inde

gloris la Novenaskiton persia simpla kantado, ol tiu ĉi urba artifika ĥoro. Tiu ĉi komparo elvokis sopiron je la hejmo kaj dum la diservo mi devis ruzi multe da penoj por ne eksplori. La humoro ne lasis min ĝis tiam, kiam mi revenis hejmen. La familion de s-ro Veselov mi ĉe nomas mia hejmo!..

Mi tute ne scias, ke en urboj (feliĉe aŭ malfeliĉe, ĉe ni en vilaĝoj tia kutimo ne ekzistas!) oni havas kutimon dum tiu ĉi tago donaci al ĉiuj samfamilianoj kaj ĉe (iafoje) al konatuloj donacojn. Tial min atendis surprizo. Ĝis mi venis la manĝoĉambron, kie ĉiuj jam sidis je matenmanĝo, oni ĉirkaŭis min, gratulante kun la ĝoja tago festa, kaj superŝutis min per donacoj. Olnjo donacis al mi beletan albumon por poŝtkartoj, s-ro Veselov - elegantan esper. signeton kaj la doktoro - luksan kinditan verkaron de Sogol. Tage venis Julia Andreevna, kiu donacis al mi belegan skribilaron, kaj la leŭtenanto - eĉ li ne malŝatis min nun! - notlibreton. Nur sola mi nenion donacis al iu!..

Olnjo ankaŭ ricevis amason da donacoj ŝatindaj kaj valoraj, sed ŝia atento estis plene okupita neĝe ili, sed je la esperanta festeno, aranĝota vespere.

Por la festeno ni ĉion aranĝis ĝuste, kiel ni supozis, sed granda diskriviĝo atendis la malfeliĉan iniciatorinon de ĝi. Venis el plankuloj, speciale invititaj al la festeno, venis. La plano de la vespero, kiun Olnjo ellaboris kun tiom fervoro kaj zorgo, rompiĝis per si mem. Tamen por konsoli ŝin, oni decidis plenumi parton de la programo. Laŭ gesto de la doktoro ni ĉiuj stariĝis kaj kun granda entuziasmo plenumis ĥore la himnon, post kiu Olnjo kun Julia Andreevna ludis ĝin je la pianino. Mi neniam aŭdis pli bonan muzikludon kaj, kiel ensorĉita, staris senmove, dum ili ludis. Fortan impreson la muziko faris ankaŭ je ceteraj ĉeestintoj, kiuj estis kortuŝitaj kaj longe aplaŭdis al la muzikintinoj.

Kompreneble, nek la paroloj, nek la raportoj preparitaj estis legitaj, nek dancoj [illegible], kiujn tre ŝatas la knabino, estis aranĝitaj, - pro manko de aŭskultantoj kaj dancontoj. La festeno estis finita per legado: s-ro Veselov tralegis sian rakonton „La ostaro", kiun speciale por tiu ĉi vespero mi tradukis el rusa lingvo. Tiun ĉi rakonton mi nepre kopios en la taglibro.

Restaĵo de la vespero estis pasigita en gaja babilado kaj ŝercado. La leŭtenanto, kiel montriĝis, estis lerta spritulo kaj dum la vespero, ŝajne, eĉ unu minuton li ne sidis silente. Olnjo, forgesinte la diskriviĝon, estis tre gaja kaj ĉarma en sia festa vestaĵo kaj ŝia rido sonora sencĉese aŭdiĝis, kiel rekompenco al plej trafaj spritaĵoj, je kiuj mi, ho, ve! - tute ne estas kapabla!

La 26-an de Decembro vespere Olnjo kun sia patro veturis viziti Julia'on Andreevna, la doktoro ĝuis „festan ripozon", kiel li parolis, t.-e., li dormis. Profitante silenton, kiu regis en la domo, mi venis en la ĉambron de la knabino, esperante iom verki. Sed, ek-

Subdiginte grandan lampon, mi longe ne povis komenci la laboron kaj longe paŝis tra la ĉambro, admirante je ŝiaj portretoj, kiuj pendis sur la muro, kaj je elegantaj malgrandaĵetoj, zorgeme kaj orde metitaj de ŝia maneto sur la tablo. Ŝia foresto nekutima dolorige tranĉis la koron kaj pensoj obstine turniĝis nur ĉirkaŭ ŝi...

Kur kiam ekaŭdiĝis ies paŝoj tra la pordo nefermita, mi sidiĝis al la tablo kaj, kliniĝante super paperoj, ŝajnigis, ke mi estas okupita. En la ĉambron eniris per paŝoj mallaŭtaj la leŭtenanto, - mi tion konjektis je facila tintetado de spronoj.

- Ĉu vi estas okupita, joĉjo? - li demandis ĝentilvoĉe, kliniĝante super mi.

Antaŭe li neniam nomis min tiel, kaj mi kun miro ekrigardis lin.

- Pardonu min, sed s-ro Veselov, la doktoro kaj ĉefo Olnjo delonge nomas vin ĝuste tiel, - mi estas <u>ŝia amiko</u> (li faris akcenton sur tiuj ĉi du vortoj) kaj pro tio, mi opinias, mi rajtas ankaŭ same nomi vin.

Li expremis mian manon, sidiĝis kontraŭ mi al la tablo kaj elprenis cigaredujon.

- Ni ekfumu! - li diris ridetante, etendante al mi la cigaredujon. - La cigaredoj estas bonegaj!

Mi, konfuziĝeme kaj post longa hezitado, prenis unu cigaredon kaj ekfumis, rektiĝante kaj min apogante je seĝdorso.

- Tamen vi estas bona kaj kuraĝa knabo, antaŭe mi ne supozis trovi en vi tiajn ecojn. Mi tre dankas vin por via klopodado antaŭ nia kolonelo pri mia liberigo. Mi devis danki vin delonge, sed pardonu, nur hodiaŭ mi sciiĝis okaze, ke vi estis mia liberiginto. Mi kore premas vian manon, ni estu amikoj!.. Ni forgesu tiujn mal... Nu, vi komprenas...

Ni intersanĝis amikan manpremon.

- Ĉu vi delonge konas la kolonelon?

Mi mallonge rakontis al li la historion de mia konatiĝo kun li.

- Mi forgesis, Olnjo ĉion rakontis al mi, - li diris, atente aŭskultinte mian monologon. - Eble, vi ŝatas lin? Mi aŭdis de multaj personoj, kiuj ne konas lin proksime, ke li estas tre ĉarma kaj ĝentila sinjoro, sed memafere li estas granda fripono! Vere! Ĉiuj oficiroj havas tian opinion pri li. Pli postuleman, ambician, malĝentilan kaj fieran homon mi renkontis neniam. Pro tio la oficiroj rilatas al li ankaŭ originale: kiam li vizitas la oficirsan manĝejon, kie, kiel oni scias, ĉiam estas plena de drinkantaj kaj senokupaj oficiroj, tuj ili unu post la alia forlasas la manĝejon kaj la estro restas tie sola. Mi faris jam ne unufoje tian artifikon kaj ĉiam kun la sama sukceso.

La leŭtenanto ekfumis novan cigaredon kaj daŭrigis:

- Vi mem jugu, ĉu mi ne estas prava, malŝatante lin. Jen vi scias, ke mi estis arestita de li ĝuste antaŭ la festotagoj. Ĉu li ne povis pusi min post la festoj? Kaj ĉu vi scias mian krimon tiom gravan? Unufoje mi malgajnis la tutan monon kaj prunteprenis ducent rublojn de unu kolego. Post kelkaj tagoj mi ree kartludis kun kolegoj kaj, ĝuste kiam mi estis gajninta

ŭpiĉe bonan monsumon, venis la puntedonisto, al kiu mi... forgesis pagi la ŝuldon. Li estis ebria kaj havis kuraĝon en ĉeesto de la kolegoj nomi min malĝentile... aludinte, ke mi ne pagas ŝuldojn. Por la ofendo mi nature pagis al li ankaŭ per ofendo, tamen la afero finiĝus bone, sed en la ĉambro okaze ĉeestis la kolonelo. Li venis al mi kaj tondrvoĉe ekdiris sian juĝon malĝustan: -„ S-ro leŭtenanto, vi kuraĝis malhonoriĝi vian uniformon!.. Estu arestita por tri tagoj!..”

-Entute, - li daŭrigis kun ĉiam pligrandiĝanta ardo post mallonga paŭzo, - mi malŝatas la militservon kaj kun malpacienco atendas tiun tagon feliĉan, kiam mi povos forlasi ĝin. Rimarku: por oficiro estas malpermesataj ĉiuj prudentaj amuzaĵoj kaj estas lasitaj al li nur kartludo, vino, virinoj! Kion mi devas fari, se ĉio tio ĉi estas abomeninda por mi, se alloga s min amuzaĵoj pli... Sed sufiĉe! Mi jam enuigis vin.

Li ekfajfis mallaŭte ian gajan melodion, ludante per la mano je kvasteto de la portepeo.

-Ha, mi forgesis!.. - li ekkriis post nelonge. - Bonvolu diri, ĉu vi partoprenos morgaŭ la dancbalon, kutime aranĝatan de niaj oficiroj ĉiujare dum la festoj?

-Ne!.. - mi respondis senhezite.

-Kial?.. Ĉu Olnjo ne parolis al vi pri ĝi?

-Ŝi sciis, ke mi ne ŝatas dancojn, eĉ tute ne scias danci kaj, kredeble, protio ŝi menion diris al mi pri la balo.

-Kiel?.. Ĉu vi ne scias danci?.. Estas hontinde, juna homo!.. En dancoj ja estas nenio malfacilaĵinda. Ĉiuj junuloj ŝatas ilin kaj vi sola estas escepto... Kaj ne sole junuloj, mi scias multajn maturajn homojn, kiuj dancas bonege! Sed, eble, vi ŝercas, amiko?

-Tute ne! Mi dancis neniam.

-Sed Olnjo tre ŝatas dancojn...

-Ŝi dancu!..

-Kaj ĉu vi ne ĵaluzos, se mi morgaŭ multe dancos kun ŝi?.

-Vi dancu, kiom vi volas.

-Kaj vi?..

-Mi ion skribos. La festoj baldaŭ, nerimarkeble finiĝos kaj mi devas nepre plenumi tiun laboron, kiun mi fiksis plenumi dum la festoj.

-Ne, vi ne skribos, Joĉjo! Ne, mia kara, vi partoprenos la balon, vi devas vidi ĝin.

-Mi restos hejme...

-Ĉu vere? Sed, se Olnjo deziros la kontraŭan?..

Mi silentis.

-Eble, vi pensas, ke la balon partoprenos nur oficiroj?.. La oficiroj nur aranĝas ĝin. Komprenu eble, inter dancontoj estos ankaŭ multaj oficiroj, sed plimulto de partoprenontoj estos civilaj homoj. Multaj gelernantoj ĉeestos, nur viaj kolegoj-seminariano j forestos... Kaj prezentu al vi, kiom da fraŭlinoj ĉarmaj ĉeestos! Vi, sendube, neniam ankoraŭ vidis tian fraŭlinaron!

Kaj kian bonodoron vezšos iliaj tualetoj !..

Mi ekridetis.

– Ĉu vi malšatas ĉiujn ilin ? Restante ĉiam fidela nur al sola ŝi... Interalie, vi, eble, ne estos ofendita, se mi demandos vin malkaŝe : ĉu plaĉas al vi Olnjo ?.. Ĉu vi amas ŝin ?..

Mi dezirus tiam vidi en spegulo, kion esprimis mia mieno dum tiu momento.

– Bone ! Tiaj ajoj estas kompreneblaj sen vortoj !.. Efektive, ŝi estas bona knabino, kvankam ankaŭ en ŝi io... iotia... Mi ne povas nun ĝuste esprimi tion, sed mi avertas vin... Ŝi delonge jam havas multajn adorantojn, kiuj estas danĝeraj konkurantoj por vi. Mi dizos al vi malkaŝe, amike : nun vi estas junulo tute ne interesa por fraŭlinoj pro via modesteco, konfuziĝemo ĉiama kaj... poste vi fariĝos pastro !.. Ĉio tio ĉi ne estas kapabla almiliti vin kun koron. Mi scias, ke Olnjo tre ŝatas vin dank' al la lingvo... sed tio ĉi, kredu al mi, estas nelongedaŭra, minuta allogiĝo, malaperonta senpostsigne. Mi bone konas virinojn, li, mia amiko, ŝatas bravulojn, kuraĝulojn. Ofte pereigas iliajn korojn ankaŭ oficirunio – kormo, spronoj, lipharoj !..

– Por kio vi parolas ĉion tion ĉi ? – mi fine interrompis lin, ridetante.

– Ha, por kio ? Por prepari vin por diskreviĝoj, kiuj estas neevitebla, mia juna amiko...

En la ĉambron enkuris Olnjo. Ŝiaj vangetoj estis ruĝaj pro frosto, kio aldonis al ŝia beleta viŝaĝeto ian specialan nuancon de ĉarmeco. Ŝi estis surprizita, vidante nin pace interparolantaj.

– Ĉu vi delonge interparolas ? Mi je unua fojo vidas vin kune !..

– Nun ni estas amikoj, – la leŭtenanto klarigis. – Montriĝis, ke vi tute ne avertis Joĉjon pri la balo morgaŭ okazonta, kiun li ne volas partopreni.

– Ĉu vi, Joseĥjo, sola restos hejme ? Al la balo venos ni ĉiuj : la paĉjoj...

– Li intencas ion skribi, dum ni gajos !... – ĉikanis mia nova amiko.

– Ne ! – ŝi diris per tono, kiu ne permesis kontraŭdiron. – Li venos kun ni !

– Olnjo !.. – mi ekpetegis. – Sed vi ja bone scias, ke mi tute ne scias dancarton... Ĉu vi volas, ke mi ĉie malhelpu al ĉiuj kaj estu objekto de mokoj ?..

Neniaj admonoj de Olnjo, ankaŭ de la leŭtenanto havis sukceson. Mi senhezite restis kun mia decido. Je unua fojo dum la tuta gastado ĉe Veselovoj mi estis tia obstina kaj rifuziĝis ĉiel al iliaj konsiloj kaj petoj... Olnjo estis ĉagrenita de la obstino kaj longe dum tiu ĉi tago ŝi sidis kuntirinte la lipetojn kaj ne respondante je miaj demandoj.

Vespere de la baltago, restinte sola en la loĝejo, mi povis nekion verki, kiel mi esperis antaŭe, nek eĉ skribi la tuglibron. Plej diversaj pensoj, plej malsamaj sentoj estis trapensitaj kaj trasentitaj dum tiuj longaj horoj de la soleco. Ĉiuj pensoj kaj sentoj, kompreneble, estis turnitaj al Olnjo, sen kiu nun ŝia ĉambro inspiris nur sopiradon. Mi longe sidis, ferminte la okulojn, kaj antaŭ mi senĉese staris ŝia ĉarma figuro en bela bala vestaĵo, en kiu ŝi vere estis belulino... Mi aŭdis muzikon, bruadon de voĉoj, ŝian ridon melodian kaj envidis al la leŭtenanto kaj al aliaj junuloj, kiuj tiutempe ĝuis ŝian proksimecon. Mi eĉ bedaŭris,

e mi estis tia obstina...

La 5-an de Januaro.

Hieraŭ mi ne finis ĉion, kion mi volis engravuri en la taglibro. Hodiaŭ mi finos, mi ias tion ĉi, kaj kuntiu ĉi celo mi jam ne prokrastas la skribadon ĝis nokto, kiel mi faris ntaŭe.

.. Restaĵon de la vespero kaj la nokton mi pasigis en la kabineto de s-ro Veselov, leyante ĉion, io ajn traĝus en miajn manojn. Oni revenis de la balo...

Ne! Mi skribos jam nokte, mi vee devas prokrasti pluan skribadon de la taglibro ĝis li favora tempo. Ĉio jam delonge vokas min el sia ĉambro kaj en ŝia voĉo jam estas ŝŭdebla incitiĝo..."

XX.

La ostazo.

La 5-an de Januaro (nokte).

....."Jen estas tiu rakonto de s-ro Veselov, kiun mi aludis hieraŭ en la taglibro:

Unufoje somere vizitis min eksopiciro Semenov, loĝinta proksime, sed nur malofte vizitanta min pro sia trova okupiteco je restarigado de sia bieno, antaŭ nelonge dote akirita. Li estis homo inteligenta, multe leginta kaj sola filatelisto idea, kiun mi konis en la tuta distrikto. Ordinare li ĉiam kunportadis kun si siajn albumojn de poŝtsignoj kaj provizon de ili por reciproka interŝanĝo. Mi plezure pasigadis kun li multajn horojn, trarigardante niajn albumojn, jen reciproke kompletigante ilin, jen vigle babilante pri novaĵoj de nia specialeco. Je tiu ĉi fojo li donacis al mi pli ol cent poŝtmarkojn valorajn, mankintajn en mia kolekto, - interŝanĝe mi povis doni al li nenion, ĉar, kiel intence, mia provizo de rusaj antikvaj poŝtsignoj, kiujn li speciale ŝatis kaj kiujn mi akiradis abunde ĉiufoje dum miaj ekskursoj en antikvajn paperujojn, hereditajn de la patro kaj avoj, estis elĉerpita. Malgrue, konsolinte la gaston, ke mapaperujojn, hereditajn de la patro kaj avoj, estis elĉerpita. Malgrue, konsolinte la gaston, ke matene ni kune serĉos ilin inter paperoj malnovaj, kušantaj en kanapoj de la malsupra etaĝo, ni disiĝis por dormi.

Okazis, ke tiufoje nombro de miaj gastoj, venintaj honoriĝi per sia ĉeesto mian filiinon, ekaze de ŝia nomfesto, estis tre granda kaj la vasta dormoĉambro, destinita speciale por gastintaj junuloj, estis ne sufiĉa por enteni ĉiujn ilin. Protio kelkaj el ili devis dormi en ĉambroj de la malsupra etaĝo, turnitaj al la ĝardeno kaj okupitaj de neniu. Tie estis kelkaj molaj turkaj kanapoj antikvaj kun leviĝeblaj kovriloj-kušĝoj, kiuj dum tiu ĉi nokto devis servi kiel litoj por la sinjoro kaj kelkaj aliaj gastoj.

Pasis kelkaj horoj. Kiam jam ĉiuj dormis, subite ies laŭtega teruriĝo elflugis el la malsupra etaĝo kaj rompis la noktan trankvilon. Respondeje la krio eraŭdiĝis laŭta bojado de mia ĉambra hundego Hudron, al kiu iom post iom aliĝis voĉoj de ĝiaj kortkolegoj. Tra la domo ekkuris vekiĝintaj gastoj, servantoj; en la domo estis neimagebla tumulto. Mi, rapid-

ne vestinte ĥalaton, malsupreniĝis kaj en la provizoraj dormoĉambroj de la malsupra etaĝo
vidis jenan scenon:

Sur la planko apud unu kanapo kuŝis senmove en noktvestaĵo unu el miaj gastoj - dek-
ejara junulo Razumov. Lia mort-ŝajne-pala vizaĝo estis kripliĝita de teruro, apud li
uŝis senorde lia titaĵo, formetita de la kanapo, renversita seĝo kaj rompiĝinta kandelo;
kanapo mem estis malfermita kaj de la fundo de la kanapkesto rigardis nin granda,
eviĝinta kaj kovrita de polvo kaj araneaĵoj homa ostaro...

Preskaŭ samtempe en la ĉambron enkuris la doktoro. Li transkviliĝis la timigitajn gast-
n kaj rekonsciigis la junulon. La lasta longe kuŝis malsana kaj, resaniĝinte, sciigis sin-
re detalojn de sia aventuro, kiujn mi rerakontos sube laŭvorte.

La junulo estis filo de arbarkomercisto el la urbo najbara kaj delonge uzis gastamecon en
domo. Pro lia bona konduto, milda kaj malkaŝema karaktero kaj sciamo ni ĉiuj ŝatis
in kaj opiniis lin kvazaŭ samfamiliano. Malfeliĉe, dum sia lasta gastado, li akiris pasi-
n al kolektado de poŝtmarkoj, kiun li antaŭe ne evidentigis kaj kiu estis por ni sekreto.
kaze li estis atestanto de nia lasta intersanĝo kun Semenov kaj lin tre agrable surprizis
iu cirkonstanco, ke mi havis ĉiajn provizojn de malnovaj, valoraj rusaj poŝtsignoj en la mul-
enombraj kanapoj de la malsupra etaĝo.

„Mi neniam ion ŝtelis, - li sincere rakontis al mi, - sed tiam je unua fojo en mian kapon
enis peka, obstina penso, ke mi penus serĉi nokte en la kanapo, sur kiu mi dormis la valor-
ojn. Mi sciis, ke mia <u>ŝtelo</u> ne estos aperigita, ĉar vi mem parolis al Semenov, ke vi ne sci-
s, kiom da kanapoj estas plenigitaj de paperoj antikvaj kaj kiom da poŝtmarkoj atend-
s tie atenton de filatelisto.

Veninte en la ĉambron, kiam miaj najbaroj jam pace dormis sur siaj kanapoj, mi lon-
e ne estingis mian kandelon. Komence mi deziris certiĝi, ĉu la najbaroj dormas kaj mi
elkfoje alproksimiĝis jen al unu, jen al la alia el ili kun la kandelo en la mano. Certiĝinte,
eili dormas kaj ne malhelpos al mi, mi atente esploris mian kanapon de ekstere, kelkfoje
enante levi ĝian kuŝejon-kovrilon, sed ĝi estis tre peza kaj mi decidis prokrasti iom ĝa sere-
enante levi ĝian kuŝejon-kovrilon, sed ĝi estis tre peza kaj mi decidis prokrasti iom ĝa sere-
adon. La nokto estis malluma, pluvo senĉese ŝprucis. Ĵus la tuta domo eksilentis kaj ekdorm-
is post tuttaga seninterrompa bruado, mi formetis de la kanapo la litaĵon kaj, genuiĝin-
te, ekkree penis malfermi ĝin. La kovrilo estis tre granda, dika kaj peza, pro tio mi nur post
[illegible] iom kaj, subtenante ĝin per unu mano, la alian mi en-
longa penado povis levi ĝin [illegible] iom kaj, subtenante ĝin per unu mano, la alian mi en-
ŝovis en ĝian internaĵon, kie mi devis palpetrovi paperojn tie kuŝintajn. Sed min atendis
disreviĝo: la mano enŝovita ĝis kubute nenion povis palpetrovi laŭlonge de la tuta kana-
o. Ĝi estis aŭ tute malplena, aŭ la trezoro serĉata kuŝis sur ĝia fundo mem. Kolektinte ĉi-
ujn fortojn, mi per ambaŭ manoj levis la kovrilon pli alte kaj, apogante ĝin je la kapo, enŝovis
ujn fortojn, mi per ambaŭ manoj levis la kovrilon pli alte kaj, apogante ĝin je la kapo, enŝovis
en profundaĵon de la kesto la dekstran manon. Malpacile spirante kaj kun kora malkvi-
te batanta pro la atendo, mi penis ekpalpi la fundon. Imagu do mian miron, kiam la ma-

anstataŭ la paperoj serĉataj, subite eksplis ian objekton malvarman, kušintan sur la
ndo mem. Mi penis eksplpi la fundon aliloke laŭlonge de la kanapo, sed tie mia ma-
kunpušiĝis kun la sama objekto malvarma, ostsimila. La lasta espero trovi la paper-
n estis perdita, mi permis la kanapon, t.-e., mi mallevis la kušejon, ree metis surĝin la
ĵon kaj enliteiĝis. Sed dormo forkuris de mi: mia imago ekscitita longe ne donis al mi
nkviliĝon. Turniĝante de unu flanko la alian, mi longe pensis pri la paperoj kaj pošt-
arkoj troveblaj en la kanapoj. Post longa meditado, kiam mi jam tute trankviliĝis kaj ĉe-
ne mokis je mia infanaĵo, subite mia penso ekstušis la objekton kušintan. „Kio ĝi estas? –
i pensis. – Eble, ŝtonoj? .. Sed tian formon, ŝajne, ŝtonoj ne havas ... kaj kiacele oni metus
en ŝtonojn? .. Ĉu ĝi estas ostoj? .. Homaj ostoj? .. La domo ankaŭ la meblaro estas antik-
... de epoko de la servuto ... Eble, antaŭ multaj jaroj oni mortigis ian praŭlinon – mi
multe legis kaj aŭdis pri tiamaj moroj kruelaj de sinjoroj – kaj metis ŝian kadavron ĉi
en ... Eble, oni metis ŝin tien ankoraŭ viva ... Tie ŝi mortis, putriĝis kaj restis nur solaj os-
oj ... " Tremo trakuris tra tuta mia korpo. Dormi nun mi tute ne povis, tiom pli super ies
toj ... Mi decidis atendi la matenon kaj tiam, sciiginte pri miaj supozoj la najbare dormin-
ojn junulojn, esplori la internaĵon de la kanapo.

Sed tempo pasis turmentige-malrapide kaj la nervoj estis tro streĉitaj: al mi nun klare
ajnis, ke sub mi – en la profundaĵo de la kanapkesto – kušas viktimo de servuta arbitro, soif-
anta venĝon, ke ĝi turniĝas sub mi, tintas per la ostoj ... Tute malsekra prošvito malvarmo,
mi forlasis la liton kaj ekbruligis la kandelon. La fajro tuj lumigis konturojn de la kolegoj dorm-
ntaj kaj dispelis kune kun la mallumo cirkaŭanta antaŭ mian timon senkaŭzan, kiu ĉiam
i trudeme ŝteliris en mian koron. Por fine liberiĝi de la supozoj turmentigaj kaj trankviliĝi
mi decidis ne prokrastante esplori la enigmoplenan internaĵon de la kanapo ĉe lumo de
la kandelo.

La litaĵo ree estis formetita kaj la kanapo tute malfermita sen peno. Preninte la kande-
lon en la manon en la manon kaj lumiginte la internaĵon mallumĉan, mi konsterniĝis:
laŭlonge de la kanapkesto kušis granda flaviĝinta homostaro kun la manoj etenditaj
kaj nigraj okultruoj, fikse rigardintaj ĝuste min. La manoj ekstremis pro la teruro kaj la
kandelo falis sur la planxon kaj estingiĝis. Mi ekaŭdis ian mallaŭtan bruetoŝ, kvazaŭ
la ostaro ekmoviĝis en sia ĉerko improviza, kaj instinkte faris kelkajn pašojn malantaŭen
en la mallumo, kunpušiĝis kun sciĝo apude starinta kaj perdis konscion ... "

La ostaro estis proprajo de mia amiko-doktoro. Kiam li transloĝiĝis por ĉiam en mian
domon, li kune kun sia medicina ilaro kaj libraro alveturigis ankaŭ tiun ĉi homan ostar-
on, kiu antaŭe staris en lia kabineto apud skribotablo. Laŭ la kutimo, li stariigis ĝin ankaŭ
en destinita por li ĉambro de mia domo. Sed baldaŭ montriĝis tuta nekonveneco de tia
ĉambrornamo: mia sola filino, tiam ankoraŭ etulino, okaze veninte en la ĉambron, estis
tiom teruregita de ĝi, ke la doktoro la saman tagon decidis por ĉiam senigi je sia konstan-

kolego sennova. Vespere ni metis ĝin en unu malplenan keston de turka [illegible] kaj kaj baldaŭ tute forgesis ĝin, ankaŭ la kanapon mem. Kaj la timigilo kuŝis tie pli ol dekjaroj, ĝis kiam ĝi ree teruregis unu homon, sed je tiu ĉi fojo jam ne ekulon-inpanon, sed la deksesan junulon.

XXI.

La unua maskvojaĝo.

Vespere de la 5-a de januaro Joĉjo skribis ensia taglibro:

„La tuta tago sekvinta pasis en preparoj al maskvojaĝo. Miaj turmentantoj, ĉar kiel lic mi nomos Olnjon kaj la leŭtenanton, decidis, ke ĉefa rolo dum la vojaĝo rajte devas aparteni al mi, ĉar mi ne volis partopreni la balon, aranĝitan de oficiroj. Mi timis, ke mi ne scios plenumi ĝin ĝuste kaj tiamaniere zee ĉagrenos ĉiujn ilin, kiuj delonge tiom klopodis kaj revis pri maskvojaĝoj, tamen mi ne rifuziĝis.

La doktoro kaj Olnjo konsilis, ke antaŭe estu ellaborita plano de la vojaĝo kaj ke la rolo, destota de mi, estu elde plej klara por mi, sed la leŭtenanto havis kontraŭan opinion, al kiu aliĝis s-ro Veselov, ankaŭ mi.

– Vi devos esti nur pli parolema, pli vigla kaj sprita !... – oni parolis al mi.

Mi konsentis kun ili, kvankam mi samtempe konsciis, ke ĝuste tiujn ĉi ecojn mi ne havis.

Oni decidis, ke mi prezentu pastron vilaĝan, Olnjo-pastredzinon kaj la leŭtenanto lu- por unua fojo-rolon pasivan, t.-e., ke li restu oficiro, kiel li estas.

Vespere venis la perukisto kaj, ĉe vidado de ĉiuj familianoj, komenciĝis mia aliformiĝado. Ĉar mi montriĝis tro maldika por prezenti pastron, kiuj-oni parolas-estas preskaŭ nenescepte dikuloj, oni komence alligis po du kusenoj antaŭe kaj malantaŭe de mi. Poste oni vestis sur min pastran robon nigrokoloran kun larĝaj manikoj, metis sur la kapon perukon kun longaj haroj, alglutis larĝan barbon kaj konformajn lipharojn kaj mi pariĝis tute nerekonebla.

Olnjo superis preskaŭ neniajn aliformigojn, pro kio ŝi restis preskaŭ tute tia, kia ŝi estis efektive. Oni konsilis, ke ŝi „iom maljuniĝu" kun ĉiopova helpo de la perukisto, sed ŝi ne volis. Pro tio mi, havinta aspekton de nejuna pastro, ne harmoniis kun ŝi-tre juna „vidino". Krankam tio estis ne tre natura, ŝi restis ĝuste tia.

Kiam ni, akompanataj de Bondeziroj de s-ro Veselov, de la doktoro kaj la perukisto, eliris strakon, tie apud la perono nin jam atendis trio de bonegaj ĉevaloj, enjungitaj en grandan glitveturilon. Ni sidiĝis, kovriĝis per pela kovrilo, kaj la trio ekkuris rapidege tra stratoj de la urbo.

La veturigisto estis antaŭe sciigita, kien li devis veturigi nin, sed por mi ĝi estis sekreto.

Mi rekte dum la vojo petis la kunvojaĝantojn, ke ili malkovru la sekreton, sed ili estis

obstinaj kaj respondis al mi nur per ŝercaĵoj.

—Kien ni veturas? - la leŭtenanto ripetis, ridante, mian demandon. - Tion ĉi vi baldaŭ vidos, kiam la ĉevaloj haltos apud preĝejo vilaĝa... kie vi, Joĉjo - pastro, edzigos min je Olinjo.

La knabino gaje ridis je la ŝercaĵo, kun bedaŭro rigardante min, kaj la leŭtenanto, kvankaŭ nenion rimarkante, daŭrigis:

—Ĉu vi, patro Joĉjo, memoras edzigos min je Olinjo? Mi bone rekompencus vin... Sed se vi estos obstina, mi tuj venigos vin al la episkopo, klerigos al li, ke vi estas malspastro, kiu proponis al mi siajn servojn...

Mi, kiel mi povis, same respondis en ŝercoj la ŝercojn kaj laŭte ridoĉĉ por unu minuto ne ĉesis en mia glitveturilo. Pro tio ni tute ne rimarkis, ke la arbo jam delongerestis post niaj dorsoj kaj ni jam estis veturintaj tra densa arbaro alia. Altaj arboj pensoplene staris silente je ambaŭ flankoj de la vojo, etendinte super niaj kapoj siajn longajn, muskokovritajn, grizajn branĉojn, feste ornamitajn de neĝoflokoj. Jam foje la arko de la ĉevaljungaĵo tuŝetis per sia suprajo la branĉojn kaj grandaj buloj da mola neĝo ŝutiĝis sur nin, kio ankoraŭ pligrandigis niangajecon kaj elvokis novajn eksplodojn de tuja gaja ridado. La veturigisto duonvoĉe kantis ion kortuŝan, senĉese ekvipante jen unu, jen la alian ĉevalon, kiuj kuris, kiel eblas plej rapideco miriga, kvazaŭ ili estis plugilhavantaj.

Sed nia bona humoro, ridoj kaj ŝercoj baldaŭ estis rompitaj de malagrablaĵoj, kiuj malice atendis nin jam ne malproksime. Sur la kampo, kien ni enveturis el la arbaro, komencigis ventego, kiu en la arbaro ne estis rimarkebla pro denseco de arboj. Ĝuste renkontenal ni eloris akra vento furioza, de kiu ne povis nin savi eĉ felvestaĵoj, je kiuj ni antaŭvidemeestis bone provizitaj. Ŝi pelis renkontentutajn nubojn de neĝopolvo, kiun ĝi suvoje kolektadis de neĝa suprajo de kampoj senlimaj. Ŝi blindigis niajn okulojn kaj, penetrante en ĉiun eĉ plej malgrandan aperturon de la vestaĵoj, kiel fajro, bruldolorigis niajn vizaĝojn, kolojn kaj manojn.

Sur la vojo tute forestis postsignoj de veturiloj, ilin forigis peneme la ventego, kiel intence, surblovinta neĝamasojn sur ĝin kaj samtempe nudiginta en kelkaj lokoj tute la teron. La ĉevaloj jam plu ne kuris, - malgaje mallevinte la kapojn, ili ~~drom~~ jendronis ĝis la genuoj en la neĝo profunda, jen haltis, ne obeante eĉ al longa vipo, kiu preskaŭ senĉese stimulis ilin.

Pasis pli ol unu horo, dum ni malrapide moviĝis tra la kampoj. La ventego pliĝis ĉiam pli kaj pli furioza kaj tra ĝi jam nenio estis videbla. La veturigisto ĉiam pli zorgataksite rigardis atente je flankoj kaj tremis pro malvarmo. Laŭ liaj supozoj proksime post la kampo devus esti ia vilaĝo, kiun ni senpacience atendis, esperante min varmigi en ia domaĉo gastama, sed anstataŭ ĝi antaŭ ni ree aperis ia arbaro kaj post nelonge la ĉevaloj haltis senmove antaŭ netraveturebla arbetaĵdensaĵo, - estis klare, ke ni devojiĝis.

Ni fikse rigardis ĉirkaŭe, esperante ekvidi malproksime ian fajreton; detenante la spiradon, ni penis ekkapti per aŭdosento ian sonon, sed ĉie estis nebulo ventega aŭ nigriĝis malkonsigne arbetaĵoj; ĉio silentis nur diversvoĉe ploregis kaj ĝemis la vento.

La veturigisto plankenturnis la ĉevalojn, ekfajfis kaj, por varmiĝi, expaŝis apud la glitveturilo. La nebulo densiĝis kaj, al nia malfeliĉo, de la ĉielo eksŭtiĝis grandaj neĝoflokoj; baldaŭ kovrintaj nin per dika tavolo blanka.

Olnjo koleris je ĉio, aŭ je io kaj delonge silentis, ni revis pri dolĉa ripozo hejme post la aventuroj kaj ankaŭ silentis, la leŭtenanto, supozante, ke ni dormetas, senĉese penis vigligi nin aŭ ridigi, avertante, ke en okazo kontraŭa ni facile frostiĝos, aŭ nerimarkeble estos formanĝitaj de lupoj.

– Ni parolas serioze! – li parolis. – Jen vi, Olnjo, konas radeton Zubatov'on, kiu dum la balo multe ridigis ĉiujn per siaj spritaĵoj... nu, li ruinoje, ankaŭ dum vintro, veturis kun du praŭlinoj kaj ekdormetis. Kaj kio okazis?.. De ie elsaltis grandega lupo griza kaj formanĝis tute lian nazon!..

– Sed dum la balo, kiel mi memoras, li estis kun la nazo, – Olnjo rediris.

– Ĉu?... Neeble!... – respondis la leŭtenanto. – Tamen de tiam pasis jam multe da tempo, eble nova nazo sukcesis elkreski!..

La serĉaĵo havis sian sukceson: ni ĉiuj ree ekridis, sed samtempe okazis io neatendita kaj timiga, kio tuj ree silentigis nin.

La glitveturilo subite extremis, ekŝanceliĝis kaj ekfalis profunde ien malsupren, fortirata de la ĉevaloj, kiuj ankaŭ falis kun ĝi. Ĉar malsupre estis multe da neĝo, ni ricevis nenian kontuzon, nur unu ĉevalo estis alpremita de la glitveturilo, kaj la veturigisto, faline, enneĝiĝis profunde kaj ne tuj liberiĝus sen flanka helpo.

– Kien ni enfalis?... – ni demandis unu la alian, dum la leŭtenanto klopodis apud la veturigisto kaj la ĉevalo.

Li insultis la veturigiston, la lasta – la ĉevalojn, la ĉevaloj sendube insultis la ventegon kaj precipe nin – aventuristojn, noktvagulojn.

Kiel montriĝis, ni estis sur fundo de ia profunda kavego, aŭ rivereto. Veturi laŭlonge de ĝi estis neeble, ĉar ĝi estis superŝutita de neĝo, ankaŭ estis neeble leviĝi el ĝi, ĉar ĝiaj bordoj estis krutegaj kaj kovritaj de neĝamasoj, kiuj superpendis super ĝia kuŝejo.

„Estas ankoraŭ la deka horo de vespero", – ni konsideris, – „se ne venos ia flanka helpo, ni devos sidi en la kavego almenaŭ dek horojn ĝis la tagiĝo. Sed tiam, ĉu pli facile ni povos liberiĝi el la kaptilo? Ĉu ĝiaj bordoj krutegaj tiam plimalkrutiĝos?"

Nia malespero estis neprisksribebla. Por plimallongigi la tempon, restintan ĝis la mateno, kaj por pli sukcese batali kontraŭ malvarmo kaj dormemo, ni decidis iom post iom preparadi vojon por la ĉevaloj, piedbatante la neĝon profunden ĉirkaŭ la glitveturilo. Tiun ĉi taskon facile plenumadis ĉiuj, krom mi: la kusenoj malbenitaj ĝenis ĉiun eĉ plej malgrand-

an mian moron. Mi koleris, kelkfoje penis liberiĝi de ili, sed la kunvojaĝantoj ne permesis al mi fari tion kaj ridis nerole, kiam mi, faletante je ĉiu paŝo, mallerte, kiel ursido, penis imiti ilian laboron.

Ni nescias, kiom da tempo ni jam sidis en nia kaptilo, kiam al nia aŭdo alflugis hundbojo. Ŝi estis ĉiam pli klare aŭdata, kvazaŭ alproksimiĝanta al ni. Estis evidente, ke la hundo akompanis iun ankaŭ, similе al ni, devojiĝinton, aŭ, ke la vojo perdita estis proksime de ni. Por altiri atenton de la veturintoj, ni ĥore kriis laŭteye. La venteto iom kvietiĝis kaj respondе ni ekaŭdis tre proksime de ni furiozan bojadon. Ni ripetis nian ĥorkrion, post kiu la bojado ekaŭdiĝis ĝuste super niaj kapoj sur kontraŭa bordo de la kavego. Post unu momento vi klare ekvidis sur la krutaĵo kontraŭ ni nigran silueton de granda hundo kaj ne malpli kla re ekaŭdis je kelkaj paŝoj de ni la vizvoĉon:

— Kiu estas tie?..

— Helpu, helpu pro Dio! — ekkriis denove la veturigisto.

Apud la hundo sur la krutaĵo aperis alta figuro de viro.

— Kion vi bezonas?.. — li demandis laŭtvoĉe, kvietigante la hundon.

Ni, ne cedante unu al la alia, penis klarigi al li nian malfeliĉaĵon.

— De kie vi veturis?.. Kien?.. Kiom da homoj vi estas?.. — li anstataŭ ia respondo je niaj petegoj, daŭrigis demandadon, kiun ni pacience respondis.

— Nu, mi gratulas vin kun la festo!.. Ĥa, ĥa, ĥa!.. — li, fine, laŭte ekridis. — Bone! Vi veturis por amuzi vin kaj enfalis en tiun ĉi kaptilon... Ĥa-ĥa-ĥa!.. Dovi amuziĝu en ĝi!.. — li more salutis nin kaj foriris, kiam ni malespere ekkriis, kiu kion poris:

— Bonulo, ne forlasu nin, ni frostiĝos!..

— Helpu pro Dio Mem!..

— Ne foriru, helpu al ni liberiĝi!

Ŝi haltis, turniĝis al ni kaj respondis:

— Mi ne havas tempon. Mi veturigas hejmen kuraciston ebrian...

— Helpu, ni pagos al vi, kiom vi volos!..

La nekonatulo rec alproksimiĝis al la krutaĵo.

— Kiel diablo enpelis vin tien? Per kio mi helpos?.. Jen mi diros en la vilaĝo, ke oni venu al vi...

— Kun kiu vi interparolas?.. — subite interrompis lin severvoĉe ia malaltkreska kaj dika viro figuro, de ie aperinta apud li.

— Jeniaj urbanoj enfalis kun la ĉevaloj kaj glitveturilo en la kavegon...

— Ni helpu al ili...

— Kiel ni helpos?.. Pli bone ni sendu al ili vilaĝanojn...

— Malsaĝulo!.. Ŝi povas morti pro malvarmo, atendante viajn vilaĝanojn. Donu al mi ŝnuron!..

— Por kio vi bezonas ŝnuron?

Anstataŭ respondo la dikulo, profunde enneĝiĝante, silente kaj decidpaŝe venis al la kruteĵo
nem kaj lia kunparolanto ankoraŭ ne havis tempon por ekrapti lin jela mano kaj forturi, kiam-
li sidiĝis sur la neĝamason, poste kuŝiĝis, eltirinte antaŭen la piedojn, kaj malsuprenglitis
al ni.

— Saluton, sinjoroj!.. Pardonu, ke mi interrompis vian trankvilon kaj entreprenis la arogant-
enviziton al vi, malsuprenglitinte sur mia propra... natura veturilo!.. Dum la vojo mi ekdor-
metis... mi vekiĝas kaj aŭdas, ke mia azeno-veturigisto Nikaĥa interparolas kun iu... nevidebla.
Ho, mi nature ekdeziris sciiĝi pri la afero... Tamen mi ne supozis renkonti tie ĉi tian societon...
— li balbutis post kelkaj sekundoj, forskuante de si neĝon, kiu ĉirkaŭŝutis lin dum la malleviga, ta-
men riskoplena malsupreniĝo. — Pardonu! Tie ĉi estas ankoraŭ la fraŭlino!.. Mi salutas vin,
anĝelsimila ekzistaĵo — kara fraŭlino!.. — li diris, ĉirkaŭrigardante nin kun scivoleco kaj ĝenti-
le premante la manon de Olnjo. — Mi estas kuracisto ebria Sergej Ivaniĉ... Ĉu vi aŭdis ion pri
mi?.. Sendube!.. Ĉar mi estas fama... jes, mi estas fama pro drinkemo de la oriento ĝis...
ĝis la sudo mem... Mia opico, pardonu la esprimon, estas pli malbona, ol tiu de hundo! Nek
tage, nek nokte oni lasas min trankvila... eĉ dum la festoj. Rimarku, nun estas tia granda
festo por ĉiu kristano... ĉiu ortodoksa kristano penas pasigi ilin en sia rondo familia... pez-
mesi alsi iam sen kulpan amuzaĵon... ekdrinkxi, pardonu la esprimon... ekdrinkxi unu-du
glasetojn da brando, ekludi kun bona homoj en kartaĉoj... Nur ni kuracistoj estas senigitaj
je ĉio tio ĉi!.. Kaj kial?.. Pro tiu simpla kaŭzo, ke neniu... pardonu la esprimon, neniu volas
morti sen nia... helpo!..

Kaj ekrigardinte supren, kie ankoraŭ staris lia veturigisto, li ekkriis minace:

— Nikaĥa, diablo, ĉu vi tetaniĝis?.. Donu ŝnuron tien ĉi! Tie ĉi noblaj personoj pereas pro
malvarmo kaj vi prokrastas kun via helpo... Kaj ri, senvosta diablo! Kial vi staras, kiel birdo ti-
migilo? Kien vi envetturigis la gesinjorojn noblajn, kiuj konfidis al vi sian altvaloran... vivon,
sanon?.. Ĉu vi blindiĝis?.. — li ekkriis je sia veturigisto. — Maljunulo tuj la ĉevalojn kaj suprenigu
ilin per la ŝnuro... Pli rapide!.. Mi ne toleras prokrastadon! Mi ŝatas, ke ĉio estu tuj farata... Via
pastra moŝto!.. — li diris, subite rimarkinte min en la glitveturilo. — Benu, benu min pekulon!
Nur se vi povus sciiĝi, kiel mi ŝatas... adoras niajn konfarantojn, niajn preĝantojn-pastrojn...
ĉefpastrojn, episkopojn, arĥiepiskopojn kaj la tutan... Mi adoras, mi adoras!.. Benu!.. — li fo-
rmetis sian ĉapon de la kapo kaj kunmetis la manojn por akcepti benon.

— Surmetu la ĉapon sur la kapon, Sergej Ivaniĉ! — mi diris, forpuŝante liajn manojn. — Mi est-
as pastro nur por kelkaj horoj!..

— Ĉu vi estas maskita?.. Mirinde!.. Mi vidadis, ke oni ofte maskiĝas je hebreo, je diablo... sed
ke oni povus maskiĝi, pardonu la esprimon, je pastro, — mi tion ĉi neniam eĉ supozis! Mir-
inde, nekompreneble, neimageble!.. — li balbutis remetante la ĉapon sur la kapon kaj ĉiam ri-
gardante min. — Kaj vi, via oficiro moŝto, ĉu vi ankaŭ, pardonu la esprimon, estas falsa ofici-
ro? — li demandis, salutante la leŭtenanton. — Ne?.. Serve, vi ekzercive estas oficiro natura, ~~kaj~~

loĝa?.. Boneĝe!... Mi alte salutas vin!... Kaj tiu ĉi spaco?.. Ĉu ĝi ankaŭ ne estas falsa?.. Mi tre ĝojas, ke mi havas okazon konatiĝi kun tiaj, pardonu la esprimon, noblaj personoj! Noblaj personoj, bedaŭrinde, loĝas nur en urboj kaj ni-loĝantoj de vilaĝoj - estas senigitaj je plezuro vidi ilin apud ni... Tamen mi ŝatas, ŝategas noblajn gesinjorojn... Mi mem, atentu, deven-as de nobla generacio! Mia patro estis... Ĉu vi aŭdis iam pri lia generala moŝto Pavel Ani-imiĉ Lubimov?.. Poste li, pardonu la esprimon, estis guberniestro... Li estis estro severa! Ho, kia severa li estis... unuvorte, li estis fulmotondro, sed ne homo! Tamen, kia bonanima li estis, kiam li estis en bona humoro... mirinde! Mia patro servis ĉe li dudek jarojn, kiel skribisto... kaj la patrino... la edzino, mortinta tiom antaŭtempe... - li ekstusis.

- Nun permesu, mi faros al vi unu demandon nemodestan: kien vi veturas? - li diris post nelonga paŭzo, dum kiu li kun memkontenteco ekrigardis komence la veturiĝistojn, kiuj - kiel prenezaj, klopodis apud la ĉevaloj, du el kiuj jam estis suprentiritaj sur la bordon, kaj poste, ordiginte siajn lipharojn longajn, ankaŭ nin ĉirkaŭis.

- En Norkino'n?.. - li ekmiris. - Kie estas tia vilaĝo?.. Atendu, mi demandos mian azenon...

Sed la azeno ankaŭ ne tuj konsideris, kie ĝi estas. Montriĝis, ke ni, devojiĝinte, veturis tute kontraŭan flankon.

- Vi devas komence varmiĝi... - li ree ekparolis. - Jen, kion ni faru!.. Kvankam la ventego ĉesas, tamen ĉiuj vojoj estas kovritaj de neĝo. Kien vi veturos malvarmaj, malsataj laŭ vojo nekonata? Kaj se vi ree, pardonu la esprimon, enfalos ien?.. Tre proksime de tie ĉi estas mal-granda vilaĝo Stepurka, kie loĝas mia amiko sincera - pastro... Ni ĵus preterveturis la vilaĝon kaj rimarkis fajrojn en fenestroj de lia domo. Ni veturu tien, kaj matene vi rapide revenos la urbon, aŭ aliloken, laŭ via plaĉo...

Ni ne kontraŭdiris, ĉar jam ni tremetis pro malvarmo kaj travivita maltrankviliĝo, kvankam miaj kunuloj tre ĉagrenis, ke ilia plano tute ruiniĝis.

- Mi invitus vin al mi, - daŭrigis mia konparanto, - mia vilaĝo kuŝas ankaŭ proksime, sed mi timas la edzinon. Ke pardonu ŝin Dio, sed mi diros al vi malkaŝe, sincere, - ŝi estas sentaŭga virino... diablino, sed ne homo, je Dio!.. Ŝi ne toleras odoron de brando kaj facile povas ofendi kiun ajn...

La lasta ĉevalo ankaŭ estis facile suprenigita, oni devis nun nur suprentiri la glitveturilon kaj nin. Olnjon, malgraŭ ŝiaj protestoj, laŭ konsilo de Serĝej Ivanyĉ, oni sidigis en la glitveturilon, kiun post longaj penoj la ĉevaloj suprenlevis per la ŝnuro. Poste oni la ŝnuron ĉirkaŭveturilon, kiun post longaj penoj la ĉevaloj suprenlevis per la ŝnuro. Poste oni la ŝnuron ĉirkaŭligis ĉirkaŭ mi kaj mi triumfe estis elprenita el la kaveo. La veturiĝistoj kaj la leŭtenanto levigis suprenpiedire kaj senflanka helpo, pasante laŭ ĉevalpostsignoj, kiel laŭ ŝtuparo. En la kaptilo restis sola la kuraciisto. Li brave prenis per la mano malsuprenigitan al li ŝnuron kaj eliris rapiderne suprenn, sed ĵus li atingis supron de la krutaĵo, la ŝnuro dissiriĝis kaj li falis renverse malsuprenn. Poste li longe ne povis liberiĝi de neĝo, kiu trafis en liajn botojn, manikojn kaj

post kolumon.

Sergej Ivanyĉ, al kiu ni en nenio kontraŭdiris, ordonis al sia azeno Nikaĥa tuj turni la ĉevalon kaj peli ĝin eble plej fervore al Stepurka kaj li mem konvolis sidiĝi en nian glitveturilon, kiu sekvis post la glitveturilo de Nikaĥa. Tia najbareco kontraŭvola plaĉis al neniu el ni, tamen ni estis plej ĝentilaj al li pro lia koneco, lerteco kaj grandanimeco, kiuj se manifestus, ni, kiu ajn, sidus ankoraŭ longe en nia kaptilo.

Baldaŭ sur nigra fono de densaj arboj, kreskintaj en la tombejo, klare desegniĝis negranda blanka preĝejo, apud kiu, laŭlonge de la vojo, nigriĝis dometoj. Nikaĥa ĝuste plenumis la ordonon de la mastro kaj ne ĉesis vipi la ĉevalon, post kiu galopis nia trio. Nikun kruo enveturis en la vilaĝon kaj haltis apud granda malnova domo. Ĝiaj grandaj fenestroj mallumaj malgaje rigardis la straton, en nenia el ili jam estis vidata fajreto.

La kuraciston elsaltis el la glitveturilo kaj per rapidema irmaniero iom ŝanceliĝa supreniris la peronon.

— Gloro al Dio! — li diris, ekrapinte kuraĝe je la pordo. — Ni tuj varmiĝos kaj ripozos, kiel hejme... Tamen kiel longe oni ne malfermas! Ni ofte vizitas la domon, kiel gasto dezirata, — li daŭrigis, pli laŭte ekfrapinte je la pordo.

Ni atendis, ĉu oni akceptos nin nokte en ripozejon. Post la dua frapado trudema, post la pordo ekaŭdiĝis ies paŝoj nerapidaj kaj laŭta voĉo de maljunulino demandis:

— Kiu estas?

— Malfermu, mi petas, kara mia! Ni frostiĝis...

— Ĉu vi ree aperis, ebriulo malbenita? Ĉu vi ne scias, ke estas jam nokto?.. Iru hejmen... de kie vi venis... — kaj ŝi foriris, laŭte murmurante ion kaj kun kruo fermante post si pordon.

— Ŝi estas malbenita virinaĉo!... — balbutis la kuraciston, revenante al ni kun la kapo malkovrita. — Mi esperis, ke renkontos nin la pastro mem, patro Nikon... Atendu, malbenita diablino!.. Jam vi malsaniĝos kaj bezonos je mia helpo... tiam mi ĉion memorigos... Malbone! Nun iru vi, — li sin turnis al mi, — petu!.. Vin oni nepre akceptos...

Mi ripetis la saman, kion jus faris Sergej Ivanyĉ. Baldaŭ post mia ekfrapo ekaŭdiĝis laŭta voĉo konata, malĝentila:

— Nu? Kiu frapas ankoraŭ?..

Mi mallongige klarigis, kiuj ni estas kaj kiel ni preskaŭ jam pereis pro malvarmo, devojiĝinte. Kompreneble, mi mensogis, ĉar mi nomis min pastro.

La maljunulino malfermis la pordon kaj eklumigis mian figuron per lanterno, kiun ŝi tenis en la mano.

— Eniru, kara gasto! Kie estas via kunvojaĝantoj?..

Tuj ekstendis nur tion ĉi kaj tuj forlasis la glitveturilon. La maljunulino lasis la lanternon en la vestiblo kaj konduksis min en ĉambron malgrandan, apenaŭ lumigitan de sebrandelo.

— Senrestiĝu, sidiĝu, kara patro, — ŝi diris, bruligante grandan lampon, kiu pendis super tablo. —

Hanjo! - ŝi daŭrigis, - alportu la samovaron. Ni devas varmigi la malvarmiĝintojn.

Dum ŝi klopodis apud la lampo, miaj amikoj jam senrestriĝis kaj brue eniris la ĉambron. Post unu minuto ni ĉiuj jam sidis ĉe la tablo, sur kiu gaje bruis granda samovaro.

- Longe hodiaŭ ne revenas hejmen nia mastro-patro Nikon, - la maljunulino diris, per rigardo scirolema jam je centa fojo trapikante min. - Li, kolombeto, laboras... li vizitas nun domojn de la parohanoj, gloras Kriston. Kaj vi, patro... Ni ne demandis eĉ pri via sankta nomo...

- Mia nomo estas Josefo! - mi diris serioztone.

- Ĉu via paroĥo, patro Josefo, estas sankaŭ granda? Ĉu vi jam vizitis domojn de viaj paroĥanoj?

- Ne!... - mi respondis, nee balancante la kapon kaj metante en la buŝon grandan pecon da bongusta mola kuko.

- Ne?... - ŝi ekmiris. - Ĉu vi tute ne vizitas ilin dum Kristnasko? Ja tio estas tre profitdona... Patro Nikon ĉiutage alveturigas hejmen po 20-30 pudoj da greno. Per la familio tio ĉi estas sufiĉa enspezo.

- Mi ne havas tempon... - mi komencis, decidinte plenumi ĝuste mian rolon. - Miaj oficoj familiaj malhelpas al tio...

- Ĉu io okazis en via familio? - ŝi demandis kun kondolenco. - Ĉu iu mortis?..

- Okazis io pli malbona, pli terura... - kaj mi ekspiris profunde.

- Kia malfeliĉaĵo, Sinjoro Jesuo!... Kio do okazis al vi?..

- La edzino... - mi montris Olnjon, kiu tuj ruĝiĝis pro konfuziĝo kaj zorgo, ke mi laŭdinde ludas la rolon.

- Ĉu ŝi estas via edzino?.. Sinjoro mia, kia juna kaj bela ŝi estas! Mi supozis, ke ŝi estas via fratino, - miregis la maljunulino. - Kaj tiu ĉi oficiro estas kiu?.. Klarigu ĉion al mi, mi petas.

- Li estas mia konkuranto, kontraŭulo...

La maljunulino larĝe malfermis la okulojn kaj la buŝon sendentan, fiksinte akran rigardon en la leŭtenanton.

- Kiel konkuranto, patro? Ŝi estas maljuna kaj malsaĝa, mi ial nenion povas kompreni.

- Ŝi diros al vi mallonge kaj klare, kvankam tio estas tre, tre dolorige por mi... He, kiel doloriga!... - kaj mi metis al la okuloj naztukon. - La edzino malfidelis kaj forkuris al li... al tiu ĉi...

- Sinjoro Jesuo!... - la maljunulino faris krucosignon pro la surprizo. - Vi forpelus lin, vi ja vojtas fari tion, kiel ŝia leĝa edzo!..

- Kion mi faros senarmila, senhelpa?.. Li havas spadon, pistolon!

- Jes, jes!... - ŝi respondis, balancante riproĉe la kapon jen je Olnjo, jen je la leŭtenanto, kiuj sin ŝajnigis, ke ili senĝene interparolas duonvoĉe, ridetante, kvazaŭ ni parolis tute ne pri ili.

– Tia juna, tia bela pastredzina kaj... Kia peko!... – ŝi daŭrigis.

– Nenia peko estas en tio ĉi! – diris Olnjo. – Mi obeas al ordonoj de la koro. Kion mi faros, se mi amas lin, la belulon, bravulon?... – ŝi montris per la mano la leŭtenanton.

– Sed vi ja havas la edzon, vi ja estas pastredzino...

– Fi! Li estas malbela, longbarba, longhara!... – respondis Olnjo.

– Vi, karulino, konsiderus tion ĉi antaŭe... Kion li faros nun sola?.. Ja du an edzinon oni redonos al li – malpeliĉulo!..

Kaj sin turnante al mi, ŝi demandis:

– Kion do, kara patro, vi intencas fari nun?..

– Mi geedzigos ilin ie... Ke Dio estu kun ili, ke ili vivu kaj ne plendu je mi! Ebl', patro Nikon permesos al mi tion fari en sia preĝejo?..

La pordo kun bruego malfermiĝis kaj en ĝi aperis dika figuro de patro Nikon. La maljunulino forsaltis de sia loko kaj ekkuris renkonten al li.

– Rigardu, kiajn gastojn por la festo sendis al mi Sinjoro! – ŝi diris. – Tiu ĉi estas pastro, patro Joseĥo!..

– Mi tre ĝojas vidi la gastojn, – tiu respondis, salutante nin. – Bonan vesperon, kunfrato! – li daŭrigis, eltirante al mi sian manon.

Mi forlasis mian seĝon kaj faris kelkajn paŝojn renkonten al li. Sed dum mi interŝangis kutimajn interpasterojn, pratajn kisojn, la kusenoj pro malstreĉiĝo de la ŝnuretoj, elfalis unu post la alia sur la planxon.

– Patrino de Dio, kio ĝi estas?.. – ekkriis la maljunulino, suprenleviute la manojn pro miro.

Mi decidis, ke mia rolo estas finita kaj tuj liberigis min de la robo, la barbo kaj haroj.

Post la pastro staris Sergej Ivanyĉ. Li jen aplaŭdis al mi, jen frapetis per la mano je la ŝultro de la pastro, parolante:

– Nu, kiel?.. Nu, kiel plaĉas al vi, maljunulo, tiu ĉi elpensaĵo?.. Jen mi komprenas tion ĉi, jen, pardonu la esprimon, tio ĉi estas vivo!.. Kiam venos maljuneco, ili almenaŭ havos ion por rememori, kaj ni?.. Kion ni rememoros? Nenion bonan ni havas por rememori!.. Ĉu ni ekdrinkos, patro, kun la karaj gastoj po unu glaseto?.. Ja mi savis ilin kaj venigis al vi!..

Ŝis la tagiĝo mem ni restis en la domo gastama. La mastrino afabla, kiu jam forgesis sian indignon kontraŭ la kuracisto kaj la geedzigotaj kaj ekstatiĝis de ni je gajeco, eĉ por unu minuto ne forlasis nin, nur de tempo al tempo kolereme ekkriante je la servistino, kiu forgesis alporti ion al la tablo ĝustatempe.

XXII.

Unu sceneto el nova maskrojaĝo.

La 6-an de januaro Jeĝo daŭrigis:

Post unu tago ni zee entreprenis maskvojaĝon en tiun vilaĝon, kiun ni ne povis atingi pro la devojiĝo, kie loĝis iaj bonaj konatoj de la leŭtenanto, ankaŭ de Olnjo. Tiuĉi-foje la vojaĝo estis pli gaja, ĉar ĝin partoprenis krom ni tri ankoraŭ du fraŭlinoj, unu instruistino de elementa lernejo kaj du oficiroj. La maskoj, aĉetitaj de la leŭtenanto antaŭ la festo, estis uzitaj ĉiuj dum tiuĉi maskiĝo. Min oni maskigis je diablo, Olnjon-je sorĉistino, la leŭtenanton-je hebreaĉo. La aliaj partoprenantoj estis vestitaj je felvestaĵoj, kies pelo estis turnita eksteren, kaj je maskoj de bestoj kaj birdoj. Tiamaniere ni havis en nia anaro unu urson, unu simion, gruon kaj cet. Pro nia multnombreco, ni, kompreneble, ne povis ĉiuj lokiĝi en unu glitveturilo. Krom jam laŭkonata glitveturilo, en kiu nun veturis la fraŭlinoj, por ni-vizoj estis dungitaj ankoraŭ du cavaltrioj, enjungitaj en simplajn glitveturilojn sen dorsapogiloj, en kiuj ni veturis ne sidante, sed duonkuŝante sur molaj amasoj de fojno.

La vespero estis luma kaj tre frosta. Pro la malvarmo, dum la vojaĝo ni estis devigataj kelkfoje halti en vilaĝoj por iom varmigi nin kaj ĉiufoje niaj haltoj altiradis alsi amasojn de gejunularo vilaĝa festanta.

Kun mi en la glitveturilo duonkuŝis la instruisto, homo ankoraŭ juna, sed drinkema kaj unu oficiro. La unua havis provizon da drinkaĵoj, kiujn li uzis kun la kunuloj ne sole dum la haltoj, sed ankaŭ dum la vojo.

Enveturante en la grandan vilaĝon-financelon de nia vojaĝo, nia glitveturilo, kiu veturis malantaŭe, disrudiĝis flanken je vojkurbiĝo kaj ekrapiĝis je palisaro de ia legomĝardeno. En tiuĉi momento, dum miaj kunuloj kuŝis en la glitveturilo, mi duonsidis en ĝia malantaŭa parto. Pro la ekrapo de la glitveturilo mi perdis ekvilibron kaj falis sur la vojon, rimarkita de neniu. Kiam mi leviĝis, la ĉevaloj jam ne estis vidataj. La larĝa strato de la vilaĝo, hele lumigita de la luno, estis senhoma. Mi, zorgataksite kaj tute forgesinte pri mia kostumo, ekkuris laŭlonge de ĝi, serĉese turnante la kapon jen dekstren, jen maldekstren, esperante ekvidi la glitveturilojn, kiuj devis halti apud ia domo, aŭ, almenaŭ, demandi iun renkontoton. Tiamaniere mi kuris jam sufiĉe longe, rimarkata de neniu kaj renkontante neniun, kiam sur unu stratkruciĝo mi ekvidis du vizinojn, dorse turniĝintajn al mi kaj interparolantajn. Akurate al ili, mi haltis kaj, preninte unu el ili je la ŝultro per la mano, delikate demandis:

—Karulino, diru al mi, kien veturis...

Ŝi turniĝis al mi kaj, kaŭtege ekkriinte pro timo, falis teren. Ŝia kunparolintino, riel frezza, sin ĵetis al domo proksima, kriante:

—Diablo, diablo!.. He, savu! Savu!..

Konsiderinte mian staton, tiom neoportunan kaj riskoplenan, kaj aŭdante tumulton, jam eritan en la domo de la virino, mi kolektis ĉiujn fortojn kaj ree ekkuris tra la strato, ĉuminute

tendante persekuton.

Al mia ĵeliĉo, mi baldaŭ ekvidis niajn ĉevalojn, ĉirkaŭitajn de gajaj knabinoj.

– Rigardu, jen estas amikoraŭ unu el ilia amaro! – ekkriis unu el ili ruĝhar-ido.

– Tiu ĉi estas diablo mem!.. – diris alia.

– Kia timiga li estas!..

– Batu lin!.. Ĵetu neĝobulojn je li! – ili kriis, kunamasiĝante apud la peronoj kaj barante mian vojon.

– Bonan vesperon, Eĥulinoj! – mi diris, dande salutante ilin. – Ne ofendu la diablon malĵeliĉan, malvarmiĝintan!..

En granda ĉambro, kien mi enkuris, miaj ĝekunuloj ĝaje dancis „la rusan" dancon. Ĝi sonoj de harmoniko. De ĉiuj flankoj ili estis ĉirkaŭitaj de densa viva muro de rigardantaj knabinoj, buboj, infanoj kaj ĉe malĵunulinoj. Kun granda peno mi trapuŝiĝis tra ĝi kaj nur tiam mi transviliĝis post la malĵeliĉaĵoj, kiam mi trovis lokon liberan en la antaŭa angulo de la ĉambro.

La danco finiĝis kaj la dancintoj komencis iam ludon, kiun mi ankaŭ ne partoprenis. La mastrino, rimarkinte tion, prenis karbŝovelilon kaj, svingante per ĝi en aero apud mia nazo mem, ekkriis ŝerce:

– Kaj vi malbenita rial flankiĝas de la gajaĵo?.. Rigardu, kian lokon li trovis por si, antaŭ sanktaj ikonoj!.. Foriru!..

Olnjo helpis al mi. Ŝi rimarkinte al mi, ŝi prenis min je la kornoj kaj diris kortuŝe:

– Fraĉjo! Vi malsatas nin. Iru kun mi al la forno, ni tuj forflugos hejmen de ili tra kornotubo.

.....

.....

XXIII.

La unua „flano".

La lastan tagon, pasigitan de Ĵeĵjo en la familio de s-ro Veselov, – la 6-an de januaro, – li longe memoris. Tage Olnjo vizitis Julia'on Andreevna, kiu estis malsana, kaj kelkajn magazenojn por aĉeti laŭ komisio de la patro kelkajn objektojn necesajn. Ŝia foresto daŭris preskaŭ ĝis la vespero. Malhelpata de neniu, Ĵeĵje sidtojn en ŝia ĉambro, sed, kutime, nenia laboro progresis. Komence penso pri la antaŭstaranta disiĝo kun la knabino, al kiu li alkutimiĝis, kiel al sia fratino, premegis lin, sed poste li rememoris, kiel tiun ĉi tagon li ordinare pasigadis hejme, sin preparante al disiĝo kun la hejmanoj kaj al forveturo en la urbon. Li longe revis, ĉirkaŭkaptita de la rememoroj tiagrablaj kaj karaj, kaj la konscienco subite ekriproĉis lin, ke li preferis la parencojn al siaj nov-

amikoj kaj kutimaŭ modestan temppasigadon de la festoj hejme al la urbaj amuzaĵoj, ki-
on, lipciis tion, aprobus nek la patro, nek la patrino.

S-ro Veselov kaj Olnjo kelkfoje demandis lin pri lia hejma ~~vivado~~ vivo, pri kutimaj disiĝoj kun
parenculoj antaŭ forveturo en la urbon, tamen li evitis detale kaj sincere paroli pri tio. An-
aŭ kelkaj tagoj li komencis sian unuan proron en verkado originala en Esperanto, ĝuste teme
de ĝi estis priskribo de unu el tiaj disiĝoj kun la parencoj. Kun, rememorinte pri la laboro, li
prenis la manuskripton komencitan kaj rapide finis kaj prilaboris ĝin, kiom li povis pro emo-
cio, ekreginta lin.

Poste li pentris en la taglibro planon detalan de la ĉambro de la knabino kaj tiel alloga-
gis je la laboro, ke tute ne rimarkis revenon de Olnjo, kiun akompanis kelkaj ~~tiaj~~ siaj am-
kinoj-fraŭlinoj. Li opiniis, ke estus ne dece plu resti en la ĉambro kaj foriris en la laborĉam-
bron de la mastro, kiu legis al ĉeestintoj tie siajn lastfoje verkitajn versaĵojn rüslingvajn.

La doktoro, najbare sidinta kun Joĝjo, rimarkis lian sopiron kaj proponis ludi kun li je
kvarmanoj. Ŝi estis amata amuzaĵo de Joĝjo, sed je tiu ĉi foje li ludis tiel distrite, ke ofte miksis
siajn figurojn kun figuroj de la kontraŭulo kaj eĉ iafoje penis preni siajn proprajn figurojn,
kio, nature, mirigis kaj ĉagrenis la doktoron.

– Vi, mon bel ami, kiel parolas francoj, – fine, li diris, – hodiaŭ estas malsana, aŭ
ensaniĝinta... Ĉu ni daŭrigos la ludon?..

– Sejunuloj! – laŭte proklamis la leŭtenanto, ĝuste en tiu minuto enirinta en la ĉam-
bron, – oni invitas vin danci, ni iru!

– Ni dankas vin, – gaje respondis s-ro Veselov, kvazaŭ la alvoko de la leŭtenanto estis tu-
rita al li, kaj, forlasinte siajn paperojn, li invitis danci kun li unu fraŭlinon, kiu sidis
apud li. – Eble, la samideano doktoro nenion havos kontraŭ tia interveno?

– Ni finos la ludon post la dancoj, – la doktoro diris afable. – Allons! – kaj li aldonis, jam
en turnante al s-ro Veselov: – Boneye! Dancoj estas necesaj por ni-junuloj same, kiel
dormo ~~al~~ por maljunuloj.

Olnjo jam sidis je la pianino, kun oni ne elportis el la laborĉambro post la festeno, kaj
ĝaja dancmuziko eksplus facile kaj melodie el-sub ŝiaj fingretoj. Du-tri paroj de dancint-
oj turniĝis tra la ĉambro. Joĝjo haltis apud la pianinistino.

– Ĉu mi povas, fraŭlino, peti vin por valso? – dande diris s-ro Veselov al la filino.

– Volonteye, paĝjo! – ŝi tuj respondis entuziasme, daŭrigante la muzikon kaj fiksinte al
la patro sian rigardon, plenan de amo. Ŝiaj gajaj okuletoj briletis profelicĝo. – Sed Julia An-
dreevna, bedaŭrinde, forestas kaj nenia povas anstataŭi min.

– Mi petos la doktoron...

– Pardonu, fraŭlino, sed mi neniam kuracis pianinojn, – diris tiu, alproksimiĝinte
al la knabino kaj kliniĝante super ŝi.

– Ni petas ne kuraci ĝin, sed nur malmulte ludi je ĝi, dum mi dancos unu valson kun

paĉjo.

La doktoro ekludis; liaj fingroj dikaj kaj neflekseblaj malfacile ekkuris laŭ la klavaro. S-ro Veselov lerte kaj delikate, kiel pupon, kaptetis la violonon kaj la paro ekmuzikigis kapturne.

Estis ĝojige rigardi ilin: s-ro Veselov dancis bonege kaj, gracie klinigante super la knabino, ion ekmurmuris al ŝi, ĉiam ridetante kaj ŝi, brilante pro la feliĉo kaj ankaŭ ridetante, jese balancis al la patro per la kapeto.

Sed ekaŭdiĝis lasta akordo kaj la doktoro forlasis la seĝon. S-ro Veselov sidigis sur ĝin la violonon kaj ekmisis ŝian maneton.

Ree muzikondoj flue kaj harmonie ekfluigis el-sub ŝiaj malditetaj fingretoj. Jočjo, kiel hipnotita, staris apude, rigardante ŝin kun amadmiro.

– Joseĉjo! – la knabino diris mallaŭte, ne interrompante la ludon, – Vi estas ial ennuita hodiaŭ?..

– Adiaŭ, Olnjo! – kun laŭta kaj profunda ekspiro respondis la junulo. – Hodiaŭ estas la lasta tago... kaj morgaŭ...

– Vi pli ofte vizitadu nin!..

– Mi havas unu peton... – li eksplustris konfuziĝeme kaj ĉiam pli kaj pli klinigante al la knabino.

– Mi aŭdas nenion!.. – laŭte diris Olnjo. – Parolu pli laŭte...

– Mi havas unu peton...

– Nu!..

– Donacu al mi via fotografajon...

– Por kio?..

– Por memoro pri...

– Bone, mi pripensos...

– Mi esperos... Olnjo, mi envias al via patro, kiu jus havis feliĉon danci kun vi...

– Jes, li dancas bonege... Sed oni parolas, ke antaŭe, kiam li estis junulo, li dancis neimitable. Estas agrable, kiam li per siaj fortegaj manoj turnas min, kiel lanugeron... Post la dancoj la paĉjo intencas iom tralegi al la gastoj kaj mi petis tralegi iom en nia lingvo. Ĉu ne, vi jam jus traduksis el liaj rakontoj?..

– Ne... Mi verkis en nia...

– Ĉu originale?.. Pri kio? Kia titolo estas de via rakonto?..

– Ĉu vi memoras... Vi kelkfoje petis, ke mi rakontu al vi iom el mia hejma vivo dum...

– Kaj ĉu vi faris priskribon de ĝi?

– Mi priskribis unu disiĝon kun la parencoj post vintraj ferioj...

– Sendube, ĝi estas tre interesa. Eble, vi mem tralegos ĝin al ni?..

Jočjo konsentis kaj la knabino donacis al li por tio longan rigardon de siaj belaj okuloj, kiun li, kiel ŝajnistiam al li, povis forgesi neniam.

Ĵus Olnjo finis la ludadon, ŝi, nenion dirinte al Joĉjo, ien forkuris rapideme. Kaj, kiam li prenis sian raŝonton legotan kaj sidiĝis al la tablo, ŝi revenis kaj kun rideto enigmoplena enŝovis en lian manon negrandan koverton fermitan, eksklamante:

– Kašu ĝin! Poste...

Preskaŭ neniu el la okaze-čeestintoj komprenis Esperanton, tamen S-ro Veselov kaj Olnjo deziris ke Joĉjo legu sian rakonton en la originalo.

Ĉirkaŭrigardinte ĉiujn apudestintojn, kelkaj el viaj kun mizo kaj scivoleco rigardis la junulon, li kun granda emocio en la voĉo komencis: „El la pasintaĵo".

Dum li legis ĝin, en la ĉambro regis silento. Nur s-ro Veselov iafoje, kiam Joĉjo pro emocio estis preta eksplodi, aprobe balancis al li per la kapo kaj Olnjo de tempo al tempo formetadis de la vangetoj grandajn larmgutojn, de ie aperintajn.

– Bonege! – diris s-ro Veselov, kiam la junulo finis, kaj varme premis lian manon. – Se vi ekzerciĝos, vi facile atingos relkan sukceson. Tiu ĉi via „unua plano", kiel vi ĝin nomas, estas laŭdinda!

XXIV.

El la pasintaĵo.

Kiel sonĝo bela, sorĉaĵplena ree traplugis en la domo gepatra la delonge, kaj kun tia malpacienco, atenditaj festoj. Pasis jam la lasta tago antaŭ la disiĝo -Epifanio. Estas vespero kaj morgaŭ frumatene, kiam miaj pli malaĝaj gefratoj ankoraŭ dolĉe dormos mi forlasos la hejmen. Kun korpremanta sopiro mi konsideras ĉiu tion kaj je lasta fojo, malrapide pašante tra la ĉambroj, ĉirkaŭrigardas kun amo ĉiujn objektojn en ili. Ĉiu el ili estas kara, parenca, ĉar kun ĉiu el ili estas kunligita ia agrabla rememoro de la infaneco. La pruto plej maljuna - instruisto popola - ie forestas kaj en la ĉambro estas nur tri plej junaj gefratoj. Ili estas malgrandaj ankoraŭ, sed la antaŭsturanta disiĝo, videble, influas ankaŭ je ili: kontraŭ sia kutimo ili nun sidas trankvile sur la kanapo, malleviute la kapetojn, kaj silentas. Silento solena, malbonsigna, nekutima regas ĉirkaŭe, nur la mura horloĝo en granda, antikva ingo, kiel ĉiam, indiferente, senzorge ronpas ĝin per sia apatia, ĉiam unutona tik-tak'ado. En la ĉambro - malordo: sur tabloj kušas amase, pretigitaj por mi, bone lavitaj kaj glatitaj tolvestaĵoj, jakoj kaj pantalonoj, klikitaj per la mano j zorgemaj de la panjo, kuketoj bongustaj, buterbakaĵoj kaj bulkoj sekigitaj, en granda nombro bakitaj de ŝi dum kelkaj lastaj tagoj. Sur la planko apude kušas ankaŭ senorde valizoj malplenaj, korboj kaj botoj.

En la ĉambron eniras la panjo. Ŝia ĉiam malsanema, tamen bela kaj ĉarma, vizaĝo estas zorgataksita kaj malgaja. La tutan tagon hodiaŭ ŝi klopodas por ĝustatempe prepari por mi ĉion neccesan, por ne forgesi ion. Jen ŝi por unu momento alproksen titolo".

simiĝas al mi kaj, preterpasante, afable karesas min per la mano maldika je la kapo. Mi estas kortuŝita, mi forsaltas de la loko kaj alpremiĝas al ŝia brusto, sed ŝi, rapide forviŝinte larmon neatenditan de la okuloj, forigas min per la mano kaj ree foriras por ion ordoni al la servistino, por ion prepari ankoraŭ por mi.

La lampo mallume lumetas en la ĉambro, la duonmallumo premas min. La soplo estas ĉiam kreskanta, ĉiam pligrandiĝanta ankaŭ pro tro longa foresto de la patrino.

Li estas diakono malriĉa, ricevanta apenaŭ tricent rublojn da salajro dum jaro. Sed tiu ĉi monsumo estas ne sufiĉa eĉ por elspezoj, kunligitaj kun edukado en la urbo de mi kaj la patrino. Tial la familio sentas mizeron sentĉese, malgraŭ laboremo de la gepatroj, - tial ĉiufoje antaŭ mia forveturo en la urbon ili estas devigataj serĉadi monon necesan ĉe riĉuloj kaj poste pagi por tio grandan procentaĵon.

Ankoraŭ tage li - malfeliĉulo - forlasis la domon kaj foriris al riĉaj parohanoj por pruntepreni de ili monsumon, necesan por mi. Mi klare prezentas al mi, kiel li, mia kara, pro mi humiliĝas, maldigniĝas nun ie antaŭ ia riĉulo - vilaĝano monavara, petante por unu - du monatoj tridek rublojn, kaj mia koro premiĝas pro kompato al li kaj pro indigno al la avaruloj. „Ĉu ja bone scias honestecon kaj noblecon de la patro", - mi pensas, - „ĉu ja scias, ke li bezonas la monon ne por ia propra plezuro aŭ bagatelo, sed por liveri necesan edukadon al mi kaj al la patrino, kiun oni eĉ ne devigus ordinare hejmen por la festoj por iom malpligrandigi siajn elspezojn... Kara mia, kompatinda, neforgesebla patro! Kiom da klopodoj, zorgoj kaj iafoje ~~af~~aflikto mi kaŭzas al vi!.. Ĉu iam mi estos kapabla redoni al vi almenaŭ centonon de ili?.."

Subite najbare en la kuirejo aŭdiĝas voĉoj. Mi tuj perdas la sopiradon kaj, detenante spiradon, aŭskultas ilin. Post unu minuto mi klare distingas lian basvoĉon kaj mi penas konjekti je lia paroltono, ĉu estis sukcesa lia monserĉado? Sed la pordo malfermiĝas bruege kaj venas la servistino kun samovaro en la manoj, post ŝi malrapide kaj mallaŭte sekvas la patro. Mi kun amo longe rigardas lian malhelan vizaĝon, cirkaŭitan de duongriza ~~barbo~~ harkreskaĵo kaj pensas: „Li estas ankoraŭ kvardek-kvar-jara viro, kaj kiel mi... zorgoj pri mi antaŭtempe maljunigis lin!.."

Silente li sidiĝas al la tablo, prenas kalkulilon en la manojn kaj longe kaj atente kalkulas ion mediteme, kaj skribas sur paperpeco. Poste li elprenas el poŝo monujon kaj ree longe kalkulas la monon. Dume venas la panjo, ŝi ankaŭ silente sidiĝas, vezŝas teon kaj ne detiras sian rigardon maltrankvilan de la edzo, de la mono kaj de la kalkulilo.

La patro finis kaj ekspiris plenbruste, la panjo je lasta foje maltrankvile ekrigardas lian vizaĝon kaj, same plenbruste ekspirinte, faras krucosignon, fiksinte la okulojn ~~sur~~ malsekajn al sankta ikono j.

— Gloro al Dio! - la patro parolas.

— Ĉu sukcesis la mono? - timeme demandas la panjo.

–Ĝi estas supiĉa... Por tri monatoj por Zinjo - 40 rubloj, - li daŭrigas, ree kalkulante per la kalkulilo monsumojn de la paperpeco. – Por tri monatoj por Joĉjo – 24 rub... Por liaj vojelspezoj - 3 rub. 50 kop., nu, ni kalkulu 4 rublojn... Sume ni riceivas – 68 rublojn. Kaj mi havas en la monujo 70 rublojn!

– Sendu, mi petas, iom da mono al Zinjo... por prandajoj! – la patrino diras timeme.

–Ŝi, malfeliĉulino, estis devigita pasigi eĉ la festojn ekster la hejmo...

– Mi havas nur du rublojn...

– Tiu ĉi monsumo supiĉos por ŝi...

– Atendu, bajne, mi havas iom da mono en la tirkesto!..

Li rapidas al sia malnova skribotablo kaj elprenas el ĝia tirkesto iom da arĝentaj moneroj.

– Ni ankoraŭ estas riĉuloj, edzino! – li parolas al la panjo kun rideto. – Jen kiom da mono ni posedas ankoraŭ! Ni kalkulu!... – li daŭrigas, ŝutante sur la tablon plenmanon da arĝentaj moneroj.

La manoj de la panjo tremas pro la nerutima laboro, la moneroj tintas... estas aŭdata ankaŭ spirado de la patro kaj malaŭita plustrado: – trideks, kvardeks, kvindeks...

– Mi kalkulis ĉi tie, – li parolas post nelonge, – 3 rublojn 40 kopekojn, – kaj vi?..

– 2 rublojn 65 kopekojn, – ŝi plustre respondas timeme, malcerte, – mi ne kutimis kalkuli tiel rapide. Eble, mi eraris... Mi tuj ree kalkulos...

– Nu, kalkulu!..

Post unu minuto ili konstatas, ke la antaŭa kalkulo estas ĝusta kaj ke ili havas la monerojn je sumo de 6 rubloj 5 kopekoj.

– Tie ni havas du rublojn superfluajn kaj tie ĉi ses rublojn kaj kvin kopekojn, – parolas la patro.

– Sume ni havas ok rublojn kaj kvin kopekojn... – aldonas la panjo. – Vi sendu al Zinjo kvin rublojn, mi petas. Ŝi ja estas knabino, ŝi bezonas fadenojn, kudrilojn...

– Bone. Ni sendu al ŝi ses rublojn! Por ni restos ankoraŭ, mia maljunulino, du rubloj kaj kvin kopekoj!..

– Sed vi ankoraŭ nenion asignis al Joseĉo... Li ja ankaŭ havos elspezojn...

– Vere, mi tute forgesis ĉi tion! Nu, la restaĵon ni donu al li... Ni esperis, ke restos por ni ia groŝo, sed kutime estas nenia restaĵo... Ĵoĉjo, Joseĉo!.. Kie vi estas?.. Jen, rigardu kaj aŭskultu atente. Mi apenaŭ povis trovi la monon necesan... Uzu ĝin ĝuste, nenion elspezu nepripensite... por bagateloj, estu ŝparema... Memoru, ke hejme restis nenia kopeko! Kalkulu!.. Tie estas 76 rubloj kaj 5 kopekoj. Eli li vi pagu por la pratino 40 rublojn, por via loĝejo 24 rublojn, por... Nu, ni metu tiun ĉi monsumon aparte, la patrino enkudros ĝin en plankpoŝon ~~de~~ internan de via jako, ke vi ne perdu ĝin kaj ke oni dum la vojo ne povu forŝteli... La restaĵon vi uzu jene: al la pratino vi donu por ŝiaj bezonoj ses rublojn,

por viaj vojelspezoj tiečí estas kvar rubloj kaj la restajo - du rubloj kaj kvin kopekoj estu ankaŭ via... Mi donus pli multe al vi, sed vi mem bone scias, ke mi plu havas nenion...

Mi estas kortušita. La gorĝon spasmigas plorego, preta eksplodi ĉiuminute. Mi ĵetiĝas al la patro, ĉirkaŭkaptas lian kolon kaj kovras per kisoj varmege aj sennombraj lian frunton, vangojn kaj lipojn.

—Paĉjo!- mi plustras,- mi dankas vin, sed. restigu la du rublojn al vi... mi ne bezonas ĵe ili, mi estas jam ne knabo malgranda, mi mem penos perlabori iom da mono!..

Sed la patro estas nepetegebla. Li metas la tutan restaĵon en mian monujon. Mi kisas lian manon kaj jam ne povas plu deteni larmojn, kiuj subite torente ekfluas el la okuloj.

-Kiamaniere mi repagos al vi, paĉjo?.. - mi plorparolas malklare.

-Kiamaniere?.. - la patro parolas, fiksinte al mi sian rigardon seriozan, tamen plenan de bonco kaj amo. — Prenu bone lerni, ne forgesu nin, preĝu!.. - li aldonas post nelonge.- Kiam venos la tempo fariĝu pastro kaj preĝu pri ni ambaŭ - la gepatroj... Prenu la monujon!..

-Atendu iom,- parolas la panjo.- Mi ie havis iom da mono...

Ŝi iom forizas kaj baldaŭ revenas kun malgranda kartona skatoleto en la manoj.

—Jen, donu al Zinjo de mi!..- ŝi parolas, metante sur la tablon du arĝentajn monerojn.— Kaj por tiu ĉi mono vi aĉetu du kandelojn kaj stariĝu ilin antaŭ la sanktfiguro mirakloparo de S. Nikolao... kaj tio ĉi estu via!- ŝi diras, etendinte al mi ankoraŭ unu restantan arĝentmoneron.

-Estu ŝparema,- aldonas la patro,- vi vidas, ke mi ĉion, kion mi havis, fordonis.

Mi estas emociita, kortušita. Mi scias, ke mi estas kvazaŭ rabisto de la familio, ĉar ĉion, kion la gepatroj enspezis dum longa tempo kaj kun granda singoremo, mi tuj deprenis de ili. Ili ŝajnas al mi tiaj mizeraj, ofenditaj kaj senigitaj je ĉio, kiaj estas nenie. Kaj la gefratoj plijunaj, restontaj hejme? Ili longe de nun pro mi estos senigitaj je ĉiu ĉanco kaj dolĉaĵoj, ĉar la gepatroj longe ne havos eblon kolekti sufiĉan sumon por tio, -anstataŭe ili devos pagi la ŝuldon. En profundaĵo de mia animo mi pardonas al ili ĉiujn iliajn ofendaĵojn kaj malagrablaĵojn, kiujn ili kaŭzis al mi dum la festoj kaj kiuj nun ŝajnas al mi tute ne atentindaj. Mi senĉese nun rakontus ilin, kiuj - tiom kaj kaj parencaj ili ŝajnas nun al mi.

Sed ili delonge jam dormas sur la kanapo, forlasitaj, forgesitaj de ĉiuj. La patro delikate forportas ilin en la brakoj en la dormoĉambron, kie la panjo senvestigas ilin kaj enlitigas. Ĉio tio ĉi estas farata trankvile, senbrue. Mi observas la scenon konatan, ripetiĝantan preskaŭ ĉiutage, staranta flanke apud la pordo de la dormoĉambro kaj imagas, ke la patro same portis iam ankaŭ min. La patro, preterirante, flustras al mi:

—Kisu ilin!.. Ja morgaŭ vi forveturos frumatene, kiam ili dormos ankoraŭ...

Mi obeas.

– Adiaŭ, mia kara! – mi flustras, klinigante super la prato. – Pardonu min, mi...

Tiu rapidesme leviĝas de la lito, cirkaŭkaptas mian kolon per siaj maldikaj manetoj kaj kisas min longe kaj varme, flustrante kaj duonplorante:

– Vi pardonu min... ja mi tiam rompis vian tranĉileton kaj dissŝiris senintence vian notlibreton... Vi veku min morgaŭ antaŭ la forveturo...

La sama sceno ripetiĝas, kiam mi ankaŭ adiaŭas kun la ceteraj gepatroj. Mi petas, ke ili diru al mi, kion mi devos aĉeti por ili en la urbo, sed ĉiuj ili ridmurmure rifuzigas de donacoj aĉetotaj kaj petas, ke mi nenion el la mono elspezu por ili.

Fine mi, viŝante la okulojn malsekajn, forlasas la dormoĉambron, de kie ankoraŭ longe estas aŭdebla ics ploretado.

La tetrinkado kaj vespermanĝo, tuj servantaj, estas pasigataj en streĉita silento. Nur el brusto de la patrino de tempo al tempo elfluyas malfacilaj ekspiroj kaj aŭdiĝas ŝerc-ajoj de la patro je mi.

Mi enlitiĝas. Sed en la ĉambro longe ankoraŭ estas aŭdata mallaŭta interparolado de la gepatroj kaj sono de tondilo, – tio la panjo enkudras la monon en mianjakon kaj klopodas pri miaj vestaĵoj.

Pasas kelkaj ~~tempoj~~ horoj, kiuj tamen ŝajnas al mi minutoj, kaj en la domo ekdormanta zee ekbolas vivo. Mi aŭdas, kiel komence veniĝas la patro, kiel li senbrue vestiĝas en mal-lumo kaj bruligas la lampon, vekas la geservantojn kaj la panjon. Mi tute ne volas plu dor-mi, sed mi ankaŭ ne volas forlasi la varman liton post tiom nedaŭra dormado kaj mi kuŝas senmove kun la okuloj fermitaj ĝis kiam venas al mi la patro por veki.

En la ĉambro jam ĉio estas ordigita, ĉio preparita por mia forveturo, metita en sakojn, valizon. Oni alportas samovaron kaj ian manĝaĵon. Sed dum tiom frua, nekutima hor, neniu volas trinki aŭ manĝi. La patro ĉiuminute eliras el la ĉambro por doni ankoraŭ ian ordonon al servanto Solovej, kiu jam enjungas la ĉevalon. La panjo ankaŭ senĉese klo-podcme kuras de unu tablo al la alia, observante ne forgesi ion. Mi uzas la momenton ti-om oportunan por plenumi mian taskon kutime plenumatan antaŭ forlaso de (la) hej-mo: mi elprenas el poŝo la monujon dikan kaj, elpreninte el ĝi du arĝentmonerojn, metas ilin senbrue en la salujon kaj superŝutas ilin de supre per salo. Sub la biskvitujon mi metas ankaŭ kelkajn malgrandajn monerojn. Envolvinte en paperpecon ankoraŭ iom da mo-no, mi metas ĝin inter ludiloj de la gepatroj. La tasko estas, fine, plenumita, mi tran-kviliĝas, ĝojas kaj antaŭĝuas, kiel la gepatroj estos agrable surprizitaj, kiam ili trovos la mo-nerojn post mia forveturo.

La patro eniras rapidesme kaj proklamas, ke la ĉevalo estas preta, ke mi tuj vestiĝu.

La panjo alportas du parojn da dikaj lanaj ŝtrumpoj kaj grandajn feltŝuojn de la pat-ro, kiujn mi vestas sur la piedojn. Super la jako kaj ĵela palto mi, kun helpo de la gepatroj

vestas ankoraŭ larĝan ŝappelton de la patro kun granda ĵela kolumo leviĝebla. Restas nur vesti ankoraŭ gantojn kaj ĉapon kaj cirkaŭzoniĝi super la ŝappelto, sed aŭdiĝas voĉo ordona de la patro:

– Ni sidiĝu nun!..

En la pezaj vestaĵoj mi estas nemoviĝebla dikulo. Malfacile pašante tra la ĉambro, mi, finfine, sidiĝas randon de seĝo. La patro sidiĝas apude. Li estas nervema kaj nepacienca, ĉar li timas, ke mi malfruiĝos al la vagonaro.

– Patrino!.. – li kriias. – Kien vi forkuris ankoraŭ?.. Sidiĝu!.. Li malfruiĝos...

La patrino rapidema revenas el la kuirejo tute vestita kaj cirkaŭliganta sian kapon per granda ŝalo. Ŝi faras krucosignon kaj sidiĝas kontraŭ mi.

– Je bona horo! – la patro parolas, leviĝante de la seĝo. – Sinjoro, nin benu!..

Mi kaj la panjo ankaŭ leviĝas kaj ĉiuj tri pene ni preĝas silente antaŭ ikono de la Savinto en malnova oriĝita kadro. Lia vizaĝo solene-trankvila kaj senfine-bona milde rigardas nin. Malforta lumo de ruĝkolora lampeto tremante lumigas Lin, pro kio ombroj senĉese moviĝas kaj ŝajnas, ke Lia mano etendita benas min por la vojaĝo.

La preĝo daŭras nelonge. Post ĝi la patro min benas kaj kisas trifoje je la lipoj. Mi ploras kaj, kun forto tenas per la manoj kliniĝintan al mi lian kapon. Poste benas kaj kisas la panjo. Ŝi ploras ankaŭ.

Ĉar miaj manoj apenaŭ povas moviĝi pro la vestaĵoj, la patro mem metas la ĉapon sur mian kapon kaj, zonirite min, kondukas al la perono, apud kiu delonge jam atendas nin nia forta ĉevalo kaj Solovej apud granda glitveturilo. Solovej - nia malnova servanto fidela - cirkaŭkaptas min per siaj manoj fortegaj kaj, kiel lumigeron, levas min kaj sidigas en la glitveturilon. Poste la gepatroj, kun kia helpo, kovras per fojno kaj ĵela kovrilo miajn piedojn, ree min benas, kisas kaj la ĉevalo formovas la glitveturilon de la loko. De malantaŭe estas aŭdataj ankoraŭ la lastaj ordonoj:

– Skribu al ni pli ofte leterojn!..

– Estu ŝparema kaj ĉiam varme vestiĝu!..

– Rapidiĝu la ĉevalon, Solovej!..

Sed ili baldaŭ estas supersonataj de laŭta knarado de neĝo sub la glitveturilo. Mi volas ankoraŭ unu fojon ekvidi la karajn vizaĝojn kaj, uzinte ĉiujn fortojn, penas turni la kapon al ili, sed ĝi nun ne plu obeas al mi. Feliĉe, en tiu sama momento la veturilo turniĝas de la domo sur la vojon kaj mi ekvidas ilin. La patro staras sur la sama loko, malgaje klininte la kapon kaj la panjo servas post la glitveturilo. En la maldekstra mano ŝi tenas blankan naztukon per kiu ŝi viŝas la okulojn kaj per la dekstra ŝi ankoraŭ daŭrigas min beni, senĉese faranta per ĝi krucosignojn en la aero.

Estas frua matena prosto. En nenia domo de la vilaĝo ankoraŭ estas vidata fajro. Nur palaj steloj hele lumas sur la ĉielo sennuba kaj enigmoplene, ŝajnas al mi, interparolas.

Je lasta fojo mi kun amo rigardas la domojn, arbojn, butikojn. Dio mia, kiom da belaj memoroj restigas en la animo ĉiu el ili. Jen ekbrilis nia granda blanka preĝejo kun alta sonorilturo, kien mi ofte iradis dum la festoj kaj kie la patro ĉiutage preĝas pri mi, jen estas betularo, nigriĝanta pro multeco de frugilegnestoj, kiuj seninterrompe kovras supraĵojn de la arboj; tie dum someraj vesperoj ludas gejunuloj kaj ilia gaja ridado kaj kantoj estas malprovizime aŭdataj. Jen estas modesta dometo - tute supersutita de neĝo - de nia komuna amato maljuna instruisto Fedot Isaiĉ. Ĉiujare printempe li revenas ĉi tien el la vilaĝo malproksima, kie li instruas vilaĝajn infanojn. Nun ĝiaj fenestroj kaj pordo estas tabulkovritaj, pro kio ĝi havas enuan, malĝojan aspekton. Mi ĉion rigardas adiaŭe kaj sentas, ke kvankam mi ree forlasas ilin por longe, tamen bonan memoron pri ili mi konservos ĝis mia morto mem.

En la aero ekflugis vipo de Solovej kaj la ĉevalo ekkuris, portrenante min kun la glitveturilo en malproksimon. La vilaĝo restis malantaŭe. Mi malsupreniĝis de la monto kaj enveturis en dezertan kampon neĝokovritan. Renkonten al mi eksblovis akra ventego. Mi kovris la vizaĝon per la pela kolumo kaj fermis la okulojn. Tedeme knaras diveŝveĉe neĝo sub la glitveturilo kaj tra ĝia ronkado en la orelo j ankoraŭ estas aŭdataj fragmentoj de la antaŭelongaj karaj paroloj de la animoj parencaj, kies la vizaĝoj ankoraŭ staras antaŭ mi klare en mia imago.

— Adiaŭ, adiaŭ, miaj karaj !... - mi plustras mallaŭte kaj sentas, kiel dormo ŝteliras por ĉirkaŭkapti min per unu fojo per sia potenca spirado, tiel bone karitan kontraŭ la malvarmo ĉirkaŭa.

XXV.

Malĝoja sciigo.

Laŭ konsilo de s-ro Veselov, Joĝjo penis de nun pli multe verki kaj pli pene me prilaboradi sian stilon, sed, ne havante kutimon al tia laboro, li povis verki nur ne multe kaj tio, kion li sukcesis verki, estis verkata kun granda peno, granda elspezo de energio kaj kunstreĉigo de ĉiuj rezervaj fortoj. Supozante, ke ĝenerale literaturo laboro postulas tiajn penojn, li tute ne povis kompreni, kiel kelkaj famaj verkistoj dum sia vivo povis verki multajn dikajn volumojn.

Kvankam la alia laboro, postulinta de li neniajn penon kaj liverinta al li ĉiam bonan enspezon, - la notskribado de verkoj de la dikulo, deprenis de li multajn horojn de tempo, tamen ankaŭ por la verkado restis iom da ĝi. Joĝjo tute ne pretendis fariĝi literaturisto, ĉar li sciis, ke li ne estas kapabla por tio, tamen de tempo al tempo ia porto mistera igis lin forlasi la notskribadon kaj verki.

Tiamaniere li nur notskribis kaj verkis, por tralegi ian libreton aŭ por plenumi taskojn,

iam donatajn de lernejinstruistoj aŭ, fine, por promeni, Jońjo ne havis tempon. Rezultatoj
le tiom ne normalaj okupoj baldaŭ montriĝis: de unu flanko - persia privata laborenspe-
oj li jam povis sen helpo de la gepatroj kovri ĉiujn siajn elspezojn, kio tre ĝojigis lin kaj pier-
gis; de la alia - li malprogresis en la lernejstudado kaj delonge jam estis opiniata de-
instruistoj, kiel unu el plej malbonaj kaj maldiligentaj lernantoj, kio doloregis
n kaj tamen estis jam nekorektebla.

Meze de la laboroj li preskaŭ tute forgesis eĉ siajn amikojn: Olnjon kun ŝiaj familianoj
kaj Julia'on Andreevna. Vere, la unuan li vizitis dufoje baldaŭ post la disiĝo, sed la un-
a vizito estis vana, li neniun el la familianoj trovis hejme kaj dum la alia vizito ili
estis pro ia okazo ŝarĝitaj je klopodoj kaj li sukcesis interŝanĝi kun siaj amikoj nur kel-
ajn negravajn frazojn. La lastan li ne vizitis jam dum tre longa tempo.

Unufoje, jam en komenco de la Granda Fasto, Jońjo ricevis leteron de Olnjo. Ŝi estis mal-
onga, sed, juĝante laŭ ĝia tono, oni povis konkludi, ke la knabino aŭ estis en malbo-
na humoro, kiam ŝi skribis ĝin, aŭ koleris je li. Ŝi postulis, ke Jońjo nepre venu al ŝi ves-
pere de la sama tago pro tre urĝa afero.

- Ni jam supozis, ke vi mortis, - la knabino diris sekrete, just li eniris ŝian ĉambron.

De la knabino kaj de la ĉambro, tiom konata al Jońjo, tuj eksplovetis io kara, parenca.
Li ne povis penis sin praviĝi, li ne prezentis al ŝi pretekstojn, kiuj povus senkulpigi lin, li si-
lente sidis kontraŭ la knabino kaj aŭskultis ŝiajn riproĉojn, kiuj ŝajnis al li merititaj.

- Se vi ne volas vizitadi nin, neniu rajtas devigi vin pariĝon, sed vizitadi la malsanulinon
, kiu tiel amas vin, tiel sopiras pri vi... vi devus! - Olnjo daŭrigis.

- Kian malsanulinon? - Jońjo ekkriis pro miro kaj eksentis, kiel malsaneme io ekspikis
ian koron.

- Ĉu vi ne scias ankoraŭ, ke Julia Andreevna delonge estas malsana? Dum lasta tem
po ŝi eĉ ne havas fortojn forlasi la liton. Ĉiuj ŝiaj konatuloj akurate vizitas ŝin kaj al-
terne dejoras apud ŝi tage kaj nokte... - la knabino parolis per la sama tono, malafable
rigardante ien sencele kaj tute ne atentante la junulon, kiu, kun kulpa mieno, fikse
rigardis ŝian vizaĝon, kiu estis ŝarma eĉ dum tiuj ĉi minutoj de kolero.

- Olnjo! - li, fine, ekkriis, interrompante la knabinon. - Olnjo, pardonu min, sed mi je
nua ĵojo aŭdas pri tia malĝelico teruza. Kredu al mi, ke... Mi efektive estas kulpa kont-
raŭ mia bonega amino kaj kontraŭ vi! Vi pardonu min, kiel vi scias, vi iĝu min ĝazi kion
ajn, mi plenumos ĉion sen kontraŭdiro, sen rifuzo, sed nur mi petegas: ne koleru plu
plu je mi!..

- Vi ĉiutage vizitadu la malsanulinon!... - ŝi diris ordonvoĉe, kiel antaŭe, evitante
renkonti lian rigardon.

- Volontege!.. Ĝi estas mia devo, mi ĝin plenumus sen via ordono, se mi sci-
is ke la maljunulino estas malsana. Sed vi ordonu al mi ankoraŭ ion alian, postu-

de mi ion malŝacilan...

La knabino sulkis la frunton kaj faris malkontentan, seriozan mienon. Sed ŝi neplesukcesis en tio ĉi. Kontraŭ ŝia volo ŝiaj lipetoj maldikaj kuniĝis je rideto apenaŭ rimarkebla.

– Kun mi rekonas vi, Josefĉjo!- ŝi diris, fikse rigardante la junulon.- Mi timis, ke vi šanĝis, sed vi ĉiam restas same naiva, riel antaŭe. Juĝu vi mem: ĉu mi rajtas ion ordoni vi, aŭ ion postuli de vi?.. Tio ĉi estus tre ridinda.

– Mi ankaŭ rekonas vin, Olnjo,- arde respondis jeĝjo.- Mi ankaŭ timis, juĝante laŭ via ekstera, malaĝabla tono kaj serioza mieno, ke vi šanĝiĝis je mi...

– Sed ni lasu la babiladon senenhavan kaj senpere transiru al la afero, por kiu mi venis. Kiel mi jus diris, ni dejoras alterne apud la malsanulino kaj hodiaŭ vespere mi devas resti tion. Bedaŭrinde, ĝuste vespere venos al mi grafidinoj – du fraŭlinoj Trubačev'oj, kiela onklinojn Eŭdokion kaj Irinon vi jam rekte renkontis dum niaj lecionoj ĉe Julia Antonovna. Ili tre bone babilas en nia lingvo kaj deziras ricevi rekte informojn pri abono al „Lingvo Internacia". Eble, vi plenumos tiun ĉi taskon? Kromtio la fraŭlinoj tre interesiĝas je vi... La grafino Irino enamiĝis en vin kaj en viajn kaštankolorajn okulojn de la unua konatiĝo kun vi kaj tiel tedis al la nevinoj per sia babilado senĉesa pri vi, ke ili nepre deziras konatiĝi kun vi...

– Kian taskon, Olnjo?.. – diris jeĝjo, konfuziĝante kaj mallevante la okulojn. Li ankaŭ delonge deziris konatiĝi kun la fraŭlinoj enigmoplenaj, kiujn li jam unufoje vidis de malproksime en la bulvardo, sed samtempe prosia, šajne denaska, konfuziĝemo timis la renkonton. Lin timigis precipe tio, ke ili estis fraŭlinoj de plej alta societo urba-grafidinoj.

– Donu al la fraŭlino informojn pri la ĵurnalo.

– Liberigu min, Olnjo, mi petas!- li malkuraĝe expetis.- Vi scias, ke mi ĉiam konfuziĝas en ĉeesto de flankaj fraŭlinoj...

– Ili ne estas flankaj, ili estas fervoraj samideanoj. Ambaŭ ili estas tre bonaj knabinoj kaj, riel vi vidos, tre saĝaj kaj kapablaj. Ĵonjo estas poetino, muzikistino kaj bone pentras, kaj la pli juna – Olnjo, kvankam ŝi ankoraŭ ne havas emon al arto, tamen estas rimarkinde bela! Tion ĉi vi jam, kredeble, aŭdis?.. Unuvorte, ili estas pli kapablaj kaj ĉarmaj, ol mi...

– Vi, Olnjo, kalumnias je vi mem!- ĵeĝjo interrompis la fraŭlinon.- En la tuta mondo estas neŭdia alia knabino pli kapabla, pli ĉarma ol vi!..

– Mi dankas vin,- la knabino respondis ruĝiĝante kaj kovrante la ĉarman vizaĝeton per la mano] por kaši sian konfuziĝon,- sed ĉu vi jam rifuziĝas? Kaj kiu, ĉu ne vi mem antaŭ kelkaj minutoj petis, ke mi ordonu al vi kion ajn? Vi knaboj ĉiam estas kuraĝaj kaj hezoj nur je vortoj!..

– Pardon!.. kiel parolas...- la ĝejunulo eraŭdis subite la voĉon de la doktoro, kiu nezim-

-eble por ili eniris en la ĉambron kaj haltis post iliaj dorsoj. – Kvankam vi estas okupitaj je -ciozaj paroloj, ĉar kio povas esti pli serioza ol amparoloj, tamen mi devas interrompi il-n, – li diris salutante Joĉjon. Apenaŭ kaptebla rideto glitis tra liaj lipoj.

Paĉjo-doktoro! Kara paĉjo-doktoro!.. Neniajn amparolojn ni havis, – sin pravigis la kna-ino, kaptante liajn manojn. – Mi nur petis Joĉjon, ke li restu kaj konversaciu kun la graf-inoj Trubaĉev'oj, kiuj vespere hodiaŭ venos al mi... Kaj mi ĝuste vespere devas deĵori ap-d la malsanulino...

– Ruzulino! – tiu respondis, ŝerce minacante al ŝi per la fingro. – Ĉu vi baldaŭ iros?.. Se -intencas iri, ni iru kune, mi akompanos vin.

– Josefĉjo vi plenumu! – diris Olnjo.

– Ne, mi timas! Liberigu min...

– Kion vi timas, mia amiko? – la doktoro demandis. – De kiam vi fariĝis tia timema?

– Li timas la belecon de la grafidinoj, – Olnjo diris, ruze ridetante al Joĉjo kaj premante je la -ano la doktoron. – Nu, feliĉan vesperon!.. Saluton al la fraŭlinoj! Nur vi, Josefĉjo, ne tro -logiĝu je la belulinoj! Ni iru, paĉjo-doktoro!.. Adiaŭ...

Restinte sola en la ĉambro, Joĉjo longe sidis enpensiĝinte apud la tablo. Subite mola, de-kata tintetado, kiu ekaŭdiĝis en la ĉambro, rekonsciigis lin. Joĉjo ektremis. Ĝuste al li -ris, flarante aeron, malgranda hundeto Meneka kun mallarĝa eleganta kolrimen-to kaj eta tintilo arĝenta. Preskaŭ samtempe en la ĉambron eniris jam konata al Joĉjo graf-no Irino kaj du junaj fraŭlinoj kun ŝi, je ĉarmeco kies Joĉjo jam renufoje admiris dum la pro-meno tra la bulvardo.

– Ha!.. – preskaŭ ekkriis kun miro grafino Irino surprizita, jen fikse rigardante Joĉjon, jen -azaŭ, iun serĉante per la okuloj en la ĉambro. – Ĉu vi estas sola?.. Kie estas la mastrino – -lnjo?..

Kaj ne ricevinte ankoraŭ respondon de Joĉjo, kiu, kvazaŭ ensorĉita, rigardis la fraŭlinojn kaj -ute ne aŭdis la demandon de grafino Irino, ŝi daŭrigis sin turnante jam al la nevinoj:

– Jen estas tiu junulo... Joĉjo! Li perfekte posedas la lingvon... Ĉu vi memoras, mi parolis -l vi, ke li havas ĉarmajn kaŝtankolorajn okulojn...

Jen kiel priskribis Joĉjo mem tiun ĉi renkontiĝon kun la fraŭlinoj-grafidinoj en sia -taglibro:

La 16an de Februaro li skribis jenon:

- -

- -

- - - - - - - - - - - - - - - - „Ni estu amikoj!..” Tiuj ĉi vortoj de ĉarma voĉo de ĉarma, nekom-parebla grafidino Sonjo agrable persekutis min dum la tuta pasinta nokto, ankaŭ nun -li sonoras klare en miaj oreloj, kvankam mi ofte demandas min mem: „Ĉu mi ne ~~–~~ er-ras? Ĉu al mi – mizera seminariano – estis turnitaj tiuj ĉi sorĉaj vortoj de la nobla fraŭ-

no-la grafidino? Ĉu ŝi diris ĝuste tiujn ĉi vortojn al mi?". Sed ne, ne, mi ne eraras. Ĝuste tiujn ĉi vortojn ŝi diris al mi, etendante sian delikatan maneton al mi post mia mallonga, ofte interrompata prokonfesiĝemo, parolo, en kiu mi skizis al la Beluline mian biografion kaj historion de mia lasta jaro. Olnjo ne eraris, kiam ŝi, forirante, kvazaŭ antaŭsentis, ke mi delogiĝos je la knabino, ke mi enamiĝos je ŝi de la unua rigardo. Jes, ŝi ne eris... Adiaŭ, Olnjo!... Mi parolas tiom ĉi sen bedaŭro, sen maldolĉeco. Mi estas enamiĝinta, mi je unua fojo... nur nun mi sciiĝis, kio estas amo".....

XXVI.

La sekreto.

La doktoro kaj Olnjo donis al Joĉjo detalajn informojn rilate al tio, kiel li devis agi apud la malsanulino. Ĵli petis insiste, ke li ne šarĝu šin per longaj paroloj kaj gardu šin de ĉiu eĉ plej malgranda maltrankvilo kaj emocio.

Vespere de la tago sekvinta, rapidante tra stratoj al la domo konata, Joĉjo rememoris tiujn tiujn ĉi informojn por dece ilin plenumi.

En la loĝejo de la malsanulino ĉio estis nerekonebla - ĉio šangiĝis dum tiuj ĉi lastaj semajnoj. Joĉjon renkontis nekonata servistino, kiu kun ia suspekto nekašata kondukis lin tra la studĉambro estinta al la mastrino malsana.

En negranda, komforta dormoĉambro, akre odorinta je kuraciloj, brulis malgranda lampo, širmita per verdkolora širmilo, veršinta cirkaŭcen molan kaj agrablan porokuloj verdkoloran duonlumon. En mola „profesora" seĝo de Joĉjo (li tuj rekonis ĝin), sidis ia sinjorino, kiu pardinta atente la malsanulinon, kiu dormis, turninte al ŝi la vizaĝon. Ĵus Joĉjo eniris, la sinjorino forlasis sian lokon kaj, sin turninte al li, diris malalte per voĉo apenaŭ aŭdebla:

- Min devis hodiaŭ anstataŭi unu junulo... seminariano. Ĉu vi estas tiu ĉi junulo?

- Jes... mi konas šin tre bone...

Kaj dorninte al Joĉjo necesajn informojn, kiam kaj kion li devos doni al la dormanta malsanulino, se ŝi vekiĝos, kiam li devos alvoki el ĉambro najbara flegistinon, ŝi restigis ĉe la lito.

Joĉjo kun amo rigardis karajn trajtojn de la dormintino. Ŝia vizaĝo estis maldikiginta kaj pala, tamen la malsano ne difektis postsignojn de ŝia Beleco kaj Joĉjo nevole prezentis al si, kia bela ŝi estis, dum ŝi estis juna. Ŝi spiris malfacile kaj kune kun spirado de ŝiaj palaj lipoj tremetantaj de tempo al tempo flugis mallaŭtaj kaj ne sufiĉe komprenebla vortoj.

Tute ne sciante kiom da tempo daŭros lia dejorado, Joĉjo, por forpeli premantan sopiron, komencis trarigardi atente ĉiujn kuracilojn, kiuj staris najbare sur tablo, poste libraron, kiun uzis, dedeble, dejorintoj dum horoj de sia izoleco. La libroj ĝuste atestis tion ĉi, ĉar laŭ sia enhavo

estis plej diferencaj kaj povantaj kontentiĝi ies ajn interesojn kaj postulojn: inter ili estis
reĝaro, la Nova Testamento, konversacioj je religiaj temoj, rakontaroj, prešaj gazetoj kaj
, metitaj de zorgema mano de Olnjo, kiu neniam preterlasis okazon pari propagan-
on de Esperanto, lernolibro de ĝi, ekzercaro kaj vortaroj. Joĉjo serĉis paperon kaj kraj-
on por skizi siajn impresojn, poste enskribotajn en la taglibron, sed ili markis sur e
la tablo. Kiam li decidis serĉi ilin en la alia ĉambro, la malsanulino ekmoviĝis kaj malfermis
la okulojn.

—Bonvolu doni al mi unuguteton... unu guteton da akvo! — ŝi diris per voĉo mal-
orta kaj mallaŭta.

Joĉjo almetis al ŝiaj lipoj inflamaj glason da akvo. Ŝi avidene ekglutis du-trifoje
aj formetis la glason per la mano. Joĉjo ne povis sin deteni kaj ekkisis ĝin, esperante, ke
o ne estos rimarkita de ŝi, sed li eraris. Ĉu lia amo kaj estimo al ŝi, nevole esprimitaj per
kiso, tuj trovis revokon en ŝia bona kaj amoplena koro, ĉu okazis io alia, — mi ne scias;
ar Julia Andreevna tuj ree malfermis la okulojn kaj etendante al Joĉjo la manojn
diris duonflustre:

—Mia inspiro, Joĉjo!.. Ĉu vi vere estas tie ĉi, aŭ ĉu mi nur sonĝas tion ĉi?..

Joĉjo proksimeniĝis super ŝi kaj penis trankviligi ŝin.

—Pro Dio! — li parolis. — Estas malutile por vi interparoli.

—Nun mi mortos trankvile, — ŝi daŭrigis, ne atentante lian peton. — Mi jam supozis,
e mi plu ne vidos vin... kaj tio ĉi doloriĝis min pli ol la malsano... Permesu, mia kar-
a, vian manon, mia fileto!..

Ŝi delikate karesis per sia mano la manon malditetan de Joĉjo, sed ŝiaj movoj ĉi-
ompariĝis pli kaj pli malrapidaj. Baldaŭ la okuloj fermiĝis, sur la lipoj ekglitis feliĉa
idreto kaj ŝi ree ekdormis, ne ellasinte la manon de la junulo el sia mano.

Ĉio tio ĉi okazis tiel rapide, tiel neatendite, ke Joĉjo nek havis tempon por doni al ŝi
uracilon, nek eĉ por liberigi la manon, kiu restis en la kaptiteco ĝis la foriro mem,
iam oni venis por anstataŭi lin en la dejorado.

De tiu ĉi tago Joĉjo precize plenumadis sian promeson, donitan
l Olnjo kaj ĉiutage vizitis sian unuan lernantinon-samideanin on. Dum la tago
ekvinta li iris al ŝi tuj el la lernejo, jus estis finitaj lecionoj.

Apud la malsanulino, kiu kutime dormis, li renkontis Olnjon.

—Hodiaŭ ree nia kara avino sin sentas pli malbone, — malgaje ŝi flustre sciigis al Joĉjo.
Mi ŝedaŭras, ke mi komisiis hieraŭ al vi la dejoradon: al ŝi senkondiĉe estas malpermes-
ita pli-malpli longa interparolado, kiun vi, ŝajne, malbonuzis.

—Mi tute nenion interparolis kun ŝi, — Joĉjo sin pravigis.

—Sed ŝi sencese, rekriĝante, vokas vin. Vi ion diris al ŝi kaj per tio tre impresigis ŝin.

Joĉjo ĵuris, ke li ne estas kulpa, sed la knabino, kiel antaŭe, daŭrigis siajn kulpigojn kontraŭ la junulo.

– Dum lasta tempo vi, Olnjo, fariĝis murmurulino, kvankam tio tute ne konvenas al vi.

– Antaŭe mi neniam rimarkis en vi, Joseĉjo, tian obstinon kaj kverpricemon, – la knabino respondis. – Ĉu tio ĉi estas sekvo de via konatiĝo kun la belulino graf...? Ĝustokaze diru al mi, kian impreson vi ricevis de la konatiĝo? Ĉu vi jam enamiĝis? En kiun?..

Joĉjo silentis.

– Ni tion ĉi antaŭvidis... – post ioma paŭzo ŝi aldonis kaj ekspiris profunde.

La gejunulo interŝanĝis tiujn ĉi frazojn, kompreneble, flustre por ne maltrankviligi la avinon. Tamen ŝi vekiĝis; kiam la knabino ankoraŭ ne forlasis la ĉambron. Kutime, ŝi komencepetis akvon, – soifo ĉiam turmentis ŝin, – kaj poste, rimarkinte la gejunulojn ambaŭ apud si, malgraŭ sia malforteco, ŝi ekdeziris rigardi ilin. Fortiĝi ili antaŭe devis sidiĝi ŝin sur la lito, ĉirkaŭmetinte per kusenoj.

– Kiel mi ĝojas, kiel mi ĝojas! – ŝi parolis mallaŭte. – La malsano kvazaŭ tuj malaperis tute, se mi havus nun iom pli multe da fortoj!.. Tamen mi estas feliĉa, vidante vin antaŭ mia morto...

– Ne parolu tiel!... – duonploronte diris Olnjo, kisante ŝiajn manojn. – Vi devas vivi, vivi longe, longe ankoraŭ!

– Mi ne timas morton, mia infano!.. Al homo ne kredanta, vere, ĝi estas timiga, terura... sed mi trankvile atendas ĝin... Rigardante vin, mi estas tre juna, kvazaŭ samaĝa kun vi. Ho, se vi scius kiom da rememoroj agrablaj vi vekas en mia animo... Ĉi estas tiom pli agrablaj, ke mi ĝuste plenumis mian promeson...

– Avnjo!.. vi laciĝis, – diris Joĉjo, je unua fojo tiel nomante Julia'on Andreevna. – Estas ja malutile por vi longe paroli...

– Kontraŭe! Se mi iam sciigos al vi ĝin – mian sekreton, mi sentos min pli bone, pli trankvile... Kuŝiĝu min, miaj karaj!..

La malsanulino permis la okulojn kaj feliĉa ridetó disverŝiĝis laŭ ŝia vizaĝo kaj lipoj silentaj.

„Kian sekreton ŝi volas sciigi al ni?" – ni longe pensis kaj paris milon da supozoj kaj, kompreneble, ni povis trovi neniam solvon de la demando.

– Ne, ŝi ne taŭgas por vi, Joĉjo!... – Julia Andreevna diris post relka tempo, kiam jam Olnjo foriris. – Ŝi estas bona, ĉarma knabino, sed iom frivola... Vi esperas esti pastro, – nu, via edzino estonta devas esti religiema... antaŭ ĉio religiema! Kaj tiu ĉi eco tute mankas en Olnjo... Kion pari? Ŝi ricevis tian edukon, ŝi ne estas kulpa, ke ŝi kreskis sen la patrino...

Trinkinte iom da akvo, ŝi daŭrigis:

– Antaŭ nelonge, kiam la knabino ankoraŭ ĉeestis ĉi tie, mi aludis pri mia sekreto.

jes, mi havas ĝin... Mi sentas, ke miaj tagoj jam restas nemultaj kaj volas malkovri ĝin al vi... Ĉar vi havas rilaton al ĝi, mia kara! Sidiĝu pli proksime... Jam mi havis unu amikon de infaneco kaj juneco, kun kiu mi pasigis ilin. Li estis homo tre nobla, ideala!.. De la naskiĝo mem Dio donacis al li tiom da talentoj malsamaj, ke ili superĉus por dek homoj. Kaj li ne enposis ilin enteron, simile al la evangelia servanto malbona! Ne!.. Dum sia vivo li penis nur plimultigi, disvolvi, rafini ilin. Li estis bona muzikisto, pentristo, verkisto... li revis sencese pri universa amo de homoj, pri fratec de ~~homoj~~ popoloj. Li multe influis je mi... eble, pli multe ol ĉiuj miaj edukistoj kaj lian nomon mi ĉiam rememoras respektege kaj kun kora danko... Ni iam parolis al vi, ke mi promesis ellerni Esperanton, - nu, tiu tiun ĉi promeson mi donis ĝuste al li.

Julia Andreevna rigardis la okulojn kaj, fiksinte sur la junulon sian rigardon de la febre-brilintaj okuloj, daŭrigis:

- Kiel ĉiam okazas inter knabo kaj knabino, nia infana amikeco iom post iom aliformiĝis je amo. Jes, li amis min en plena senco de tiu ĉi vorto kaj tio ne estis sekreto por mi. Sed dum li pasigis la lastan jaron en la universitato, mi konatiĝis kun alia junulo, beluleo... kaj, evidente, tion volis Dio... mi fordonis al li mian manon kaj koron, konsentinte esti lia edzino. Tiu ĉi mia ago, tute ne antaŭvidita de li, tute ne atendita por li, tre konsternis lin kaj baldaŭ post mia edziniĝo li iom forveturis kaj mi plu nek vidis lin, nek ion aŭdis pri li... Vi scias, ke mia edziniĝo estis malfeliĉa: mi havis solan filon, tre similan al vi ... kiu mortis tre frue, antaŭtempe, same antaŭtempe mortis ankaŭ la edzo. Feliĉon familian mi ne trovis en la vivo!..

Ŝia voĉo extremis pro emocio, ŝi ree viŝis la okulojn malsekajn. Joĉjo estis tiel kortuŝita de ŝia sincera rakonto, ke li tute forgesis averti ŝin, ke ŝi estu pli trankvila.

- Printempe de la jaro pasinta, - ŝi daŭrigis, pli oportune apoginte la kapon je la kusenoj, - mi entreprenis grandan vojaĝon en la sudon. Ĉirkaŭe... tio okazis en gubernio de Voroneĵ, en kupeon, kiun okupis mi, vespere venis ia sinjoro maljuna. Li ĝentile salutis min kaj petis permeson veturi kun mi ĝis unu proksima stacio, kie li devis forlasi la vagonaron... ĉar li nenie povis trovi lokon por si pro multeco de veturintoj. Mi, kompreneble, nenion havis kontraŭ tio kaj li sidiĝis sur kanapon kontraŭ mi... Baldaŭ nerimarkeble inter ni komenciĝis vigla interparolo, dum kiu mi rimarkis ion konatan, kvazaŭ parencan, en lia aspekto, ankaŭ en la voĉo kaj parolmaniero. Mia miro estis senlima, kiam mi, demandinte la nekonatulon pri lia nomo, sciiĝis, ke li estas ĝuste tiu, kiun mi tiel varme amis, estimis kaj kiun mi... iam preferis! Mi volis tuj interrompi la interparolon por resti ne rekonita de li, sed estis jam malfrue: li ankaŭ demandis pri mia nomo kaj mi ne volis, mi jam ne povis mensogi... Ni mallongige sciigis unu al la alia niajn vivhistoriojn post nia disiĝo kaj montriĝis, ke li ankaŭ antaŭtempe

perdis sian edzinon...

Pro emocio profunda ŝi longe ne povis daŭrigi la rakonton.

— Li neniom ŝanĝiĝis de tiam, kiam mi vidis lin je lasta fojo. Kompreneble, tempo nepetegeble kaj travivaĵoj kuŝiĝis sur lin sian manon: la vizaĝo estis rovrita per sulkoj profundaj kaj en la barbo arĝentiĝis grizharoj, sed tiuj ĉi ŝanĝoj estis nur eksteraj... ajn internajn ŝanĝojn mi tute ne rimarkis. Li estis, kiel antaŭe, bonanima, koraĝa... Li nek perdis kredon je homoj, nek je siaj ideraloj. Lia parolo, kiel antaŭe (antaŭ longe) estis entuziasmoplena... Tiam je unua fojo mi ekaŭdis de li pri Esperanto. Li montriĝis pezvorega semanto de la kreitaĵo de D-ro Zamenhof... En vortoj nemultaj, sed plej konvinkaj li prezentis al mi, kiel ni, hejmaj inteligentaj, bezonas je lingvo helpa kaj, ke nia devo estas tuj ellerni ĝin, subteni, propagandi. Li profete antaŭdiris, ke post tempo nelonga la lingvo estos ĉie akceptita kaj ĉie uzata, ke rapide en eksterlando aperos specialaj institucioj pure-esperantaj por pari eblaj ĉiujn servojn de eksterlandaj samideanoj... ke aperos grandaj dikaj ĵurnaloj esperantaj kaj ĉiuj vezkoj, ĉu literaturaj, ĉu sciencaj estos verkataj kaj tradukataj nur en tiu ĉi lingvo, ke oni plu ne bezonos je iliaj tradukoj naciaj... Mi respektege aŭskultis lin kaj sentis, ke la semo, ĵetita en min, ĝermos kaj devos alporti fruktojn, kvankam jam malfruiĝintajn... Mi tiam decidis akiri lernolibron de la lingvo, ellerni ĝin kaj propagandi ĝin inter miaj konatuloj. Kiam li konjektis mian intencon, li estis kortuŝita... li...

Ŝi paris miallongan paŭzon kaj ekrigardis Joĉjon ekzamenante, kvazaŭ dezirante sciiĝi, ĉu ŝi devas daŭrigi la rakonton, ĉu jam finiĝin; ĉu si devas malkaŝi de li ĝian finon, ĉu kaŝi? Joĉjo montriĝis inda aŭskulti ĝin. Ŝi vigliĝis, ruĝajo kovris ŝiajn palajn vangojn kaj ŝi daŭrigis per voĉo pli mallaŭta:

— Subite li alproksimiĝis al mi kaj kovris mian vizaĝon per vazmaj kisoj... Tiam ago li neniam permesis al si, dum sia juneco... Je tiu ĉi fojo ĝi estis elvokita de mia konsento je lia kredo je fina triumfo de tiu nobla ideo, kiu jam eniĝis en lian sangon kaj plu ne estis apartigebla de lia estajo... Baldaŭ la vagonaro haltis apud la stacio. Ni disiĝis, ebenke, por ĉiam... Antaŭ lia foriro mi solene promesis, ke mi nepre ellernos la lingvon kaj faros ĉion, kion mi povos por ĝia propagando... Vi scias bone, ke mi plenumis la promeson... Pro tio mi estas feliĉa kaj nun... mi povas morti trankvile... Ŝi laciĝis!..

XXVII.

Du tute forgesitaj kovertoj.

La 17-an de Marto, kiam la Eklezio honoras Sanktan Aleksion - Dian Homon, ĉiujare en la seminario estis granda soleno. Komence la arĥiepiskopo kun la lernejestraro (la rektoro kaj inspektoro) kaj urba pastraro servis solenе liturgion, al kiu kun-

enis ĉiuj lernantoj, orkestraro kaj multaj eminentaj urbanoj kaj post la liturgio en la sa-
lono de la lernejo okazis solena festeno, dum kiu estis rekompencataj plej bonaj kaj diligent-
aj lernantoj. Oni elvokadis ilin po unu al katedro, sur kiu sidis la arĥiepiskopo, ĉirkaŭita
de la lerneja estraro kaj instruistoj, ankaŭ de honoraj gastoj, kaj li enmanigis al ĉiu el ili
ian libron belebinditan, akompanante tion per sia beno kaj kelkaj vortoj kuraĝigaj. Pos-
te la gastoj honoraj malsupreniĝis en loĝejon de la rektoro por partopreni tagmanĝon
kaj la lernantoj en la manĝoĉambron, kie estis jam preparita por ĉiu el ili teo kaj
dolĉaĵoj.

Oni ne pensu, ke je tiu fojo oni rekompencis ankaŭ nian heroon, - ho, ve! - li neniam
ondiĝas je tia honoro!

Kiam la lernantoj bruamase forlasis la manĝoĉambron kaj eliris en la koridoron,
renkontis ilin kiu alia iris la rektoro, kiu akompanis al la elirejo la gubernieston kaj unu
ajoron en parada milituniformo. Kiel montriĝis poste, li estis la kolonelo. Li estis
venta en la urbo pro sia riĉeco, dote ricevita, kaj komparado; en la lernejo li estis ano ho-
nora de la Komitato, prizorginta malriĉajn lernantojn.

La lernantoj respektoplene flankiĝis por cedi la vojon al la altrangulo, kiuj malrapide
iris, rigardante la junulojn kaj interparolante. Kiam la kolonelo estis ĝuste kontraŭ
ejo, li tuj rekonis lin kaj etendis al li sian manon. La iritoj haltis.

— Ĉu vi ankaŭ ricevis hodiaŭ ian rekompenc-donacon? - li afable demandis Joĉjon.

— Ne!.. - li respondis malgaje kaj apenaŭ aŭdeble.

— Li, ŝajne, estas tre bona knabo... Laŭ mia opinio, la lernejo devas fieri je tiaj ~~knaboj~~
knaboj... - li diris al la rektoro.

— Ĉu vi konas lin? - demandis la gubernestro.

— Jes! Li estas tiu sama, kiu savis mian filedon...

La gubernestro aprobe ekbalancis per la kapo al flanko de Joĉjo.

— Vi atentu lin, mi petas, - la kolonelo daŭrigis, sin turnante al la rektoro, - li estas
nobla kaj kuraĝiginda infano... Kaj kia religiema li estas!..

— Li nur lernas malbone, - diris la rektoro, - li estas maldiligenta...

Kaj ili eliris pluen.

Vespere de la sama tago Joĉjo estis kutime apud la malsanulino. Ŝi malfortiĝis kaj
maldikiĝis kun ĉiu [redacted] tago. Senplanka helpo ŝi tute povis nek leviĝi de kuseno, nek turn-
iĝi. Nur ne forlasis ŝin ankoraŭ konkoreco kaj rimarkinda atento al la junulo. Ŝi antaŭe
ĉiam partoprenis la jaran solenon de la lernejo kaj nun tre interesiĝis pri detaloj de la
nunjara. Joĉjo mallongige rakontis al ŝi ĉion atentindaĵon kaj ne povis kaŝi de ŝi la ren-
kontonkun la kolonelo, prisilentinte, kompreneble, la rimarkon de la rektoro. La malsan-
ulino estis tre kortuŝita kaj feliĉa rideto ne unufoje ekglitis tra ŝia pala vizaĝo, dum
Joĉjo priskribis al ŝi la scenon.

Laŭ peto de Julia Andreevna Joĝjo iris de ŝi al la familio de Veselov'oj, por redoni al ili ian pakaĵeton, kiun Olnjo forgesis dum unu el siaj lastaj viziton. Pasiĝinte nur kelkajn minutojn en la gastama domo, li foriris hejmen, sed jam malsupreniĝante de la ŝtuparo, li iom ekmemoris, reiris kaj tuj eniris en la ĉambron de Olnjo. Li rakontis ankaŭ al ŝi pri tiu honoro, je kiu la kolonelo indiĝis lin antaŭ la rektoro, la guberniestro kaj ĉiuj lernantoj. La knabino tiel ĝojis je la okazintaĵo, kvazaŭ je la honoro indiĝis ne li, sed ŝi mem. Tio ĉi pligrandigis lian personan ĝojon kaj tute forglatigis impreson neagreblan de la rimarko de la rektoro, kiun Joĝjo tute prisilentis.

Kiam Joĝjo lastfoje expremis la manetojn de la knabino, kies la vizaĝeto ankoraŭ brilis per ĝojo ne falsa, kaj estis preta foriri, ŝi haltigis lin kaj, rapide malfermante tirkeston de la tablo, donis al li ĉifitan koverton fermitan, sur kiu estis farita krajone noto: al Josefo M.

– Ĉu ĝi estas via? – ŝi demandis. – Ŝin antaŭ longe, antoraŭ antaŭ la festoj, trovis la serviston sur planko de la antaŭĉambro. Ekde, vi perdis ĝin?

Joĝjo ekmemoris, ke ĝi estis tiu koverto, kiun enmanigis al li knabeto Vladĝjo antaŭ lia foriro post la vizito memorinda al la kolonelo kaj pri kiu li tute forgesis. Per la manoj tremantaj Joĝjo malfermis la koverton antaŭ la okuloj de la knabino miregita kaj el ĝi eliĝis banknoto je cent rubloj kaj vizitkarteto de la kolonelo, sur kies dorsa flanko li tralegis:

„Min trafkortuŝis via religiemo kaj amo al viaj gepatroj malriĉaj, pri kio mi ĵus sciiĝis. Feliĉaj estas gepatroj, kiuj havas tian filon! La monon almetatan vi akceptu, kiel esprimon de mia, kaj de mia edzino, danko. Uzu ĝin laŭ via kontrovo; mi antaŭe scias, ke ĝi estos dece elspezita. Kolonelo Novickij."

– Olnjo!.. – ekkriis Joĝjo, feliĉigita de la neatenditaĵo, donante la karteton al ŝi, – mi tute forgesis... En via tirkesto estas ankoraŭ unu mia koverto fermita...

– Kia?

– Tiu, kiu enhavas vian fotografaĵon. Ĉu vi memoras, vi enmanigis al mi tiam?..

– Kaj vi tiel estis ĝojigita de ĝi, ke vi tuj kaŝis ĝin en mian tirkeston, eĉ ne ekrigardinte ĝin?.. – ŝi interrompis.

– Olnjo!.. Mi ne tiam!.. Ne! Jam poste... Mi rigardis ĝin... – Joĝjo balbutis.

– Jen ĝi estas!... – diris la knabino. – Sed nun ĝi estas superflua, ne interesa por vi... Nun, ade, Sonjo...

– Olnjo!.. – li ekkriis, elŝirante el ŝiaj manoj la koverton, kiun ŝi ree intencis kaŝi.

– Atendu!.. Rigardu, ĉu mi diris ne veron? La koverto estas eĉ ne malfermita, vi eĉ ne ekrigardis la fotografaĵon!

– Mi forgesis, pardonu!..

La knabino paris malkontentan mienon kaj forturniĝis de Joĝjo, kiu, ne rimarkante tion, jam legis sur dorsa flanko de la fotografaĵo dedicon, skribitan rapidmaniere:

„Al patro Josefo por bona memoro. Kiam li, antaŭ pastriĝo, edziĝos je sep-pudulino, li redonu al mi tiun ĉi fotografaĵon, ke la sep-pudulino ne elgratu miajn okulojn pro la fotografaĵo. Via amiko Olnjo Veselov. 189..."

– Kial vi aludas iam sep-pudulinon?..

– Ĉu vi en komprenas? Nu, vi edziĝos, pariĝos pastro vilaĝa... Kaj ĉu vi ne scias, ke preskaŭ ĉiam pastredzinoj vilaĝaj estas dikulinoj, multpezaj... – jam pervoĉo klaris kolereman respondis Olnjo. – Kiam mi skribis, mi ne supozis, ke vi enamiĝos en...

Ju laŭtvoĉe voxis la gejunulojn en la manĝoĉambron kaj Olnjo, ne fininte la frazon, rapide forturniĝis de Joĉjo kaj forkuris, lasinte lin konsternita.

XXVIII.

Tentoj.

La paskajn feriojn Joĉjo estis devigita pasigi ankaŭ en la urbo, ĉar pasko en tiu ĉi jaro estis frua kaj veturi hejmen vaporŝipe li ne povis, ĉar la rivero liberiĝis de la glacio nur en fino de la paska semajno kaj veturi ĉevalo (sur) estis troxara veturmaniero. Post la festo tuj deviskomenciĝi la plej grava tempo de lernjaro – ekzamenoj, por kiuj Joĉjo devis tute fordoni sian tempon, kapablecojn kaj fervoron, – en kontraŭa okazo lin atendis tute ne agrabla sorto esti restigita en la sama klaso ankoraŭ por unu jaro. Tial li decidis dum la festo plenumi ĉiujn siajn aferojn privatajn, t.-e., la netskribadon, korespondadon kaj verkadon, ke ili ne povu poste malhelpi al liaj aferoj senperaj – al preparado al ekzamenoj. Kaj li faris juste, kiel li decidis. Al lia laborado diligenta favoris ĉio, eĉ vetero: dum la tuta daŭro de la paska semajno estis nenia tago serena kaj suna, sed ĉiam jen pluvis, jen neĝis. Joĉjo nenien iris dum tiu ĉi tempo, krom kutimaj ĉiutagaj vizitoj al la malsanulino kaj du mallongaj – por relkaj minutoj – vizitoj de la familio de s-ro Veselov. Rezultate li sukcesis netskribi unu grandan manuskripton de la dikulo, ricevitan juste antaŭ Pasko, kaj verki unu noveleton originalan, kiu, pro cirkonstancoj ne favoraj, kiel ankaŭ aliaj liaj similaj literaturpetolaĵoj, ~~[illegible]~~ nenie estis presita.

La unua ekzameno de psikologio okazis en la jaŭdo de la postpaska semajno. Tio ĉi estis tre serioza lernobjekto, tamen neniu el lernejkolegoj de Joĉjo, ankaŭ li, dum la lernjaro iom studis el ĝi, ĉar ĝia instruisto Petr Petrovič – homo tre serioza kaj instruitulo – nepostulis tion de siaj lernantoj. Li estis ĉiam okupita je verkado kaj tradukado de sciencaj verkoj, kies manuskriptojn li ĉiam havis kun si en flanka poŝo de surtuto. Dum lecionoj en la lernejo li ĉiam profundiĝadis en ilin kaj tute ne atentis tion, kion faris liaj lernantoj.

Ordinare, veninte en la lernejĉambron kaj supreniĝinte sur katedron, li tuj profundiĝis en sian manuskripton, antaŭe nur nominte iun el lernantoj:

– Petrov!.. Diru al ni, kion vi studis por hodiaŭa leciono.

La lernanto, sen ia konfuzo tuj prenis la lernolibron kaj legis ĝin laŭte kaj nerapide, haltante nur tiam, kiam la tasko estis tute tralegita. Ne interrompante eĉ por unu momento sian sciencan laboron, la instruisto ~~~~ parolis:

– Bone, tre bone... Sidiĝu!

Post tio li nomis alian lernanton, kiu same legis la saman. Tiel daŭris la afero senŝanĝe de tago al tago. Kiam sonoris la sonorileto, anoncante finon de leciono, la instruisto kunmetadis siajn paperfoliojn, enpoŝigis ilin kaj postulis, ke oni donu al li lernolibron.

– Por sekvonta fojo vi tralegu jen tiujn ĉi tri foliojn, – li parolis, nomante la paĝojn, kaj foriris.

Tiu ĉi tre originala metodo de instruado daŭris jam dum multaj jaroj kaj estis por neniu sekreto. Ĉiuj lernantoj tre amis bonan Petr'on Petroviĉ kaj estis konvinkitaj, ke ĉiuj instruitoloj estas ĝuste tiaj bonanimaj kaj nepostulemaj homoj.

Dum ekzamenoj ĉiujare li uzadis jenan artifikon, por savi siajn lernantojn kaj por ne senvualigi ilian sensciecon en la „ellernita" scienco, kiu tamen postulis de ili kelkan manlertecon kaj kuraĝon. Ĉiu instruisto ordinare antaŭ sia ekzameno dividis tutan ellernitan dum jaro materialon je partoj egalaj, konforme al nombro de lernantoj kaj samnombran kvanton de biletoj lotumotaj dum ekzameno kaj ĉiu lernanto, preparante al ekzameno la tutan ellernitan materialon, dum ĝi devis respondi nur tion, kio estos al li lotemontrita. Same faris ankaŭ Petr Petroviĉ, sed nur kun jena diferenco: li faris ĉiun bileton en du ekzempleroj. Unu biletaron li lotumis inter siaj lernantoj ankoraŭ antaŭ longe antaŭ ekzamenoj kaj ĉiu devis bone ellerni al la ekzameno nur tiun parton de la lernolibro, kiu estis konforma al tiu ĉi lia bileto lotemontrita. La duan biletaron la instruisto uzis por kaŝi la artifikon, t.-e., li ▬ metis ĝin sur tablon antaŭ lernantoj dum la ekzameno. Tiamaniere, lernantoj, venintc al ekzamenotablo, devis preni unu el tie kuŝintaj biletoj kaj ŝanĝi ĝin je tiu, kiu estis antaŭe lotumita de la instruisto. Mi ripetas, ke tiu ĉi operacio ▬ estis tre riskoplena kaj postulis grandan lertecon de manoj, kiu, kompreneble, ne mankis ĉe la lernantoj.

Jočjo dum la lotumo ricevis la unuan, t.-e., la plej facilan bileton, kiu traktis pri la nomo de la scienco kaj ĝia konsisto, – sekve tion kaj sole tion li devis respondi dum la ekzameno. Trankviligita de tio, li senlaboris antaŭ la ekzameno, pasigante ĉiujn tagojn, destinitajn por la preparado al ĝi, en la familio de s-ro Veselov.

Post kelkaj tagoj la tuta familio devis forveturi en la bienon „Veselovo", kaj la knabino senĉese klopodis, tion ordigante kaj preparante al la vojaĝo. Preskaŭ senpozire apud ŝi estis ankaŭ siaj amikinoj – la grafidinoj, kiuj al tiu tempo tiel progresis en Esperanto, ke ne embarase povis babili en ĝi kun Olnjo kaj Jočjo pri kio ajn. Jajne, tiam estis la plej feliĉa periodo de lia vivo!

La grafidinoj, kvankam ili estis lernantinoj de gimnazio, tiam ĝuis ripozon, ĉar ili estis plej bonaj lernantinoj kaj ĉiujare estis liberigataj pro tio de ekzamenoj. Dum someroj ili kun la patro aŭ kun unu el la onklinoj vojaĝis eksterlanden kaj dum la somero venonta ili intencis fari kun la patro grandan vojaĝon vaporŝipe laŭ Volga de ĝia komenco mem ĝis la enfluo, t.e., de Tver ĝis Astraĥanj. Ili jam antaŭĝuis ĉarmajn de tiu ĉi alloga vojaĝo kaj revis pri malatenditaj renkontiĝoj kun gesamideanoj sur vaporŝipo kaj pri propagando, kiun ili esperis fari sur vaporŝipo inter kunveturontoj. Unjo revis pri ankaŭ laŭĝan propagandon de la lingvo en Veselovo, ĉe aranĝi esperantan informejon en sia domo. Ĉio tio ĉi estis sencese priparolata de la fraŭlinoj je plej diferencaj manieroj. La fraŭlinoj gaje pepis, kiel hirundinoj, ĝojigante per tio senlime esperantan memamon de Joĉjo. Joĉjo senlime envidis al la fraŭlinoj senzorgaj kaj kun doloro en la brusto rigardis iliajn vizaĝetojn ĉarmajn, antaŭvidante baldaŭan disiĝon kun ili kaj sian izolecon en la urbo dum la ekzamenoj.

Aŭskultante entuziasmajn parolojn de la fraŭlinoj, Joĉjo estis silentema kaj zorgatakita pli ol iam antaŭe. Li estis silentema ne pro sia kutima neparolemo, ne pro konfuziĝemo, kiu delonge tute forestis jam en ĉesto de la fraŭlinoj, sed pro tiu nova sento, kiu rekviĝis en li je unua fojo tuj post la memorinda konatiĝo kun la grafidinoj. Tiu ĉi sento estis ankoraŭ ne klara, ne difinita, tamen turmentiga kaj maltrankvila. De tiu tempo, kiam li konatiĝis kun la grafidinoj, kiam li kun miro rimarkis, ke, malgraŭ tiu diferenco, kiu estis inter tiuj ĉi bonedukitaj, riĉaj altrangulinoj kaj li - malriĉa, malalta kaj tute ne rimarkinda seminariano, la grafidinoj ne evitas, ne malŝatas lin, sed rilatas al li, kiel al sia egalulo, amiko, eĉ, servante ekzemplon de Olnjo, ne konsideras nomi lin „Joĉjo", - de tiam li komprenis, ke ili superas senkompare Olnjon per sia beleco, ĉarmeco kaj agableco. Li rimarkis, ke inter ili kaj Olnjo estis tia sama grandega diferenco, kiu estis inter Annjo - la filino de la vilaĝanestro kaj Olnjo. Joĉjo ĝuste taksis tiujn meritojn de Olnjo, sed ili estis iel plimalgrandigitaj, ombrigitaj de la samaj meritoj de la bela grafidinoj, kiuj sen ies helpo, nur pro sia diligenteco kaj pacienco, exposedis la lingvon ne malpli bone, ol Olnjo kaj, kiel sajnis al Joĉjo, estis kapablaj alporti al la lingvo pli grandan utilon, ol Olnjo.

„Ŝi ne taŭgas por vi, Joĉjo!.. Ŝi estas bona, ĉarma knabino, sed trefrivola..." - li aŭdis la voĉon de Julia Andreevna ĉiupoje, kiam nur li rigardis Olnjon.

„Ŝi estas bona, bela, kvazaŭ parenca knabino, sed ŝi fariĝis fremda por mi post tio, kiam mi konatiĝis kun la grafidinoj, post tio, kiam verema Julia Andreevna diris al mi la veron pri ŝi," - pensis Joĉjo. „Mi neniam kuraĝos pensi, ke ŝi aŭ unu el la grafidinoj estu, en estonteco malproksima, mia edzino... tamen la lastaj forlogas min!.. La grafidinoj," - li plustre elparolis la titolon de ili, - „Sonjo"... „Kiom da ĉarmeco kaj sorĉaĵo enhavas nur tiuj ĉi nomoj!.." - li ofte pensis, kun detenata spirado, rigardante la fraŭlinojn. „En

la apudesto mi forgesas ĉion, mi neniam forirus de ili, se tio ĉi estus ebla, mi konsentus esti ilia servanto... Kaj se nili mi estas malfeliĉa, kvazaŭ perdinta ion valoran."

La unua ekzameno pasis sukcese por Joĉjo, li respondis sian, t.-e., la unuan bileton kaj ricevis tre bonan noton. La dua ekzameno devis okazi en la sabato de la sama semajno el historio de la Eklezio. Dum tiuj ĉi du tagoj antaŭ la ekzameno li devis trastudi grandan, dikan lernolibron de la historio, kiun li malmulte studis dum la jaro kaj kiun li tute ne ŝatis. Tre konfuzis kaj dolorigis lin tio, ke dum tiuj ĉi tagoj li ne povos esti inter la fraŭlinoj, kiuj, dank'al belega printempa vetero ĉiam estis ekster la domo en la bulvardo, aŭ en urba ĝardeno kaj ĉiam multhoma kajo vivplena. Kaj la vetero, efektive, kiel intence, estis tiom deloge-bela, kiel neniam. Antaŭ nelonge estis varma pluvo printempa kaj unua pulmotondro, post kiuj herbejoj ĉie verdiĝis, burĝonoj de arboj krevis kaj aero estis plenigita de ebriiganta printempa odoro. En stratoj kaj la kajo estis viveco. En la vero sonis senfinaj fajfoj de vaporŝipoj, kantoj kaj muziksonoj de promenantoj en boatoj tra la rivero. Ĉio en la naturo vekiĝis, vigliĝis, ĉio ĝojis, - nur li, kiel ŝajnis al Joĉjo, ne povis partopreni tiun ĉi grandan feston de reviviĝo de la naturo, nur li estis devigita, dum ĉiuj ĝojis kaj ĝuis la printempon, studi diversajn enuigajn kaj malsaĝajn historiojn, fizikon, latinan lingvon kaj ceterajn ĉarmajojn sciencajn.

Ĝuste kun tiaj pensoj malgajaj Joĉjo iris en la ĝardo al la fraŭlinoj, kiujn li esperis ĉi-fojn renkonti kutime en la ĉambro de Olnjo.

Antaŭ ol supreniĝante laŭ la ŝtuparo, li ekaŭdis ilian babiladon kaj ridon, kiuj revokiĝis malĝoje en lia koro. Ho, kiel li envias en tiu ĉi minuto al la knabinoj liberaj kaj senzorgaj.

- Olnjo! Joĉjo venis!... - gaje ekkriis Olnjo, jus li alproksimiĝis al la ĉambro ne fermita.

- Vi venis ĝustatempe, - diris Sonjo. - Ni jus decidis iri la kajon.

- Mi ne povas akompani vin, - Joĉjo diris malgaje.

- Kial? - Sonjo demandis, ekskuinte la kapon kaj fiksinte al Joĉjo mirigitan rigardon de siaj klaraj, bruligantaj okuloj.

- Nun estas sezono de ekzamenoj kaj la kajo estas ĉiam tre multehoma, mi povas tie renkonti iun mian instruiston...

- Ĉu vi timas viajn instruistojn? - naive demandis Olnjo.

- Kompreneble, li timas! - Olnjo respondis nerveme. - Dum ekzamenoj lernantoj devas ne promeni, sed studi lernolibrojn.

- Malfeliĉa Joĉjo! - kortuŝe diris Sonjo, en kies voĉo estis aŭdebla nefalsa kompato. - Li devas sidi en ĉambro sufoka kaj studi siajn enuigajn lernolibrojn, dum la vetero estas tiel bela. Kian ekzamenon vi havos dum la tagoj proksimaj?... - ŝi daŭrigis, ekspirinte profunde kaj mallevante la okulojn.

- Historion de la...

-Ĉu la historion? - Olnjo vigle interrompis lin. - Aŭskultu, Josefĉjo, kion mi diros al vi... Mi sonĝis hodiaŭ, ke vi dum ekzameno de la historio ricevis lote bileton №14-an! Tio ĉi estas tiel mirinda, tiel mirinda! Mi tre bone memoras ĝis nun tiun ĉi grasliteran numeron...

-Ĉu? - joĉjo eksmiris, ne deturnante sian rigardon de Sonjo. - Se ĝi estus vera antaŭdiro, mi povus promeni hodiaŭ la tutan vesperon... por ellerni unu bileton estas necesa nur unu duonhoro.

-Joĉjo, iru kun ni!.. Hodiaŭ la onklinoj ne povas akompani nin kaj ni solaj ne kuraĝas iri tiel malprudente, - petis Olnjo, premante lin je la mano kaj karese favorigante lin.

-Olnjo neniam eraras!.. - Sonjo aldonis al la argumentoj de sia fratino, jetante sur lin ĉarman rigardon de siaj serenaj okuloj, en kiu li tralegis multan el tio, kio estis kaŝita de ceteraj mortemuloj kaj pro kio li tuj decidis [redacted] senhezite preferi al la praŭlinoj ĉion en la mondo.

-Morgaŭ vespere la grafidinoj, - diris Olnjo, - promenos boate la insulon kaj Sonjo nepre deziras, ke la rusa nomo de ŝia boato „Djevuŝka" („Knabino") hodiaŭ estu anstataŭita de la esperanta „Samideanino". Ni jam akiris verdan koloron kaj penikon, ĉu vi helpos al ni?..

La tento estis granda kaj ne venkebla. Post unu minuto Joĉjo, akompanata de la praŭlinoj, iris al la kajo, tenante en la manoj kolorilojn kaj penikon. Je ambaŭ flankoj de li iris bele-vestitaj kaj printempe-gajaj la knabinoj. De tempo al tempo Joĉjo timeme rigardis ĉirkaŭe, timante en ĉiu renkontita homo rekoni aŭ ian instruiston, aŭ la [redacted] inspektoron. La knabinoj ankaŭ estis maltrankvilaj kaj forgatakitaj, ili senĉese ekrigardis en lian vizaĝon, demandante, ĉu tiu aŭ alia renkontito ne estas lia instruisto.

Tamen tute feliĉe kaj sen ia malagrablaĵo ili trairis relkajn stratojn ĝis la kajon. Malsupreniĝinte de ĝi al la rivero mem, kie balanciĝis sur ondoj kvietaj malgranda, sed gracia kaj bela, kiel ĝia posedantino, „Knabino", - la gejunuloj estis en plena sen-fine-reco. Joĉjo rapide, kiel profesia koloriĝisto, koloriĝis la nomon antaŭan de la boato per blanka kolorilo, super kio poste Sonjo lerte faris krajone konturon de kvinpinta stelo kaj la novan nomon, kiujn Joĉjo ne malpli lerte poste verde koloriĝis. Joĉjo laboris nerapidante, ofte forlasante la penikon kaj partoprenante en rido kaj gajaj ŝercoj de la knabinoj, kiuj ĉe por unu minuto ne forlasis lin kaj aprobis lian laboron jen per laŭdoj, jen per siaj rimarkoj kaj gajaj rigardoj. Li laboris kun penemeco grandega kaj tiel allogiĝis al la laboro, ke li ne rimarkis, ke makulis sian jakon per verda kolorilo.

- Joĉjo, ĉu vi promenos kun ni morgaŭ al la insulo? - Sonjo demandis lin, kiam li, tute fininte la laboron, sidiĝis kun la knabinoj sur grandan glatan ŝtonon apud bordo kaj malgaje trarigardis la verdajn makulojn sur la jako.

-Kia malsaĝa demando !..- diris Alnjo, malkontente kuntirante la lipetojn.- Li ja studos nur unu bileton al la ekzameno, kiun sonĝis Olnjo,-pro tio li estos tute libera dum tiuj ĉi du tagoj.

-Tentantinoj !..-joĉjo diris respondo, ĝojante je ebleco de la alloga promeno venonta. Promesinte nepre partopreni la boatpromenon, Joĉjo revenis hejmen jam malfrue vespere, feliĉa kaj gaja.

XXIX.

Aventuroj.

Matene, por ~~kant~~ trankviligi iom la konsciencon, kiu riproĉis nian heroon je frivoleco, Joĉjo prenis en la manojn la lernolibron de la historio. Sed trastudinte supraĵe tri-kvar paĝojn de ĝi kaj konvinkiĝinte, ke li ne sukcesos trastudi ĝin la tutan pro manko de tempo,-li ne forgesis pri la boatpromeno !- Joĉjo trovis la misteran kvarbileton. Li longe penis koncentriĝi je ĝi sian atenton, sed liaj pensoj ĉiam flugis for de ĝi al la rivero, al la knabinoj.

La tago promesis esti varmega, la suno ĝoje rigardis tra la fenestro kaj logis forlasi la ĉambron. Joĉjo decidis, ke li facile trastudos la bileton matene antaŭ la ekzameno mem kaj ekiris tien, kien tiris lin la koro.

Post taymezo la fraŭlinoj, feste vestitaj kaj bele frizitaj, akompanataj de onklino Eŭdokio, kiu kutime kunprenis dikan franclingvan, ankoraŭ ne tranĉitan, romanon, prenintan kun si fotografilon, manĝajojn kaj gitaron, gaje interŝanĝante spritaĵojn kaj ĉirkaŭflutante Joĉjon per gajaj ŝercaĵoj pro lia makulita jako, baldaŭ sen malhelpe atingis la ĝetejon. Ŝi estis jam plena de promenantoj. Dio mia! Kiom da homoj de plej diversaj oficoj kaj aĝoj estis tie, sed inter ili Joĉjo, bedaŭrinde, rimarkis neniun lernanton. La laciĝintaj fraŭlinoj trovis unu benkon liberan kaj sidiĝis por ripozi de la rapida paŝado kaj iom rigardi ornamojn de preterirantaj fraŭlinoj. Joĉjo ne aŭdis iliajn parolojn, ĉar li ĉiumomente atendis por si neagreblan renkontiĝon. Kaj lia antaŭsento ne trompis lin. Baldaŭ antaŭ ili haltis sinjoro, kiu tenis je la mano knabineton, bele vestitan. Larĝe malfermintaj okulojn, li longe rigardis jen Joĉjon, jen la fraŭlinojn, poste, kvazaŭ ne konfidante al siaj okuloj, li elprenis nazumon, metis ĝin en la dekstran lokon sur la nazo kaj, ekbalancinte ridoĉe per la kapo, diris al Joĉjo malaŭte:

-Ĉu vi ankaŭ promenas ?.. Kun la fraŭlinoj ?.. Tie ĉi hodiaŭ promenas multaj instruistoj, vi farus bone, se vi tuj forlasus viajn akompanantinojn kaj irus hejmen... jam nun, se vi ne forgesis, estas sezono de ekzamenoj !..

Dirinte ĉi tion, la sinjoro formetis de la nazo la nazumon kaj foriris per malrapida ekmarŝo, de tempo al tempo returnante la kapon kaj kvazaŭ dezirante sciiĝi, kian ĝi-

n havis lia averto. Joĉjo, sin kaŝinte post la dorsoj de la praŭlinoj, staris hezitante kaj
ĝiĝante.

– Joĉjo? Kiu li estas? – Sonjo demandis lin en Esperanto.

– Ĉu vi forlasos nin kaj tuj revenos hejmen?..

– Ni iru al la boato! – ekparolis en la sama lingvo la ceteraj knabinoj.

– Ili malsupreniĝis. Sonjo tuj dungis unu remiston, ĉiuj okupis en la boato siajn lo-
n, antaŭe destinitajn por ĉiu el la partoprenantoj de la promeno kaj la beluline „Sam-
ernino" flue eknaĝis, kuraĝe dishakante per sia brusto obstinajn ondojn. Alnjo sidis
ud la direktilo, – krom ŝi neniu sciis direkti boaton. Alnjo, kiel pli malpeza, sidiĝis
r la boatnazon kaj Joĉjo kun Sonjo okupis la mezan benkon. Ĵus la boato fornaĝis kelk-
n klaftojn de la bordo, Sonjo ekfrapis je kordoj de la gitaro kaj mirindaj sonoj de iu ro-
nanco, kiel torento, ekfluis super la glata akva ebenaĵo. Joĉjo delonge ŝatis gitarmuzik-
n, sed li neniam antaŭe aŭdis ĝin super rivero. En la sonoj, jen plilaŭtiĝantaj, jen mal-
lilaŭtiĝantaj, jen subite trarompataj de la mano (lezta) de Sonjo estis io sorĉa, supertera. Li
nge rigardis kun amo kaj admiro la ludantinon, tute forgesinte ĉion, eĉ la ekzam-
non, morgaŭ okazontan, eĉ la neagrablan renkonton, eĉ Alnjon, kiu delonge ĵaluze ri-
ardis lin. Nur kiam preter ili kun bruego preterpasis rapide granda vaporŝipo, las-
ta post si vicon de ŝaŭmantaj ondoj, tra kiuj la boato ekglitis kaptūrne, jen leviĝ-
nte, jen malleviĝante kun terura rapideco, ŝi formetis la muzikilon kaj mallaŭte
emandis Joĉjon:

– Ĉu vi ŝatas muzikon?

– Mi ŝatas, sed tian mi aŭdis neniam... Ŝi ensorĉigis min. Vi ludas bonege!

La knabino, kontentigita de la respondo, modeste ekridetis.

– Vi tamen ne respondis al mi, kiu estas tiu sinjoro... – diris Alnjo, sin turnante al Joĉjo,
iam la ondoj iom trankviliĝis.

– Ĉu li estas via instruisto? – aldonis Alnjo.

– Jes, li estas instruisto!.. Sed li estas bonulo kaj neniam malutilon li kaŭzos al mi, –
spondis Joĉjo.

– Mi tuj rimarkis tion ĉi, li tiel bonanime rigardis vin, – diris Sonjo, facile ludante
r siaj malditaj fingretoj je la kordoj.

– Li estas tre simpatia sinjoro!... – interrompis ŝin la fratino, – kia estas lia nomo?

– Felicin!..

– Ĉu Felicin? – diris Sonjo. – Ne, la nomo mem montras, ke li ne estas danĝera por vi.

– Kial lia nomo estas Felicin, sed ne Feliĉin?.. – sopiris Alnjo. – Tio ĉi estus pli belsona
aj pli konforma al...

La insulo, kuŝinta je dek verstoj de la urbo, estis arboriĉa. Anstataŭ de malproksime
i ŝajnis granda verda monteto, kvankam nur kaj branĉoj de la kreskaĵaro ĵus komenc-

is sian printempan ornamadon je foliaro. Lasinte apud „Samideanino" la remiston, la ge-
samideanoj kun la onklino, kiu dum la boatpromeno estis profundiĝinta en la romanon
kaj, sajne, aŭdis nenion el la interparoloj, supreniĝis krutegan bordon de la insulo, ston kor-
itan kaj ĉirkaŭzonitan de malaltaj arbetajoj, sterniĝintaj preskaŭ laŭ Bordo mem. La in-
sulo ne estis logata, ĝi estis nur loko amata por someraj boatpromenoj. Tamen oni aplikis
al ĝi aspekton de urbĝardeno, aranĝinte kelkajn vojetojn serpentkurbajn kaj benkojn.
– Ni haltu, gesamideanoj! – diris laŭte kun entuziasmo, sendube, je unua fo-
jo pleniganta ĉeron de la insulo per belsona esperanta parolo. – Ni salutu la gastaman
an insulon per la kanto, kiun ĝi ankoraŭ aŭdis neniam! Ni kantu la himnon!..
Kaj la vortoj senmortaj de la granda aŭtoro de Esperanto, ekfluigis ĥore, konsente
per unu fojo el kvar junaj, ~~entuziasmo~~ entuziasmoplenaj buŝoj:

„En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko..."

Poste la societo, disloĝiĝinte en pentrindaj pozoj sur la krutajo de la Bordo, vespermanĝ-
is bongustajn kuketojn kaj laktan, kiujn oferis antaŭvideme kunprenis. Ŝi intencis fari
kelkajn fotografaĵojn de la insulo, sed aperis malhelpoj: pro densa kreskaĵaro sur la insulo
ne sufiĉa
regis ~~malmulta~~ lumo, krom tio, kiel intence, hejme estis forgesitaj provizaj negativoj. Tial, forlas-
inte sur tiu sama loko la onklinon, kiu ree profundiĝis en la romanon kaj ripuziĝis ĉi
en ajn, la gejunuloj nur jevagado tra la insulo, laŭte kantado kaj gaja ridado, ĉar krom
li sur la insulo, šajne, estis ankoraŭ neniu. Ĵi ne forgesis ankaŭ por memoro eltranĉi per
poŝtranĉilo esperantan steleton kaj siajn nomoj sur unu benko kaj per tio eterniĝis ilin.
La suno jam estis malsupreniĝanta, kiam la gejunuloj, lacaj kaj kontentaj je la pro-
meno, decidis reveni hejmen. Sed tiam ilin atendis malagrabla malagrablaĵo, – ili ne-
niel povis trovi la vojeton kaj ŝtupareton, laŭ kiu ili supreniris de la boateto. Kien ajn ili
venus, ĉie malhelpis al ilia malsupreniĝo densaj arbetajoj pikemaj aŭ krutaĵo. Tamen
plua serĉado de la elirejo, krom tio, estis ĉiam pli kaj pli riskoplena, ĉar la insulo, kiu en-
taŭ relonge estis tute senhoma, nun estis iom post iom pleniĝanta de novaj vizitan-
toj-urbanoj, inter kiuj ĵoĝjo povis renkonti instruistojn. La fraŭlinoj jam estis ĉirkaŭ-
kaptitaj de malespero kaj kun terura rigardis siajn belajn vestaĵojn, kiuj devis neevit-
eble superi pro malsupreniĝo maloportuna.
Por aranĝi la aferon, ili longe interkonsiliĝis. Kiam ĉiuj proponoj de la knabinoj pri la
malsupreniĝo estis refutitaj pro ilia nekonformeco, Joĝjo proponis al ili sian planon
kuraĝan, kiu delonge maturiĝis en lia kapo, sed priparoli kiun, li longe konfuziĝis. Li
proponis al la knabinoj siajn konservojn por malsupreniĝi ilin ie ajn unu post la al-
ia en siaj brakoj, aŭ almenaŭ kun sia helpo.
Kvankam ili ne estis tute certigitaj pri forto kaj lerteco de Joĝjo, tiom necesaj en tia ris-
koplena entrepreno, tamen ili post sufiĉa hezito konsentiĝis. La unuan, kiel pli mal-

grandan kaj pli kuraĝan, Joĉjo devis malsupreniĝi Alnjon.

La Beluline, komence nur sin apogis per la mano je la ŝultro de Joĉjo, per la alia manо subtenante randon de sia beleta vestaĵo, sed poste ŝi pro timo forlasis ĝin kaj jam per la ambaŭ manetoj ĉirkaŭkaptis Joĉjon je la kolo. Li uzis neversajnajn penojn por ne ekgliti kaj ne paliĝi la grandvaloran ŝarĝon kaj, precipe, por ne malpuriĝi ŝian vestaĵon, dume li sentis ŝian nekutiman proksimecon al si, nervenan batadon de ŝia koreto kaj molajn bonodorajn bukletojn, kiuj agrable tiklis lian vizaĝon. Post nelonge ili malsupreniĝis kaj la Beluline rumĝojo konstatis, ke ŝia vestaĵo neniom superis de argilo kaj arbostumpetoj, malhelpintaj al la malsupreniĝo. Pro ĝojo la knabino saltis, kiel juna kapridino, kaj, frapante la manplatojn, kuraĝigis de malsupre siajn rumulinojn, ke ili sentime sin fordonu al tia bonservema kaj lerta kavaliro, kia estis Joĉjo.

Olnjo estis pli postulema: ŝi ne permesis, ke Joĉjo tuŝu ŝin. Ŝi ordonis, ke li nur tenu ŝin je la ambaŭ manoj, ke ŝi ne falu, kaj singardeme malsupreniĝu rum ŝi paŝo post paŝo. Joĉjo obeis kaj ili feliĉe jam atingis mezon de sia vojo danĝera, sed tiam la knabino subite ekglitis kaj fortiris post si la junulon. Tamen li ĝustatempe subtenis ŝin kaj ne permesis al ŝi fali, kvankam li piedpremis kaj forŝiris pecetoj de punto, kiu ĉirkaŭis ŝian juprandon.

Kiam Joĉjo je dua fojo suprengrimpis la krutaĵon, nie atendis liajn bonservojn Sonjo, de malsupre ekaŭdiĝis krio alarma de Olnjo:

— Joĉjo, atendu iom!.. Joĉjo kara, ne malsupreniĝu!.. Ja sinjoro staras tie ĉi kaj mi timas, ke li estas via instruisto...

Kompreneble, la knabino avertis la junulon en Esperanto, ĉar ĝenerale nur tre malofte ili uzis inter si la lingvon rusan. Pro densaj arbetaĵoj, kiuj baris la knabinon kaj la nekonatulon, starintan tie, Joĉjo povis vidi nenion, tamen nun li tre malmulte interesiĝis je tio, kiu staris malsupre: tuta lia atento estis turnita al Sonjo.

Ŝi ne volis sekvi la ekzemplon de Olnjo kaj, gracie levetinte iom la vestaĵon per la mano maldekstra, per la dekstra sin apogis je la brusto de Joĉjo. Li delikate premis ŝin je la talio kaj komencis jam je tria fojo la vojon danĝeran. Ŝia vizaĝo beleta kaj ruĝiĝinta nun estis tre proksime de lia vizaĝo kaj ŝia spirado, kiel taga venteto varmeta, blovis ĝuste sur lian vizaĝon.

— Joĉjo, pro Dio, ne paliĝu min!.. Joĉjo, mia karulo, ne dipektu mian vestaĵon!.. — ŝi flustris senĉese.

Joĉjo jam kutimis al la tasko kaj tre malrapide kaj singardeme iom post iom tiris post si la knabinon. Li ne rapidis, ĉar la alpremiĝo kompidema de la knabino plaĉis al li kaj li deziris, ke la malsupreniĝo daŭru, kiel eble, plej longe. Dum la malsupreniĝo li devis ĉiam rigardi malsupren - sub siajn piedojn - kaj pro tio li havis okazon vidi kun admiro malgrandetan pantofleton de Sonjo, en kiun estis enmetita

ŝia piedeto graciaĵ, vestita je silka maldika ŝtrumpeto.

Ĵi malsupreniĝis feliĉe. La fraŭlino ordiĝis kaj ĉirkaŭrigardis sian vestaĵon, kiu bone konserviĝis, kaj Joĝjo, ebriigita de ŝia ĉarmeco kaj proksimeco, staris ankoraŭ apud ŝi gaja kaj feliĉa pro sia sukceso. Sonjo, je signo de danĝeco, amike etendis al li sian manketon, kiu jus estis apoganta je lia brusto, kaj li ekpremis ĝin forte kaj ekkisis.

Sono de la kiso ankoraŭ sonis en la oreloj de Joĝjo, kiam li subite ekaŭdis apud si mem sonon alian - ies voĉon viran konatan. Li ekrigardis tien kaj konsterniĝis. Je du paŝoj de ili staris, svingante en la aero per bastoneto helforma kaj fikse rigardante lin, lia instruisto de la historio. Evidente li estis ĝoja, ekkaptinte la junulon ĝustatempe, ĉar lia vizaĝo estis moke-ridetanta kaj plezuroplena. Sonjo, paliĝinta pro neatenditeco kaj antaŭsentanta jam iam malagrablaĵon por Joĝjo pro la renkontiĝo subita, staris apud li, [illegible] kulpe malleviinte teren la okulojn. Alnjo staris post la instruisto kaj faris al la gejunuloj iajn gestojn insistajn kaj riproĉe balancis al Joĝjo per la kapo. Olnjo forestis.

— Vere, estas agrable promeni dum tia bela vespero kun tia ĉarma fraŭlino!... — diris la instruisto. — Ĉu vi forgesis, juna sinjoro, ke vi estas lernanto, ke morgaŭ okazos al vi ekzameno el la historio?.. Kun fraŭlinoj [illegible] sur la insulo izolita ankoraŭ neniu el miaj lernantoj iam sin preparis al ekzamenoj. Tamen, eble, mi malhelpis al vi?.. Pardonu, ĉarma fraŭlino!.. Kiel vi sukcesis vin prepari al la ekzameno, ni vidos, mi esperas, morgaŭ!...

Kaj, ree eksvinginte per la bastoneto en la aero, li faris kelkajn paŝojn for de la gejunuloj.

— Ni vidos morgaŭ!... — Joĝjo respondis al li maldelikate, ne povante plu toleri la mokon.

Sonjo sekvis silente post Joĝjo al la boateto kaj Alnjo, kiel ĥifano, kuris antaŭ ili al Olnjo, kiu interparolis kun la remisto apud la „Samideanino". Joĝjo rerigardis, la instruisto ankoraŭ staris kaj fikse rigardis ilin.

La bonaj knabinoj estis pli emociitaj, pli maltrankviligitaj de la okazintaĵo, ol Joĝjo mem. Ĵi bedaŭris, ke pro ili li ricevis la malagrablaĵon kaj timis, kiel li morgaŭ antaŭstaros antaŭ la instruisto dum la ekzameno. Sed Joĝjo estis tiom feliĉa en ilia ĉeesto, tiom kontentiĝita de la promeno, ke la malagrabla renkontiĝo, kompare kun agrablaj travivaĵoj dum la promeno, ŝajnis al li bagatelo, kiun oni ne devis eĉ atenti. La boateto jam estis preta por fornaĝi, oni nur devis trovi la onklinon-grafinon. Olnjo kun Alnjo rapidege ekkuris supren laŭ la ŝtupareto kaj invitis ŝin. Ŝi sidis sur la sama loko, kaj estis tiom profundiĝinta en la romanon, ke ŝi ne tuj konsideris, kie ŝi estas kaj kion oni postulas de ŝi.

— Ĉu vi jam finis promenadon tra la insulo? — ŝi diris, fermante la libron kaj kun

miro rigardante la knabinojn. – Kial vi tiel rapidas?..

Kiam la boateto fornanĝis de la insulo, la vojaĝantoj envidis multegon da ~~boat~~ boatetoj, enkiuj, feste vestitaj urbanoj, rapidis al la insulo, kiu nur dum vesperoj estis homoplena. En la boatetoj aŭdiĝis gajaj krioj, rido, kantoj kaj iafoje eĉ bravaĉaj sonoj de harmoniko. Sed ili ĉiuj naĝis malproksime de la „Samideanino", ĉar la fraŭlinoj, ĉagrenitaj de la unua renkontiĝo, ne volis submeti la junulon al nova malagrablaĵo kaj speciala mano de la boatdirektantino gustatempe flankenturnis la boaton, kies aperis antaŭ ĝi ia nekonata boateto. Kiam ili estis meze de la rivero, Sonjo, laŭ peto de Joĉjo, ree ekludis je la gitaro. Ĉarmita de la muziko, li volis plu pensi nek pri la ekzameno, nek pri la malagrablaĵo.

– Olnjo, kara onklnjo, Olnjo!.. – gaje parolis Sonjo, forlasinte la boaton, – rigardu min, ja nenia, nenia eĉ plej malgranda maxuleto estas sur mia vestaĵo! Kaj de kia alta krutaĵo mi malsupreniĝis! – ŝi diris, cirkaŭrigardante kun ĝojo sian vestaĵon kaj ĵetante al Joĉjo dankoplenan, ĉarman rigardon.

XXX.

Olnjo ne eraris.

Joĉjo akompanis la fraŭlinojn ĝis ilia domo mem kaj, malgraŭ ekkoje ripetita peto de Olnjo, neli ankaŭ akompanu ŝin kaj pasigu eĉ ŝi kelkajn minutojn, sub preteksto de la ekzameno venonta, iris en la infanĝardenon, kiun ordinare vizitis neniu, krom vartistinoj kaj infanoj. La ĝardeno estis malplena kaj silenta. Sidiĝinte en laŭbo, kiu estis en plej malproksima angulo de la ĝardeno, Joĉjo sin apogis per la dorso je la kolono, fermis la okulojn, malkovris la kapon kaj restis en tiu ĉi senmova pozo longan tempon.

En liaj oreloj ankoraŭ sonis jen la gitarmuziko de Sonjo, jen ŝia agrabla brustvoĉo: „Joĉjo, karulo!.. Joĉjo, probio, ne faligu min!..." Li sentis ankoraŭ parfum-bukedoron, kiu elĝis de ŝia vestaĵo delikata, li sentis tuŝeton de ŝia mano varma, spiradon de ŝia buŝo kaj ĉastan rigardon de ŝiaj klaraj, bruligantaj okuloj. Ŝia konfuziĝemo, poste danka, kiel ŝajnis al li, amplena rigardo post la malsupreniĝo feliĉa kaj sendifekteco de la vestaĵo ankaŭ klare sin prezentis al li. Li bedaŭris, ke li ne povis ricevi kison de la beluline, – sed tiu ĉi bedaŭro estis ne daŭra kaj preterfluginta, kiam li rememoris ŝian dankan manpremon kaj la kison, per kiu li engravuris sur ŝia mano ŝian amon al ŝi. Li pensis, travivis la prešajn ankoraŭ impresojn de senpera proksimeco de la knabino amata kaj ŝiaj voĉo brusta trudeme sonis en liaj oreloj: „Joĉjo, karulo!.. Joĉjo!.."

„Kial mi ne nomis ŝin tiam je la nomo?.. Kial mi, trankviliĝante ŝin dum la malsupreniĝo, ne diris al ŝi: „Sonjo!", anstataŭ kutima „<u>fraŭlino</u>", – tio ĉi estus tiom

naŭzea, konvena kaj pardonebla... Eble, ŝi ne ofendiĝus je tia mia familiareco, sed pet-
us, permesus al mi ĉiam nomi ŝin tiel... Kaj mi... stultulo, seminariano... nomus
mian amatan knabinon - grafidinon Sonjo!.. Jes, Sonjo!.. - li semzonscie - laŭte diris
la lastajn vortojn.

- Ŝinjoro!.. - interrompis liajn dolĉajn revojn severa kaj maldelikata voĉo: - Oni ne
permesas dormi en la ĝardeno. En la ĝardeno oni nur promenas... Volu foriri, la
ĝardeno tuj estos ŝlosata.

Jočjo ekstremis pro neatenditeco, malfermis la okulojn kaj, per malrapida, ŝan-
celiĝanta irmaniero, forlasis la ĝardenon.

Li havis deziron nek dormi, nek reveni hejmen kaj la tutan nokton li vagis tra
stratoj senhomaj, senĉese ĝuante la travivaĵojn tiel neordinarajn, tiel dolĉajn.

Matene, antaŭ foriro mem en la lernejon, Jočjo rekfoje trastudis la bileton N14-an
kaj nur sole ĝin, tute konvinkita, ke ĝi nepre estos lote donita al li, kaj kun trankvila
animo venis al la ekzameno. Sur la tablo ankoraŭ kuŝis multaj biletoj dismetitaj, ki-
am li alproksimiĝis al ĝi. Antaŭstaris malfacila tasko konjekti, kiu el ili estis la 14-a?
Sed nenion rezitinte, Jočjo prenis tiun, kiu kuŝis pli proksime al li, ekrigardis ĝian
numeron kaj, ho, miro!.. ĝi estis ĝuste la 14-a.

Kurtiam Jočjo je unua fojo kaj kuraĝe ekrigardis la instruiston. Li estis precize tia,
kia li estis dum la hieraŭa renkontiĝo: la sama sarkasmo estis vidata en liaj okuloj, la
sama mokzideto - sur la lipoj. Li jam antaŭĝuis, kiel Jočjo povos nenion respondi el
la bileto kaj, sendube, li jam pretigis por li iam mokajon por fari lin ridinda kaj mok-
inda antaŭ liaj kolegoj.

Sed neordinara miro ĉirkaŭkaptis lin kaj seriozeco anstataŭis la antaŭnelongan
mokzideton, kiam Jočjo komencis trankvile kaj bonege paroli. La instruisto formetis si-
ajn okulvitrojn, viŝis la vitrojn, kaj ree ekrigardis Jočjon kun miro, kvazaŭ ne fidante al
siaj okuloj kaj oreloj.

- Bone! Bonege!.. - li diris, kiam Jočjo finis. - Kun mi proponos al vi unu demandon
ekster la bileto.

La feliĉo ne perfidis al Jočjo: la demando estis facila por li, ĉar li okaze memoris
respondi ĝin ĝuste.

- Sufiĉe! - la instruisto diris, kiel ŝajnis al Jočjo, per voĉo malkontenta. - Sidiĝu vi-
an lokon... Tamen diru antaŭe, - li aldonis, - ĉu vi longe promenis hieraŭ sur la insulo
kun la knabinoj?..

Jočjo silentis. Li penis silenti, ĉar li sentis, ke, se li parolos, li diros ion ofendan,
nekonvenan.

- Kiuj estas la fraŭlinoj?.. Almenaŭ tiu ĉarmulino, kiu indiĝis je la kiso?..

Jočjo obstine silentis. Post lia dorso estis audata rido de la kolegoj. Nur kiam la in-

struisto exsvingis per la mano, Joĉjo revenis sur sian lokon.

La instruisto longe pripensis, kiel taksi la koneyan respondon de Joĉjo kaj, fine, li pariĝ malnoblan agon, taksinte ĝin nur per la noto „bone".

La knabinoj tre maltrankviliĝis pri Joĉjo kaj kun malpacienco atendis lian revenon en la ĉambro de Olnjo, ĉar dum la reveno el la promeno, cedante al iliaj petoj, li promesis reni al ili tuj post la ekzameno. Lian triumfantan irmanieron ili rimarkis de malproksime tra la fenestro kaj rekrontis lin sur la ŝtuparo.

-Kian bileton vi prenis? - Sonjo demandis, jus li alproksimiĝis al la ŝtuparo. - Ĉu Olnjo ne erariS, parinte la antaŭdiron?

-Ĉu la instruisto mallaŭdis vin por la hieraŭa promeno?

-Ĉu feliĉe por vi finiĝis la ekzameno?

Joĉjo estis tute supersŭtita de la demandoj. Kaj kvankam li ankoraŭ neniom respondis al ili, ili jam konjektis je lia gaja vizaĝo, ke ĉio finiĝis bone por li. Ĉirkaŭita de la knabinoj triumfantaj kaj ĝojaj, li sidiĝis al la tablo de Olnjo kaj rakontis ĉion detale. Olnjo ordonis al la servistino, ke ŝi alportu teon en ŝian ĉambron. Tio ĉi, kiel memoris Joĉjo, neniam ankoraŭ okazis en la domo, ĉar oni manĝis kaj trinkis eksklusive en la manĝoĉambro. Sed pro la tiom neordinara okazintaĵo, en tiu ĉi ĵojo estis farita escepto - la teo por la gejunuloj estis aranĝita en la ĉambro de Olnjo.

Baldaŭ antaŭ la gejunuloj aperis bongustaj bakaĵoj, dolĉaĵoj kaj teo, kiujn ili konsumis apetite je gajaj senfinaj rakontoj pri impresoj de la memorinda antaŭtago.

XXXI.

Disiĝo.

Vespere de la dimanĉo Joĉjo devis por longe disiĝi kun la familio de s-ro Veselov. Granda, ductaĵa vaporŝipo „Espero", sur kiu ili entreprenis la vojaĝon al sia bieno, estis hele lumigita de elektraj lampetoj vidata de malproksime de la kajo, tra kiu Joĉjo rapidis sub ombro de mallumo. Ĉu prosparemo, ĉu speciale por doni ebLon al lernantoj promeni tra ĝi sentime dum ekzamenoj, ĉu pro ia kaŭzo alia, - ni tion precize ne scias; sed la kajo ĉe dum plej mallumaj noktoj neniam estis lumigata. Malgraŭ tio, ĝi, kutime, estis homoplena: ĉiuj ien rapidis, kuris tien kaj reen, laŭte parolis, insultis, ridis, puŝis unu la alian kaj samtempe ne povis vidi bone unu la alian. La kajo dum vespero malluma estis tre simila al granda formikejo maltrankviligita.

Tiamaniere, Joĉjo, rimarkita de neniu, trankvile atingis la vaporŝipon kaj supreniris la duan etaĝon, kie loĝiĝis unua kaj dua klasoj. Tie ĉi ankaŭ estis, kiel en por-

nikejo: en koridoroj mallarĝaj amasiĝis portistoj, ŝarĝitaj de grandaj valizoj, korboj kaj saketoj, klopodis vojaĝantoj, dislokiĝante en kajutoj, kuris rapide bufedservistoj, ŝarĝitaj de teleroj, manĝaĵoj, boteloj. Estis aŭdataj voĉoj de ĉiuj tonoj kaj humoroj: iu ploris, de ie el internaĵo de kajutoj aŭdiĝis gaja virina rido, ie oni laŭte disputis, iu kantis, el malfermita pordo de salono de dua klaso fluis pianinmuziko, senĉese sonoris elektrosonriloj kaj bruegis ie malsupre vaporo, eliluganta el vaporkaldronoj.

Jeĉjo eniris salonon de unua klaso. Ĝi estis luksa meblita, ornamita de grandegaj speguloj kaj blindige-lumigita de elektrolampetoj. Ĉe unu granda tablo li ekvidis la doktoron, kiu atente legis ian dikan libron kaj s-ron Veselov'on, kiu skribis rapidege en sia notlibreto.

– Vi faris bone, samideano-propagandisto, revenis ĉi tien, – li diris en Esperanto, etendante al Jeĉjo la manon. – Tie ĉi estas multaj vojaĝantoj inteligentaj, kiuj ne sole iam aŭdis esperantan parolon, sed antaŭ neniam aŭdis ion pri la lingvo mem. Nia interparolado en la lingvo nekonata sendube altiros atenton de kelkaj personoj; per ĉiu okazo la filino prenis por propagandaj celoj multe da propagandiloj kaj lernolibroj. Sidiĝu!

La doktoro forlasis la libron kaj alproksimiĝis al Jeĉjo.

– Mi delonge ne vidis vin, – daŭrigis s-ro Veselov. – Ĝojne, nun vi estas okupita de ekzamenoj? Ĉu vi prosperas en ili kun deca sukceso?

– Dum lastaj tagoj nia amiko, ĝojne, havas multajn sukcesojn, – enmiksiĝis la doktoro. – Sukcesojn interfraŭlinoj, sukcesojn en esperanta propagando kaj en la ekzamenoj. Kaj inter ĉiuj ili, t.-e., inter la sukcesoj estas intima kunligo...

– Tio ĉi estas laŭdinda! Mi konfesas, ke mi ne atendis de vi sukcesojn nur en la unua direkto, jus aludita de la doktoro kaj mi havas neniajn atestojn pri tio, jen kiam revenos ĉi tien la fraŭlinoj... Samideano doktoro, eble vi nenion havos, se mi proponos gratuli nian amikon kaŭze de liaj sukcesoj tiom diversplanaj? Ĉu mi povas postuli po unu glaso da bona ĉampanvino?..

La doktoro faris nekontentan mienon, sed post nelonge li jese ekbalancis per la kapo.

– Mi ne drinkos! – Jeĉjo eksprotestis.

– Mi ankaŭ ne drinkos, – ĝerce diris s-ro Veselov. – Ni nur gratulos vin kaj deziros al vi pluajn sukcesojn. – Kaj li ion eksflustris ruslingve al servisto.

– De auditu, kiel parolis romanoj... – diris la doktoro, – ili estas dubindaj. Ĉu ne? li demande ekrigardis la junulon.

– Mi... Mi ne scias... – Jeĉjo respondis mallaŭte.

– Por kio vi estas tiom modesta inter ni, mia amiko? – la doktoro daŭrigis. – Vi estu tia, kia vi estas en ĉeesto de la knabinoj!..

– Vi estas tro postulema, doktoro, – diris s-ro Veselov. – Sed kial vi opinias dubinday pluajn ekzamenojn de li en...

– Ĉu en la ekzamenoj ?.. – interrompis lin la doktoro. – Das ist eine alte Geschichte, kiel parolas germanoj. Vi vidu : Olnjo [redacted] hodiaŭ forveturas... La grafidinoj estas, sajne, ankoraŭ ne tiaj intimaj amikoj...

– Sed kian rolon en la ekzamenoj ludas Olnjo ? – s-ro Veselov demandis, ridante. – Mi tute nenion komprenas, mi tute nenion aŭdis ankoraŭ.

En la sama momento malantaŭe ekaŭdiĝis gajaj voĉoj de la knabinoj. Joĉjo tuj vigliĝis kaj, kiel pilko, forsaltis de sia seĝo renkonten al la voĉoj. En la salonon enkuris Olnjo, ĝoja kiel ĉiam, post ŝi sekvis la grafidinoj. Joĉjo vere ne rimarkis la ĉeeston, li koncentriĝis la tutan atenton je Sonjo. La knabino brue sidiĝis ĉe la tablo.

– Hodiaŭ ni havos ĉi tie, fraŭlinoj, propagandan esperantan vesperon, – diris s-ro Veselov. – Ni uzu sole nian lingvon kaj vidu, kiaj multenombraj najbaroj aŭskultas kaj evidente ne povas konjekti en kia lingvo estas la interparolado. Olnjo, la doktoro bedaŭras, ke vi forveturas el la urbo.

La knabino kun miro ekrigardis demande la doktoron.

– Ne, ne mi bedaŭras, – tiu respondis, – sed Joĉjo...

– Ankaŭ ni ! – diris Sonjo. – Karega Olnjo, restu ankoraŭ por kelkaj tagoj !

– Almenaŭ dum daŭras ankoraŭ la ekzamenoj de Joĉjo ! – aldonis la doktoro kun ridetanta mieno.

Ĉiuj ekridis.

– Fraŭlinoj, klarigu al mi, mi petas, kian kunligon sekretan havas Olnjo kun la ekzamenoj, – diris s-ro Veselov, – mi tute komprenas nenion. La doktoro scias ian sekreton, sed en via permeso, videble, li ne kuraĝas malkovri ĝin.

– Estas nenia sekreto ! – diris Olnjo. – Simple... mi nur unufoje aŭdiris al Joĉjo, pri kio ŝi estos demandita dum la ekzameno... Ŝi kredis al mi kaj nature ŝi preparis al la ekzameno ĝuste nur tion... kaj ŝi ne eraris !..

S-ro Veselov laŭte ekridis.

– Mi neniam rimarkis en vi, mia filino, tian kapablecon ! Kiu do nun, post via forveturo anstataŭos vin en tiu ĉi rolo ?

– Sonjo !.. – Olnjo diris mallaŭte, tamen aŭdeble por ĉiuj, tuj kaŝante sian ruĝiĝintan vizaĝeton post dorsoj de siaj amikinoj.

– Kiu diris tion al vi ? – laŭte kaj malkonstente-kolereme diris al si la fratino.

– Nenie diris al mi, mi mem antaŭvidas tion : Olnjo forveturos, mi, bedaŭrinde, tute ne scias antaŭdiri, restas sola vi... Kaj ĉu ni ne devas helpi al la bona knabo, kiu helpis al ni... – daŭrigis ŝi naivulino Olnjo.

La knabinoj ruĝiĝis kaj konfuziĝeme rigardis jen la naivulinon, jen unu la alian,

ed tiu daŭrigis, kvazaŭ rimarkante nenion:

– Kiu helpis al ni malsupreniĝi de la kruta jo, nek direktinte, nek makulinte niajn fe-

tajn vestajojn!...

– Sonjo, vi devas tiukaze helpi al la junulo! Mi petas vin! – diris la doktoro.

– Ankaŭ mi! – aldonis s-ro Veselov.

– Ankaŭ mi!... – laŭte tridante, aldonis Olnjo.

La servisto metis sur la tablon pruntojn kaj tri malgrandetajn glasetojn da vino.

– Mi volas drinki por pluaj sukcesoj de la junulo multepromesanta, – diris s-ro Veselov.

– Mi esperas, ke vi, fraŭlinoj, aliĝos al mi, ke vi devas aliĝi...

La servisto metis anstataŭ tri pli grandajn glasetojn da likvoro. S-ro Veselov stariĝis kaj,

levinte sian glaseton, diris:

– Mi drinkas tiun ĉi glaseton por pluaj sukcesoj en la ekzamenoj de nia komuna amiko-jočjo, ĉar ili havas grandan signifon por lia plua vivo! Mi drinkas ankaŭ por pluaj sukcesoj en la urbo, en tuta nia patrujo, en la tuta mondo de la henia elpensaĵo de honorinda doktoro Zamenhof! Sed pri la sukcesoj, kiujn aludis la doktoro, pri sukcesoj de jočjo inter la fraŭlinoj mi diros jenon: li devas nun neniom atenti iajn fraŭlinojn, ĉar mi, laŭ mia propra sperto, bone scias, ke neniu samtempe povas havi sukcesojn en lernado kaj en amindumado, – la unua ĉiam superos pro la dua! Ĉio estas bona nur tiam, kiam ĝi estas farata ĝustatempe. Nun estas ĝustatempe por li fervore labori por sukces-

plene fini la ekzamenojn, poste, postili, en Veselovo, kien li devos veni por gasti, estos ĝustatempa pliztado je vnabinoj. Mi ne havas kutimon inviti iun el gejunularo al mi en la bienon, ĉar tio estas ilia devo. Mi esperas, ke jočjo ankaŭ vizitos nin somere kaj tiam mi havos okazon pli detale priparoli la aferon. Sesamideanoj! Mi petas vin servi mian ekzemplon!

S-ro Veselov faris kapoklinon en planxon de siaj kunparolintoj kaj ekstrinkis la fluidaĵon. Ĉiuj sekvis lian ekzemplon, malpleniginte siajn glasetojn per negrandaj ~~sorboj~~ englutoj.

– Sesinjoroj!... – laŭtvoĉe anoncis eniranta vaporŝipservanto. – La vaporŝipo tuj fornaĝos! Se inter vi estas akompanantoj, ili rapidu forlasi la vaporŝipon!

En la salono ĉiuj komencis adiaŭi. S-ro Veselov ĉirkaŭprenis kaj kisis jočjon, ankaŭ la doktoro. Olnjo longe premis lian manon kaj petis, ke li ofte korespondu kun ŝi, akuratecaĵigadu ŝin pri stato de sanco de Julia Andreevna kaj nepre vizitu la bienon. Ŝi longe kisis la grafidinojn. Posteili ĉiuj eksploretis kaj longe flustris ion inter si.

Je malsupre ekaŭdiĝis unu post la alia tri tranĉsonaj ekbatoj je sonorilo, post kiu servis tondra fajfo longedaŭra de la vaporŝipo.

Forlasinte la vaporŝipon kaj kune kun ĝi, kiel ŝajnis al jočjo, ion karan, parencan, li longe ankoraŭ staris kun la grafidinoj surrando mem de la alborditejo. La forvetur-

ntoj-geamikoj ankaŭ staris sur randoj de balkono de la vaporŝipo kaj interŝanĝis kun li lastajn kondeziroj n kaj lonjge svingis per blanka naztuko j.

Kiam la vaporŝipo malaperis el la okuloj en norda mallumo kaj nur ĝiaj kolorlanternoj enkoraŭ, kiel steletoj en la ĉielo, briletis malproksime, Jočjo sidiĝis la grafidinojn en lungitan kaleŝon kaj akompanis ilin ĝis la domo.

– Jočjo, ĉu vi tre timas la morgaŭan ekzamenon? – Alnjo beluline demandis lin rtopreneme.

– Ĉu la instruisto de latina lingvo estas ankaŭ malbona, severa?... – aldonis ŝia pli malj unia fratino.

Jočjo trankviligis ilin ambaŭ, ĉar la ekzameno ekstere estis tute netimiga por li. Tamen la praŭlinoj trevolis scii ĝi morgaŭ pri rezultato de la ekzameno kaj ili inter- onsentis, ke Jočjo venu post tagmezo en la infanĝardenon, kie la grafidinoj promesis tendi lin. La ĝardeno estis vizitata nur de infanoj kaj vartistinoj kaj estis, sajne, sola endanĝera loko en la urbo por kunvidiĝoj similaj.

XXXII.

Ree unu malagrablaĵo!

Al la ekzameno de latina lingvo oni devis scii traduki laŭplačan fragmenton el tio, kion oni tradukis dum lernjaro. Tamen lernantoj, bone sciintaj la ingvon, ordinare tute ne preparis sin al la ekzameno, ĉar ili la instruisto proponis tra- uki iajn frazojn el libro tute ne uzata en la lernejo. Jočjo, ĝenerale šatinta studi lingv- jn, supiĉe bone sciis la lingvon.

Dum la ekzameno la instruisto proponis al li kelkajn frazojn, kiujn li tradukis tuj kaj enerare. Sed la rektoro, čeestinta la ekzamenon, ne estis kontentigita de la fragmentoj, radukataj el latina lingvo kaj ordonis, ke Jočjo traduku sur klastabulo unu simplan fragmenton de la Nova Testamento en latinan lingvon. La fragmento estis tre simpla kaj facile tradukebla kaj devis esti jene tradukita: „At illi dixerunt: Crede in Dominum Jesuum Christum..." Sed Jočjo delonge ne havis okazon skribi ion en tiu ĉi lingvo kaj, al- utiniĝinte opte skribi en Esperanto, komencis traduki la fragmenton ĝuste en Espe- anton: „Sed ili diris: Kredu je la Sinjoro...", tute ne rimarkante sian eraron.

La rektoro subite alkuris al la tabulo kaj, tremante pro indigno, ekkriis kolere me:

– Kion vi skribas?.. Ja neniu vorto estas ĝusta! Ĉu vi freneziĝis? En kia lingvo vi skribas?

Jočjo konjektis sian eraron kaj rapide forviŝis ĉion skribitan.

Kvankam li poste tradukis la fragmenton ĝuste kaj senerare, tamen la rektoro posta- is, ke Jočjo diru en kia lingvo li skribis. La sekreton Jočjo ne volis malkovri, tamen li ankaŭ devis ion respondi al la severulo, kiun timis eĉ ĉiuj instruistoj, kaj li, ne šatinta

mensogi, decidis je tiu či fojo uzi mensogon kaj diris, ke li iom studas svedan lingvon.

– Svedan lingvon ?.. – severe kaj kun miro, ekkriis la estro, parante specialan akcenton sur la unua vorto, kvazaŭ li neniam antaŭe aŭdis pri ekzistado de tia lingvo. – Sed ĉu permesis al vi studi ĝin ?.. Ĉi ja necstas inter la lingvoj, kiuj estas permesitaj por studado de la lernantoj !..

Pro tiuj fojo ne sciis, kion li devis respondi. Tamen li dankis sorton: se li ne mensogis kaj diris la veron, li tute pereus.

– Kie vi trovis lernolibron de sveda lingvo ? Kiu donis ĝin al vi ?.. – li daŭrigis la demandadon ĉiam pli kolere kaj trudeme.

– Ali... trovis ĝin tute okaze, – fojo respondis kulpe. – Ali nur malmulte studis ĝin...

– Alportu la lernolibron al mi ! Tiun ĉi lingvon scias neniu el viaj estroj kaj instruistoj, ial ankaŭ vi ne devas studi ĝin... Hodiaŭ alportu al mi la lernolibron !.. Sidiĝu !

En malbona humoro fojo iris en la ĝardenon, kie devis atendi lin la feliĉaj knabnoj. Li guste nomis ilin feliĉaj, ĉar ili efektive estis tiaj: ili povis promeni kiam kaj kie ili volis, ili povis ankaŭ studi kian ajn lingvon tute senpune, sed li ?.. Se oni malŝatis lin pro studado inajata de sveda lingvo, do kion oni entreprenus kontraŭ li, sciiĝinte, ke li studas lingvon internacian „Esperanto" ?

Li eniris en la ĝardenon. Ĝi estis granda kaj bela. Ĝis krevintaj burĝonoj de arboj estis hele-verdaj kaj bonodoris, kvankam malsupre sub branĉoj de la arboj oni ankoraŭ ne povis trovi rifuĝejon de seninduloge-bruligintaj sunradioj. Laŭ larĝa vojeto, surŝutita de sablo, fojo iris ĝis fontano, serĉante per la okuloj la grafidinojn, sed ili neniie estis videblaj. Li viziris jam konatan al li laŭbon, starintan sur pitoreska monteto ŝtonparita, rekrevenis al la fontano, ĉirkaŭiris la tutan ĝardenon – la fraŭlinoj estis neniie.

Pro frua horo la ĝardeno estis ankoraŭ preskaŭ tute senhoma, nur iafoje estis renkontataj gekznaboj, kurintaj laŭ vojetoj kaj unu vartistino, kiu vetiriĝis en malgranda ĉirkaleĉo etulon.

Fojo sidiĝis sur benkon apud enirejo mem de la ĝardeno kaj enpensiĝis. Se Alnjo ne forveturus, li tuj irus al ŝi kaj sciigus al ŝi sian malĝojon, sed ŝi forveturis kaj estis neniu, antaŭ kiu li povus malkovri sian animon por plifaciligi ĝin. La grafidinoj, Sonjo ?.. Sed guste ŝin li tiel atente kaj vane serĉis tra la tuta ĝardeno, kaj ĉu ŝi venos ?.. Kaj nun, atendante ŝin, kvankam la fratinoj ĉiam estis kune, kaj kliniĝinte super la benko, li senkonscie kaj peneme skribis sur ĝi krajone ŝian nomon. Li tiel profundiĝis en la laboron, ke tute ne rimarkis, kiel subite la fraŭlinoj aperis antaŭ li.

– Ĉu vi delonge atendas nin ? – Sonjo demandis, amike etendante al li la manon. – Vi malfruiĝis... sed se vi nur vidus, kiel ni rapidis !..

– Ni kuris, sed ne iris ! – aldonis Alnjo, sidiĝante maldekstre de li sur la benkon. – Nu,

ĉi pasis via hodiaŭa ekzameno? Ĉu sukcese?..

Jocĵo silentis, fikse rigardante Sonjon. Ŝi estis ĉarma en sia bela blanka vestaĵo, zona de larĝa kolora rubando. La samkolora rubando beligis ŝian pajlĉapelon, el-sub ku estis vidataj buklringoj. La rnabino malfacile spiris pro la rapidiro kaj ŝiaj vangetoj diketaj estis pli ruĝetaj, ol ordinare.

-Jocĵo, prenu la sunombrelon, mi petas, mi tre laciĝis,- Sonjo daŭrigis etendante la ombrelon kaj sidiĝante apud li je la dekstra flanko.-Kiel vi estas tiom enpensema kaj silenta hodiaŭ? Ĉu vi havis sukceson dum la ekzameno?

Ĉiam rigardante la fraŭlinon kaj faluze ŝirmante ŝian vizaĝeton kontraŭ la suno, Jocĵo komencis gaje rakonti, kvankam nenio gaja por li aŭ por la fraŭlino estis en la rakonto. Simple li ĝojis, ke ŝi ree estis kun li, ke li ree povis, kiom li volis, admiradi ŝin. Li rakontis pri sia erarskribo, sed prisilentis ĝiajn postsekvojn.

-Donu la sunombrelon!-ŝi diris.-Ni iru en la laŭbon, tie ĉi oni povas facile rimarkin.

Sed Jocĵo nek volis redoni al ŝi la ombrelon, nek forlasi la lokon. Li petis, ke ŝi permesu li ankoraŭ iom da tempo resti ŝia servanto.

-Se tio ĉi plaĉas al vi,-ŝi diris, ĉarme ridetante,-vi servu. Sed kial vi preferas min? La fratino same laciĝis... Nun diru al mi, kion vi faris ĉi tie, atendante min?

-Kion mi faris?.. Nenion!..

-Vi estis tia enpensema, mi rimarkis...

-Kaj kliniĝinta super la benko,-Alnjo aldonis.-Vi kvazaŭ skribis ion sur ĝi...

Subite ŝi leviĝis de la benko kaj laŭte ekkriis pro miro:

-Rigardu, kion li faris! Kara Sonjo, la tuta benko estas plenskribita de via nomo!..

Sonjo nenion respondis kaj eĉ ne ekmoviĝis de sia loko. Nur laŭ ŝia vizaĝo estis rimarkeble, ke tia atento, kiun Jocĵo dediĉis al ŝi, estas plaĉanta al ŝi.

-Sonjo!-Alnjo daŭrigis,—Ĉu vi ne kredas?.. Rigardu!..-kaj perdinte esperon, ke la fratino obeos al ŝia voko, ŝi stariĝis ĝuste kontraŭ Jocĵo kaj diris:-Jocĵo, ĉu vi ne scias mian nomon? Kial vi ne skribis, kune kun tiu de la fratino, mian nomon?..

-Mi ne havis tempon...

-Vi havis tempon por centfoje skribi la nomon de la fratino, sed vi ne havis ĝin por skribi almenaŭ unufojon la mian?.. Kial vi tenas nun ŝian ombrelon, sed min tre malŝatas, ĉu vi ankaŭ ne havas tempon?

-Sufiĉe!.. Vi parolas tro laŭte. Ni iru la laŭbon!-diris Sonjo, leviĝante de la benko. Kaj ŝi triope ekpaŝis tra la ĝardeno.

-Frankviliĝu, grafidino,-Jocĵo diris al Alnjo.-Mi tuj skribos vian nomon sur ĉiu benkoj de la laŭbo.

-Mi ne volas tion, mi ne permesos!..

Tiu ĉi negrava okazintaĵo ĉion dipektis. Alnjo grimace kuntiris la lipetojn kaj plu ne-nion parolis. Sonjo, kvankam ŝi estis parolema kaj gaja, kiel ĉiam, en la laŭbo jam ne sidiĝis apud Joĉjo. Li intencis diri al ŝi ion pri tio, kion li sentis kaj pensis, dum li atendis ŝin, sed en apudesto de Alnjo tio estis neebla. Ili sidis kelkajn minutojn kaj disiĝis. Antaŭ la disiĝo Joĉjo ĉe ne havis kuraĝon demandi Sonjon, kiam kaj kie li povos esperi je nova intervidiĝo.

XXXIII.

El la taglibro.

La 12-an de Majo.

„La ekzamenoj baldaŭ finiĝos kaj estas jam proksima tiu tago, kiam mi forlasos la urbon enuigan kaj sufokan. Lastaj ekzamenoj estas por mi pli- malpli sukcesaj, sed ĉu povis okazi alie? Kun mi atente min preparas al ili kaj tutajn tagojn mi pasigas studante lernolibrojn. Kur fiziko, el kiu mi scias absolute nenion, iom maltrankviligas min. Sed, eble, Dio helpos al mi. Al nenium vizitas, krom Julia Andzeevna, kiu, kompreneble, estas jam ne zesanigebla, - sed tiuj ĉi vizitoj al la malsanulino estas tre malagrabla, ĉar ili pezmesas nek longe resti apud ŝi, nek maltrankviligi ŝin per paroloj.

La knabinojn mi ne vidis jam delonge, kvankam ĉiuj oje, revenante el la lernejo post. ekzamenoj, mi tre atente rigardas preterirantojn, esperante renkonti ilin (legu ŝin!) okaze, mi intence vizitas la ĝardenon kaj ĉiuje esploras tie ĉiujn vojetojn, la laŭbon kaj kun premegata koro nepre sidas iom da tempo sur la benko, sur kiu mi lastfoje amrigardis ŝin. Nun mi jam estas senigita je tiu ĉi plezuro, anstataŭ ŝi mi rigardas nun nur ŝian nomon, skribitan de mi sur la benko! Ĉiuje, sidante tie, mi rememoras, kiel felica mi estis tiam, - tiam ja mi atendis nepre-an ŝian venon, kaj nun kiom ajn da tempo mi sidus, mi ne ekvidos ŝin!

Hodiaŭ, kutime, mi ankaŭ vizitis la ĝardenon kaj kutime mi ne renkontis tie tiun, kiun amas mia koro. Jes, mi amas ŝin! Jes, mi sentas tion delonge. Ŝi estas mia unua amo kaj estas maldolĉe konstati, ke ĝi estas tiom ne prospera por mi. Foriranta el la ĝardeno, por unu minuto mi sidiĝis sur la benkon, aldonis al la nomoj de ŝi, skribitaj antaŭe, ankoraŭ unu kaj volis jam forlasi ĝin, kiam antaŭ mi haltis ia virino lukse vestita kun knabeto, kiun ŝi tenis je la mano. Ŝi estis la edzino de la kolonelo, veninta por promeni kun la fileto. Laŭ ŝia propono, mi akompanis ŝin. Dum la promeno ŝi sciigis min, ke ŝia edzo antaŭ nelonge vidis la rektoron kaj en sia konversacio kun li, li aludis mian allogiĝon je la lingvo, kiun mi tiam nomis sveda. La kolonelo pravigis min, montrinte al la rektoro, ke mi estas tre sciama knabo kaj allogiĝema, ke la lingvo, ellernita de mi ne estas

lasreda, sed Esperanto, kiun nun lernas multaj seriozaj kaj fidindaj homoj, ke en tiu ĉi mia ago estas nenio mallaŭdinda aŭ puninda.

– La edzo tre bedaŭras, ke vi ankoraŭ ne forlasis tiun ĉi lingvon, kiu povas kaŭzi al vi ankoraŭ multajn malagrablajojn! – Ŝi finis sian parolon.

La rektoro tre ŝatas kaj estimas la kolonelon kaj nun mi estas trankvila, – la ekzamenantoj dum la ekzamena finiĝos por mi senpune..."

.....

.....

.....

La 15-an de Majo

„Nun estas noktmezo, tamen mi antaŭ nelonge revenis hejmen. Hodiaŭ mi havis ekzamenon el matematiko, kiun mi venkis triumfe, kvankam mi ne ŝatas tiun ĉi sciencon malsaĝan kaj kaprompan.

Post la ekzameno mi renkontis en la koridoro la rektoron. Feliĉe, li rimarkis min tre malfrue: kiam li intencis haltigi min, mi estis jam forkurinta malproksimen. Tiamaniere, mi evitis renu malagrablan renkontiĝon. Sed alie ja ne povis okazi, ĉar hodiaŭ estas tago de ekskluzive agrablaj renkontiĝoj.

Mi ne povis ankaŭ hodiaŭ preteriri la ĝardenon kaj forlasi ĝin ne esplorita, kvankam mi tutime, ne renkontis tie tiun, <u>kiun</u> mi delonge soifas renkonti. El la ĝardeno mi iris al Julia Andreevna. La maljunulino hodiaŭ estis komuniita de la S. Oferdonaĵoj kaj ŝmirita de sanktigita oleo, pro tio ŝi estas animtrankvila kaj pli vigla, ol antaŭe, malgraŭ tetura malforteco, kiu ne forlasas ŝin. Ŝi jus ricevis grandan leteron de Olnjo, kiun ŝi permesis al mi tralegi. La knabino sciigas, ke ŝi multe laboras en florĝardeno, tamen Esperanto ankaŭ ne estas forgesita. Baldaŭ Veselovo'n komencos viziti gejunularo kaj ŝi antaŭ ilia veno preparas specialan ĉambron, kie estos konstanta esperanta ekspozicio, ankaŭ estas organizata de ŝi verdado de esperantaj lernolibroj, vortaroj kaj ekt. en ĉiuj vaporŝipoj de la rivero. „Por Joĉjo, – ŝi skribas, – jam estas ankaŭ destinita speciala ĉambro, kie mankos nenio por liaj amataj laboroj." Naivulino!.. Kvazaŭ ŝi ne scias tion, ke mi ne povos longe logi en ilia bieno, kaj por nelonga, relikta ĝa mea gastado, la ĉambro estas tute superflua... Nenio tiras min en Veselovo'n!..

Montriĝis, ke en nia urbo gesamideanoj estas pli multaj, ol kiel mi supozis. Nur estas bedaŭrinde, ke ili sekvas mian ekzemplon, – ne uzas signeton esperantan. Elirante de la malsanulino, mi renkontis en strato la leŭtenanton, kiu iris kun fraŭlino. Li amike salutis min kaj apable konatigis min kun la fraŭlino. Kvankam ŝi konis nek min, nek Olnjon, tamen ŝi jam delonge studis mian lingvon kaj havis korespondadon kun eksterlandaj samideanoj. Bedaŭrinde, ŝi tute ne povis paroli en la lingvo. La fraŭlino estis malĝoja: hodiaŭ ŝi ricevis belan albumon de vidaĵoj de ia belga urbo

paj unu numeron de franca jurnalo „L'Etranger", kiu donas sur siaj paĝoj lokon ankaŭ por artikoloj en nia lingvo. La fraŭlino estis ravita de la ricevitaĵoj kaj kun piereco montris ilin al sia onklo, kiu estas ĝendarmoficiro, esperante, ke li inde taksos ilin. Sed li montriĝis homo malkleraj kaj tro singardema: li ne aprobis interrilatojn de la nevino kun alilandanoj kaj la jurnalon li opiniis tre danĝera kaj suspektinda, pro tio li antaŭ la okuloj de la fraŭlino dissiris ĝin je pecetoj. Tiu ĉi cirkonstanco estis kaŭzo de la malĝojo de la fraŭlino. Ŝi tute ne supozis, ke estas en la mondo tiaj azenoj, kiuj povas agi tiamaniere, sed min mirigis pli la leŭtenanto, kiu proponis al la fraŭlino, ke ŝi de nun sanĝu sian adreson kaj ricevu esperantajn korespondaĵojn laŭ lia adreso; - la leŭtenanto faris tre heroaĵon kaj konservon al ŝi kaj al nia afero. De nun la fraŭlino povas esti trankvila - ŝiaj korespondaĵoj neniam plu trafos en la manojn malpurajn de la onklo zorgema.

Kun la leŭtenanto mi iris la bulvardon kaj poste la kajon. Inter promenintaj tie urbanoj estis multaj fraŭlinoj, sed nek Sonjon, nek Alnjon mi rimarkis tie. Ĉapeletoj, rubandetoj koloraj kaj elegantaj vestaĵoj de knabinoj, tre similaj al tiuj, kiujn mi kelkfoje vidadis sur la grafidinoj, senĉese aperadis kaj malaperadis antaŭ mi kaj mia koro malfeliĉa multfoje komencadis bati maltrankvile, esperante tuj ekvidi ŝin.

Mia akompananto rimarkis mian maltrankvilecon kaj, feliĉe, li komprenis ĝin malĝuste, - li opiniis, ke mi timas kunpuŝiĝi en tiuj ĉi loĝoj malpermesitaj por mi iun el la instruistoj. Ni jam longe marŝis silente: li senĉese salutis renkontiĝintajn oficirojn kaj fraŭlinojn konatajn, mi do estis tute profundiĝinta en la vanan serĉadon. Fine, ni atingis la kajon, kie la leŭtenanto estis devigita forlasi min. Ni disiĝis tre amike kaj promesis post nelonge renkontiĝi en Veselovo.

Restinte sola, mi longe staris senmove, min apogante je fera kajbalustrado, kaj observis la riveron, fluintan malsupre. Laŭ ĝia spegula supraĵo senĉese glitis boatoj kaj vaporŝipoj, aŭdiĝis bruado de vaporŝipradoj kaj diversstonaj fajfoj kaj post la rivero, kiel grandega, senĉesa interrompa ĝardena sonĉa, verdiĝis senfinaj arbaroj kaj herbaroj, sur kiuj nur iafoje estis apenaŭ videblaj vilaĝaj domĉetoj. Al mi, kiu naskiĝis kaj pasigis la infanecon en kamparo, tiu ĉi helverda pejzaĝo estis multe pli kara, pli alloga, ol la urbo polva kaj senigita je riĉa kreskaĵaro. Jam post iom miaj pensoj forportis min nerimarkeble en Veselovo'n, kiun mi ankoraŭ tute ne konas, sed kiu, pro rakontoj, opte aŭditaj pri ĝi, ŝajnis al mi ia paradizo, aŭ ia sonĉa lando nur imagebla. De Veselovo, de Olnjo, kiu subite antaŭstaris antaŭ mia imago, kiel bona genio de Esperanto kaj ĝia propagando, pensoj transportis min en la naskiĝlokon. Per okuloj spiritaj mi klare vidis la parencajn vizaĝojn kaj per oreloj animaj mi aŭdis gepatrajn parolojn. Mi subite klare ekvidis nian ombroriĉan ĝardenon apud la domo. Arboj, kiujn mi vidis lastfoje, forlasante la hejmon, duonnudaj kaj vestitaj je funebra ornamo aŭtuna, staris nun en riĉa festa vestaĵo kaj ilia foliaro sennombra kaj flora, brilintaj inter ĝi, bonodoris kaj komunikis ~~[illegible]~~ tiom konatan

al mi viglecon kaj ĝojon. Sub longaj kaj dikaj branĉoj de pomarbo maljuna, tra kies den-
sa foliaro neniam penetras radioj de la suno bruliga, „ili" sidas ĉe tablo, sur kiu ber-
as monotone samovaro. Sed ilian atenton altiras nek la naturo cirkaŭa, nek flan-
kaj paroloj aferaj, ne! Ĉiuj pensoj kaj paroloj de ili estas direktitaj al la filo, kiu mal-
oksime en la fremda urbo sukcesa nun „superas" kaj senzipoze laboras por fini kun
deca triumfo siajn ekzamenojn kaj poste pasigi la someron en la parenca familio.

„En kia tago okazos la 5-a de Junio?" - la patro demandas, per sia mano maldika,
ulkabunda, ordiganta la barbon larĝan kaj grizan. - „Ĉu en dimanĉo?.."

„Ĝuste en dimanĉo..." - la patrino respondas, fikse rigardante la edzon kaj pen-
ante diveni, kion li intencas entrepreni. Ŝi scias laŭ sperto, ke li neniam demandas
on vane, senkaŭze, - ankaŭ nun. - „Por kio vi demandas ĉi tion?"

„Mi mem veturos en la urbon por renkonti Joĉjon ĉe vaporŝipo."

„Vane!" - la patrino provas kontraŭparoli, kvankam ŝi bone scias, ke ŝia kontraŭpa-
rolo, kiel ĉiam, restos sen rezultato. - „Vi nur laciĝos kaj malsaniĝos de la vojaĝo; rigardu,
kia sekeco kaj polvo estas cirkaŭe! Ĉu Solovej ne povas anstataŭi vin? Krom tio ne forgesu, ke
en la dimanĉo diservo finiĝos malfrue... Do kiam vi veturos?.."

La patro fetas malkontentan rigardon al la edzino kaj nervoze ekfrapas per la man-
plato je la tablo, - kio signifas, ke li ne forlasos sian intencon.

„Ĉu vi ne scias", - post nelonge li daŭrigas jam per tono trankvila, - „ke vaporŝipo ven-
as vespere? Sekve, mi havos tempon por ĉio. Returnen ni veturos vespere, tiam varmego jam
forestos... Ni haltos, preterveturante, en Nikulskoje; mi delonge jam ne vidis patron Ni-
kolaon."

„Tion ĉi vi povus pariiam alifoje..." - la patrino zorge malkuraĝe provas kontraŭparoli.

„Memafere, la knabo senpacience atendas tiun momenton, kiam li, fine, ekvidos la ge-
patrojn... Lija forestas el la hejmo de la aŭtuno..."

„Vi havos ankoraŭ sufiĉe da tempo por vidi lin..." - la patro interrompas ŝin kaj ler-
ĝas. Tio ordinare signifas, ke oni povas plu ne paroli pri la sama objekto.

Patro Nikolao, maljuna pastro, estas amiko de la patro, kiun kaj kiam ajn li veturus
preter Nikulskoje, li nepre haltas ĉe li por iom da tempo kaj inter ili, sajne, delonge ekzis-
tas sekreta intenco parenciĝi. Almenaŭ, la patro ofte aludas al mi liajn filinojn - kon-
fuziĝemajn dikulinojn, kiuj ŝajnas al li idealaj fianĉinoj. La patrino, eble, ne scias pri
la intenco, sed ŝi antaŭsentas ĝin kaj ĵaluzas min al la pastro, kiun ŝi ŝatas, ankaŭ al
liaj familianoj, pri kiuj ŝi scias ankaŭ nenion malbonan.

Ĵus la patro forlasis sian lokon, al la patrino malkuraĝe jam alpremiĝis miaj gefra-
toj plijunaj.

„Panjo, ĉu estas vero, ke baldaŭ venos Joĉjo?"

„Kiam, panjo, venos Joĉjo?.."

La patro marŝas apude, duonvoĉe kantante ian himnon.

– Nemeka, Nemeka!.. – subite mi aŭdas post mi konatan voĉon knabinan kaj extremas. Kiel tra dormo profunda mi aŭdis senĉesan movadon kaj bruadon de promenintoj post mia dorso, ilian diversvoĉan paroladon, sed ili neniom malhelpis al mia revado, neniom tuŝetis mian atenton, sed tiu ĉi voĉo konata...

Kun granda peno mi rektiĝis, – la dorso kaj la piedoj doloris prolonga senmova kurbiĝostarado, – kaj rerigardis kun la koro batanta. Apud miaj piedoj ĉirkaŭflaras peneme postsignojn malgrandeta Nemeka – la hundeto de grafino Irino kaj en relkaj pašoj, tenante je la mano la onklinon, kiu, nigre-vestita, šajnas malĝunulino, staras Alnjo kaj daŭrigas alvoki la hundeton, kiu ne volas foriri de mi.

– Malbona Nemeka!.. – la onklino murmuras. – Vi agas nekonvene, plu mi neniam prenos vin al promenoj... Ĉu oni povas?..

– Joĉjo!.. – la knabino ekkriis ĝoje kaj kun mizo. – Jen estas la sekreto: Nemeka rekonis Joĉjon kaj ne volis foriri de li.

Mi salutas la konatulinojn kaj pašas kun ili laŭlonge de la kajo. Alnjo estas beleta, kiel angeleto. Šiaj vangetoj brulas je ruĝaĵoj, la ĝoja vizaĝeto senĉese ridetas kaj petolulo venteto faluze ludas per šiaj molaj haretoj kaj rubandetoj de la ĉapelo. En pura stilo Zamenhofa la knabino babilas gaje kaj rakontas al mi okazintaĵojn de la lastaj tagoj, de kie mi sciiĝas, ke Sonjo forveturis neatendite Krimeon kun la patro malsana je akompano de grafino Eŭdokia. Grafino Irina ĉiam silentas, ŝi zorgeme observas sian Nemeka'on, ke ĝi ne perdiĝu en la popolamaso kaj, de tempo al tempo rigardante niajn ĝojajn, ridetantajn vizaĝojn, aprobe balancas per la kapo jen al mi, jen al la knabino. Nekonatulo povas imagi, ke ŝi aŭskultas nin atente kaj partoprenas nian ĝojon, sed memafere ŝi nur sin šajnigas, ke ŝi komprenas la paroladon, ŝi ~~nur~~ ĝuas la liberan fremdlingvan babiladon nur pro tio, ke ĝi estas fremdlingva.

– Joĉjo! Ŝi ja tute ne komprenas Esperanton. Ŝi entute komprenas nenian lingvon, krom la rusa, – parolas la knabino.

Kaj la onklino responde ridetas kaj kortuŝe jese balancas per la kapo.

Nerimarkeble, pašo post pašo sekvante la praŭlinojn, mi vizitas komence puntmagazenon, kie ili longe serĉas puntojn bezonajn, poste ĉasmagazenon, kie la grafino aŭ longe elektas kaj prove vestas novan kolrimenetonpor Nemeka, poste apotekon, tabakmagazenon, sukeraĵvendejon kaj cet. Ĉio aĉetita estas senpeze kaj tuj enmanigata al mi, mi nerimarkas, ke mi iom post iom fariĝas simila al šarĝbesto pro multaj aĉetaĵoj portataj kaj kun timo konstatas, ke la tago pasis, ke restas nur unu tago, dum kiu mi devos trastudi dikan lernolibron de fiziko, kiun, kompreneble, mi ne šatas kaj, pro tio, ne scias.

Alnjo, kvazaŭ konjektinte miajn pensojn malgajajn, subite demandas zorgatak-

ite:

– Joĉjo, ĉu vi jam havis ekzamenon el fiziko? Ni tute forgesis sciigi al vi ion... tre grave!..

Kaj, cirkaŭrigardinte, malkonfidence preterizantojn, kvazaŭ timante, ke oni aŭdos la parolon, ŝi aldonas malaŭte, mistere:

– Al tiu ĉi ekzameno vi studu nur la 23-an bileton!.. Ĉu vi aŭdas? Nur, sole la 23-an!.. Sonjo antaŭ sia forveturo mem sonĝis... Ŝi sonĝis, ke vi ricevis dum la ekzameno ĝuste tiun ĉi bileton... Ŝi multe maltrankviliĝis, ke ŝi mem neniel povis sciigi al vi tion ĉi...

– La 23-an, la 23-an!.. Sonjo sonĝis ĝin!.. Sonjo, kara knabino Sonjo min sonĝis!.. mi flustris senĉese, revenante hejmen el la longedaŭra promeno.

Mi estis tiel agrable surprizita de la lasta sciigo de la knabino, ke mi forgesis ĉi dankri ŝin por ŝiaj zorgoj pri mi, mi forgesis peti ŝin, ke ŝi skribu al Sonjo saluton de mi, mi forgesis demandi ŝin, kie kaj kiam ni povas renkontiĝi. Jen kiom da plej nepardonebla j eraroj mi faris tuj, ĵus mi sciiĝis, ke zorgis pri mi, sonĝis min Sonjo, la grafidino, tiu knabino, kiun mi...."

XXXIV.

Kompenso.

La 30-an de Majo Joĉjo skribis en la taglibro:

.....

.....

– Pri kiu vi intencas paroli al ni?.. – demandis instruisto de fiziko mian antaŭulon Slatin'on, ĵus mi alproksimiĝis al la tablo por preni mian bileton N 23-an.

Li estis bona knabo, sed maldiligentulo nekorektebla. Kiel ĉiam, ankaŭ antaŭ la ekzameno el fiziko, li „ne havis tempon" trastudi la tutan lernolibron kaj kontentiĝis je war unuaj biletoj, esperante, ke feliĉo, kiu oni tre favoris al li, ne forlasos lin ankaŭ je tiu ĉi fojo. Sed, hove, estis rimarkeble, ke je tiu ĉi fojo ĝi tute perfidis al li: li grimacis (kompreneble, kiam neniu el la ekzamenantoj rigardis lin), skuis la kapon kaj ne povis trovi konvenan lokon por la manoj, kiujn li metis jen en poŝojn, jen post la dorson, jen gratis per ili la kapon kaj apenaŭ videblajn lipharojn. Mi longe observis lin kaj, kore bedaŭrante la malfeliĉulon, kiu, videble, ankoraŭ ne havis knabinon, kiu sonĝis lin kaj antaŭdiris al li biletojn studotajn por ekzamenoj, prokrastis preni de la tablo mian bileton. Fine, la instruisto ĝentile riverencis al mi kaj plej afable diris:

– Volu preni bileton! Elektu, kiu plaĉas al vi...

Mi faris rapidan manmovon kaj kuraĝe prenis tiun, kiu kuŝis en mezo mem de la tablo, esperante, ke ĝi estas ĝuste tiu, kiun sonĝis Sonjo. Sed, ekrigardinte la bileton, mi

ekstremis pro malvarmo interna, ĝi estis la 33-a - pri magneto kaj elektromagneto, pri kiuj mi havis neniam scion, neniam ideon.

Tiatin ekrigardis min envieme, sed tuj, rimarkinte laŭ mia mieno, ke mi ankaŭ preni's bileton ne konatan, ekspiris pli facile kaj komencis malrapide, tirate:

- Pri... pri telegrafo... - kaj li ektusis.

- Bone, - diris la instruisto, kiam li fine transviliĝis post la tusado, tiel neatendite aperinta de ie. - Rakontu al ni, kion vi scias pri telegrafo.

- Telegrafo!.. Telegrafo... - li vigle komencis, sed tuj silentiĝis kaj jam per voĉo malkuraĝa kaŭrigis post ioma paŭzo: - Mi... mi, sinjoro instruisto... estis malsana, kiam oni lernis pri telegrafo...

- Sekve, vi tion ĉi ne scias? - la instruisto vigliĝis. - Sekve, vi ne studis tiun ĉi bileton al la ekzam..

- Mi... mi, sinjoro instruisto... mi ne havis tempon.

- Bone!.. Sed kiom da biletoj vi trastudis antaŭ la ekzameno?

- Mi... kvar...

- Nur?..

- Nur!.. Mi... mi, sinjoro instruisto...

- Mi scias, ke mi estas sinjoro instruisto, sed ni parolu pri telegrafo. Ĉu vi tute nenion scias pri ĝi? Ĉu vi neniam vidis ĝin?..

- Mi scias... Mi vidis. Mi... sinjoro instruisto...

- Se vi scias pri ĝi, nu, vi diru ion pri ĝi. Nu, kio estas telegrafo?.. Jam tio ĉi estas tre simpla afero.

- Telegrafo... telegrafo estas... ĝi estas kolonoj, sur kiuj...

Laŭta rido nedeteneble de la kolegoj ekraŭdiĝis responde post miaj dorsoj.

- Sufiĉe!.. Iru sur vian loko n! - la instruisto diris.

Tiatin penis diri ankoraŭ ion por sin pravigi, petis, ke oni demandu lin pri io alia, sed la instruisto estis nepetegebla. Li faris en la listo noton „plej malbone" kaj fiksis sur min sian rigardon.

- Vi pri kio parolos al ni?

- Pri magneto kaj elektromagneto...

- Bone!.. Rakontu... Kia estas diferenco inter ili?

Mi eloxvente silentis.

- Ĉu vi ne scias tion ĉi?

Mi silentis.

- Nu, diru al ni, kio estas magneto?

Mi sulkis la frunton, streĉis memoron, penante almenaŭ ion ekmemori pri la demandata objekto, sed helpis neniio.

– Demandu lin pri io alia, – diris lia kolego, ankaŭ instruisto de matematiko kaj fiziko. – Eble, li rakontos al ni pri telegrafo?..

La instruisto respondo klinitis al li kaj longe ion flustris en lian orelon, ridetante. Poste ili ambaŭ ekridis kaj ekrigardis min kun malicaj mienoj.

– Kial vi silentas, ĉu vi neniam vidis magneton? – demandis la unua.

– Ĉu vi neniam sentis forton de magnetaltirado? – aldonis la dua. – Oni parolas, ke kelkajn junulojn ĉe diem sezono de ekzamenoj io tiras al promenado kun fraŭlinoj, – ĉu tiu ĉi forto ~~altiranta~~ altiranta estas magneto?..

Mi decidis silenti kaj ne atentis, kion ili parolis. Mi nur bedaŭris, ke mi tiel facilanime fidis al la knabino, kiu kredeble forgesis la ĝustan numeron de la bileto, kaj malpacience atendis, ke oni pli baldaŭ liberigu min de la turmentado, resendante min sur la lokon.

– Ĉu vi ne preparis al la ekzameno tiun ĉi bileton?

– Ne!..

– Kiom da biletoj vi preparis?..

– Unu...

– Nur?..

– Jes...

– Kian? Ĉu la unuan?..

– La dudek trian!..

– Ĉu la dudek trian? – la instruisto miris. – Strange! Kial vi preparis ĝuste ĝin? Eble, iu antaŭdiris al vi tion?..

Mi silentis.

– Vi ĉiam silentas kaj ni vane perdas tempon, parolante kun vi... Iru sur vian lokon!

Kian noton mi ricevis en la listo, mi ne scivolis.“

.....

.....

La 3-an de Junio.

„Mi jus revenis de ekzameno el greka lingvo. Tiu ĉi ekzameno estas la lasta. Tuj post ĝi devos okazi kunveno de ĉiuj instruistoj por konsiliĝa kunsido kaj vespere ĉiuj lernantoj devos reveni en la lernejon je lasta fojo por sciiĝi decidojn de la kunsido kaj por ricevi forpermeson.

La koro estas premita... je tiu ĉi fojo mi vizitis nek la ĝardenon, nek la malsanulejon. Adiaŭos mi kun la lasta vespere, kiam mi sciiĝos rezultatojn de la ekzamenoj. Nokte mi forveturos“.....

.....

La 4-an de Junio.

„Malĝlare antaŭsentante ion malbonan, atendantan min, mi malfrue venis vicaŭ vespere en la lernejon. Ĉiuj lernejkolegoj jam estis tie. Plimulto de ili estis ĝoja kaj ĉiuj malpacience atendis aperon de la inspektoro, vagante laŭlonge de la koridoro kaj deniganta supokan aeron per laŭta interparolado kaj vigla rido.

– La rektoro vokis vin!..

– Iru pli rapide en la administrejon!..

– Vin delonge oni jam serĉas! Iru tuj en la administrejon!..

Mi ekaŭdis de ĉiuj flankoj, ĝis mi eniris en la koridoron.

La administrejo de la lernejo estis en la unua etaĝo, en ĉambro najbara kun loĝejo de la rektoro, tion ĉi mi sciis tre bone, kvankam antaŭe neniam mi estis tie. Ordinare, lernantojn, kulpajn je io oni vokis al la inspektoro, kie ili ricevis indan rekompencon por sia ago, sed en la administrejon oni vokis iun el ni tre malofte, nur en okazoj eksterordinaraj, plejofte por sciigi iun pri lia eksigo el la lernejo.

Konsiderante ĉion tion ĉi, kun koro premegita de timo kaj antaŭsento de malfelicо, mi malrapide malsupreniĝis kaj haltis antaŭ la pordo mistera kaj timiga, sur kiu estis grandlitera subskribo lakona: „Administrejo". Mi ordigis la harojn kaj la jakon, poparis trifoje krucosignon kaj malrapide per la manoj tremantaj malfermis la pordon. Ŝi estis trapeza kaj, kiam mi fermis ĝin post mi, ĝi laŭte ekrapis kaj ĝia frapbruo plugis tra la ĉambro, kiel tondro printempa.

La ĉambro estis granda. Meze de ĝi staris longa tablo, ĉirkaŭ kiu sidis nekonataj skribistoj. Instruistoj ape kaj dise marŝis tra la ĉambro, kelkaj sidis apud negranda tablo, kiuj staris apud fenestroj kaj estis kovritaj per amasegoj da paperoj. Ili ĉiuj fumis, laŭte interparolis kaj ridis. Inter ili mi tuj rimarkis la inspektoron, kiu skribis ion diligente, tamen la rektoro forestis.

La pordo fermiĝis post mi kun laŭta tondrobruo, tamen neniu atentis ĝin, neniu eĉ ekrigardis min. Malgraŭ tio, mi salutis ĉiujn ĉeestintojn per respektega riverenco komuna, kiu ankaŭ, ŝajne, estis nek rimarkita, nek atentita de iu.

Pasis kelkaj minutoj kaj mi daŭrigis la staradon apud la pordo. La timo antaŭe longa jam cedis lokon al trankviliĝo: mi jam forgesis, ke oni alvokis min tien ĉi por sciigi al mi ian malagrablaĵon kaj, movante jen unu, jen la alian piedon, mi aŭskultis la multvoĉan tumulton, kiu ŝajnis nun al mi netiom senorda, kiel komence, kaj observis la laboron de la skribistoj, kiuj skribis forpermesojn al lernantoj. Ĉu longe daŭris tiu ĉi observado, mi ne scias, ankaŭ mi ne scias de kie subite aperis antaŭ mi nia instruisto amata Felicio.

– Kion vi atendas ĉi tie, kolombeto? – li demandis.

– Oni ordonis, ke mi venu ĉi tien... al lia rektora moŝto...

– Kio okazis? Ĉu vi, kolombeto, faris iam kulpon?..

– Mi scias neniaŭ...

– Se vi estus senkulpa, oni ne venigus vin tien ĉi, – li respondis, ridetante. – La afero estas malbona, mi certigas vin, se vin atendas io neagrabla...

Kaj ekspirinte profunde, li aldonis post nelonge jam serioztone:

– La rektoro nun estas okupita... La kolonelo vizitis lin kaj...

– Ĉu la kolonelo? – mi laŭte demandis. – Ĉu mi povas iri tien?.. – kaj kuraĝa penso, kiel fulmo, ekbrilis en mia kapo: „mi tuj iru al la rektoro, se li diru al mi, kion li en-encas, en ĉeesto de la kolonelo. La lasta nepre defendos min. Alian defendanton pli fortecan, pli indulgeman mi ne trovos".

Mi jam estis preta forlasi la ĉambron kaj realigi la penson, sed la instruisto ekkaptis min je la maniko kaj kun mizo ekkriis:

– Kien?.. Ĉu al la rektoro?.. Ĉu vi, kolombeto, freneziĝis? Ĉu vi ne scias, ke eĉ ni – instruistoj... eĉ mi – maljunulo neniam kuraĝas transpaŝi sojlon de lia loĝejo sen lia invito, sen lia...

Li ankoraŭ ne havis tempon por fini sian monologon, kiam subite en la ĉambro ekregis silento. Trapordo ne rimarkita de mi eniris el sia loĝejo la rektoro. Li estis severa kaj malbonhumora.

– Ĉu vi ĉion ordigis? – li demandis la inspektoron. – Jam estas hora malfrua...

– Nur kelkaj forpermesoj ne estas ankoraŭ subskribitaj, via rektora moŝto.

– Mi esperis, ke la sinjoroj instruistoj partoprenos en tiu ĉi tasko, – li diris malagable rigardinte ilin. Kaj de la instruistoj lia rigardo deglitis kaj falis sur min. Mi eksentis, kiel ekstremis miaj genuoj de tiu ĉi akra estra rigardo. Li tuj faris kelkajn paŝojn rapidmajn al mi kaj haltis antaŭ mia nazo mem.

– Kiu vi estas? – li demandis min severvoĉe, fiksinte ~~min~~ sian rigardon tranĉantan sur miajn okulojn.

Mi respektege riverencis al li kaj nomis min.

– Kiu vi estas?.. – mi tuj ekaŭdis la saman demandon, faritan jam kun zimarkebla incito kaj kolero.

– Mi estas lernanto de...

– Ha, vi estas lernanto!.. Vi ankoraŭ kuraĝas propreti al vi tiun ĉi titolon honoran?.. Kaj estas devoj de lernanto?

La demando estis tiel neatendita, ke mi ne sciis, kion mi devas respondi kaj stariĝis konsternita.

– Kiaj estas la devoj?.. Se vi estas lernanto, vi devas scii ilin!

Mi kun peteco en la rigardo rigardis jen unu, jen la alian instruiston, kiuj staris kun ronde post la rektoro, ĝuante la scenon turmentigan.

– Kio?.. Ĉu vi ne sciasilin?.. Nu, diru, ĉu dum ekzamenoj lernanto povas promeni post la urbo kun fraŭlinoj? Ĉu lernanto povas maldiligenti? Ĉu li povas persiaj ayoj mal-honrenaj malhonorigi sian lernejon?.. Vi lernas kaj propagandas tra la urbo ian lin-von artefaritan, kondiĉan, kiu estas permesita en nenia lernejo!.. Vi silentas? Vi estas obstina!.. Sidiĝu kaj skribu tuj peton, ke oni eksiguvin el la lernejo! Donu al mi paperon!..

Li forlasis min. Unu el la skribistoj paris al mi signon per la mano, montran-te lokon apud unu tablo kaj liberigante ĝian randon de paperoj kuŝintaj. Mi ek-sidis post la rektoro kaj kun plorego ekkriis:

– Via rektora moŝto!..

Li haltis kaj ekrigardis min.

– Via rektora moŝto, pardonu!.. – mi diris.

– Skribu peton, ke oni eksiguvin!..

– Via rektora moŝto!..

– Mi scias, ke mi estas rektora moŝto. Jam dum tridek jaroj mi estas rektora moŝto! Ni tute ne havas tempon por plu paroli kun vi... Skribu tuj, ke oni eksiguvin... – kaj li daŭr-igis sian vojon al la instruistoj, kiuj ankoraŭ staris silente respektoplene klinante siajn kapojn.

– Pardonu, mi petas vin, via rektora moŝto, pro Dio... pro la kolonelo!..

Tiu ĉi magia vorto, ĝustatempe dirita de mi, havis neatenditan por ĉiuj efikon. La rektoro tuj haltis, ree fikse ekrigardis min kaj, ripozoĉe, malpacile spirante, diris:

– Se vi estus bona kaj dankema knabo, vi, pro la kolonelo, kiu ŝatas vin kaj ĉiam in-vitiĝas pri via konduto kaj sukcesoj... kiu ĉiam superas, aŭdante, ke vi estas kna-bo malbona kaj maldiligenta, – vi estus diligenta, imitinda lernanto, vi neniam ekperigus lin, vi ŝatus ĉiujn zorgojn pri vi!.. Nur pro li... pro tiu ĉi nobla kaj me-ritoplena sinjoro, – li aldonis post paŭzo nelonga, – mi pardonas vin! Vi, kiel mal-diligentulo, restu ankoraŭ unu jaron en la sama klaso! Jen hejmen!.. Oni tuj donos al vi forpermeson...

Jen el sidintoj apud la granda tablo, – pro ĝojo mi eĉ ne rimarkis, kiu li estis, – ra-pide me leviĝis, elprenis el amaso de kuŝintaj paperoj unu folion, alproksimiĝis al mi kaj mmanigis jam tute pretan forpermeson, en kies malsupro estis skribita ~~jug~~ justa tak-o de mia ayado dum la lernjaro:

„Pro maldiligenteco kaj malbona konduto li estas restigata ankoraŭ por unu jaro en la sama klaso."

7.

XXXV.

Neatendita proksimeco.

Jočjo ne tuj poveturis hejmen. Okazis ankoraŭ unu malpeličajo, kiu levigis lin pasigi en la urbo ankoraŭ du tagojn: mortis Julia Andreevna.

Kvankam, ĉiam plimalboniĝinta, stato de ŝia malsano al neniu donis jam duman ekzaj tagoj ian esperon je resaniĝo, tamen, sciiĝinte pri ŝia morto, ĵus jus jočjo revenis el la lernejo, li eksentis, ke li kune kun ŝi perdis ĉion plej karan en la vivo. Tiu ĉi nova ekbato, eksplodinta super lia kapo tuj post la okazintajo en la lernejo, tute senportigis Jočjon.

La mortintinon li trovis kušanta sur tablo meze de tiu ĉambro, en kiu aŭtune okazis lia unua renkontiĝo kun ŝi kaj poste la lecionoj. Vestita je nigra vestajo, kun krucmetitaj manoj sur la brusto kaj bona, trankvila vizaĝo, ŝi ŝajnis ĝuanta kutiman dormripozon trankvilan. Nur la vizaĝo flave-blanka kaj la enfalintaj okuloj testis, ke tiu ĉi dormripozo estos je tiu ĉi fojo tre daŭra... eterna.

En la ĉambro, odorinta je incenso kaj vakso, estis neniu. Nur juna palvizaĝa monahino, starinta apud la mortintino mem en sia kutima nigrkolora vestajo, malaŭte, tamen tre klare kaj ne rapidante, legis la psalmolibron.

Dum kelkaj minutoj Jočjo staris apud la monahino, fiksinte sian rigardon sur la pacan vizaĝon de la mortintino kaj aŭskultante inspirplenajn vortojn de la reĝo-profeto, kiu tiom bone sciis ĉiujn fleksiĝojn de animo de homo; tutan ŝanĝiĝemecon kaj rantecon de lia vivo:

„Li ne rememoriĝis, ke ni estas polvo. Homo estas kiel herbo, kiaj tagoj estas kiel floro de kampo, tiel li ĉesos flori. Pasos super ĝi vento, kaj ĝi jam ne ekzistas, kaj ĝia loko ĝin jam ne rekonas. Sed la boneco de la Sinjoro daŭras eterne al tiuj, kiuj lin timas, kaj lia bonfaremeco iras ĝis la pranepoj, kiuj observas lian interligon kaj memoras liajn ordonojn..." – legis la monahino.

Jes tusado retenata kaj profunda ekspiro ekaŭdiĝis post Jočjo el duonfermitaj pordoj de la ĉambro najbara kaj interrompis lian revadon. Li rerigardis. Alta, funebre vestita figuro de la kuzino de la mortintino, kun ruĝaj postploraj okuloj, kiun li neniam jam renkontadis dum lastaj tagoj apud la malsana avino, ĝoje salutis Jočjon.

– Jen kia malĝojo okazis al ni!... – ŝi komencis kaj tuj larmoj torente ekfluis el ŝiaj okuloj. – Nia devo estas tuj sciigi ĉiujn parencojn kaj konatulojn de la kuzino... ke ŝi kredu la reganon ĉielan!... Unu duonon de la tasko mi plenumis, jen estas amaso de telegramoj sendotaj, sed mi tute ne scias adresojn de kelkaj ŝiaj konatuloj, ekzemple, de S-ro Veselov...

– La mortintino havis multajn amikojn, ĉiuj ŝin amis kaj ŝatis pro ŝia boneco, –

aldonis nekonatulino, subite aperinta de ie.– Ŝi nur korpe estis malforta kaj maljuna, sed ŝia animo...– Ŝi ne finis, almetis naztukon al la okuloj kaj eksplodegis laŭte, konvulsie.

La kuzino de la mortintino sidiĝis kaj kovris per la manoj sian vizaĝon, larmoj suprenis ŝin. Post unu minuto la ĉambro pleniĝis de laŭta plorado histeria de la virinoj, kiuj, videble, sincere, tutanime amis la mortintinon kaj nun ne povis trovi konsolon. Joĉjo, apenaŭ detenante ploregon, de tempo al tempo forŝkuis per la mano grandajn larmgutojn de la vangoj. En la najbara ĉambro, kiel antaŭe, aŭdiĝis simploj kaj samtempe alte-inspiraj kortuŝaj vortoj de David, kiujn mallaŭte kaj malrapide legis la monahino.

– Ĉu vi rapidas hejmen?– fine, forvišante larmojn kaj reeleviĝante, diris la kuzino de la mortintino. – La kuzino antaŭ sia morto mem petis, ke mi nepre transdonu al vi la heredaĵon...

Ŝi kliniĝis, malfermis malaltan ŝrankon, starintan apud kameno kaj elprenis de tie grandan ligaĵon de libroj kaj kajeroj.

– Jen, tion ĉi... ŝi testamentis, ke mi transdonu al vi. Preĝu, mi petas, pri ŝi!

En la ligaĵo estis ĉiuj esperantaj libroj, ekzercoj kaj fragmentoj de taglibro de mortinta Julia Andreevna, kiuj enteni ŝiajn impresojn de la vonatiĝo kun Joĉjo kaj de la esperantaj lecionoj, tiom ne longedauraj.

En la tria tago post la morto oni enterigis Julia'on Andreevna. Ĉerko kun ŝia cindro dum funebra liturgio staris en tiu paroĥa preĝejo, kiun ŝi dum la vivo ofte vizitadis. La liturgion ĉeestis nur ne multaj geamikoj kaj konatuloj de ŝi, plimulto de ili ne ričevis ĝustatempe sciigojn pri ŝia morto. Joĉjo dum la liturgio kaj funebra diservo, tuj servinta post ĝi, ne foriranta de la ĉerko, preĝis. Kaj kiam oni ekkrantis: „Venu, donu, ho patroj, lastan kison al la mortintino", li ne havis forton plu deteni ploregon kaj, risante la frunton de la mortintino, ekkaptis randojn de la ĉerko per la ambaŭ manoj. Oni perforte forkondukis lin al la pordoj. Poste, jam iom trankviliĝinte, li portis la ĉerkon kune kun kelkaj parencoj de la mortintino al loko de ŝia eterna ripozo kaj laŭtvoĉe kunkantis kun la ĥoro la kanton, per kiu oni akompanas mortintojn: „Sankta Dio, Sankta Forta, Sankta Senmorta, indulgu nin."

Neniu diris adiaŭan parolon super ŝia tombo, neniu metis sur ĝin florkronon. Kaj tio ĉi estis tiel ne natura, tiel doloriga por Joĉjo.

Joĉjo malgajeriveris hejmen de la tombejo. Dum la tuta vojo malgajaj pensoj turmentis lin. Alirante jam al la domo mem, li haltis kaj flustre diris: „Jen mi enterigis karan, neforgeseblan Julia'on Andreevna, iom pli frue mi enterigis amian amon al ŝi, eble, post nelonge oni postulos, ke mi enterigu ankaŭ ceterajn miajn konatajn gesamideanojn kaj Sen titolo".

ĉé Esperanton mem... Kia malĝelića homo mi estas!.."

XXXVI.

Hejmen!

La vaporŝipo, sur kiu rapidis hejmen Joĉjo, nur vespere atingis Kologa'on - malgrandan, dormeman urbaĉon. Kontraŭ atento, neniu el pasaĝeroj renkontis la knabon sur la albordiĝejo. Dum kelkaj minutoj li vagis tra la bordo inter vilaĝaj veturiloj kaj aretoj de vilaĝanoj, kiuj pace interparolis kun pipoj en la manoj, ankoraŭ esperante trovi inter ili konatan veturilon de la patro, sed baldaŭ montriĝis, ke nek la veturilo, nek ia konata vilaĝano tie ĉeestis. Joĉjo, ne perdante eĉ unu minuton, senhezite decidis piediri hejmen.

Tra longa ne pavimita strato, kun malgrandaj unuetaĝaj domaĉoj lignaj kaj longaj tabulligitaj bariloj interili, kun grandaj pluvlagetoj kaj netrairebla koto, Joĉjo nerimarkeble eliris el la urbo. Li preteriris la malsanulejon, malaĝablan duetaĝan masonitan malliberejon kun alta, ankaŭ masonita, muro kaj armita soldato - gardisto apud la pordego, urban tombejon, kiu, pro abunda kreskaĵaro, de malproksime estis similа al sinjora ĝardeno, kun malgranda malalta preĝejo, vicon de briksejoj, forĝejoj, bućejon kaj eniris sur la grandan vojon.

Tio ĉi estis memorajo de antikva epoko de servuto, kiam kelkaj urboj de nia norda regiono estis kunligitaj per tiaj vojoj. Ŝi estis larĝega, supiĉa poz pli ol dek veturiloj vice veturantaj, betula aleo je ambaŭ flankoj kies, paralele al ĝi, tiriĝis du aleoj mallarĝaj, por unu veturilo. Post tiuj ĉi mallarĝaj aleoj, laŭlonge de la vojo, estis larĝaj kaj profundaj kavkanaletoj kun bordoj, kovritaj de suxa herboxovro kaj densaj arbetaĵoj de saliko, junipero kaj juna betularo, inter kiuj jen tie, jen aliloxe altiĝis nigraj konusformaj formikejoj. Altaj kaj dikaj betuloj, jengraciaj kun siaj rektaj trunkoj kaj blanxa ŝelo ne difektita, jen kripligitaj de ventoj, kun rompitaj suprajoj kaj branĉoj, jen likenkovritaj, tute grizaj, prezentis belan kaj gajan pejzaĝon.

Bedaŭrinde, nun delonge neniu prizorgas la arbojn. Ĉiujare multaj el ili pereas pro ventegoj, pro la aĝo kaduka kaj neniu plantas anstataŭ ili novajn, junajn betulojn. Sed iam, oni parolas, milo j de servutuloj estis ĉiuprintempe okupitaj je plantado kaj prizorgado de ili. Oni akrumisilin dufoje ĉiutage, iafoje portante por tio akvon en siteleyoj de malproksime. Precipe multan klopodadon kaj prizorgon postulis junaj betuletoj, plantitaj en loko j sabloriĉaj: ili obstine ne volis kreski en sablo kaj, malgraŭ penega plegado, pereis grandnombre. Jam nun, veturante tra la vojo, oni kun malĝojo vidas grandajn interspacojn en la aleoj, tute senigitajn je la arboj, - kaj pasos ankoraŭ dudek-tridek jaroj kaj nenia postsigno restos de tiu ĉi iama beleco!..

Eniinte sur la grandan vojon, tra kiu ĵoĉjo devis piediri ĝis la hejmo mem, li haltis ravita. Antaŭ nelonge elfalinta pluvo malsekigis la vojon, purigis aeron kaj redonis al foliaro tiun freŝecon, tiun virgan verdecon, je kiu kreskaĵaro sin ornamas nur dum printempo. En la aero estis disverŝita aromo peĉa de betula foliaro kaj mielodora de kampaj floroj. De ĉie: de brancoj de la betuloj de arbetaĵoj, de kampoj, kuŝintaj je amflankoj de la granda vojo, - senĉese, seninterrompe aŭdiĝis gaja, multvoĉa, diversmelodia kantado de birdoj nevidataj, kiuj supersonis de tempo al tempo laŭta krizado de ia izola ruzkolo kaj delikataj triloj de najtingalo, kiu amuzis sian matinon ie super proksima rivereto.

. Post la urbo supozacera kun ĝiaj ĝardenoj kaj bulvardoj mizeraj tiuĉi senlima vastaĵo de la naturo sempera, kiun ĵoĉjo jam delonge ne observis, ravis lin. Enspirante plenbruste la aromon resperan acron kaj ĝuante la belecon ĉirkaŭan, ĵoĉjo sin apogis per la dorso je unu betulo kaj longe ne moviĝante staris ravita, aŭskultante la birdĥorojn. Pro nekutima freŝeco de la aero ebriiganta, pro noveco de la impresoj li sentis facilan kapturniĝon agrablan. Por unu momento forgesinte tute, kie li estas, kien li celas, li nenion pensis, nenion sentis, krom virinece - delikataj brakoj de la naturo, kiu tiel afable - gepatre etendis ilin al sia ido, tiom lacigita kaj elturmentita de la studado antaŭ lastaj ekzamenoj kaj de la lastaj urbaj malagrablaĵoj kaj diskreviĝoj.

Je ne malproksime ekrapis, kiel malproksima tondrobruo, radoj de veturilo je ligna ponto, ekaŭdiĝis voĉo vira, instiganta ĉevalon kaj ĵoĉjo rekonsciiĝis al realeco. Krepusko vespera densiĝis, eksplodis resteteto. Ĵoĉjo ordigis sian ĉapelon, ekstremis kaj ekpašis tra unu mallarĝa aleo de la vojo, ĉiam amadmirante belecojn de Dia mondo, kiujn li per mano malavara disĵetis tra la mondo kaj kiujn nur ne volas ne scias rimarki homo, forlogiĝinte de vivorantaĵoj.

Negrandaj vilaĝoj, kiuj kuŝis sur la granda vojo kaj kiujn trairis ĵoĉjo, estis dezertaj. Pacaj loĝantoj de ili dormis kaj nur ĉafoje tra nokta silento aŭdiĝis knarado de putkvilo aŭ ploro de sufiĉinfano. Ĵoĉjo kun ĝojo renkontis ĉiun vilaĝon, de kiuj ventumis io parenca kaj kiuj vekis en li, kiu pasiĝis tutan sian infanecon en vilaĝo, feliĉajn rememorojn de malproksimaj infanjaroj. Li haltadis meze de ĉiu vilaĝo kaj longe enspiradis en sin vilaĝan odoron specifan de laktoĵus melkita kaj sterko. En fenestroj, ĉafoje tute malfermitaj, nenio estis videbla pro foj, nur en ne multaj domoj lumiĝis lampetoj en angulo antaŭ ikonoj.

Ju pli malproksime restis post li la urbo, ju pli konataj fariĝis por li la vilaĝoj trairataj kaj kampoj, ju pli proksime estis la celo de lia pašado, des pli malproksimaj fariĝis liaj urbaj impresoj kaj rememoroj, des pli ili estis anstataŭataj de penso pri la hejmo, pri la parencoj, kiujn ĵoĉjo delonge jam soifis vidi. La unuaj estis kvazaŭ ĉiam pli kaj pli ŝirmataj de densa nebulo, la lastaj, kontraŭe, ĉiam sin prezentis kun

nova, neordinara klareco. Kiam li trapašis la unuan duonon de la vojo, kiam post li restis jam Nikulskoje, kie loĝis la amiko de la patro pastro Nikolao, Joĉjo konstatis, ke li nek volis, nek povis jam pensi pri Veselovo, aŭ pri Olnjo, aŭ eĉ pri <u>ŝi</u> - Sonjo, tiel same, kiel antaŭ nelonge, rapidante en la infanĝardenon, esperante renkonti tie <u>ŝin</u>, li ne volis, ne povis pensi pri la hejmo, pri la domo gepatra, pri la patrino.

Ŝuste noktmeze Joĉjo, kun la koro maltrankvile batanta, eniris, fine, laca en la paĉencan vilaĝon. Ŝi, kiel ~~antaŭe~~ ankaŭ la aliaj, kiujn li jam trapašis, pace dormis. Ŝian dormon rompis nenia sono, nur en la ĝardeno apud la domo gepatra trilis diverspmaniere najtingalo, inspirante, kiel šajnis al Joĉjo, felicajn, ~~sonĝ~~ sorĉajn sonĝojn al la dormantoj.

Joĉjo aliris al „la onkla domo". Ŝi nigriĝis, kiel griza malpura makulo, sur fono de klara, sennuba ĉielo kaj densaj nigraj ombroj de ĝardenarboj jentie, jen aliloke kušiĝis surĝin. Ŝi estis šlosita kaj kvazaŭ neloĝata plu, nur malhela fajreto antaŭ ikonoj en la ĉambro de la patrino atestis kontraŭan.

Joĉjo eniris en la ĝardenon.

De la unua rigardo Joĉjo nerekonis ĝin, tiel ĝi šanĝiĝis. Ĉie branĉoj tušetis lian kapon, kio ne okazis antaŭe, ĉie je flankoj estis rimarkeblaj kvazaŭ novaj, tute neretonataj de li, densaj arbetaĵoj, kiuj estis antaŭe, sed nun ili estis pli densaj kaj, šajne, netraireblaj. Joĉjo venis al la malĝuna pomarbo kaj sidiĝis apud la tablo, sur kiu ankoraŭ estis videblaj postsignoj de tetrinkado antaŭnelonge.

„Ĉu mi devos iri tuj en „nian domon", aŭ iom atendi en la ĝardeno?" - Joĉjo pensis. - „Ne, mi atendos... en „nia domo", kredeble, kutime, nun dormas la patro, li tuj vekiĝos, li demandos min... En mia ĉambro supre, kredeble, ankoraŭ ne estas preparita por mi lito... Jes, la patro, sendube, tuj demandos min... Kion mi respondos?.. Kial tiu ĉi penso, tiel simpla, pli frue ne venis al mi en la kapon? Kial mi antaŭe nenion pripensis?.. Ĉu mi mensogos al li?.. Sed post nelonge la mensogo senvualiĝos, ja en la forpermesa papero estas klare skribita... Ne, mi ne mensogos!."

Joĉjo leviĝis de la benko kaj zorgataksite eliris laŭlonge de la ĝardeno. Li pensis:

„Tamen kion mi timas? Ĉu mi faris ian krimon? Tio ĉi povas okazi al ĉiu!.. Oni scias, ke ĉiujare relkaj lernantoj en ĉiu lernejo estas restigataj en sama klaso, do kion timi?.. Kompreneble, mi faris negrandan eraron... tiuj ĉi knabinoj multe malhelpis al mia..."

Kaj subite al Joĉjo sin prezentis klare Sonjo en sia luksa vestaĵo, ornamita de rubandoj kaj puntoj, en sia blanka pajla ĉapelo, tia sama Sonjo, kia ŝi estis dum la boatpromenado. Joĉjo ne havis fortojn forpeli de si la fantomon kaj, haltinte antaŭ florbedoj, longe ĝuis, rigardante ĝin.

„Kia bela, ĉarma ŝi estas!..." - li pensis. - „Se ŝi estus simpluline, ia filino de pastro,

mia kulpo estus nepardonebla, sed ŝi estas grafidino!... grafidino Sonjo!... Nenion el miaj kamaradoj iam eĉ interparolis kun ia grafidino, kaj mi promenis kun ŝi... kaj ŝi nomis min „Joĉjo", rvazaŭ mi estis..."

La fantomo senpostsigne malaperis subite tiel same, kiel ĝi aperis.

„Tamen mi iru!.." - ekpensis Joĉjo, sentante, ke dorno nedeteneble tiras lin en siajn brakojn. - „Mi bedaŭras la patron... Li estos ĉagrenita... Li estas tia bona, amoplena por mi - la infanoj... sed kion fari?.. Vere, li elspezis iom da mono por mia vivo en la urbo, sed dum lastaj monatoj mi pagis por la logĝejo el mia propra mono, perlaborita de la dikulo... Krom tio mi ja sendis jam al la gepatroj cent rublojn... tiujn... kaj nun mi donos al ili ankoraŭ la aliajn cent rublojn... kaj dum la somero mi ankoraŭ perlaboros..."

Joĉjo haltis apud enirpordo de „nia domo". Ŝia rezonado ĝis tia grado trankviligis lin, ke li sentis jam nenian eĉ plej malgrandan timon antaŭ tuj necesita interparolo malagrabla kun la patro.

La pordo, kutime, ne estis ŝlosita. Joĉjo eniris en la ĉambron de la patro kaj por unu momento haltis apud la sojlo senmove.

— Kiu?.. - ekraŭdiĝis laŭta voĉo dormema de la patro kaj iu ekmoviĝis sur la lito.

Joĉjo respondis.

La lito ekknaris. Granda blanka figuro rapidege leviĝis de ĝi kaj ekmoviĝis al tablo, staranta apud granda, neniam fermata, fenestro. Joĉjo aŭdis, kiel la patro per la mano tremanta ion serĉis sur la tablo, kaj daŭrigis stari senmove.

— Kie ili estas?.. Kiu ilin prenis?.. Mi ja metis ilin ~~tie~~ tie... - la patro murmuris, palpante la tablon. - Nu, mi trovis, gloro al Dio!.. - li aldonis, prenante alumetojn, kiujn li serĉis, kaj bruligante kandelon.

— Jen estas bona surprizo!.. Ĉu vi piediris de la urbo?.. Kial vi ne skribis, ni sendus ĉevalon.

— Mi skribis... - diris Joĉjo, aliranta al la patro per paŝoj malkuraĝaj.

— Ĉu vi skribis? Ni delonge nenian sciigon ricevis de vi. Dum lasta tempo oni tre neakurate liveras leterojn al ni. Morgaŭ ni nepre devos sendi iun al la poŝtejo, kredeble, tie multaj leteroj kuŝas delonge. Jen la frato ankaŭ...

— Ĉu la onklo ankoraŭ nevenis?..

— Dio scias, kiu okazis al li... nek li mem venas, nek skribas ion... La patrino jam delonge atendas lin senpacience... Ŝi eĉ la ĉambron preparis por li... Nu, bonan... bonan matenon!..

Joĉjo per la manoj tremantaj ĉirkaŭprenis maldikan kolon de la patro. La patro kaj la filo ekkisis unu la alian.

— Kia granda vi fariĝis!.. Vi tute nesimilas nun al tiu antaŭa knabo, kiu forlasis

nin aŭtune... Bone! Vi jam havas aspekton de plenaĝulo... fianĉo...-gaje parolis la patro, de la kapo ĝis la piedoj mem trarigardante la filon ĉe malforta lumo de la kandelo. -Jes!... Jen, ekĝojos la patrino!..

Joĉjo memkontente ridetis.

-Nu, tiun ĉi nokton vi jam pasigu en la najbara ĉambro. Feliĉe, tie estas aranĝita lito... Patro Nikolao antaŭ nelonge gastis ĉe ni kaj li pasigis tie unu nokton. Pardonu, ni ne atendis vin kaj ne preparis por vi... jam morgaŭ oni...

Kaj kvazaŭ ion ekmemorinte, li subite faris seriozan mienon kaj, fikse rigardante la filon, kiu tuj konfuziĝeme ruĝiĝis, li diris:

-Nu, supiĉe paroli pri bagatelaj!.. Ĉu mi povas gratuli vin?..

-Mi... ĉu gratuli?..

-Jes, ĉu vi sukcese finis viajn ekzamenojn?

-Ha, paĉjo! -diris Joĉjo, metante sian manon sur la ŝultron de la patro kaj sidiĝante apud li sur la liton. -Nur vi ne koleriĝu, ne maltrankviliĝu. Mi tuj...

-Ĉu vi ree devos submetiĝi al ia ekzameno aŭtune?..

-Atendu, paĉjo, pro Dio! Mi tuj...

-Kaj mi esperis...

-Mi tuj, paĉjo!... -balbutis Joĉjo, pro subita konfuziĝo forgesinte ĉiontion, kion li pripensis en la ĝardeno por respondi al la patro.

„Kiel bone mi tiam ĉion pripensis, kiel ĉio estis konvena!.. Nun mi tute ne scias, kion paroli por pravigi min kaj trankviligi lin. Ah ĉion, ĉion forgesis..." -li pensis.

Li streĉis la memoron por ekmemori sian rezonadon, sed anstataŭ tio antaŭ liaj okuloj aperadis kaj tuj malaperadis gracia figuro de Sonjo en luksa festa vestaĵo kun ridetantaj ĉarmaj, klaraj, bruligantaj okuloj.

-Nu, nu! Parolu!..

-Paĉjo kara! -komencis Joĉjo, penante paroli per voĉo trankvila kaj forpeli la fantomon trudeman de la beluline. -Ah, kompreneble, estas... nu, mi estas kulpa antaŭ vi, sed vi ne koleru, mi petas... Tio ĉi, vere, estas tia bagatelo... jen, vi vidos... Vi ja memoras, mi sendis al vi cent rublojn, nu, nun mi ankaŭ havas multe... supiĉan monon... vi ne... vi...

-Parolu pri la afero!... -severe kaj malpacience interrompis lin la patro. -Ĉu oni forprenis vin tute el la lernejo?

-Ne!.. Ĉiuj ekzamenoj estis sukcesaj por mi, sed unu... el fiziko... La instruisto ofendiĝis unufoje, ke mi promenis kun la fraŭlinoj... kun la grafidinoj kaj plendis al la rektoro... Nu, tiu... vi bone konas lin...

-Tiel, tiel!.. Vi parolas, ke vi promenis kun grafidinoj?.. Tiel!.. -la patro ekspiris, malgaje malleviante la kapon. -Montru al mi vian forpermesan liston!

Joĉjo elprenis el poŝo la kunfalditan paperon kaj enmanigis ĝin al la patro.

La patro per la manoj tremantaj malfaldis la paperon, almorigîs al la kandelo kaj ekdegis silente la liston de ĝia komenco mem. Kiam li atingis per la okuloj la grandliteran alskribaĵon en la malsupro de la papero, li almovis ĝin al la kandelo mem kaj longe, kredeble, kelkfoje legis ĝin. Poste li silente kunfaldis la paperon, ankaŭ silente redonis ĝin al la filo kaj ree sidiĝis sur la liton.

— Mi gratulas vin!... — fine, li diris mallaŭte.

— Atendu, paĉjo! Se vi ĉion sciiĝos, vi ĉion komprenos kaj ĉion pardonos... Jes, mi faris malgrandan eraron. Sed „errare humanum est", kiel parolas la doktoro...

— Kia doktoro?..

— Mia amiko...

— Tiel! Bone!.. Vi povas ne daŭrigi. Kvankam mi ne ĉion sciiĝis, tamen mi ĉion komprenis, mia filo! Ne pasis ankoraŭ kvin minutoj de tiam, kiam vi eniris kaj vi jam sukcesis rakonti al mi grandan amason da ĉia absurdaĵo... pri iaj fraŭlinoj, grafidinoj, pri ia doktoro-amiko... Mi scias, vi havis ankoraŭ tie alian konfarantojn, pri kiuj vi skribis... iajn kolonelojn, verkistojn... Jen estas frukto de viaj konatecoj! Nun oni restigis vin en la sama klaso, poste oni forpelos vin el la lernejo!.. Estas malfacile, mia filo, samtempe lerni kaj flirti je knabinaĉoj!.. Mi ĉion komprenis! Iru, dormu!..

La kandelo taj estingiĝis, la lito ekknaris. Kaj longe ankoraŭ Joĉjo povis aŭdi malkontentan murmuradon, tusetadon kaj ĝemetadon de la patro.

XXXVII.

Flejme.

Joĉjo, ĉagrenita de la ekzistantaĵo kaj malkontenta je si mem, ke li ne povis ĝuste klarigi la aferon al la patro, longe ne povis endormi. Nur antaŭ tagiĝo mem dormo kunforĝis lin. Sed la dormo estis maltrankvila, sonĝoj estis multenombraj kaj kaj inkubaj. Ili sen ia interligo rapide sekvis unu post la alia, restigante post si neniun rememoron, krom turmentiga doloro en la kapo. Nur unu sonĝo, la lasta restigis en la memoro de Joĉjo klarajn postsignojn.

Li sonĝis la ĉambron de Olnjo. Apud la tablo sidis kun li Sonjo, kiu atente aŭskultis lian interparolon en Esperanto kun la patro. Joĉjo, respondante ion al la patro, subite interrompis sian parolon, ne povante trovi esperantan vorton konforman al lia ideo esprimota, kaj li demandis ruslingve la knabinon, kiel oni devas diri tion (li ne memoris, kian ideon li deziris esprimi) en Esperanto. La knabino kun miro ekrigardis Joĉjon kaj, ridetante, diris: „Ĉu vi ne memoras tian simplan vorton? Ĝi estas „Kloon"!" „Ĉu Kloon?" — ree demandis Joĉjo, — „tia vorto tute ne ekzistas en la lingvo!" „Kloon, kloon, kloon!" ek-

ĝis la knabino, kaptante Joĉjon je la mano. La patro tuj malaperis kaj Joĉjo kun la knabino estis jam ne en la ĉambro, sed jam sur la kajo. Subite eksblovis ventego kaj forŝiris de la kapo de Sonjo ŝian belan ĉapelon pajlan, ornamitan de larĝa rubando kaj luksaj artefaritaj floroj, kaj ĝi ekruliĝis malsupren de la krutaĵo al la rivero mem. La knabino eksplodis pro la malĝojo, sed Joĉjo tuj ekruliĝis malsupren post la ĉapelo kaj ekkaptis ĝin per la manoj, ne permesinte al ĝi enfali en la riveron. Sed revenante kun la ĉapelo supren laŭ la krutaĵo de la kajo, li kun ĉagreno rimarkis, ke unu floreton de la ĉapelo li rompis neintence per la mano, kiam li kaptis la ĉapelon. „Mi nenian memoraĵon havas de vi, Sonjo", - Joĉjo diris, metante la floron en butontruon de sia jako, - „permesu al mi konservi tiun ĉi floreton. Kiel oni nomas ĝin?" „Kloon, kloon, kloon, kloon!" - respondas la knabino. Joĉjo kun miro rigardas kaj vidas, ke la knabino subite iom malaperis kaj, anstataŭ ŝi, sur tiu sama loko staras la rektoro, fikse rigardante lin severe. „Sentaŭgulo!" - li kriis al Joĉjo, - „ĉu oni tiel sin preparas al ekzamenoj? Virec promenas kun la grafidino! Skribu tuj peton, ke oni eksigu vin el la lernejo!.." La rektoro tuj ankaŭ malaperis kaj ĉiuj promenintaj tra la kajo - virinoj kaj viroj, praŭlinoj bele ornamitaj kaj fratoj buboj malpuraj, - ĉiuj subite kaptis unu la alian je la manoj kaj rapidege ekkuris preter Joĉjo, laŭte kriante: „Kloon, kloon, kloon, kloon, kloon..." Kaj en ilia kriado tiradu Joĉjo jam klare distingis, ke ili kriis ne „kloon", sed „onklo".

Farinte tiun ĉi eltrovon Joĉjo vekiĝis. Lia kapo doloris, la brusto estis premita kvazaŭ de ia ŝargo. Estis jam tago. Tra la fenestro malfermita veršiĝis el la ĝardeno aromo de floroj kaj birdkantado. Granda burdo, okaze enfluginta tra la fenestro, nuntempe elirejon, zumis tedeme super la lito, senĉese sin batante jen je la muro, jen je la plafono.

„Onklo, onklo, onklo" - Joĉjo ripetis flustre, ellitiĝante kaj en la nokta tolaĵo alproksimiĝante al la fenestro. „Onklo estos malkontenta je miaj sukcesoj, mi tion ja scias delonge" - li pensis. „Tamen estu tio, kio estos. Tio ĉi jam tedis al mi!"

En la manĝoĉambro de „la onkla domo", kien Joĉjo venis post nelonge, li trovis la patrinon, kiu ion klopodis je mastrumado. Ŝi estis pala kaj ŝiaj ruĝaj okuloj estis postploraj. Ekvidinte la filon, ŝi sinjetis al li, alpremis lin al sia brusto kaj kareskante kaj kisante lin je la kapo, konvulsie ploris.

- Mia kara! - ŝi flustris, klinigante super la filo. - Kial vi ne volis pasigi Kristnaskon kun mi? Kial vi Paskon pasigis en la urbo?.. Mi jam timis, ke vi nevolos reveni hejmen ĉe por la somero... Mia kara, tuta brusto mia eltormentiĝis pri vi! Se vi povus scii, kiom da noktoj sendormaj mi pasigis, pensante pri vi, kiom da larmoj mi verŝis, preĝante pri vi!.. Kio okazis al vi?.. La patro estas kolera hodiaŭ, li ĉion sciiĝis pri vi, sed, malgraŭ miaj petoj, li preskaŭ nenion diris al mi. Oni restigis vin en la sama klaso? Kia malĝojo!.. Mia kara patrina antaŭsentis ion malbonan... Jaj viaj konatuloj, la patro

...rolis, malutilis al vi ... Konsolu min iom, ĉion rakontu al mi, mia kara !... - ŝi flustris kaj ŝiaj grandgutaj larmoj torente fluis el ŝiaj okuloj kaj malsuprenfluis kaŭ la kapo kaj vizaĝo de Joĝjo.

Izoliĝinte kun la patrino en la ĉambro de la onklo, kie jam ĉio estis preta por lia veno kaj kie neniu povis interrompi ilian konversacion, Joĝjo, kiel li povis trankviligis la patrinon kaj detale, tamen prisilentinte la promenojn kun la knabino kaj sian intimiĝon kun ili, - li bone sciis, ke la patrino jaluzos lin, - rakontis al ŝi ĉion, kio interesis ŝin, pri la mortinta maljunulino, pri la kolonelo kaj lia edzino, ankaŭ pri la familio de s-ro Veselov. La patrino jam delonge ĉesis plori kaj Joĝjo kun plezuro observis, kiel avideme ŝi aŭskultis lin, kiel sur ŝiaj ankoraŭ antaŭ nelonge palaj vangoj ekludis vangruĝo, kiel ŝi ridetis afable kaj aprobe balancis al li per la kapo. Sed ŝi estis plej kortuŝita, kiam Joĝjo, fininte sian rakontadon, donis al ŝi la vizitkarteton de la kolonelo, kiun li ricevis dum sia dua vizito.

- Panjo, mi donacos al vi tiun ĉi monon, - diris Joĝjo, kiam la patrino direktis siajn feliĉan rigardon en la angulon, kie estis ikono de S. Nikolao, kaj faris krucosignon. - Vi ja ofte bezonas je mono kaj mi dum la somero perlaboros ankoraŭ multe da mono ...

- Donacu al mi, mia kara, tiun ĉi karteton, - ŝi diris, alpremante al sia brusto lian kapon kaj supersŭutante liajn molajn, kiel lino, harojn per varmaj kisoj.

Dum la sama tago oni aranĝis liton por Joĝjo en lia ĉambro kaj li longe klopodis tie, ordigante sian labortablon. Li havis grandan tenton meti la fotografaĵon de Olnjo sur la muro, antaŭ la tablo, sub granda portreto de D-ro Zamenhof, sed li ne kuraĝis fari tion ĉi, timante ofendi sian tro jaluzan patrinon kaj aldiri al si ĉiujn eblajn suspektojn de ŝi.

Vespere Demjan - la leterportisto alportis el la poŝtejo grandan amason da korespondaĵo. Tie estis nur du leteroj, adresitaj al la patro de Joĝjo: unu estis tiu, kiun Joĝjo antaŭ longe sendis al la gepatroj kun sciigo pri dato de sia veno hejmen, la alia estis malloŋga, kutime lakona, letero de la onklo, kiu sciigis nur: „Mi veturas, ĵaŭdon, ĉevalon, la ĉambron. N.N." Joĝjo, kiu ĝustatempe sciigis siajn korespondantojn pri la somera adreso, ricevis kelkajn leterojn eksterlandajn, unu manuskripton netc - skribotan de Klevĉrov-Ĉagin kaj unu leteron de Olnjo. La knabino gratulis Joĝjon pri feliĉa finiĝo de la ekzamenoj kaj en nemultaj vortoj sciigis, ke ĉiuj familianoj malpacience atendas lin en Veselovo, ke tie estas neimagebla gajeco. „Por vi jam delonge estas preparita en la domo speciala ĉarma ĉambro, kie neniu malhelpos al viaj sciencaj laboroj, - ŝi skribis, - kvankam mi tre dubas, ke vi estos kapabla ion labori tie ĉi. Vi venu, - ni vidu! Plu mi nenion skribos, ke vi venu pli baldaŭ kaj mem ĉion sciigu.

lonjo salutas vin, mi antaŭ nelonge ricevis leteron de ŝi. Ŝi esperas viziti Veselovo'n antaŭ ia kutima festo familia de la 11-a de Julio, ĉar ŝia patro jam ricevis grandan plifacilon de sia malsano. Ne klopodu vane, verkante respondon leteran al mi, ĉar ni-aj Veselovo'anoj-ĉiutage atendos vin mem. Via amikino Olnjo".

„Ne klopodu vane!.. kara knabino!" - ekpensis Joĝjo, tralegante la leteron, - „Ne klopodu vane, atendante min! Tio ĉi, ŝajne, estas tute neefektivigebla por mi. La gepatroj, ni scias, ne permesos al mi plu tian frivolecon."

Kaj subite Joĝjo eksentis enuon, senkaŭzan sopiron pri la feliĉaj loĝantoj de Veselovo kaj pri tiu, kiu en Julio esperas ankaŭ esti tie. Estis jam krepusko, la vitra pordo de la balkoneto, kiu en la ĉambro de Joĝjo anstataŭis fenestron, trelasis malmulte da lumo en la ĉambron, pro kio nuntie estis ebla nenia laboro. Esperante dispeli la sopiron, oĝjo per pasoj neaŭdeblaj malsupreniĝis laŭ la ŝtuparo kaj, rimarkita de neniu, eksis en la ĝardenon kaj tie izoliĝis inter densaj, apenaŭ trairieblaj arbetajoj de sovaĝa arbo. „Se tiu ĉi sopiro okazus al mi antaŭe, en la urbo, mi tuj facile dispelus ĝin, ritinte la infanan ĝardenon, aŭ Olnjon, aŭ, fine, Julia'on Andreevna", - Joĝjo pens, sidiĝante sur duonputriĝinta arbostumpon kaj kunpremante la kapon per la manoj. - „Kelkminuta promeno apud la domo de la grafidinoj havus ne malpli grandefikon!.. Kaj nun? Tie ĉi neniu estas kapabla ĝuste kompreni min aŭ helpi al mi... la patro koleras je mi kaj volas nenion paroli kun mi, la panjo, kun propra al sia vo altrina ĵaluzo, observas ĉiun miian paŝon kaj ĉu mi povas fari al ŝi eĉ sensignifan ludon je tio, kio kaŭzas al mi la sopiron?.. Ho, gardu Dio!.." Kaj je centa jam fojo sin rezentis al Joĝjo la belaj knabinoj gajaj, iliaj ridetoj, naiva, petolema babilado kaj riardoj... preĝpe, rigardoj bruligantaj de Sonjo. Se li povus nun envidi iun el la knabinoj menaŭ per unu okulo, li sentis, ke li perdus por longa tempo ĉian enuon, sopirdon kaj rec akiros bonhumoron, sed ho, ve!..

Subite alfluyis de malproksime gaja kantado de vilaĝaj knabinoj. Oni ne povis ompreni vortojn kantatajn, sed la melodio estis tre ĉarma kaj bela. Ŝi plene harmoniis kun ĉirkaŭa trankvileco vespera en la naturo kaj nevole logis aŭskultanton en malproksimen al vastajo de kampoj, por de ĉiutagaj zorgoj kaj ĉagrenoj.

Joĝjo plivigliĝis. Lia malgaja vizaĝo sereniĝis, li atente aŭskultis la melodion aj la voĉojn jen alproksimiĝantajn, jen malproksimiĝantajn, kiuj ŝajnis al li enataj. Post kelka hezitado li forlasis sian refuĝejon kaj per brava izmaniero expašis enkonten al la sonoj allogaj.

Sur kontraŭa rando de la vilaĝo Joĝjo renkontis areton da knabinoj, kejne vestitaj. li, preninte unu la alian je la manoj kaj alpremiĝinte unu al la alia, malrapide anšis laŭlonge de la strato, kantante. Antaŭ ili, en pozo solene-trankvila, iris kun ere-serioza mieno knabino, teninta en la manoj etenditaj antaŭen negrandan

abieton, ornamitan de helaj, diverskoloraj rubandetoj.

Joĉjo haltis, kun scivoleco observante de malproksime la procesion, kiun li ankoraŭ neĝam vidis, kvankam li konjektis ĝian esencon kaj komprenis ĝian signifon. Kiam la knabinoj alproksimiĝis al tiu loko, kie staris Joĉjo, ili subite ĉesigis la kantadon kaj, flustre, interparolĝis kelkajn vortojn.

-Jru kun ni, Joĉjo!-diris unu el ili pli kuraĝa la filino de la vilaĝanestro-Annjo, konsiderante kovrante sian vizaĝon per blanka naztuko, kiun ŝi tenis en la mano.

-Kien vi iras?..

-Al onklo Matvej... ni portas tien la „krásota'on" („belecon")...-diris Annjo kaj, ne atendinte sian parolon, ŝi silentiĝis.

-Ĉu vi konas Fenjon, lian filinon? Nu, morgaŭ okazos edziĝosoleno...-komencis alia knabino, sed Annjo tuj interrompis ŝin.

-Ŝi edziniĝas je Nikolaj Vasiljiĉ el Sxitovo,-diris Annjo, rec almetante la tukon al la vizaĝo.-Hodiaŭ tie estas la fianĉo. Li regalos amikinojn de la fianĉino... Jru kun ni!-kaj ŝi ekridis.

Rec la knabinoj eksflustris kaj ekridis inter si, iom konsiderante, post kio ili ekriis al unuvoĉe:

-Jru kun ni!.. Jru!.. Joĉjo, iru kun ni...

Joĉjo silente faris jesan geston per la kapo kaj aliĝis al la knabinoj post kio ili tuj, kuriĝante la kantadon, expaŝis pluen tra la strato.

La procesio haltis apud negranda pajlekovrita domaĉo, apud kiu amasiĝis scivolaj-virinoj kaj infanoj. Kiam la knabinoj alproksimiĝis al la perono, la scivolulo ekzapis antaŭe de la knabinoj en la domaĉon.

La kantado tuj silentiĝis. La knabinoj, sin ordiginte, en paroj, oruls signinte al Joĉjo, li sekvu post ili, eniris la peronon kaj de tie en la domaĉon. Joĉjo, timeme rigardante flankoj, ankaŭ eniris.

Negranda ĉambro de la domaĉo estis plena de scivolulo[j], kiam eniris la knabinoj, ankaŭ ne tuj, foriris malantaŭen, premante tiujn, kiuj staris apud la enirpordo. Super tablo pendis negranda lampo, avare verŝinta lumon. Je la tablo, en la angulo sub ikono sidis juna knabino, klininte la kapon super la tablo kaj kovrinte la vizaĝon per la manoj. Ŝi estis simple vestita, ŝia kapo estis malkovrita kaj de ĝi malantaŭen kaj je flankoj falsupreniĝis densaj longaj blondaj haroj, sur kiuj kuŝis rimarkeblaj, klaraj postsignoj de tio, ke antaŭ nelonge ili ankoraŭ estis kunmetitaj harlige. Dekstre de la knabino sidis la fianco – junulo kun negrandaj lipharoj kaj glate frizitaj haroj. Li estis vestita je kolora ĉemizo kun alta kolumo kaj kun negranda duonronda pošeto sur la brusto, de kie falsuprenigis dika, brilanta kupra ĉeneto de poŝhorloĝo. Li sidis brave, alte levinte la kapon, elstariginte antaŭen la brustON, tenante en la mano cigaredon kaj, de tempo

l tempo ellasante tra la nazo ringojn de tabakfumo, šajnis, tute ne atentis sian fianĉon-
n. Maldekstre de la fianĉino sidis jam ne juna virino kaj, de tempo al tempo ordigante
aj karesante la harojn malligitajn de la knabino, kaj rišante per tuko siajn sekajn okul-
n, duonvoĉe kortuše kaj kvietege kantis:

„Adiaŭ, mia gaja juneco! Adiaŭ, mia knabina harligeto! Adiaŭ, miaj junaj kna-
noj, bonaj amikinoj... Adiaŭ, miaj ĉarmaj gepatroj, la paĉjo, la panjo!.. Senrevene
asis mia juneco..."

Ĵus la virino rekomencadis la kantadon, la fianĉino tuj eksplorĝemadis kaj konvul-
eksklamadis la kapon; jus ŝi ĉesigadis la kantadon, la knabino ĉesigadis la plorĝe-
ojn. Sed tiu ĉi kortuša kantado kaj plorĝemado, evidente, neniom influis la fianĉon.
sidis ĉiam en sia pozo senŝanĝa, ellasante indiferente tra la nazo tabakfumon;
j nur iafoje jetante al la fianĉino tute indiferentan, kvazaŭ ironian rigardon.
La knabino, kiu portis la abieton ornamitan, starigis ĝin meze de la tablo. La fi-
ĉino ekrigardis ĝin, ree mallevis la kapon kaj laŭte eksploregis. Dume la knabinoj' ĉiz-
aŭis la tablon kaj, ĥore ekkantinte kortuše konforman kanton, je sonoj de la kanto ko-
encis forŝiradi de la abieto la ornamon.

Joĉjo kun seivoleco observis ĉiun movon de la knabinoj, ĉiun vorton de la kanto kaj tiu
alegorio de vivo de virino edziniĝinta, senigita je antaŭaj ~~plo~~ fraŭlinaj beleco, juneco
j ĝojoj, tre kortušis lin.

La abieton, senigitan je la ornamo, oni formetis de la tablo kaj la fianĉinon kun
virino-ploristino oni forkonduxis en alian ĉambron. Sur la tablon oni metis
ankan kovrilon, starigis samovaron, dolĉaĵojn, kukojn, kiujn antaŭe preparis la
anĉo. Ĉirkaŭ la tablo sidiĝis la knabinoj, - Joĉjo rifuziĝis sekvi ilian ekzemplon, malgraŭ
ura admono de la fianĉo kaj de la knabinoj, - kaj komenciĝis regalado de la knabinoj.

La tetrinkado daŭris en solena silentado, kiun nur iafoje interrompis la fianĉo kaj
-patrino de la fianĉino, kiuj fervore regalis la knabinojn. Sed jus ili forlasis la tablon;
ekaŭdiĝis vigla babilado, rido, ŝercoj, kiuj daŭris jam senfine. Estis gaje, rigardante la
nulinojn, sed Joĉjo estis silentema kaj malgaja. Li fikse rigardis la vizaĝon de An-
o, kiun li opiniis antaŭe belulino, kaj kun malgajo nun konstatis, ke nenio alloga,
rma estis en ŝia vilaĝana beleco, ke ŝiaj gestoj estis tute negraciaj kaj ŝercoj-vulga-
j kaj sovaĝaj. Tra nebulo li vidis figuron de ~~ma~~ alia knabino, vere-belulino, gracia,
nedukita kaj ĉarma, sed nenio mizinda estis en tio, ĉar tiu knabino estis graf-
ino kaj Annjo - nur vilaĝanidino!

XXXVIII.

Surprizo.

Kvankam la čambro de la onklo estis delonge preparita por li, tamen en la ĵaŭdo oni ree longe klopodis, penante aldoni al ĝi ĉiel plej belan kaj pu-an aspekton. Joĉjo kelkfoje, laŭ petoj de la patrino, vizitis ĝin kaj penema esploris ĉiujn angulojn, penante trovi ian muŝon kaŝiĝintan, sed ĉiufoje li, post sia vana esplorado, revenis al la patrino kaj trankviligis ŝin, ke nenie estas videbla eĉ unu postsigno de muŝoj.

Antaŭ la tagmezo la onklo devis veni.

Joĉjo, zenemorante sian sonĝon inkuban kaj misteran „Kloon", penis konjekti mi-teroplenan signifon de tiu ĉi vorto kaj ĝian interligon sendube, kiel ŝajnis al li, kun la atendata veno de la onklo, sencese elkuradis sur la peronon kaj fikse rigardis la voj-n. Je tiu ĉi interligo li ne kredus, se la vorto mistera eliris nur el buŝo de iu, sed ĝin diris ŝi, sekve, la interligo devis esti. „Ja Sonjo, kvankam tio ĉi okazis en sonĝo, ne permes-us al si tute senzaŭze eldiri ian vorton malsaĝan!" - Joĉjo pensis.

Sed jen malproksime sur vojkurbiĝo montriĝis polvonubo, la kozo de Joĉjo ekstremis en la brusto, li enkuris en la ĉambrojn, laŭte proklamante:

- La onklo!.. La onklo veturas!..

La gepatroj de Joĉjo, feste vestitaj, rapidemе elиris sur la peronon kaj haltis sur la ŝtup-o, atendante la gaston. Joĉjo sin kaŝis malantaŭe de ili. Nun jam estis klare vidataj la ĉevalo, vigle trenanta trote novan kalešon de la patro, kiun li uzis nur plej malofte, kaj Volovej - la veturigisto kaj la onklo, sidantaj kurbiĝinte en porvojaĝa mantelo kaj blanka ajlĉapelo.

La renkonto okazis, kutime, en profunda silento. La kalešo haltis ĝuste kontraŭ la ŝtuparo kaj la onklo longe moviĝis en ĝi, antaŭe ol li leviĝis. La gepatroj de Joĉjo helpis al la maljunulo forlasi la kalešon kaj supreniĝi sur la peronon, subtenante lin je la man-i. Nur sur la perono la onklo formetis de la kapo sian ĉapelon kaj permesis al la boprato, ke li ekkisu lin je la glate razita, flavaĵa, sulkoplena vango. La patrino - lia fratino - ost tio ĉiukaŭprenis per la manoj lian kolon kaj longe alpremadis lian kapon al ia brusto, flustrante karesajn vortojn. Fine, la maljunulo ekskuis la kapon kaj ellasis en sonon obtuzan, post kio la fratino liberigis lin el siaj brakoj kaj ekkuris antaŭ li. Kur tiam severa rigardo de la onklo falis el sub liaj longaj grizaj brovoj sur la nevon, kiu staris ĉiam en sama pozo sur la loko antaŭa. Joĉjo respektoplene salutis lin. La mal-unulo iom kliniĝis al li kaj, malrapide pašante kaj ne haltante eĉ por unu momento, farante superulo-lecan mienon, kvazaŭ tiu ĉi ioma kliniĝo kaŭzis al li grandan penon, diris per gesto montris al la nevo sian vangon. Joĉjo ekkisis la lokon montritan kaj kun

miro, miksita kun timo, rimarkis, ke la onklo subite haltis kontraŭ li, fikse rigardante lian bruston, kie modeste radiis esperanta signeto ŝvinpinta. La onklo rigardis la steleton, la nervo-lian vizaĝon, sur kiu oni povis samtempe tralegi koleremon kaj bonecon, severecon kaj afablecon, scivolecon kaj malŝaton. Estis malfacile konjekti, ĉu tiuj ĉi tiom malsamaj kaj kontraŭaj sentoj batalis en la maljunulo, ĉu ili estis nur ŝajnigaj. De la steleto la rigardo de la maljunulo ekglitis al la vizaĝo infane-naiva kaj samtempe meminde-fiera de la nevo, poste ree al la steleto.

-Kio ĝi estas?..- fine, severe diris la onklo, geste montrante la steleton, kaj lia mieno prezentis mokon, scivolecon kaj mirsamtempe.

-Ĝi estas signeto... esperanta...- ĵoĝjo respondis, avideme kaptante per la lipoj aeron, kvazaŭ ĝi ne estis sufiĉa por lia spirado.

-Signeto!.. Kia stulta respondo!.. Mi vidas, ke ĝi estas signeto, mi ne blindiĝis sanoraŭ... Mi demandas vin, kial vi portas ĝin sur via brusto?..

-Mi... ĉar mi estas esperantisto... onklĉjo!..

La onklo nenion respondis, kvazaŭ tiu ĉi timema respondo de la knabo plene kontentigis lin. Dum iom da tempo, kvazaŭ ion konsiderante, kvazaŭ ion dezirante kompreni, la onklo rigardis la nevon silente. Poste li faris per la mano geston nedifinitan, kies sencon kaj signifon neniu komprenis, kaj daŭrigis la paŝadon.

-Mi delonge konsilis, ke vi formetu vian signeton...- murmuris malantaŭe la patro. Kun vi atendu de la onklo decan edifon!.. Kiu ne obeas al siaj gepatroj, tiu...

Pluajn vortojn de la patro ĵoĝjo ne aŭdis. Li estis okupita de tute aliaj pensoj.

La onklo en la ĉambro dum relka tempo restis kun la fratino, poste ĝis la vespero mem li ripozis de la vojaĝo laciga. Dum tiu ĉi tempo, kompreneble, ĉiuj en la domo iris sur piedfingroj kaj interparolis nur flustre. Vespere estis aranĝita je honoro de la onklo tagmanĝo en la manĝoĉambro, kie antaŭzorge estis neniigitaj ĉiuj insektoj, kiujn ne toleris la gasto. Sed kiamĉiojam estis preta por la tagmanĝo kaj vi nur atendis eniron de la gasto, li subite sciigis la fratinon mirigitan, ke li prokrastos la tagmanĝon kaj ke oni anstataŭ ĝi alportu al li en la ĉambron teon kaj venigu la nevon. La fratino vane penis protesti, pruvante al la frato obstina, ke la tagmanĝo prokrastota perdos sian bonguston, ke tiujn manĝaĵojn, kiujn ŝi nun preparis, li manĝis ĉeniam, la maljunulo estis ne malkonvinkebla.

-Teon!..- li, fine, ekkriis laŭte, kiam tedis al li la admonoj de la fratino.- Venigu la... nevon!

Ĵoĝjo, kiel antaŭe, kun la steleto sur la brusto kuraĝe eniris en la ĉambron kaj haltis, malleviute la kapon, apud la pordo. La onklo, sidante je la tablo, longe silente observis la knabon, fine tio ĉi, videble, tedis al li, li prenis el la arĝenta tabakujo piĉjvanton da

flartabako kaj fikse ekrigardis Joĉjon.

– Kiu rekomendis al vi studi Esperanton? – li diris.

– Neniu, mi mem...

– Ĉu vi delonge studas ĝin?..

Joĉjo komencis detalan kaj sinceran respondon je la demando, ankoraŭ ne povante kompreni, ĉu aprobas la onklo lian emon al la lingvo, ĉu mallaŭdos, sed la onklo interrompis lian en la komenco mem:

– Ĵus ĉi tien!.. Sidiĝu...

Joĉjo sidiĝis al la tablo apud la onklo mem.

– Nu!... – li diris, ŝarĝante per la tabako ambaŭ nazotruojn, – rakontu!..

Joĉjo komence konfuziĝis de ne kutima proksimeco de la onklo, li ofte interrompis sian rakonton per longaj paŭzoj kaj longe ne povis atingi fluecon de la rakontado. Sed laŭmezure de tio, kiel la vizaĝo de la onklo, kutime severa kaj malserena, pli kaj pli malseriĝis kaj sereniĝis, laŭmezure de tio, kiel li ĉiam pli ofte kaj pli ofte aprobe balancis al Joĉjo per la kapo kaj balbutis per tono kontenta sian kutiman „Hm!..", jam gaje fraztante per la tabakujo je la tablo, Joĉjo pli kuraĝe kaj pli sincere, nenion kaŝante, rakontis al la maljunulo pri siaj penoj propagandi la lingvon en la urbo, pri siaj konataj kaj pri ĉiuj agrablaj kaj malagrablaj, kiuj rezultis el tio.

— ...Per miaj malsukcesoj mi tre ĉagrenis la gepatrojn, ja oni restigis min ankoraŭ por unu jaro en la sama klaso... – finis Joĉjo per plenda tono, fiksinte siajn gajajn okulojn en la ne malpli gajajn de la onklo, kiu daŭrigis frapetadi per la tabakujo je la tablo.

– Tio ĉi estas bagatelo, kompare kun tio, kion vi jam utiligis kaj povas ankoraŭ utiligi el viaj konatecoj, – la onklo respondis, ridetante ankoraŭ enigmoplene. – Kaj ĉu vi parolas en Esperanto? – li aldonis post ioma paŭzo jam en Esperanto.

Joĉjo ne tuj komprenis la aferon. Li larĝe malfermis la okulojn kaj buŝon kaj longe rigardis la onklon, timante, ke, eble, la aŭdaco ento trompis lin. La onklo ĝuste komprenis la hezitadon de la nevo kaj kun feliĉa mieno, daŭrigis en la sama lingvo:

– Ĉu vi komprenis min?..

– Onklo, onklo kara!.. Ĉu vi ankaŭ estas?.. – Joĉjo tuj ekkriis, forsaltante de la seĝo kaj ĉirkaŭprenante la onklon.

– Ŝuŝiĉe, ŝuŝiĉe!.. – murmuris la onklo, ridetante, en Esperanto, skuante per la kapo kaj sin liberigante de la ĉirkaŭpreno. – Moderigu vian ardecon! Lasu vian delikatecon bovidan!..

– Kaj ĉu delonge vi, kara onklo, posedas la lingvon?

– Preskaŭ de ĝia apero mem...

– Vi, ŝajne, loĝas en Polujo, onklo?.. Ĉu vi vidis iam doktoron Zam...

– Ĉu oni povas loĝi en Romo kaj ne vidi la papon? Nun mi loĝas ĝuste tie, kie tempe loĝas ankaŭ Zamenhof – en Grodno... Mi konas lin tre bone... Tamen sufiĉe babili! La somero estas longa, ni ankoraŭ ne renuforje havos okazon interparoli! Jen, diru al la patrino, ke mi volas manĝi.

Kaj rimarkinte, ke la nevo ne volas tuj disiĝi kun li, la maljunulo afable ekkaresis lin je la kapo per la mano kaj aldonis:

– Nu, vi estas bravulo! Mi ne atendis ion similan de vi... Vi estas junulo multepromesanta!

XXXIX.

Nova protektanto.

La gepatroj de Joĉjo estis surprizitaj, kiam la onklo eniris en la manĝoĉambron gaja kaj ridetanta, kion li preskaŭ neniam vidis antaŭe, sed ilia mieno ne havis limojn, kiam la onklo ekdeziris, ke Joĉo sidu apud li.

– Delonge, delonge, miaj karaj, mi devus esti tie ĉi, sed diversaj cirkonstancoj je tiu ĉi Jojo detenis min, – li diris, interrompante silenton, kiu ĝis tiam regis en la ĉambro, jus li malplenigis teleron da supo. – Nu, kiel vi fartas tie ĉi?.. – li demandis, ekrigardante la mastrojn. – Kiel fartas via filo plej maljuna? – li sin turnis al la mastro.

– Mi dankas vin, li bone fartas, ankaŭ ni ĉiuj... – la mastro parolis, sed la onklo, ne aŭskultante lin, daŭrigis:

– Kiel mi memoras, li iam projektis aranĝi ian bibliotekon... Ĉu viaj vilaĝanoj loĝas libraĉojn?

– La biblioteko jam funkcias... Li klopodas nun, ke oni permesu aranĝi en la vilaĝo suran popolan lernejon.

– Hm!.. Jen kiel vi progresas! Kian lernejon vi bezonas ankoraŭ, ĉu universitaton? – la onklo ekridetis.

– Ne, kian universitaton! – respondis la mastro, ne komprenante moktonon de la frato. – Li simple volas, ke la popolo havu eblon ricevi pli vastan klerecon...

– Nu, diru al li, mi petas, ke li estas stultulo! – la onklo diris triumfe, gaje ridetante.

La mastro estis ofendita de tia neatendita komplimento. Hezitante, ĉu li devas kontraŭdiri, ĉu silenti, li ekrigardis demande la edzinon. Tiu ĝuste komprenis la rigardon kaj okulsignis petegante, ke li ne atentu la parolojn de la ekstravaganculo-frato. La gastro duone daŭrigis sengene:

– Jes, li estas stultulo kaj ne simpla stultulo, sed stultulo memfida, fieza! Jen, tiu ĉi via filo, – li diris, frapante Joĉjon je la ŝultro per la mano, – estas bravulo! Li ne similos

al la frato!

– Mi scias tion ĉi. Ĉe nun li ne similas al sia frato plej malĵuna!.. – respondis la patro, rigardante Joĉjon. – Kiam lia frato havis tian aĝon, li lernis kune kaj tiu ĉi, – li montris Joĉjon per la mano, – ĉu vi scias, nun estas restigita en la sama klaso ankoraŭ por unu jaro kaj poste oni elpelos lin tute el la lernejo, vere! Jen kia bravulo li estas!

– Absurdo! Absurdo!... – ekkriis la onklo, leviĝante.

– Frato, frato!.. Kien vi? – kun terura ekkriis la mastrino, ankaŭ leviĝante. – Oni tuj portos vostaĵon... Pavel Ivanoviĉ! – ŝi sin turnis al la edzo kun peteganta mieno, – ĉesu, mi petas... Mia bona frato...

La gasto sidiĝis.

– Se oni restigis lin en la sama klaso, tio ĉi estas bagatelo neatentinda! Unu jaro perdita signifas nenion!.. Sed ĉu vi scias, kion li akiris dum tiu ĉi jaro perdita, ha? Ĉu vi scias, ke li estas konata, kaj ne sole konata, sed akceptata, kiel amiko de la familio, kun kiaj alte-noblaj kaj alte ŝatataj anoj...

– Kiuj scias nur malmoraliĝi junulojn!... – aldonis ĉagrene la mastro.

– Hm!.. Permesu, permesu! – ekkriis la onklo, ekfrapinte per la tabakujo je la tablo, kio ĉiam signifis lian malkontenton je io. – Permesu, kiam mi diros, vi povos paroli, kion vi volos, sed vi ne rajtas interrompi min! Jes!.. Malmoraligas la popolon nur personoj, similaj al via filo plej malĵuna, kiu havas pri si tiom altan opinion, kaj memafere estas nur stultulo, fieruleto! Jes!..

– Tiel... Mi dankas vin... Vi ĝojigis min, vi...

– La familio de grafo Trubaĉev!.. Ĉu vi scias, kio ĝi estas?.. Tio ĉi ne estas simple pipro-kuko, mia kara! La grafo estas eminentulo... liaj sciencaj verkoj estas alte ŝatataj ĉe eksterlando!.. Oni invitis lin, ke li okupu katedron en Moskva universitato! Tiajn saĝ-ulojn, mia kara, ne ĉiujare naskas la tero! Kaj la kolonelo?.. Kolonelo Novickij estas fame konata bonfaranto!.. Lia nomo estas fama tra tuta Rusujo! Ĉu vi nenion scias?.. Li estas homo altehumana, honora membro de sennombraj institucioj. Ricevinte kun la edzino... Ŝi estas filino de riĉa krimea posedanto de vinberĝardenoj... ha, kia estas lia nomo?.. Nu, vi kredeble vidadis krimean vinon de lia firmao... Jen, en kia medio estis Joĉjo dum la jaro pasinta!.. Mi forgesis nomi al vi aliajn familiojn, eble, ne malpli...

– Sufiĉe!... – diris la mastro, leviĝante.

– Ne, vi atendu...

– Ke vi ankoraŭ ofendu min?

– Pavel Ivanoviĉ! Pro Dio mem!... – la mastrino ree sin turnis al la edzo, farante al li pe-tegoplenajn okulsignojn. – Atendu, mia bona frato...

La interparolo neeviteble kaj kutime finiĝis per malpaciĝo.

Joĉjo triumpis. De tiam, kiam tiel neatendite enmiksiĝis en lian personan vivon la onklo, jam neniu riproĉis lin je la jaro perdita kaj la patrino elmontris al li ĉiel favoron kaj simpation. Eĉ la patro, al kiu tre ne plačis ĉiama defendado kaj probado de la onklo de la „mankoj", kiel li prezentis al si forlogiĝon de la filo je Esperanto kaj la konatecojn nekonvenajn por lernanto de religia lernejo, de Joĉjo, eĉ li ĉiam pli kaj pli interesiĝis pri lia okupado je la netskribado kaj korespondado kun tiaj eminentaj personoj kaj malkaŝe esprimis iafoje al la filo sian miron je lia nelaciĝebla laboro. Li en profundajo de sia animo jam konsentis kun ĉiuj argumentoj de la bofrato kaj sur pro nerepaciĝemo kun li evitis aprobi la agadon laŭdindan de Joĉjo. Ofte, alportinte en la ĉambron de Joĉjo fus ricevitan korespondaĵon por li, la patro longan tempon pasis apud lia tablo, kun intereso nekaŝata trarigardante leterojn eksterlandajn kaj auskultante entuziasmajn parolojn de la filo pri sendube fina triumfo de la lingvo kaj felicxo de la homaro, kiun liveros tiu ĉi triumfo.

Unufoje matene, baldaŭ post la lasta malpaciĝo de la bofratoj, Joĉjo, kliniĝinte super la tablo, urĝe netskribis iantre enuigan kaj neleegeblan manuskripton de Kleverov-Čagin, kiam subite ekaŭdiĝis knarado de ŝtupoj de la ŝtuparo kaj malpacifa maljunula spirado. Joĉjo ankoraŭ ne havis tempon por konsideri, al kiu apartenas tiuj ŝtupaŝoj, kiam la onklo aperis sur sojlo de lia ĉambro. Li estis vestita je blanka, maldelikata kitelo veltola kaj flarĝranda pajla ĉapelo. En unu mano li tenis dikan juniperan bastonon kun branĉtuberoj kaj en la alia - grandan korbon. Forminte post si la pordon, li longe staris apud la pordo mem, trarigardante la ĉambreton per siaj kutime-severaj okuloj.

– Kia ĉambreto estas sufiĉe ĉarma, – li komencis, aliranta al la nevo kaj daŭrigante trarigardi internaĵon de la ĉambro. – Mi neniam estis tie ĉi... Vi majstre, mi vidas, scias ornami sian laborĉambron. Kion vi skribas?

Joĉjo montris la manuskripton kaj donis necesajn klarigojn pri la laboro al la onklo.

– Hm!.. Ĵetu!.. Kaj plu neniam perdu tempon je tia laboro malsaĝa, – li diris, sulkinte la brovojn, jus li ekrigardis la kajeron nelegeble kaj malzorge skribitan. – Ĵetu!.. – li ripetis.

– Sed, kara onklo, mi perlaboras monon, skribante... Kaj je mono mi ĉiam bezonas sur mia... – Joĉjo komencis sin defendi.

– Mi donos al vi pli saĝan laboron... Nun mi ne havas tempon liberan por klarigi ĉion al vi, – mi rapidas en la arbaron por serĉi fungojn... Poste, poste!.. Vi perlaboros pli multe da mono... Nu, montru al mi, kion vi havas interesan, – li aldonis, sidiĝante apud la tablo.

Joĉjo metis antaŭ la onklo lastfoje ricevitajn poŝtkartojn kaj leterojn eksterlandajn. La onklo, ne turnante al ili specialan atenton, rapide kaj supraĵe trarigardis ilin kaj for-

retis ilin flanken.

– Ĉu vi havas leteron de via amiko ... nu, de s-ro Veselov, ekzemple ?..

– Antaŭ nelonge mi ricevis leteron de Olnjo, sed...

– Ĉu ĝi estas sekreto ? – la onklo demandis, fikse rigardante Joĉjon kaj movrudeto faci- a ekglitis tra lia vizaĝo.

– Tute ne !... Ĉu mi havas sekreton de vi, kara onklo ? – diris Joĉjo, brilante per siaj belaj uloj kaj ruĝiĝante.

– Ĉu ŝi estas bela ?..

– Onklo !...

– Eble, vi havas ŝian portreton ?

Joĉjo konfuziĝeme malfermis la oruloj n kaj elprenis el (tirkestode) la tablo malgrandan ko- verton.

– Oho !.. – li diris, elpreninte la fotografaĵon el la koverto kaj rigardante la portret- n de la knabino. – La knabinaĉo estas belvizaĝa ! Kial vi kaŝas la portreton ? Vi metu ĝin ien, ekzemple, tien ĉi ... – la onklo montris per la mano la muron apud la portre- to de d-ro Zamenhof. – Aĥ, eble, vi timas la patrinon ? Ĉu ŝi vidis la fotografaĵon ?

– Onklo !.. – petegante komencis Joĉjo, sed tiu ne permesis al li daŭrigi.

– Mi diros, mi ĉion diros al ŝi !.. Mi nepre... Nu, montru ankoraŭ ion al mi, mi rapid- as en la arbaron.

Joĉjo montris la leteron de Olnjo.

– Kio ĝi estas ? – la onklo demandis. – Ĉu letero ? Poste !.. Mi ne havas nun tempon. Mo- ntru aliajn fotografaĵojn... de la graĵidinoj.

– Mi ne havas.

– Mi bedaŭras !.. Nu, diru, almenaŭ, ĉu ili estas ankaŭ tiaj ĉarmaj ?

– Ne... – apenaŭ aŭdeble, tamen kuraĝe diris Joĉjo, honteme ŝirmante la vizaĝon per a letero, – ili... ŝi estas ankoraŭ pli...

– Ĉu pli ? Ĉu ? .. Nu, nun mi multan komprenas.

Li prenis la leteron de Olnjo kaj komencis legi ĝin.

– Ĉu vi veturos en Veselovo'n ? Oni ja preparis tie por vi ĉe specialan ĉambron !..

– Ne... La paĉjo...

– Malĝeliĉa knabino ! Mi tre bedaŭras ŝin, vere ! Ŝi tie klopodas, zorgas por vi, senpa- ence atendas vin kaj tute ne supozas, ke alia knabino, la graĵid...

– Kara onklo !..

– Tamen, mi tre konsilas al vi veturi tien, trankviligi la knabinaĉon... Ĉi mem ntencas viziti tiujn ĉi nekonatajn kaj tiom gastamajn strangulojn.

– Kara onklo ! Mi tre, tre dezirus veturi tien, sed mi scias, ke nek la paĉjo, nek la panjo...

– Kia absurdo ! Vi preparu ĉion por la vojaĝo, mi ĉion aranĝos... kaj poste, kiam vi ĉion

ĝiĝos kaj vidos tie proprokule, mi kune kun vi veturos tien al la aludata de la knabino
esto familia. Mi ĉion aranĝos!..

Kaj la onklo, sulkinte la brovojn, rapidege leviĝis de la seĝo kaj, nenion plu dirinte, for-
ris laŭte piedfrapante.

Dum la sama tago la onklo havis longedaŭran konversacion kun la patrino kaj re-
ultatoj de ĝi elmontriĝis tre baldaŭ.

Vespere, kiam Joĉjo kutime netskribis la lastan manuskripton (laŭ la konsilo de la
nklo li decidis repuziĝi de plua simila laboro), en lian ĉambron per paŝoj facilaj eniris
a patrino.

– Ĉu vi jam forveturas de ni, Joĉjo?.. – ŝi diris, malgaje, karesante per la mano la kap-
n de la filo. – Kial vi ne montris al mi portreton de tiu knabino?.. Antaŭe vi nenion
aŝis de mi, – ŝi diris riproĉe, profunde ekspirinte.

Ŝi longe rigardis la portreton silente, poste ŝi, ankaŭ silente, redonis ĝin al Joĉjo.

– Panjo, ĉu mi povas starigi ĝin sur mia skribotablo? – Joĉjo demandis, ruĝiĝante kaj
onfuziĝeme mallevante la kapon.

– Se ĝi... se ŝi tiel plačas al vi, vi, kompreneble, povas, – ŝi ne tuj respondis, malgaje ri-
etante, – se la knabinon vi šatas pli, ol la patrinon.

– Panjo, panjo!.. Mi sciis... Por kio vi tiel parolas? – Joĉjo ekkriis, per la ambaŭ manoj
irkaŭkaptante la kolon de la patrino.

– Se vi volas veturi tien, vi veturu, tion ĉi tre deziras mia bona prato, sed... sed vi ne
ute forgesu tie min, vian patrinon... – ŝi aldonis, silente eksŝuinte la kapon al la
nabinportreto.

La patro aŭkaŭ iamaniere sciiĝis pri la vojaĝo, kiun intencis efektivigi lia filo,
aj vespere de la sama tago, enlitiĝante, li invitis lin en sian ĉambron.

– Nu, kiam vi intencas veturi? – li demandis Joĉjon, just li eniris.

– Kien, paĉjo? – demandis Joĉjo surprizita.

– Mi ne scias... Ĉion tion ĉi elpensas via onklo kaj la patrino!.. Nu, veturu! Ĝis la urbo
in veturigos Solovej.

Pro neatendita kaj tiom ĝustatempa enmiksiĝo de la onklo ĉio favoris, kiel neni-
m, antaŭe, al vojaĝo de Joĉjo en Veselovo'n.

XL

Tien kaj tie.

Veselovo kuŝis pli ol jarcent verstoj de la vilaĝo kaj tie nek iam estis,
ek ĉe preterveturis in el parencoj aŭ samvilaĝanoj de Joĉjo. Li sciis nur, ke Veselovo'n oni
ovis atingi per vaporŝipo, ankaŭ per fervojo. Joĉjo elektis la unuan.

Vespere de malserena, malvarma junia tago Joĉjo venis vaporŝipa albordiĝejon. Ĝi estis tute senhoma. La vaporŝipo ankoraŭ forestis kaj neniu povis diri, kiam ĝi venos. De la rivero Bloris akre-malvarma vento, kiu pelis kun bruo sur suprajo de la rivero nigrajn ondojn kun ŝaŭmantaj dorsoj, kaj la albordiĝejo-negranda barako kun konstruajo sur la perdeko por servantoj kaj malgranda atendejo por pasaĝeroj - facile balanciĝis sur ondoj kaj kraketis. Joĉjo, sin apogante je balustrado de la barko, klinigis malsupren sur la tuta korpo kaj observis senlacan ludadon de la ondoj, ilian bruan plaŭdadon je la barkrando kaj, aŭskultante ilian plustradon, penis kompreni ĝian sencon kaŝitan. Ju pli longe li rigardis senfinan vicon de la ondoj kurantaj, ju pli longe li aŭskultis ilin, des pli forte premis lian koron senkaŭza doloro kaj sopiro. Li tute ~~nn~~ memoris, kie li estas kaj ĉu longe listarastic, li jam ne distingis la ondojn, nstataŭ kiuj nun plugis antaŭ liaj okuloj diverskoloraj punktoj kaj anstataŭ ilia itna brua plaŭdado, jen minace-timiga, jen delikate-lulanta, li aŭdis nun nildan, malgaje-ĵaluzan, kortuŝan voĉon de la patrino: „... Ĉu vi jam forveturas de i, Joĉjo?.. Kial vi ne montris al mi la portreton de la knabino?.. Antaŭe vi menion aŝis de mi!.. Se vi ŝatas la knabinon pli, ol la patrinon..."

aŭskultante

„Ĉu memgrafere mi ŝatas la knabinon pli?.." - li pensis, ankoraŭ ĉiam ripetiĝ-ntan voĉon de la patrino en la brua plaŭdado de la ondoj. - „Knabinon?.. Kiun nabinon? Ĉu tiun?.. Jes, se vi volas!.. Almenaŭ mi sentis ne unufoje hejme apud patrino sopiron, enuon, kiujn mi sentis neniam, sidante apud Sonjo, aŭ Olnjo..." j figuro de la maldika, malsanema patrino tuj cedis sian lokon en imago de Joĉjo la gajaj, ĉarmoriĉaj knabinoj. Li ekstremis, kuntiris pli bone sian jakon, tra kiu jam longe penetris malvarmo kaj malrapide, malvigle expaŝis al la atendejo.

Ĝi estis malgranda ĉambreto kun kameno en unu angulo kaj du fenestroj, tur-itaj al la rivero. Apud muroj staris tarĝaj benkoj, sur unu el kiuj kuŝis maljuna irino en multe portita vilaĝana vestaĵo. Sub la kapon, kovritan per granda griza lo estis metita granda vojsako, je kiu sin apogante per unu mano kaj klinigante per la virino sidis grizbarba maljunulo kun malgrasa vizaĝo kaj viglaj grizaj ok-loj, rigardintaj el profundaj orulkavaĵoj. Joĉjo sidiĝis apud unu fenestro kaj turn-sian fiksan rigardon al la maljunulo. Sed tiu turnis tute neniam atenton al li j daŭrigis, jen klinigante al la vizaĝo mem de la virino, jen levante la kapon, sian karolon laŭtvoĉe:

„Nu, bone!.. Kion fari?.. Oni alveturigis min hejmen... Oni venigis al mi la pas-on, la kuraciston, - helpas nenio: nek la mano, nek la piedoj moviĝas... Oni veturi-is min en la urbon, en hospitalon... Oni kuŝigis min sur liton, mi atendas, nek mano, nek la piedoj moviĝas!.. Bone, mi kuŝas tie unu tagon, du, tri tagojn. Mi kuŝas, observas ĉion kaj miras: oni nek kuracas min, nek doktoro vizitas kaj esplor-

as min, nur iafoje alkuras al mi kuracisto kun ia trinkajo kaj ankoraŭ ĉiutage matene venas ia viro ebria en palto kaj ĉapo sur la kapo... Li iras de unu malsanulo al la dua tra la ĉambro kaj babilas kun li. Li venas al mi kaj demandas: „Nu, maljunulo, kiel vi fartas?..“ Mi respondas: „Gloro al Dio!..“ Li parolas: „Gloro al Dio, vi estas pli proksime al morto!.. Montru vian langon!..“ Kaj li iras plu en... Tiel la afero daŭras tri tagojn. Mi miras... Sed kion fari?.. Mi vivis kvardek jarojn en Peterburgo, dum tiu ĉi tempo mi servis en tri restoracioposedantoj, mi bone scias ordojn en veraj hospitaloj. Vivinte en la ĉefurbo, mi unufoje malsaniĝis... Okazis al mi serioza malsano... transurniĝo de la posta intesto!... Mi kuŝis en hospitalo Obuĥovskij... Nu, tie malsanulojn ĉiutage vizitadis doktoro. Li estis vestita je blanka ĥalato... li mem esploris ĉiun malsanulon propramane!.. Kaj tie?.. Bone! Unufoje matene preteriris la kuracisto, mi demandas lin: „Diru, mi petas vin, bona homo, ĉu tie ĉi iam vizitas malsanulojn doktoro?“ Li respondas: „Li vizitas ĉiutage! Ĉu vi ne vidis lin?“ „Ne,“ - mi parolas, „mi kuŝas tie ĉi jam tri tagojn kaj nenia doktoro vizitis kaj esploris min ankoraŭ!.. Nur ĉiutage malgrandaj venas ia viro ebria en palto kaj ĉapo sur la kapo... Li venas al mi kaj demandas: „Nu, maljunulo, kiel vi fartas?..“ Mi respondas: „Gloro al Dio!..“ Li parolas: „Gloro al Dio, vi estas pli proksime al morto!.. Montru vian langon!..“ Kaj li iras plu...“ La kuracisto parolas: „Kion vi deziras ankoraŭ? Tiu ĉi viro estas ĝuste la doktoro!..“ „Ĉu?..“ - mi parolas, - „sed mi supozis, ke li estas kortisto!..“ Bone! Mi kuŝas kaj observas lin, kio okazas al la malsanuloj najbaraj. Tie kuŝis unu 19-jara knabino malsana, [illegible] hundfilo, ordonis, ke oni tondu tute ~~kajon~~ ŝiajn harojn kaj verŝu sur ŝian ~~kapon~~ kapon ian malvarman... Nu, kompreneble, la knabino malfeliĉa mortis mortis! Venis li matene en la ĉambron, haltis antaŭ la knabino mortinta, ekskuis per la kapo kaj diris: „Mi bedaŭras, mi bedaŭras, la knabino mortis dum ne natura morto!..“ Kuŝis tie unu malsana bubo el Nerjezovo, li ankaŭ venenis lin!.. Bone! La kuracisto ĉion rakontis al la doktoro... Unufoje matene la doktoro venis... li alproksimiĝis al mi kaj demandis min kutime: „Nu, maljunulo, kiel vi fartas?..“ Mi respondas: „Gloro al Dio!..“ Li parolas: „Gloro al Dio, vi estas pli proksime al morto!.. Montru vian langon!..“ Mi montriĝis... „Bone!“ - li parolas, - „sed kial vi ribelas tie ĉi?..“ Mi respondas: „Mi ne ribelas, bona sinjoro, mi nur ĉiam atendas vian helpon: jen nek la manoj, nek la piedoj malsanaj...“ Mi kuŝas tie ĉi jam kvar tagojn kaj vi eĉ unufojon ne bonvolis ekrigardi ilin... nur ĉiam rigardas mian langon! Sed mia lango estas sana... vi rigardu miajn piedojn kaj manojn!.. Mi kvardek jarojn vivis en Peterburgo, dum tiu ĉi tempo mi servis en tri restoracioposedantoj, mi bone scias ordojn en veraj hospitaloj. Vivinte en la ĉefurbo, mi unufoje malsaniĝis... Okazis al mi serioza malsano... transturniĝo de la posta intesto!... Mi kuŝis en hospitalo Obuĥovskij... Nu, tie malsanulojn ĉiutage vizitadis doktoro. Li estis vestita je blanka ĥalato... li mem esploris ĉiun malsanulon propramane!...“ Li ne-

ion respondis al mi kaj foriris pluen. Li vizitis ĉiujn malsanulojn, kiuj kuŝis tie kaj, foirante, li haltis apud la pordo mem kaj alvokis la kuracistion. Mi rigardas ilin kaj aŭskultas. La doktoro parolas duonvoĉe al li: „Kaj la maljunulo?.. Kion ni faros al li?.. Ha, donu al li gutojn pli venenajn!" Bone... Pasis unu horo, [redacted] venas al mi la kuracisto, li portas flason kaj parolas al mi: „Nu, maljunulo, trinku!" „Ne", - mi parolas, - „antaŭ ol mi trinkus tion ĉi!". Li parolas: „La doktoro ordonis!". Mi parolas: „Mi tre dankas vin ankaŭ la bonan doktoron, sed mi ne trinkos... Mi ĉion vidas, mi ĉion aŭdas, kio okazas tie ĉi ĉe la malsanuloj. Tie ĉi kuŝis unu 19-jara knabino malsana... li, hundfilo, ordonis, ke mi tondu tute ŝiajn harojn kaj verŝu sur ŝian kapon akvon malvarman... Nu, kompreneble, la knabino malfeliĉa nokte mortis! Venis li matene en la ĉambron, haltis antaŭ la knabino mortinta, ekskuis per la kapo kaj diris: „Mi bedaŭras, mi bedaŭras, la knabino mortis de ne natura morto!..." Kuŝis tie ankaŭ unu malsana Rubo el Nevjerovo, li ankaŭ venenis lin..." La kuracisto nenion respondis al mi. Li kolereme elverŝis sian kuracilon en lavovazon kaj foriris. Bone!... En la tago sekvinta matene venas la doktoro. „Ha, maljunulo!" - li parolas, - „Kiel vi fartas?.." Mi respondas: „Sluzo al Dio!.." Li parolas: „Sluzo al Dio, vi estas pli proksime al morto!.. Montru vian langon! Ĉu vi trinkis hieraŭ la kuracilon?.." „Ne!" - mi respondas, - „mi ne trinkis ĝin!.." La doktoro koleriĝis, li kriis: „Kie vi estas, stultulo?.. Ĉu vi forgesis, ke vi estas en hospitalo, ke vi devas obei al kuracistoj?.." „Pardonu min maljunan stultulon", - mi parolas al li: „lasu min hejmen, mi petas!... Mi mortos tie trankvile apud mia edzino - maljunulino..." „Kial vi ne volas plu resti tie ĉi? Ĉu ne plaĉas al vi nia kuracado?.." - li parolas. „Ne, sinjoro doktoro," - mi parolas, - „ĝi tre plaĉas al mi!... Mi kuŝas tie ĉi jam kvin tagojn kaj mi ĉion vidas, mi ĉion aŭdas, kio okazas tie ĉi al la malsanuloj. Tie ĉi kuŝis unu 19-jara knabino malsana, vi, via doktora koŝto, ordonis, ke oni tondu tute ŝiajn harojn kaj verŝu sur ŝian kapon akvon malvarmegan... Nu, kompreneble, la knabino malfeliĉa nokte mortis! Vi venis matene en la ĉambron, haltis antaŭ la knabino mortinta, ekskuis per la kapo kaj diris: „Mi bedaŭras, mi bedaŭras, la knabino mortis de ne natura morto!.." Kuŝis tie ankaŭ unu malsana Rubo el Nevjerovo, vi ankaŭ venenis lin!.. Kaj hieraŭ, foirante el la ĉambro, vi haltis apud la pordo mem kaj alvokis la kuracistion. Mi rigardas vin kaj aŭskultas. Vi parolas al la kuracisto duonvoĉe: „Kaj la maljäŭnulo?.. Kion ni faros al li?.. Ha, donu al li gutojn pli venenajn!.." „Ĉu vi volas hejmen?.." - li parolas. „Faru tian konservon al mi, lasu min hejmen! Tage kaj nokte mi preĝos pri vi al la Sinjoro!.." - mi parolas. Bone!.. En la sama tago oni lasis min... Hejme mi kuŝis unu semajnon, la maljunulino - mia edzino kovrencis plegi min, kuraci... Kaj kion vi supozas? Mi sentas, [redacted] unu mia maneto komencis moviĝi... poste la alia... poste la piedetoj... Jen, kian gracon donis al mi la Sinjoro!.. Mi tute resaniĝis, kaj se mi restus en la hospitalo, oni antaŭ longe venenus min!.. Jen, kial kuracas niaj doktoroj!.. Mi ne konsilas, ne konsilas al vi. Pli bone vi iru al la popola

racisto!.. elnufoje mi..."

Ekaŭdiĝis fajfo tirata de vaporŝipo. Ekstere oni ekkuris, laŭte piedpiapante kaj krian-
. Jočjo, kiu nerimarkeble profundiĝis en la babiladon de la maljunulo kaj nenion ri-
arkis, ekstremis kaj ekrigardis tra la fenestro. Granda vaporŝipo, malrapidiganta
an iradon, turniĝis meze de la rivero, sin direktante al la albordiĝejo.

– Kiam la vaporŝipo estos en Veselovo? – Jočjo demandis unu servanton de la va-
rŝipo.

– Morgaŭ vespere... Ĉu vi veturas tien?.. La vaporŝipo pasigos la noxton tie-ĉi kaj nur
umatene ĝi forlasos la urbon.

En salono de dua klaso, ankaŭ en granda kajuto komuna de la sama klaso estis
eniu. Jočjo ekmarŝis tra la vaporŝipo. Ŝi ŝajnis malviva, senhoma. Kiam li revenis
la kajuton, lian atenton altiris negranda, tamen bele skribita grandlitera afi-
sur pordo de kajuto de la vaporŝipestro:

Tie-ĉi
estas aĉeteblaj lernolibroj
kaj propagandiloj de la lin-
gvo internacia
„Esperanto".

La skribmaniero estis tre konata al Jočjo. Longan tempon li staris antaŭ la afiŝo, leg-
nte kaj religanteĝin, dume lia koro ĝoje batis.

„Karaknabino", – Jočjo pensis, re preterirante la afiŝon antaŭ la tagiĝo kaj revenan-
en la kajuton, – „ŝi ĝuste efektivigis tion, pri kio mi revis vintre kaj printempe..."

Kiam li iris preter maŝinfako, li rimarkis la figurojn konatajn. La genaĝjunulo sidis
r planko de la ferdeko, dorse alpremiĝinte al varma tubego de la vaporŝipo. La malju-
ulo, fikse rigardante la najbarinon, parolis:

– Kio doloras ĉe vi, ĉu la koro?..

– Jes, jen tie-ĉi mi sentas doloron, – la virino parolis, montrante per la mano sian brustон.
i sentas, ke kvazaŭ iu sučas tie la koron...

– Tio-ĉi ĉirkaŭ via koro envolviĝis granda tenio, – ĝi sučas la koron. Mi mem, kiam mi
is en Peterburgo... mi vivis tie kvardek jarojn. Dum tiu-ĉi tempo mi servis ĉe tri restora-
posedantoj...

Sed nun jam tute nenian intereson elmontris Jočjo al la rakontado. Li pensis pri
knabino, pri enigmoplena kaj fabela Veselovo, pri tio, kio atendis lin tie.

— Kio ĝi estas?.. – demandis Jočjo, kiu longe jam staris sur balkono
la vaporŝipo, admirante belan panoramon de bordoj de la rivero kaj malpacience at-

ndante ekvidi Veselovo'n, kiam antaŭe post kruta riverkurbiĝo, ĉe radioj de la subiranta suno, ur alta bordo ekbrilis granda domo, dronanta en densaĵo de arboj.

–Tio ĉi estas ĝuste Veselovo... – respondis sinjoro, starinta apud Joĉjo kaj jam delonge donta al li klarigojn. – La domo vidata estas loĝejo de s-ro Veselov, la dometoj, kiuj staras dekre, estas vilaĝo Veselovo kaj post ĝi, ĉu vi vidas ruĝajn teymetojn?.. Tio ĉi estas fervojstacio. Tie somere, oni parolas...

Sed Joĉjo plu ne aŭskultis la parolemulon kunvojaĝanton, ĉar li plu ne bezonis iajn klarigojn.

Li, ne forturnante la okulojn, rigardis la domon kaj luksajn ĝardenojn, kiuj ĉiam pli klare kaj pli klare vidiĝis, laŭmezure de alproksimiĝado de la vaporŝipo. La unua etaĝo estis kaŝita de rigardo de ĝardenoj, sed fenestroj de la dua estis bone vidataj kaj, ŝajnis, logis al si per sia misterec o.

Joĉjo forlasis la vaporŝipon kaj longe restis sur la albordiĝejo, atente rigardante gejulojn, kiuj, gaje ridante kaj interparolante, amasiĝis tie, sed interzili li renkontis nek iun konatulon, nek iun verdstelulon. Tute nerimarkita kaj neatentita de iu, Joĉjo marŝis sur la bordon. De tiu ĉi momento surprizoj akompanis lin sen interrompe, encese.

La unua, kio okulfrapis lin kaj kion li ne rimarkis antaŭe de la vaporŝipo, ĉar li tute ne sian atentontiam koncentrigis ne sur la bordo, sed sur la albordiĝejo, kie li esperis novi Olnjon, – la unua, kio okulfrapis lin, estis granda elpendaĵo tabula, bazita sur du altaj kolonoj, pro kio ĝi, sendube, estis videbla de malproksime de la rivero. Sur ĝi estis arte pentrita granda kvinpinta stelo kaj sub ĝi sekvis grandlitera surskribo, kiu invitis ĉiun samideanon preterveturantan halti kaj viziti la gastaman familion. Suprenirante al la domo laŭ vojeto, je ambaŭ flankoj kies estis zorgeme plantitaj junaj tilioj, Joĉjo ~~kaŭ~~ elkoje devis halti surprizata de multaj afiŝoj, jen presitaj, jen manskribitaj, per kiuj oni donadis al preterirantoj diversajn sciigojn pri la lingvo kaj pri maniero ricevi ĉiujn informojn pri ĝi. Ravita de ĉio vidita kaj konsciante ie en profundajo de sia ekzistajo, ke en ĉio ĉi estas parteto de li mem, de lia sindonemeco al la lingvo amata, Joĉjo kun plezuro haltadis de tempo al tempo, ordigis sian vestaĵon kaj rerigardis, ankoraŭ esperante iun renkonti, sed nek antaŭe, nek malantaŭe estis vidata iu.

La vojeto alkonduxis la junulon al granda duetaĝa domo kun malfermitaj pordoj de la perono. Li kuraĝe supreniĝis laŭ larĝa ŝtuparo kaj baldaŭ estis en negranda, tamen tre pura kaj luma antaŭĉambro, en kiu, al miro de Joĉjo tute forestis vesthokaro kaj regulo, tiom kutimaj en antaŭĉambroj. Li staris unu minuton hezite, rigardante ĉirkaŭe kun scivoleco. Antaŭe estis larĝa ŝtuparo en la supran etaĝon, je ambaŭ flankoj de ĝi estis pordoj malfermitaj, de kie aŭdiĝis ies voĉoj kaj malproksima muziko. Dekstre kaj maldekstre de la enirejo estis ankoraŭ pordoj negrandaj kun surskriboj, dekstre: „Ak-
„Sen titolo".

ceptejo por vizitoj", maldekstre: „Akceptejo por vizoj". Ĵus, konsiderinte la aferon, Joĉjo ek-
iris maldekstren, kiam ekaŭdiĝis laŭta hundbojado kaj de la ŝtuparo malsupreniris
grandega hundo. Ŝi, ĉiam bojante, malrapide alproksimiĝis al la junulo, eksplaris lian
vestaĵon kaj gaje ekvirinĝis per la vosto, evidente, je odoro rekoninte en li „amikon de la domo".

La akceptejo estis negranda ĉambreto kun unu fenestro, tamen ĝi tiel ĉarmis Joĉjon,
ke li restus en ĝi senelire dum kelkaj tagoj. Apud la pordo estis spegulo kaj horoj por vest-
aĵoj, kiujn la junulo vane serĉis en la antaŭĉambro, kaj ĝuste kontraŭ la pordo tuta mu-
ro estis kelege ornamita de poŝtkartoj, ricevitaj el plej diversaj landoj. Sur tablo, kiu
staris apud la muro estis ekspoziciitaj aliaj esperantaĵoj, inter kiuj Joĉjo tuj rekonis la
kajeron de Olnjo kun la himno esperanta sur la unua paĝo, kiun li enskribis antaŭ lon-
ge dum la unua renkontiĝo kun la knabino ĉe Julia Andreevna, kaj' antaŭvideme
metitajn en ordo grandajn provizojn de propagandiloj, gramatikoj, vortaroj kaj aliaj lib-
roj. Apud la libroj staris eleganta monkesteto kun avizo, ke oni prenu al si la librojn, ki-
ujn oni bezonas kaj pagon por ili, laŭ sia kontrovo, metu en la monkesteton. La bonar-
anĝo, en kiu plej malgranda bagatelo estis bone antaŭvidita kaj zorge aranĝita de ies
mano, ree tiel surprizis Joĉjon, ke li ne povis trovi indajn vortojn por poste esprimi sian
dankon al la knabino.

— Ĉu vi neniam antaŭe estis tie ĉi?.. — Joĉjo subite ekaŭdis ies voĉon.

Kur nun, turniĝinte, li ekvidis malantaŭe de si nekonatulon, kiu duonkuŝis kun
libro en la manoj sur apogseĝo, starinta proksime de la pordo.

— Ne! — diris Joĉjo, ĝojiĝinte, ke li, fine, renkontis en la domo vivan homon. — Diru, mi
petas, ĉu Olnjo estas hejme?

— Kiu? Kia Olnjo?..

— La fraŭlino...

— Ha, nun mi komprenas... Ĉu vi konas ŝin?.. Matene mi vidis ŝin en la manĝoĉam-
bro, sed kie ŝi estas nun, mi ne scias. Se vi ankoraŭ neniam estis tie ĉi, mi konsilos al vi
iri en la manĝoĉambron, tie ĉiam estas iu kaj tie vi ricevos necesajn sciigojn.

Joĉjo dankis la nekonatulon kaj foriris

— Maldekstren de la ŝtuparo!.. — li ekaŭdis post si lian voĉon.

Apud la ŝtuparo mem Joĉjo kunpuŝiĝis kun du fraŭlinoj, kiuj, gaje ridante kaj tenante
unu la alian je la manoj, flugrapide kuris renkonten. Ekvidinte Joĉjon, ili konfuziĝis
por unu momento, ekrigardis lin kaj tuj, kun antaŭa rapideco kaj kun ankoraŭ pli
laŭta rido, malaperis sur la ŝtuparo.

Joĉjo eniris en grandan ĉambron kun mola antikva meblaro kaj altaj speguloj inter
fenestroj. Meze de la ĉambro staris roje-vestita jam nejuna altkreska virino kun ĉapelo en
la mano, per kiu li svingis en aero de tempo al tempo, ridetis kaj ion klarigis al tri junaj
fraŭlinoj, kiuj staris antaŭ li.

– Estas neeble... – li parolis, ĝentile skuante la kapon. – Mi jam preterlasis la limtempon, la edzino atendas min hodiaŭ...

– Ardalion Jakovlič, karulo, – petis unu fraŭlinon, rigardante lin kun malkontenta mieno, – nu, restu ankoraŭ unu tagon tie ĉi! Oni intencas aranĝi koncerton... Kiu gvidos ĝin cen vi?

– Adra... Addralion Jakovlič! karulo! – petis alia fraŭlinon, akompanante ĉiun sian peton per gaja rido nedetenebla.

– Ne Adralion, Kanjo! – Sin korektis la unua, ankaŭ ineksktiĝante de ŝi je rido.

– Addr... Abd... Alzadrion!.. Ha-ha-ha!.. Mi ne povas elparoli la nomon.

– Ha-ha-ha!.. – ridis ŝiaj kunuloj.

– Nu, aŭskultu, mi tuj ĝuste diros: Ad... Adzz... Andralion!.. Jakovlič!.. Ha-ha-ha!..

– Ha-ha-ha!.. – supersonis la ridadon de la fraŭlinoj laŭta basvoĉa rido de la sinjoro. – Serioze, mi ne povas! Adiaŭ!.. Mi malfruiĝos al la vagonaro.

– Senkoruloj! – diris unu el la fraŭlinoj. – Nu, iru!.. Ne, ne, atendu, mi akompanos vin ĝis la stacidomo. Ni tuj vestiĝos...

Jočjo dum kelka tempo rigardis la gajulinojn, sed, čar ili tute ne atentis lin, li eksaršis pluen tra la ĉambro.

Sur larĝa mola kanapo de najbara ĉambro, kien eniris Jočjo, kuŝis junulo, leginta per mallaŭta voĉo kion al du samaĝuloj, kiuj sidis proksime de li sur seĝoj. Ĵus Jočjo enris la legisto tuj silentiĝis kaj kaŝis la libron sub silke-broditan kanapkusenon. La aŭskultintoj kun konfuzitaj vizaĝoj malamike-demande ekrigardis Jočjon.

– Diru, mi petas, kie estas la manĝoĉambro? – Jočjo diris, konjektinte, ke li malhelpas al la junuloj.

Unu el ili tuj leviĝis kaj ĝentile kondukis Jočjon tra kelkaj, tute senhomaj, ĉambroj.

– Ĉu Olnjo estas hejme? – demandis Jočjo, irante.

– Ni tuj scriĝos...

– Kaj sinjoro Veselov mem?..

– Matene mi vidis lin, li legis al ni siajn versaĵojn... Jen estas la manĝoĉambro!

Je granda manĝo~~ĉambro~~ tablo sidis belaspekta nigrohara viro de kvardek jaroj proksime, kiu, apetite manĝante rostaĵon, vigle interparolis kun juna fraŭlino en blanka antaŭtuko.

– La rostaĵo estas bonega, mia kara, – li parolis, maĉante grandan pecon da viando kaj kun gaja rideto rigardante la fraŭlinon, kiu servis je la tablo, – nur ĝi estas iom seka... Se vi trovus ie u-u-unu, nur unu glaseton da brando, mi juras, mi kun plezuro englutus kune kun la rostaĵo mian propran langon.

– La sinjoro antaŭvidis tion ĉi, – ridante respondis la fraŭlino, – kaj ke liaj gastoj ne englutu siajn langojn, li neniam havas kutimon...

–Ĉion tion ĉi mi scias delonge kaj tre bedaŭras...

–Paŭnjo!–diris la junulo, kiu enkondukis Joĉjon.–Tiu ĉi juna sinjoro demandas pri fraŭlino Veselov,–li geste montris al la servistino Joĉjon kaj foriris.

–Ha!–ŝi ekkriis, pririgardante Joĉjon.–Bedaŭrinde, la fraŭlino forveturis kun sia patrjo. Hirevenos morgaŭ. Ĉu vi ne manĝis ankoraŭ? Ŝajne, vi ĵus venis, sidiĝu, mi tuj...

Kaj ŝi forkuris.

–Ĉu la doktoro estas hejme?–Joĉjo demandis, kiam, post unu minuto, la servistino revenis kun manĝaĵoj en la manoj kaj metis ilin antaŭ li.

–Li ankaŭ forestas... Li ja ofte forveturas por viziti malsanajn vilaĝanojn.

Joĉjo manĝis malrapide, ankoraŭ pli malrapide li atentis nun nekonatajn gejunulojn, kiuj jen eniradis en la manĝoĉambron, jen eliradis kaj kiujn li renkontadis je ĉiu paŝo, kiel ajn li ĝuis, kaj kiuj iafoje eĉ sin turnis al li kun diversaj demandoj. Nun jam nenio miregis lin en tiu ĉi originala domo, kiu šajnis multevizitata hotelo de bankulo, nenio surprizis lin, kvankam ĉe ĉiu paŝo ankoraŭ antaŭ sin horo li estis kapabla renti ravon de ĉiu bagatelo.

Antaŭ krepusko li vizitis preskaŭ ĉiujn ĉambrojn de la malsupra etaĝo, unu negrandan ĝardenon, la riveron, eĉ la stacidomon, esperante renkonti iun el siaj malnovaj konatuloj. Li revenis en la domon, kiam tra ĝiaj fenestroj jam brilis lumo de kandeloj kaj lampoj. En koridoro li kunpuŝiĝis kun du virinoj, je aspekto servistinoj, kiuj portis en la manoj kusenojn kaj litkovrilojn.

–Kie estas mia ĉambro?..–li subite, eĉ neatendite por si mem, demandis ilin.–Oni jam ŝribis al mi...

–Via ĉambro?–kun miro demandis la pli maljuna el ili, larĝe malfermante la okulojn kaj fikse rigardante Joĉjon.–Jen kun mi... Jen la noktoj vi pasigu tie ĉi, sur tiu ĉi kanapo. Ni tuj aranĝos por vi liton. Hodiaŭ, kiel intence, ni havas tiom da gastoj, tiom da gastoj... la ĉambroj, ŝajne, ne enspacos ĉiujn. Kiam revenos la gemastroj, ili faru, kiel ili volas...

Joĉjo restis sola en la ĉambro. Ŝi estis granda angulĉambro kun grandaj fenestroj malfermitaj, rigardantaj en la ĝardenon kaj kvar grandaj kanapoj, sur kiuj estis aranĝitaj por la nokto litoj. El la ĝardeno enflugis, tra la fenestroj preŝa vespera aero, ebriiga flarodoro, fajfado de vaporŝipoj kaj vagonaroj kaj malproksimaj gajaj voĉoj kaj kantoj. Ĉe aliaj kondiĉoj ĉio tio ĉi sendube bone impresus ĵin Joĉjo, sed nun li indiferente rilatis al ĉio kaj preskaŭ ne rimarkis ion el la ĉarmaĵoj. En lia animo estis malpleneco, malkontento kaj diserviĝo je ĉio, kion li atendis en tiu ĉi strangaj kaj neordinara domo. Enlitiĝinte, li longe kuŝis kun la okuloj malfermitaj kaj la vortoj de la lasta letero de Olnjo ironie sonis en liaj oreloj, supersonante ĉiujn sonojn, kiuj aŭdiĝis tra la fenestroj: „Ni-ĉiuj Veselovo'anoj ĉiutage atendas vin!.. Por vi delonge jam estas preparita en

la domo speciala ĉarma ĉambro, ke nenio..."

„Vere, ŝi tiel skribis", – li, fine, erpensis, forpelante la trudemajn pensojn, ke li estas nek atendita, nek dezirata tiucie, – „sed ŝija forestas! Kaj mi scias, mi jam antaŭsentas, ke kunŝia apero ĉio klarigos. Ŝi estas tia ĉarma, bona knabino!".

Prosendorma nokto antaŭa Jocjo dormis senrekiĝe, trankvile. Frumatene li vekiĝis rigla, freŝa kungaja, neklara antaŭsento de io bona. Tuj ellitiĝinte, li forlasis la ĉambron kaj, kiel fantomo, neaŭdeble glitante tra vico de ĉambroj, en kiuj amikoraŭ dormis neronataj viroj kaj junuloj, eliris sur grandan verandon.

Malsupreniĝinte de ĝi, Jocjo haltis antaŭ granda florbedo, kiu seninterrompe estis lukse kovrita de grandaj diverskoloraj astrofloroj kaj peonioj, kaj en kies mezo mem flankiĝis, apenaŭ rimarkebla malgranda ligna kruco, sur kiu li trafegis nur unu vorton „Panjo". Li tuj ĉion komprenis, rememorinte rakontojn de Julia Andreevna pri la neĝustaloka enterigo de la patrino de Olnjo. Li formetis sian ĉapelon kaj respektoplene genuiĝis antaŭ la tombo.

Farinte kelkajn pasojn antaŭen, Jocjo enaŭdis ekzrapon de ĝardenporda kaj poste iu mallaŭtan parolon. Kaj pli frue, ol li povis klariĝi al si, ke tiu ĉi ekzrapsono estis efektive ekzrapo de fermata ĝardenporda, kiu estis ie proksime, kvankam ne videbla pro densaj siringarbetaĵoj, laŭta knabinvoĉo konata tremigis lin.

– Josefĉjo!... Kiam vi venis?..

Renkontenal Jocjo ne paŝis jam nun, sed kuris ĝojvizaĝa, gaja Olnjo kun malordigintaj bukloj de silkaj haroj kaj entuziasme brilintaj okuloj.

La gejunuloj interŝanĝis manpremojn kaj rigardojn, kiuj pli elokvente parolis al li multan, ol plej afektaj paroloj.

– Kiel mi timis, ke vi venos dum mia foresto! Kaj, kiel intence, tio ĉi okazis ĝuste tiel, – la knabino pepis, konduksante al la domo la junulon je la mano. – Ĉu vi estas kontenta je ĉio, kion mi kun granda peno kaj preskaŭ sen flanka helpo faris por akceli finon triumfon de la lingvo kaj realigi nian revadon? Ĉu vi estas kontenta je la ĉambro?

La knabino estis ĉagrenita, ke Jocjo estis devigita pasigi la noktonsen ĉiaj oportunecjoj kune kun iaj gastoj, en la ĉambro nekomforta. Ĉiam tenante lin je la mano, la knabino supreniĝis en la duan etaĝon kaj, reguligante la spiradon post la rapida supreniĝo, haltis antaŭ unu pordo fermita.

– Jen estas via ĉambro!... – ŝi diris, malfermante la pordon. – Mi post nelonge venos al vi; mi bezonas lavi min post la longa vojo en vagonaro kaj ŝanĝi mian vojan kostumon. Oni alportos teon ĉi tien, – ŝi aldonis, facile enpuŝante Jocjon en la ĉambron.

La ĉambro estis ne granda, sed tiel bela kaj tiel zorgeme aranĝita, ke ĝi superis eĉ plej kuraĝajn atendojn de Jocjo.

Granda fenestro de la ĉambro estis turnita al la rivero, de kie malproksime estis vidata ĝia blua kaj larĝa serpentiĝanta strio. La muroj estis ornamitaj de grandaj portretoj de la domomastro kaj de la doktoro. Antaŭ la fenestro estis metita modesta skribotablo kun cleyanta skribilaro kaj simetrie dismetitaj fotografaĵoj de ĝeneralaj gekonatuloj de Jeĝjo, inter kiuj al ĝojo kaj konfuzo de li estis ankaŭ fotografaĵo de Sonjo. Harmonika lavtablo, libroŝranko kaj lito kompletigis meblaron de la ĉambro.

Jeĝjo ankoraŭ ne havis tempon pririgardi ĉion, kiam Olnjo kun memkontenta, kvietanta mieno, frizita kaj vestita je bela rozkolora vestaĵo, jam estis apud li, gaje babilante.

– Ĉu plaĉas al vi la ĉambreto? – ŝi demandis, ne deturnante de li siajn okulojn. – Kaj la skribotablo?.. Ĉu vi rekonis?.. – Ŝi ruze faris mangeston al la fotografaĵo de Sonjo.

El la ĉambro la ĝejunuloj iris tra larĝa koridoro, kiu dividis la supran etaĝon je du egalaj partoj. Je ambaŭ flankoj de la koridoro estis pordoj de fermitaj ĉambroj.

– Ni ĉiam loĝas supre, – klarigis la knabino, – malsupre ni nur taymanĝas. Kun ankoraŭ plimulto de niaj gastoj dormas, mi poste konatigos vin kun la tuta domo. Dum ni vizitu nur kelkajn ĉambrojn, okupatajn de nenia kaj prezentantajn specialan intereson ne sole por vi norulo, sed ankaŭ por ni – ĉiamaj loĝantoj de la domo. Jen estas nia biblioteko kaj laborĉambro de la paĉjo!

La ĝejunuloj haltis por unu minuto meze de granda ĉambro kun longaj vicoj de libroŝrankoj kaj grandega tablo, supersŭtita de sennombraj luksa-eldonitaj albumoj kaj ĵurnaloj. Poste ili vizitis florĉambron – miniaturan vintran ĝardenon, „la ĉambron de la panjo", kiu estis severe gardata kaj observata ĝuste en tiu sama stato, en kiu forlasis ĝin la mastrino antaŭ la apero en la mondon de la filino, la ĉambron je memoro de Olnjo – muzeon, kie estis konservata ĉio, kio rilatis al la knabino de ŝia nasko ĝis ŝia „knabineco". Tie ĉi ili restis iom pli longe, trarigardante kun scivoleco nekaŝata ŝijn sennombrajn portretojn kaj fotografaĵojn, kiuj seninterrompe kovris ĉiujn murojn de la ĉambro kaj krom tio estis metitaj en kelkaj specialaj albumoj. En ŝranko estis videblaj ŝiaj ĉiamaj ludiloj, libroj kaj etaĝvestaĵoj, kiujn ŝi uzis dum siaj infanjaroj.

Post ĉio, vidita en tiuj ĉi ĉambroj, jam malpli atentindaj kaj interesaj ŝajnis al Jeĝjo la ceteraj ĉambroj: de Olnjo, de la doktoro kaj multaj aliaj kaj en ili la ĝejunuloj restis tre malofte aŭ tute ne restis.

– Ni iru pluen, ni iru pluen!... – la knabino ĉiam ripetadis la saman, rapidege tirante Jeĝjon je ĉiu je la mano. – Ni ankoraŭ ne unufoje havos okazon esti tie kaj vidi ĉion detale.

Ili malsupreniĝis, nee trairis vicon de grandaj neloĝataj ĉambroj de la malsupra etaĝo kaj eliris sur la peronon.

– Ni iru en la parkon! – diris la knabino kaj, kaptante la manon de Jeĝjo, je kiu ŝi ĉiam

teris lin. Ŝi ekkuris laûlonge de pasado de la domo. Joĉjo sekvis ŝian ekzemplon.

Ili trakuris ne haltante anguleton de vasta frukt̂ardeno, mallarĝan pontecon malnovan, kiu tremis sub iliaj piedoj, super profunda kavego, sur kies fundo apenaŭ aŭdeble flustris malgranda, malrapida torento kaj haltis sub densa ombro de dikegaj tilioj kaj ulmoj maljunaj.

Dekstre de ili, post alta tabulbarilo, kuŝis la larĝa kavego, tute kovrita de densa kreskaĵaro diversspeca, kiu ŝajnis netrairebla, kaj maldekstre iris malproksimen belforma vico de sennombraj tilioj kaj ulmoj, kiuj, kiel gardostarantoj, staris je ambaŭ flankoj de larĝa aleo kun ĝardenbenkoj apud arbotrunkoj mem kaj piedbatita vojo sableca.

– Alko, alko, alko!.. – la knabino ekkriis subite kaj ree ekkuris antaŭen laûlonge de la barilo.

– Kiun vi alvokas? – demandis Joĉjo, kuratinyante la knabinon kaj malfacile spirante pro la daûra kurado.

– Alkidon!.. Printempe ĉasistoj kaptis unu junan alkidon kaj donace al mi alkonduksĝin en la bienon. Oni metis ĝin en la kovidejon, kie ĝi loĝis ĝis mia veno mem el la urbo... Ŝi estas interesa besto, tre malsovaĝa. Ŝi alkutimiĝis al homoj kaj volonte venas, kiam oni alvokas ĝin. Nun ĝi ĝuas liberon en tiu ĉi netrairebla sovaĝa parto de la parko, kie loĝas delonge ses ĝiaj parencoj – grandaj alkoj kun idoj. Mi ĉiutage venas ĉi tien por vidi ĝin kaj nutri ĝin per pano el mia manoj, – klarigis Olnjo kaj ŝi daûrigis kriie: – Alko, alko, alko!..

Sed neniu resonis. Nenia sono aŭdiĝis de tiu ĉi parto de la parko, nenia branĉo ekmovis de la densa kreskaĵaro. La knabino baldaŭ perdis esperon ekvidi la alkidon kaj sur ĉagreno sidiĝis sur proksiman benkon de la aleo.

– Ĉu ĝi jam sovaĝiĝis dum mia foresto? – ŝi diris post nelonga silento. – Kion vi rigardas? – ŝi aldonis, ruĝiĝante, rimarkinte, ke Joĉjo aliris al apuda arbo kaj atente observas ĝian ŝelon. – Oni dipextis tie ĉi ĉiujn benkojn kaj sekigis multajn arbojn per siaj stultaj branĉadoj...

– Kial stultaj? Mi nenion stultan vidas... nur vian nomon. – Joĉjo respondis, jam turnante sian rigardon de la arbošelo al la benko, sur kiu sidis la knabino.

La benko mem kaj ĝia apogilo estis kovritaj de sennombraj inicialoj de Olnjo kaj ŝiaj kamaradinoj, skribitaj kaj eltranĉitaj.

– Kiu?.. – mallaûte demandis Joĉjo, geste montrante la skribaĵojn kaj ial konfuziĝante.

– Kiu? .. Kiu same skribis sur ĝardenbenko de la urba ĝardeno „Sonjo"? – Olnjo respondis, malice ekrigardinte Joĉjon. – Nenia alia, krom junulaĉoj...

– Ĉu la leûtenanto? – ree demandis Joĉjo.

– Kia ridinda kaj naiva knabo vi estas! Ĉu vi opinias, ke krom la leûtenanto mi havis neniun adoranton? – ŝi diris, gaje ridetante kaj levi ĝante de la benko. – Ho, ili estis nekalkul-

eblaj, sennombraj!..

– Sed la leŭtenanto ja faris al vi edziĝoproponon?..

– Tiun ĉi malsaĝaĵon krom la leŭtenanto faris tre multaj el miaj adorintoj... Sajne, ola vi... Tamen mi forgesis, ke vi zdoras la alian...

– Olnjo!..

Kelkan tempon ili ~~sidis~~ iris silente tra la alco, poste la knabino prenis alian direkton aj baldaŭ ili malsupreniĝis per mallarĝa vojeto en densajn arbetaĵojn, sovaĝe kreskintaj en tiu ĉi loko. La vojeto alkonduksis la gejunulojn al arte konstruita ponteto, sur iu ili staris silente iom da tempo, amadmirante nepriskribeblajn belaĵojn de la parko idataj de tie. La knabino ekspiris plenbruste kaj flustris:

– Tiu ĉi ponteto estas nomata „La ponteto de amkonfesoj"..

Jočjo volis ion demandi, sed, ekrigardinte la pensoplenan vizaĝeton de la knabino, iu, šajnis, travivis nun multajn, eble, agrablajn rememorojn, li ĝuste komprenis ravecon de la momento kaj ne kuraĝis malhelpi alŝi.

– Tie, malsupre estas multe da serpentoj... entute, en la parko, kiu kušas najbare de a granda arbaro, ioroje estas renkontataj sovaĝaj bestoj kaj estas nesendangĝere visitadi malproksimajn angulojn de ĝi sen sufiĉa akompanantaro, – la knabino diis, supreniĝante sur altaĵon, kiu estis sur kontraŭa flanko de „la ponteto de amonfesoj". – Ni tre šatas tiun ĉi lokon kaj tre bedaŭras, ke ĝi kušas tiel malproksime de la domo, – ŝi aldonis, montrante al Jočjo vastan placeton, širmitan de tri flankoj de viva muro de junaj kverkoj kaj la kvara flanko kies estis turnita al la rivero. – Ni nomas tiun ĉi ~~placeton~~ lokon „la placeto de panorama mirinda" kaj la paĉjo nomas ĝin ankaŭ „la placeto danĝera".

La flanko de la placeto, turnita al la rivero, finiĝis per krutega, tute ne barita, sabloka abruptaĵo, kies fundo perdiĝis el okuloj malsupre en marĉa kavego. Jočjo intuicis pli proksime aliri al la bordo de la abismo, sed la knabino antaŭvideme ekkaptis lin je la mano.

– Ne alproksimiĝu!.. La grundo tie estas malfirma kaj trompanta. Ĵus oni mesis sian piedon sur la randon de la abruptaĵo, ĝi tuj malsuprenŝutiĝos kaj tiros vin ~~de~~ si malsupren kuraĝulon...

La gejunuloj sidiĝis kaj rigardis pentrindajn ĉirkaŭaĵojn, kiuj estis malproksime vidataj de tie ĉi sur la kontraŭa bordo de la rivero.

– Antaŭ unu jaro... jes, jam unu jaro pasis post tio!... – sopire ekspiris Olnjo, post nelonge daŭrigante la parolon. – Tie ĉi antaŭ unu jaro amkonfesis al mi Sevolod... Bedaŭrinde, ni ne konas lin. Detiam li preskaŭ tute ne vizitas nin! Li estas tre bela, ĉarma kaj brava junulo... Mi, kutime, forrifuzis lian amon arogan kaj negustalokan kaj eĉ iom moketis je lia stulteco. La junulo estis tiel konstern-

ta de mia rifuzo, xe neniom hezitinte, decidis fini la vivon kaj mi, tute ne supozante an intencon, ne havis tempon... Li flugrapide alproksimiĝis al la abruptaĵo kaj pli rue, ol mi ekkriis, malaperis...

Tiu ĉi rememoro, videble, estis tre dolorига por la knabino. Ŝi longe silentis, kaj, kiam Jaĝjo volis demandi ŝin pri plua sorto de la junulo, kvazaŭ konjektinte lian intencon, diris decidoplene:

– Ne, sufiĉe pri tio ĉi!... Ne demandu min plu, mi petas... iam poste! – kaj, kvankam por forpeli pensojn malgajajn, kiujn inspiris al ŝi la rememoro, ŝi saĝis la temkaj, kun zimarkebla plivigliĝo, daŭrigis jam gaje: – Ha, ni ne forgesu!... Hodiaŭ espere venos la vaporŝipo „Belulino", kies estro estas fervora samideano. El ĉiuj kaj ĉi vaporŝipestroj mi sukcesis allogi al Esperanto nur tiun ĉi. Ne, ni ĉiueoje aranĝas al la vaporŝipo ian originalan rekonton. Hodiaŭ ni volas aranĝi tie ĉi grandan brulligmaron je ĝia honoro...

La gejunuloj revenis hejmen per alia vojo preter bela tabulligna pavilono por dudek dum festenoj kaj grandaj plaĉoj, bele baritaj, por kroketo kaj laŭnteiso-ludoj.

– Ĉu plaĉas al vi nia Veselovo?– demandis Olnjo. – Vi ial rigardas ne kutime indiferente ĉiujn belajojn de ĝi, kvazaŭ vi ne komprenas ilin aŭ ne volas esti sincera.

– Vi ne konjektis! Nek tio, nek la alia estas kaŭzo de mia ŝajna indiferenteco. Hodiaŭ mi vidis ĉe ĉiu paŝo tiom da mirindajoj, ne iam ankoraŭ viditaj de mi, ke mi ute ne estas kapabla miri je io ajn. Vi scias, ke pro multeco de plej diversaj impresoj... Tre proksime de ili subite ekaŭdiĝis ies gajaj voĉoj kaj baldaŭ el-post arboj aperis feststita areto de gejunuloj.

– Kapitan!– Olnjo sin turnis al unu junulo, post kiam la gejunularo salutis Olnjon kaj Jaĝjo kaj la knabinoj interŝanĝis amikajn kisojn kun la mastrino. – Kapitan! ĉu vi plenumos mian peton?..

– Tuj!... Ĉion, kion ajn vi ordonus, fraŭlino, – tiu respondis, soldate rektiĝante antaŭ la knabino.

– Hodiaŭ vespere, vi scias, ni renkontos la „Belulinon". Antaŭ ĝia veno ni devas ion preparі por surprizi kaj honoriĝi ĝin. Kolektu, mi petas, eble plej multe da sea branĉo kaj aranĝu el ĝi grandan brulligmaron sur la placeto de panoramo mirinda...

– Tuj, mi tuj... Ni ĉion ĝuste aranĝos. Kamaradoj! – li sin turnis al la junuloj, kiuj sudestis. – Ni iru, plenumu la ordonon de la fraŭlino!

El la gejunularo eliĝis kelkaj junuloj kaj ekkuris post la invitinto.

Olnjo, akompanata de Jaĝjo, jam estis en kontraŭa parto de la parko, kiam, malfacispirante, ilin kuratingis tiu sama junulo, kiun Olnjo petis aranĝi la aferon.

– Nu, kion ankoraŭ?.. – parinte malkontentan micron, diris la knabino, severe ri-

ardante la junulon, kiu formetis antaŭ ŝi sian ĉapelon kaj staris hezitante.

– Ĉu vi ordonos, tuj ekbruligi la lignaron, ĵus ni aranĝos ĝin?..

– Ĥa-ĥa-ĥa... – Olnjo laŭte ekridis sincere, tute forgesinte sian severecon ŝajnigan. – Vi bone komprenis, kion mi komisiis al vi! Mi volas bruligi ĝin malfrue vespere, kiam nos la vaporŝipo, ke estu pli granda efekto de la fajro dum la malluno...

– Mi tiel same opiniis, fraŭlino, sed la kamaradoj...

– Mi vidas, ke vi nenion volas fari por mi. Ne iru!.. – ŝi diris kun severeco antaŭa. Ni mem ĉion aranĝos kun Josefĉjo...

– Ne, ne, ne!.. Mi ne permesos, fraŭlino! – ekkriis la junulo kaj, kiel sago ellasita el paŝarko, ekkuris reen.

– Mi forlasos vin tuj, Josefĉo, – diris la knabino. Jen estas la patro!.. Oni ludas je kroketo. Ni tute ne dormis la nokton pasintan kaj estas tre laca, – ŝi aldonis, tuj malaperante post ronda laŭbo, belege ornamita de ekstere de plektokreskaĵoj.

– Mein Gott!.. Kiun mi vidas!.. – tuj ekkriis la doktoro, kiu sidis sur ĝardenbenko kaj observis kroketludadon, ĵus li ekvidis Jočjon.

– Ha, mia amiko! Kiam vi aperis sub mia ĉielo?.. – preskaŭ samtempe ekaŭdiĝis voĉo de s-ro Veselov, kiu, hejme vestita, je silka ĉemizo sen zono kaj amerikaj pajlĉapelo, kun kroketmartelo en la mano, eliris tuj el mezo de ludintoj kaj observintoj la ludon. – Mi treĝojas... mi treĝojas... Nu, kiajn sukcesojn vi atingis lastatempe?

– Ho, mi estas feliĉa, kiel neniam, sed... – li tuj komprenis, kion aludis s-ro Veselov, kaj pli malkuraĝe daŭrigis: – prezentu al vi, mia onklo maljuna... li estas delonga esperantisto! Li konas eĉ d-ron Zamenhof'on mem!..

– Vere, tio ĉi estas bonega novaĵo, – diris s-ro Veselov kun grave-serioza mieno, – sed mi volas scii antaŭe, ĉu sukcese vi finis vian lernjaron? Ĉu plensukcese vi finis viajn ekzamenojn?

– Ha, ne demandu!.. – Jočjo respondis malkaŭte, malgaje malsevante la kapon. Oni rustigis min en la sama klaso...

– Ĉu vi memoras, mi avertis vin... – komencis s-ro Veselov, sed la doktoro interrompis lin:

– Lasu, mi petas. Non bis in idem, kiel parolis antikvuloj... Li jam estas punita. Vere, est modus in rebus... Sed ni forgesu ĉion. Das ist eine alte Geschichte! „Gaude-amus igitur, juvenes dum su-u-mus!" – li gaje ekkantis, sidiĝante apud juna fraŭlino, kiu laŭte ridis, forpreninte el manoj de la junulo ian objekton. – Fraŭlino, – li diris serĉe al ŝi, – permesu esplaĉi al vi...

Kiam vespere Jočjo aŭskultis kun multaj aliaj gastoj s-ron Veselov'on, kiu, kun pro-
[illegible]al li scio kaj entuziasmo, legis en la biblioteko sian ĵus verkitan grandan verspo-
emon, en la ĉambron neatendite eniris Olnjo kaj, facile preninte Jočjon je la mano,

eksklustris:

— Ni iru!..

De neniu zimarkitaj la gejunuloj forlasis la ĉambron kaj rapidege ekpaŝis al la parko. Kiam ili en mistera duonmallumo de la nokto somera iris tra alĵo, kie ombroj de arboj kunplektiĝis kaj formis ĉe luno arĝenta de la luno fantaziajn desegnojn sur la vojeto kaj apudaj arbetaĵoj, ornamitaj de densa foliaro, eraŭdiĝis lauta, tirata basa fajfo de vaporŝipo.

— Jen la „Belulino" jam alproksimiĝas al la albordiĝejo. Ni kuru, ĝi ne longe restos tie, ni malfruiĝos !... - diris la knabino kaj ili ekkuris, kiel infanoj.

Sur la placeto estis multe da homoj. Oni tie kutime ridis, kantis kaj petolis, atendante Olnjon.

— Fraŭlino, ĉu vi estas kontenta ?.. Jen, kian grandegan lignaron ni aranĝis apud la abrupto mem. La brancaĵaro estas tre seka, ĝi brulos, kiel pulvo! - diris unu junulo, respektoplene riverencante al la knabino.

Ĉiuj silentiĝis, amasiĝante apud la knabino.

— Bone... Ni dankas, - ŝi diris. - Kiam la vaporŝipo naĝos ĝuste kontraŭ ni, vi, sinjoroj, - ŝi sin turnis al junuloj, - laŭ mia signo prenu en la manojn brulantajn brancojn kaj svingu per ili en la aero, akompanante la svingadon per laŭta tuja kriado, simila al la fajfado de la vaporŝipo.

De la placeto oni klare vidis, kiel la vaporŝipo, post tri fajfoj faritaj, gracie ekmoviĝis laŭ spegule-glata suprajo de la rivero kaj atente observis ĉiun movon de ĝi. Kiam ĝi, turniĝante meze de la rivero, ellasis lastan daŭran kaj interrompantan fajfon adiaŭan, la knabino ekkomandis:

— Ekbruligu!..

Kelkaj konservemaj manoj, jam delonge atendintaj la komandon, kun alumetoj etendiĝis al la lignaro de ĉiuj flankoj kaj hela fajro tuj ĉirkaŭkaptis la sekan brancaĵaron, lumigante gajajn, ruĝajn vizaĝojn de la ~~gu~~ junuloj kaj blankajn figurojn de knabinoj. La fajro subita tuj altiris atenton de vaporŝipanoj. Oni vidis ĉe luno de la luno, kiel la vaporŝipestro, en blanka uniforma opica, venis al rando meŝ de la komandponteto kaj prenis en la manojn paroltubon.

Laŭ gesto de la knabino, la junuloj kaptis en la manojn brulantajn brancojn kaj laŭtega fajfsimila krio tiratax: „Tu-u-u, tu, tu, tu, tu-u-u!" - eksonigis la silentan noktan aeron.

— Trankvilan nokton, fraŭlino!.. Vivu Esperanto!... - klare oni ekaŭdis viran voĉon de la vaporŝipo, kiam ĝi naĝis ĝuste kontraŭ la placeto.

— Felican vojon!... - respondc ekkriis ĥore la gejunularo, svingante per la brancoj kaj blankaj tukoj.

Responde ekaŭdiĝis tondrlaŭta fajfosaluto de la vaporŝipo.

Ĵus la fajfo silentiĝis, la gejunularo ree ekkriis fajfsimile.

Kaj longe, longe en silenta aero de la nokto super la rivero aŭdiĝis alterne ripetiĝantaj fajfado de la vaporŝipo kaj laŭta fajfsimila kriado de junaj voĉoj.

Nur kiam la „Beluling" malaperis post malproksima riverkurbaĵo, oni forpuŝis ankoraŭ brulantan la branĉaron en la abismon kaj forlasis la placeton.

— Kia ĉarma estas la vaporŝipestro !.. Kiel forvore li studas la lingvon... Kiticl satas ŝipanoj'n ĝenerale... — flustris Olnjo, sinjardeme malsupreniĝante de la placeto kaj konfideme sin apogante je la mano de sia akompananto - Joĉjo.

XLI.

Lastfoje.

La 11-an de julio, kiam la Eklezio honoras sanktan Princinon Olgxa'on, en Veselovo estis ĉiujare aranĝata familia festeno, kiun partoprenis, krom kutimaj someraj gastoj, multaj konatuloj de la familio, nobeloj kaj aliaj gravaj personoj el najbaraj urboj kaj bienoj.

Joĉjo ankaŭ je tiu ĉi fojo esperis ĉeesti la solenon kaj ~~[illegible]~~ antaŭtage de la festo, akompanata de la onklo, vaporŝipe alproksimiĝis al la celo de sia vojaĝo.

La onklo estis en bonega humoro kaj ŝercis kun la nevo senĉese. Surprizita de ankoraŭ nenie vidita propaganda afiŝo sur la vaporŝipo, li aĉetis ĉe la vaporŝipestro tutan lian provizon de esperantaĵoj kaj dum la vojaĝo disdonis ilin al kunvojaĝintoj. En varmaj paroloj kun ili pri esenco kaj estonteco de la lingvo la onklo senĉese ripetadis la nomon de sia juna nevo, al kiu sole li atribuis la honoron vastan de propagando sur la vaporŝipoj.

Tamen la vojaĝo estis malagrabligita de unu okazintaĵo, kiu treege koleriĝis la onklon kaj por longe rompis lian egalpezon animan. Dum taŭmanĝo, kiun li ĝuis en manĝoĉambro, li kun terura envidis unu malgrandan muŝon, kiu subite de ie aperis kaj kuraĝis sidiĝi ĝuste tiun teleron el kiu manĝis la onklo. Kies ajn plumo estas senporta ĝuste priskribi koleron de la onklo. Kvankam la kaŭzinto de la okazintaĵo preskaŭ tuj estis kaptita per lerta manmovo de Joĉjo kaj senkompate mortigita de li antaŭ la okuloj mem de la onklo, la malĝenulo laŭte kriis, insultis la vaporŝipon, servantaron kaj kunveturantojn, li venigis la vaporŝipestron kaj ĥefkelnejestron, malkaŭdis iliajn malpurecmon kaj senzorgemon kaj, laŭte piedfrapante, solene promesis, ke li plu neniam vojaĝos vaporŝipe.

Ceteran parton de la vojaĝo la onklo pasigis en malbona humoro kaj malkontente murmuris ĉe kiam li estis gastame renkontita kaj enlogiĝita kun la nevo en

lia ĉambro de la gemastroj.

La 11-an de Julio en la domo regis neniam vidita de ĵoĝjo tumulto kaj vivego. De la matena mem kaj ĝis la tagmanĝo de la alborditĝejo kaj de la fervojstacio sekvis lukse vestitaj kaj belornamitaj praŭlinoj kaj sinjorinoj, elegantaj kalešoj kun bruado jen de unu, jen de la alia flanko senĉese alveturigadis al la perono honorajn kaj eminentajn gastojn. Kiam tagmeze Olnjo revenis el preĝejo, kie kušis je kelkaj verstoj de Veselovo, ĝin atendis en saloneyoj de la domo pli ol cent vizitintoj, kiuj superšutis per donacoj la peliĉan kaŭzintinon de la soleno.

La tagmanĝo estis aranĝita en unu el plej grandaj saloneyoj de la malsupra etaĝo kaj sur la tablojn estis metitaj ĉiuj antikvaj familiaj vazaroj kaj manĝilaroj, ornamitaj de iama grafa blazono, kiujn oni uzis nur unufoje ĉiujare. La plej honorajn lokojn je la tablo okupis Olnjo kaj šiaj parencaj grafinoj kaj grafidinoj, - nur Sonjo forestis. Ĵoĝjo kun la onklo ricevis lokojn ĝuste kontraŭ ili, inter s-ro Veselov kaj la doktoro. Kutimaj gastoj de Veselovo - simplaj mortemuloj - sidis aparte de la unuaj je speciala tablo, apude aranĝitaj. Vino veršiĝis torente, toastoj aŭdiĝis senĉese. Multenombra servistaro, speciale dungita por tiu ĉi tago, kun ruĝaj švitkovritaj vizaĝoj, klopodeme kuradis inter la tablo, apenaŭ havante tempon konservi al ĉiuj.

Post la tagmanĝo la gastoj dissutiĝis tra la ĝardenoj kaj vasteya parko. Ĉie aŭdiĝis ĝojaj voĉoj, rido; el malfermitaj fenestroj de la domo veršiĝis sonoj de dancmuziko. Bruetado de silkaj vestaĵoj virinaj, vigla babilado de graveaspektaj plenaĝuloj kaj intima flustrado de paroj de gejunuloj intermiksiĝis en unu ĥaosa brusonaro. Diverspeca parfumodoro, kiu abunde eliĝis el blankaj, kiel neĝo, balvestaĵoj elegantaj de praŭlinoj, konkuris kun aromo de ĝardenfloroj kaj superis ilin.

En la parko unu parto de la gastoj junaj ludis je kroketo, alia promenis tra ombraĉaj aleoj, kelkaj ĝuis tetrinkado en la pavilono. S-ro Veselov, la doktoro kaj ofte ĉi Olnjo mem nelaciĝeble sin šovis jen tien, jen aliloken, ĉien emportante vigliĝon kaj gajecon, observante atente, ke nenie ie povu enui aŭ resti senpartoprene en tiu ĉi eksterordinara festo familia.

— Ŝejnuloj, ĉi tien!.. — subite ekaŭdiĝis voĉo de s-ro Veselov, kiu rimarkis, ke kelkaj praŭlinoj, ĉu pro manko de konformeco kvanto de junuloj inter la gastoj, ĉu pro varmego, kun enuantaj mienoj sidis izole aŭ pensoplene marŝis tra la parko, porŝirante arbofoliojn. — Ŝejnuloj, nenie devas esti enuanta hodiaŭ! Ĉi tien, mi petas!..

De ĉiuj flankoj ekamasiĝis la gastoj, scivole atendante, kion ankoraŭ elpensis la mastro, tiom elpenseme je amuzaĵoj.

— Delonge tie ĉi ni ne aranĝis ludon je taksado de reĝo. Dum mia juneco ĝi estis unu el plej disvastigitaj ludoj de gejunularo. Ni ludu!.. Ebl, ie ne scias esencon de la ludo, mi tuj klarigos ĝin. Unue ni elektos reĝinon aŭ reĝon, laŭ via plaĉo, kaj sidigos

ĉin aŭ lin sur honoran lokon – sur seĝon de balkono de la pavilono. Dum la elektita persono ĝuos je honoro, donata de ĉiuj ni, ĉiu el partoprenontoj devos eldiri al mi sekrete sian taksон de la honorata persono, kiun mi enskribos krajone por memoro sur papero. Kiam ĉiu ludonto eldiros sian taksон, mi aŭ iu alia tralegos antaŭ la persono reĝe-sidanta sur la trono ĉiujn taksojn eldiritajn. Tasko de la sidanto estos konjekti almenaŭ unu personon, kiu faris por li tiun aŭ alian taksон... Ĉu vi komprenis? La afero estas tre simpla, vi tuj konvinkiĝos en tio. Ni komencu !.. Nur mi devas averti ĉiun, ke la ludo estas ludo, ke neniu rajtos ofendi je ies taksо, eble, ne plaĉonta... Oni repagu ĉi ofendinto per la sama! Ni petas elekti reĝinon aŭ reĝon!

Unuvoĉe estis elektita reĝino Olnjo. La knabino dankis por tia honoro kaj vigle suprenkuris la balkonon kaj okupis la seĝon, senĝene kaj tre nature akceptinte tiu ve-re-reĝinan pozon. Kiam s-ro Veselov kolektis ĉies taksojn, li alproksimiĝis al la trono kaj, respektoplene salutinte la reĝinon, komencis:

— Reĝino, oni parolas, ke vi estas dicca, anĝel-simila, nesurtere-bela, petolulino...

S-ro Veselov longe legis, šajne, senfinan vicon de taksoj, kiuj estis laŭdoj, adoresprimoj de la knabino, kiu kun tre indiferenta vizaĝo, videble, tute ne atentante la flatemajn opiniojn, pacience aŭskultis la patron. Kiam li finis, Olnjo tuj ripetis ĉiujn el la taksoj legitaj kaj proklamis, ke tiu ĉi taksо, laŭ ŝia supozo, apartenas al grafidino Tamara. S-ro Veselov informiĝis en la listo kaj konstatis, ke Olnjo ne eraris. Tiam Olnjo tuj forlasis la seĝon kaj surgin sidiĝis la grafidino. Ŝi estis plena kontrasto de bela kaj gracia Olnjo. Ŝi estis maldika, malgrasa, altkreska fraŭlino de dudek jaroj proksimume. Ŝia vizaĝo estis ne bela kaj fiera. La fraŭlino kvazaŭ hontis, ke ŝi, estante eminentulino, pro la festeno devas partopreni la ludon por amuzi tiun ĉi popolamason, kies plimulton konsistigis simpluloj, malkleruloj.

— Reĝino, - diris s-ro Veselov, plenumante sian taskon kaj salutante la grafidinon, - oni parolas, ke vi estas: fieruline, malbeluline, fanfaronuline, ĉarmuline, anĝelo, luksе vestita, memfida, knabinaĉo, sagulino, egipta mumio, perfektecо de beleco, ziĉulino, delikata kiel sonĝo...

Dum s-ro Veselov ne rapidante legis la taksojn, la grafidino kun pala vizaĝo kaj kolereme-ofendeme sulkinte la brovojn malkovris la kapon kaj aŭskultis la plej ofte ofendajn, nemerititajn ~~[illegible]~~ taksojn. Kiam la tuta listo de la taksoj estis elĉerpita kaj ĉiuj silentiĝis, atendante la plej interesan parton de la ludo, la grafidino leviĝis de la seĝo kaj laŭte per neagrabla, gorĝa voĉo diris, etendante la manon antaŭen:

— Mia nomis „egipta mumio" tiu ĉi junulo... juna homo kun signeto sur la brusto, kiu sin kaŝas... jen post tiu fraŭlino kun alta hararanĝo!.. Mi ne scias lian nomon...

— Vi ne eraris, reĝino, – respondis s-ro Veselov, gaje ridetante, kiu bone memoris,

ke tiu ĉi taksо apartenis al joĉjo. – Joĉjo, nun estu reĝo.'

– Via reĝa moŝto, oni parolas, ke vi estas bona knabaĉo, malbertulo, utopiisto, belokululo, danĝera konkuranto, ĉiama akompananto de dinjo, restoraciservanto, ruzulo, netolerebla junulo, knabo, obeemulo, aroganta knabo...

– Ŝia grafidina moŝto bonvolis honoriĝi min je titolo de „restoraciservanto"! Ĉu mi ne eraras? – diris triumfe joĉjo, kiam s-ro Veselov ankoraŭ ne finis la liston.

– Vi ĝuste diris la veron, – diris s-ro Veselov, trarigardinte antaŭe la longan liston de la taksoj. – Via grafidina moŝto, bonvolu ekspedi la reĝan seĝon.

Vigleco, ridoj, laŭtaj laŭdoj al pli spritaj kaj pli ĝustaj taksoj, ankaŭ al ĝusta konjektado de taksintoj ĉiam altiradis al la ludo novajn kaj novajn partoprenantojn. La onklo, kiu gelonge sidis apud grafino Irino kaj konversaciis pri io kunŝi, ankaŭ al komuna ĝojo baldaŭ aliĝis kunsia simpatiulino al la ludantoj. Baldaŭ oni ekvidis lin, kiel decis, ankaŭ sur la honora seĝo. Sed la maljunulo longe, longe ne povis forlasi ĝin, ĉar pro ia kaŭzo li neniel povis konjekti iun el siaj taksantoj. Li koleris, laŭte murmuris, frapis kolereme per sia tabakujo je tablo, sed nenio helpis kaj ĉiam pli ofte kaj pli ofte ŝutiĝis sur lin plej ofendaj, neniam ankoraŭ aŭditaj de li, taksoj, kiuj ne ŝercejam frenezigis lin kaj kiujn li je tiu ĉi fojo devis toleri.

– Via reĝa moŝto, oni parolas, ke vi estas maljunaĉo, mizera, ĉarma homo, pripono, viva ostaro, koleremulo, murmerulo... – Ŝajne, jam je dekа fojo parolis s-ro Veselov, salutante la maljunulon kaj legante ĉiam preskaŭ la samajn sarkasmajn kaj ofendoplenajn taksojn.

– Hm!.. hm!.. – la maljunulo murmuris laŭte, kolereme sulkante la densajn brovojn kaj frapante jen per unu, jen per la alia piedo, aŭskultante s-ron Veselov'on. – Ĉu mi memafere estas „fripono"?.. Permesu!.. Tiamaniere min taksis, mi scias, jen tiu ĉi knabaĉo... junulo en granda ĉapelo... Ne, ne tiu ĉi, sed tiu jen mokeme ridetas je mi... jen li!.. Mi scias nenies nomojn!..

– Ne, via reĝa moŝto, vi eraras, – respondis, apenaŭ sin detenante de rido, s-ro Veselov, informiĝinte en la listo.

– Nu, je dio, tiu ĉi taksо apartenas al tiu jen virino!..

– Supiĉo, supiĉo! – oni kriis. – Oni povas fari nur unu konjekton!.. Li ree eraris, li ree estu taksata!

Kaj ree kaj ree la maljunulo longe devis aŭskulti, kiel „iaj knabaĉoj kaj fraŭlinaĉoj", kiel li parolis, kolerante, supersŭtis lin de ĉiuj flankoj per plej neallogaj alnomoj-taksoj.

Nur kun granda peno kaj post longa tolerado li sukceris forlasi la seĝon, kaj poste ĝis fino nem de la ludo li stampis ĉiun taksaton, kiu ajn li estus, per plej ofendaj nomoj, kvazaŭ vengante al ĉiuj pro longa kaj aroganta mokturmentado de li.

Tamen, sub influo de ĉirkaŭantĉa gajeco kaj ĝoja komuna, li, kontraŭ sia kutimo, je tiu ĉi fojo ne povis longe konservi koleron kaj jam post nelonge parolis sincere al la doktoro:

— Mi miras, kio estas tie ĉi! Nenie aliloke iam mi observis ion similan. Mi sentas, ke mi tie ĉi ne povas eĉ koleri... Ha, se mi estus plijuna almenaŭ je dek jaroj! Mi translogiĝus ien proksime de tie ĉi. Tie ĉi efektive estas vivo, en plena senco de tiu ĉi vorto! Sed nun estas malfrue... mia morto jam estas proksima, mi sentas. Kaj strania afero: nek en la domo, nek en la parko mi tute vidis muŝojn, tiujn ĉi venenantojn de mia vivo, mia bonhumoro! Tamen, eĉ se ili estus tie ĉi, mi kuntrenus tuj pereigus ilin ĉiujn.

La onklo kun joĉjo gastis en Veselovo ĝis semajnon kaj ju pli longe li vivis tie, des pli grandan ravon li sentis. Li ne lasadis grafinon Ĵina'on kaj la doktoron, kiujn li examis de unua renkontiĝo kaj pri kiuj li poste ofte parolis, ke li nenie vidis iam tiajn saĝajn kaj prudentajn homojn.

— Vane. Mi preferus veturi vaporŝipe... — parolis al la onklo la doktoro, kiam li seĝis, ke lia nova amiko intencas reveni hejmen per vagonaro.

— Mi dankas vin... Mi jam ĝuis vojaĝon vaporŝipe unufoje, veturante ĉi tien kaj mi promesis, ke mi plu neniam vojaĝos tiamaniere.

Kaj la onklo detale rakontis al la doktoro la okazintaĵon en la manĝoĉambro de la vaporŝipo, kiu difektis lian bonhumoron por longa tempo.

— Jes, vi estas prava! En vagonaro ne povas okazi al vi simila malagrablaĵo, ĉar en niaj vagonaroj ankoraŭ ne estas manĝoĉambroj, tamen tie vi povas submetiĝi al aliaj, eble, pli neatenditaj surprizoj. Unu mia bona konato iam antaŭ longe unufoje entreprenis vojaĝon en vagonaro kaj tiu ĉi unua provo por longe forprenis de li ĉian deziron vojaĝi tiamaniere.

La konversacio okazis en la biblioteko, kie ĉiam ĉeestis iu el legemulaj aŭ aliaj seriozaj gastoj de la domo, kiujn povis deloĝi nek gajaj ludoj en societo de ĉarmaj knabinoj ie en la parko aŭ sur la rivero, nek beleco mirinda de la ĉirkaŭaĵoj. Ĉiuj tie estintaj, forlasinte sian okupon, fiksis siajn rigardojn al la doktoro, kiu sciis rakonti interese kaj bele. La doktoro, ekridetinte je ilia preteco al aŭskultado, daŭrigis:

— Mi, estimataj sinjoroj, estas nordano. Mi naskiĝis kaj pasigis mian plej bonan aĝon-junecon en norda, malvarma gubernio de Arĥangelsk. Kiel vi scias, tiu ĉi gubernio estas tiom vasta, ke en ĝi facile enspaciĝus tri-kvar regnoj de okcidenta Eŭropo. Nu! Bonege... Ĝuste en tiu tempo, al kiu rilatas mia rakonto, oni aranĝis unuan kaj solan ĝis nun en tiu regiono fervojon de Arĥangelsk ĝis Vologda, kiu kuniĝis tiamaniere nian (la) plej nordan urbon kun Moskvo. Tiu ĉi, ankoraŭ de plimulto de (de ili) loĝantaro, neniam vidita mirindaĵo estis komence renkontita kun malkofido

kaj longan tempon post aranĝo de la fervojo multaj ĉi inteligentaj niaj homoj preferis vojaĝi moze majorum, kiel parolis antikvuloj-romanoj, tio-estas en glitveturilo kun enjunyitaj ĉevaloj, aŭ cervoj, aŭ eĉ hundoj... Ilnufoje, jam post nekunujara funkciado de la fervojo, en la kapon de mia konato venis penso esprovi la novan manieron de transveturado, en Jaroslavl li havis ian rurĝan aferon. Li estis, mi devas sciigi vin, dikulo, posedinta la ventro de tre solida amplekso kaj havinta tute neniun ideon pri fervojo ĝenerale kaj pri ĝiaj moroj kaj ordoj. En tiu ĉi rilato li estis tute neinformita, kiel ia kvinjara knabo... Bonstate, post kelktaga vojaĝo en glitveturilo, li, fine, atingis ian stacion, pli proksiman de li, kaj kun premegita koro envagoniĝis. Nu! Bonege!.. Feliĉe aŭ malfeliĉe, vi ĉi mem tion vidos, li trafis en tute malplenan vagonon. Tamen antaŭ forveturo mem de la vagonaro en la vagonon eniris tri ĉifonvestitaj personoj, kiuj sengene tuj okupis benkojn kaj sin fordonis al dormo. En najbareco kun ili mia konato tute senmalhelpe traveturis jam kelkajn staciojn, kiam subite pordo de la vagono malfermiĝis, aperis konduktoro kun lanterno en la mano (la afero okazis nokte), ekpuŝis per la mano libera unu kuŝinton kaj, laŭtege ekkriinte: „Kontrolisto!..” foriris. Mia bona konato rigardas siajn najbarojn kaj miras: ili tuj forlasis siajn benkojn kaj sin kaŝis sub la benkoj. „Kion signifas tiu ĉi averto de la konduktoro? Kial la najbaroj forlasis siajn #lokojn kaj sin kaŝis sur la malpura planko sub la benkoj? Kion fari? Ĉu resti sur la loko, ĉu sekvi ilian ekzemplon?..”- li pensas, rigardante ĉirkaŭe kaj serĉante per la okuloj iun, kiu povus doni al li konsilon.„ Se mi restos sidante, mi timas, ke al mi okazos ia malagrablaĵo... Videble, la personoj, sin kaŝintaj estas spertaj homoj kaj konas ordojn fervojajn... Se ili sin kaŝis, sekve tiel oni devas agi pro iaj nekompreneblaj por mi-nespertulo-kaŭzoj...” -li daŭrigis pensi, tremante pro la maltrankviliĝo kaj ia malbona antaŭsento.„Nu, estu, kio estos!.. Malbenita fervojo, malbenitaj ordoj stultaj!.. Sinjoro, benu min pekulon!...”- li eksplustris, farante kruccosignon kaj etendiĝis sur la planko malpura, malbonodora, penante sin kaŝi ankaŭ sub la benko. Malbenante ĉion en la mondo ankaŭ tiun horon, kiam je unua fojo en lian kapon venis penso pri la vojaĝo en vagonaro, mia bona konato enŝovis la kapon en mallumon, rezistan sub la benko. Post la kapo sekvis sur la novan kuŝejon la korpo, sed la benko estis aranĝita tiel malalte super la planko, ke lia ventro tute ne permesis plu fari ian plej malgrandan moron, malgraŭ liaj penoj. La stato de mia bona konato ankoraŭ plimalboniĝis pro tio, ke en tiu sama momento la pordo malfermiĝis kun bruego kaj eniris kelkaj homoj. Spasme spirante pro malbonodoro kaj ia timo nekompreneble li ŝovis siajn ŝultrojn jen tien, jen reen, sed nun jam io malhelpis eĉ eltiri reen la kapon. Ni ne povas diri, ĉu longe kuŝus tie senhelpe mia bona konato, se la homoj enirintaj (ili estis kontrolisto kaj du konduktoroj) ne falpuŝiĝus je liaj piedoj kaj haltus. „Haltu! Tie

ĉi estas io suspektinda... Jen estas iespiedoj!"– diris unu konduktoro, lumigante per lanterno ruŝantan mian bonan konaton. „Tiu lin priponon, tiu lin sentaŭgulon je la piedoj!"– ordonis la kontrolisto. La konduktoroj obeis kaj baldaŭ antaŭ la kontrolisto staris malpuriĝita, konfuzita kaj tremanta figuro de la dikulo. „Vian bileton!.."– severe ekkriis la kontrolisto, senĝene, senkompate sxuante la malfeliĉulon je la ŝultro. „Montru vian bileton!.." Mia bona konato, anxoraŭ nenion xomprenante, elprenis la bileton el poŝo kaj enmanigis ĝin al la kontrolisto. Tiu ĉe lumo de lanterno atente esploris la bileton kaj, redonante ĝin al la dikulo, demandis: „Ĉu kien veturas?" „En Jaroslavl'on..." „Por kio vi, havante bileton, kaŝiĝis sub la benxon?" „Pardonu, sinjoro!"– jam pli kuraĝe respondis tiu,– „Mi neniam antaŭe eĉ vidis fervojon, mi neniam veturis en vagonaro kaj tute ne konas ordojn fervojajn... Mi sidis jen tie ĉi, subite la pordo malfermiĝas, aperas unu tia sinjoro"– li daŭrigis, montrante per la mano konduktoron:– „La sinjoro nekonata, mi vidas, ekpuŝis per la mano unu homon, kiu kuŝis najbare sur benxo kaj, ekkriinte „Kontrolisto!" foriris. Mia najbaro tuj sin kaŝis sub benxoj kaj mi post longa hezitado decidis sekvi ilian ekzemplon... Mi tute ne konas ordojn..." La kontrolisto ekridis kaj jam plu ne aŭskultis lin. Kliniĝinte, li tuj trovis la senbiletulojn, kiuj antaŭe interkonsentis kun unu konduktoro, ke li avertu ilin antaŭ apero de la danĝera ebla. „Tiu ilin, tiu ilin sentaŭgulojn, priponojn je la piedoj!..."– la kontrolisto laŭte ordonis al la konduktoroj..."

La disiĝo estis kortuŝa. Olnjo, s-ro Veselov, la doktoro kaj kelkaj gastoj akompanis joĝjon kun la onklo ĝis la stacidomo. Dum la onklo senzorge ŝercis kaj interŝanĝis kun la akompanantoj bagatelajn frazojn, la gejunuloj iris malantaŭe de ili je la mano, malgaje mallevinte la kapojn kaj flustris:

— Sed kiel okazis ĉio tio ĉi?.. Kial vi nenion diris al mi pli frue?– flustris joĝjo.

— Financaj aferoj de la paĉjo delonge jam estas en malbona stato kaj liaj elspezoj ĉiam superas enspezojn. Vi vidas, kiom da gastoj ni havas ĉiutage... Sio ĉi postulas ja...

— Sed tian ordon, tian kutimon en via domo, vi povus facile ŝanĝi...

— La patro ne povas... li tre ŝatas gejunularon. Krom tio, li parolas, ke, senĝene je ĉiama apudesto de gejunuloj, li nepre prenez... mortos...

— Sed kiam okazis tia ŝanĝo en la leŭtenanto?..

— Jus li forlasis militservon kaj ricevis grandan kapitalon post ia mortinta onklo... Li tuj venis al ni kaj ree faris al mi serioza edziĝoproponon, promesante tuj pagi parton de niaj ŝuldoj, en kontraŭa okazo li minacis... Kaj lia minaco ĉion pereigis! Se li minacus, ĉu li permesus al si minaci al mi... al ni?.. Mi tie ĉi naskiĝis, mi tie ĉi pasigis la infanjarojn, tiom da zemeroj estas kun–

ligitaj kun ĉiu loko, ĉiu arbo, ke, mi scias, nenie en la mondo mi renkontos plu ion similan al nia parko, al nia domo... al nia kara, parenca, nekomparebla - bela kaj ĉarma Veselovo!.. Sed mi ankaŭ ne povas preferi tian honon, mi ne povas kordoni al li min, mian feliĉon nur pro tio, ke li nun estas riĉulo, ke li povas realigi siajn minacojn...

— Kaj kion?.. Kion vi decidis?.. Kia sorto antendas nun Veselovo'n, vin?..

— Baldaŭ la tuta bieno fariĝos lia proprajo kaj mi devos forlasi ĝin por ĉiam...

— Kiel? Ĉu tio ĉi estas ebla?..— laŭte ekkriis Jeĉjo kaj larmoj aperis sur liaj okuloj.

Eksonis unua sonorilbruo. La onklo returniĝis kaj rimarkinte ploremon, emocian mienon, ripoĉe - mokeme okulsignis al li.

— Ĉu ni disiĝas por ĉiam?..— flustris Jeĉjo, premante la manon de la knabino, kiu ŝajnis nun tia malfeliĉa, senhelpa kaj ĉarma.— Ĉu mi neniam plu vidos vin, vian patron?..

— Ne, ne!..— aperaŭ audeble eksflustris la knabino.— Ne ĉio ankoraŭ estas perdita... Aŭtune ni transloĝiĝos en la sudon... Mia fianĉo... estas sufiĉe riĉa por... For la pensojn malgajajn! Ni restu bonaj amikoj!..

Jeĉjo estis tiom surprizita de ĉio ĵus aŭdita, precipe de la lasta sciigo, ke li perdis kapablecon ion konsideri, li nur sentis, ke li subite por ĉiam perdis en la mondo ĉion, kion li ŝatis, kion li amis. Kiam eksonis la dua sonorilbruo, la gemastroj lastfoje expremis la manojn de la gastoj kaj la mano de Jeĉjo longe restis kunpremita en la maneto de la knabino. En ŝiaj okuloj ankaŭ brilis larmoj.

— Adiaŭ!..— diris la onklo, farante lastan, adiaŭan eksvingon per la ĉapelo, kiun li tenis en la mano.— Jeĉjo, lasst uns gehen! Vi ne trafos en la vagonaron... He, ili ambaŭ ploras!..— li aldonis duonziproĉe - duonŝerce.— Nu, kisu la knabinon kaj allons, kiel parolas nia bona doktoro.

La lipoj de la gejunuloj, kvazaŭ obeante al tiu ĉi subita ordono, kuniĝis en unu daŭra, varma kiso.

Eksonis la tria sonorilbruo. Jeĉjo kun la onklo apenaŭ havis tempon por ensalti en vagonon kaj la vagonaro ekmoviĝis. Jeĉjo kliniĝis tra fenestro malfermita kaj ekrigardis la stacidomon. S-ro Veselov kaj la doktoro svingis ankoraŭ per siaj ĉapeloj, Olnjo konvulsie ploris, almetinte al la vizaĝo blankan nazotukon. Ankoraŭ unu momento kaj ĉio malaperis el la okuloj de Jeĉjo.

— Hm!..— parolis la onklo, kiam ili sidiĝis en la vagono.— Vi jam estas preta plori, kiel knabinaĉo... Hm!.. hm!.. Cetere mi komprenas... Ĉu vi scias? Ni plijuniĝis dum tiu ĉi semajno almenaŭ je dek jaroj!..

— Kaj mi... kaj mi plimalgajniĝis je la sama nombro de jaroj.— malgaje, aperaŭ audeble, eksflustris respondis Jeĉjo.

—Das ist absurd!- diris la onklo, kiu heredis de sia nova amiko – la doktoro emon ŝmetadi alilingvajn frazojn en sian rusan kaj esperantan parolon. – Ĉu vi scias, kia ideo neordinara venis subite en mian kapon?.. La tutan someron ventan mi pasigos kun vi en Veselovo!.. Oni ja volonte cedos por mi vian ĉambron kaj por ĉio mi pagos, kompreneble...

– Ne, ni ne ĝuos plu tian feliĉon... – interrompis lian revadon la nevo.

– Kial?.. Kion vi parolas?.. – severe sulkante la brovojn demandis la onklo.

Kaj ĵetĝo malrapidis al la onklo la sekreton, kiun sciigis al li la knabino.

La onklo subite kuntiriĝis, malleviš la kapon kaj enpensiĝis. Dum la tuta vojo li plu eldiris jam neniun vorton.

XLII.

Post dekkvin jaroj.

Ĵetĝo antaŭ dek jaroj edziĝis je knabino, kiun li elektis kun konsento kaj aprobo de la gepatroj kaj pastriĝis. Nun li estis patro Josefo, en kiu neniu rekonus jam nun antaŭan knabon-ĵetĝon. Longaj densaj haroj kovris nun lian kapon, granda barbo malsupreniĝis ĝis la brusto.

Estis vintro. Patro Josefo revenis hejmen fervoje el sia nasriĝloko, kien li veturis kun sia filineto plej malĝuna - orfjara knabino ĉarmeta Nanjo – por viziti siajn malĝunajn gepatrojn. Nelga ventego de la mateno mem furioze ĝemkriis ekstere kaj superŝutis per grandaj molaj neĝaflokoj ĉion, kion ĝi renkontis sur sia vojo. Multe superis de ĝi ankaŭ la fervojo. Reloj, tiuj superŝutataj de la ventego, fusoni liberigis ilin de neĝo, ofte estis tute nerimarkeblaj meze de neĝkampoj kaj kuŝis profunde sub dika neĝotavolo. Pro tio vagonaroj funkciis neakurate kaj kun granda malfruiĝado, iafoje ili eĉ tute haltis meze de la vojo, ne havante fortojn venki la malhelpon de la naturo. Ĵuste la sama okazis al la vagonaro, en kiu sin veturis patro Josefo. Kun malfacileco la vagonaro noxte atingis ian malgrandan stacion, la vojo ĝis kiu kuŝis plej ofte tra arbaroj, pro kio la vojo malpli superis de la ventego. Sed fine la vagonaro forlasis la stacion kaj aperis meze de vasta neĝokampo, ĝi ne havis fortojn longe batali kontraŭ neĝo kaj, senfortiĝinte, haltis je kelkaj verstoj de la stacio.

La halto subita de la vagonaro meze de la neĝkampo ekmaltrankviligis veturantojn, sed ili baldaŭ sciiĝis, ke nenio danĝera okazis, ke oni tuj postulos helpolokomotivon kun neĝforigilo kaj la vagonaro senmalhelpe daŭrigos la vojon.

Apud enirpordoj de la vagonoj kaj sur ŝtuparoj amasiĝis scivoluloj, kelkaj el ili eĉ malsupreniĝis kaj marŝis apud la vagonaro tra profunda neĝo, kiu, kiel sablo, facile dissutiĝis sub la piedoj. Patro Josefo ankaŭ malsupreniĝis kaj, rašante si-

an vizaĝon en mola pela kolumo, malrapide eliris laŭlonge de la vagonaro. La ventego blovis kun neordinara furiozeco kaj, kvazaŭ ĝojante, ke ĝi jam sukcesis haltigi la vagonaron, sin amuzis je ĝi, penante supersŭti ĝin, - la radoj estis jam duone kaŝitaj en la neĝo. De vagonplacetoj kaj ŝtuparoj aŭdiĝis vigla parolado, iakoje insultajoj, kaj ridoj.

— Permesu, permesu, karuloj... Kial vi haltis en la pordoj? - kriis ia maljunulino.

— Kien vi rapidas kun via sako?.. Kial vi puŝiĝas?.. - aŭdiĝis respondo maldelikata vira voĉo.

— Kien?.. Kien mi devas!.. Ĉu vi ne vidas, la vagonaro haltis? Mi dormis kaj ne aŭdis, kiel ĝi haltis... Se mi ne vekiĝus, oni forveturigus min, Dio scias kien... - la maljunulino parolis, dispuŝante scivolulojn starintajn.

— Revenu, malsaĝa virino! Revenu!.. - ŝin admonis, ies voĉo laŭta. - Sidu sur via loko, kien vin pelas malpura spirito? Ĉu vi ne vidas, ke la vagonaro haltis meze de kampo?..

— Ne trompu! Ĉu vagonaroj haltas iam meze de kampo?.. Tie estas la stacidomo, mi scias... - kaj la maljunulino, kun sia sako ŝarĝoplena, ĝemante, malsupreniĝis, akompanata de mokrido de scivoluloj, starintaj apude.

De placeto de unu vagono de dua klaso aŭdiĝis gaja detenata virina rido kaj murmureta, malkontenta voĉo de viro.

— Ha, kiel interese!.. Tia ventego terura estas ĉirkaŭe kaj neniom estas timige... - patro Joseĉo klare aŭdis tra ĝemplovo de la ventego agrablan voĉon de juna virino. - Mi malsupreniĝu, karulino...

— Olnjo, vi malvarmumos!.. Revenu en la vagonon!

— Mi tuj revenos, Glebĉjo!.. Ne maltrankviliĝu, mi petas, reiru, reiru, mi tuj... Ha, kiel estas interese!.. Unufoje, mi memoras... Tio ĉi estis antaŭ longe, mi tiam estis ankoraŭ fraŭlino. Vintre ni entreprenis dum Kristnasko maskvojaĝon... Ha-a! - ŝi ekkriis subite. - Mi perdis mian muf on, ĝi falis!.. Jen estas malfeliĉaĵo...

Samtempe patro Joseĉo rimarkis, kiel al liaj piedoj falis ia nigra objekto. Li tuj klinis la muf on kaj donis ĝin al la virino, kiu hezite haltis sur vagonŝtuparo.

— Mi dankas vin, bona homo!.. - ŝi gaje ekridis, prenante el liaj manoj la muf on. — Kun estas tiel mallume, ke mi tute ne vidas, kiu vi estas.

La gaja voĉo de la virino ŝajnis al la pastro ial konata, vekanta en lia animo ion malproksiman, duonforgesitan kaj karan. Li kuraĝe supreniĝis post la virino kaj, forminte post si la pordon, haltis sur la vagonplaceto. Ĉe lumo de lanterno li ekvidis du virinajn figurojn. Unu estis meznreĝa, sufiĉe juna virino mode vestita je velura fela palto kaj modesta felĉapelo, la alia estis pli maljuna kaj ŝia vestaĵo kaj aspekto montris, ke ŝi estis servistino. La virinoj tute ne rimarkis la nove venintan kaj

daŭrigis sian interparolon. La unua, sin apogante per la dorso je muro de la vagono, koketeme ŝirmante de tempo al tempo sian bolan kaj gajan vizaĝon per eleganta ventumilo, ion rakontis. La dua fikse rigardis ŝin kun serioza mieno.

— Vi, sinjorino, kiel estis maskita? - ŝi demandis.

— Mi?.. Mi estis pastredzino vilaĝa... Ha, kiel estis gaje!.. Sed dum la vojaĝo miaj okuloj devojiĝis, ne longe, longe vagis sen ĉia signo de vojo... La ventego furiozigis, ĝuste, kiel nun, kaj, prezentu al vi nian surprizon, ni falis kune kun la ĉevaloj kaj la glitveturilo...

— Olnjo!.. Eniru, mi petas, vi povas sen malhelpo interparoli interne de la vagono, — ne ekaŭdiĝis maltrankvila voĉo vira el malfermita pordo de la vagono.

— Pardonu, sinjorino, mi interrompos viajn rememorojn agrablajn, - subite ekparolis la pastro, farinte kelkajn paŝojn antaŭen kaj haltante antaŭ la sinjorino mirigita, - ŝajne, ni estas konataj, ĉu vi rekonas min? - li aldonis, riverencante al ŝi.

La sinjorino konfuziĝis, ekrigardis la haroričan vizaĝon de la pastro, ŝirmis per la mupo sian vizaĝon kaj, nee ekskuinte per la kapo, respondis:

— Ne!.. Eble, vi eraras...

— Ne, mi ne eraras! Nun mi tute rekonas vin, - la pastro respondis. — Ĉu vi estas Olnjo... Veselov?..

— Jes, mi efektive iam estis fraŭlino Veselov kaj nun mi estas sinjorino... Sed kiamaniere vi konas min? Kiu vi estas?.. - larĝe malfermante la okulojn, demandis la sinjorino, trarigardante la trudemulon.

— Ĉu vi memoras ankoraŭ... Josefĉjon, vian amikon iaman?.

— Josefĉjo!.. - ĝoje ekkriis la sinjorino, sin jetante al la pastro. - Ĉu vi estas?.. Se vi ne dirus tion ĉi, mi neniam rekonus vin... sed nun viaj okuloj kaj via voĉo!.. Ni iru en la vagonon! La edzo delonge maltrankviliĝas pri mi...

Kaj kaptinte la pastron je la mano, ŝi rapideme ekpaŝis.

— Glebĉjo, Glebĉjo! - ŝi ekkriis, enirante en la kupeon. - Rigardu, kiun mi alkonduis!.. Sed vi ne konas lin... Kiel mi ĝojas, kiel mi ĝojas!

De kanapo leviĝis altkreska, dormema sinjoro en civila uniformo kaj, ankoraŭ nenion komprenante, longe rigardis jen la vizaĝon entuziasman de la edzino, jen la haroričan pastron.

— Kiun mi renkontis, Dio mia, kiun mi renkontis! - ŝi laŭtvoĉe parolis, malfacile spirante pro emocio. - Sidiĝu, Josefĉjo! Ni nomu unu la alian, kiel antaŭe! Glebĉjo, tiu ĉi pastro estas mia malnova amiko, tiu Josefĉjo, pri kiu mi ofte rakontis al vi.

La viroj silente premis unu al la alia la manojn.

Tuta horon la malnovaj amikoj pasigis en sincera konversacio. Subite me-

ze de ĝembreado de la ventego ekaŭdiĝis laŭta bas-tona fajfo, post kio baldaŭ ĉiuj
idintoj eksentis ekpuŝon facilan de la vagono.

— Gloro al Dio! - diris la edzo de Olnjo, - fine venis de iĉ nia savanto - helplokomotivo.

Post iom da tempo zee ekfajfis base la noveveninta lokomotivo, responde al ĝi ekfajf-
is ankaŭ la malfortiĝinta raj la vagono ricevis ekpuŝon malantaŭen. Poste zee sekvis
en la sama ordo la fajfoj mallongaj raj la vagonaro estis forte ekpuŝita antaŭen,
tamen ĝi restis sur la sama loko.

— Nun observu viajn nuxojn!... - gaje ridante, diris la edzo de Olnjo. - La lokomo-
tivoj, šajne, ĉiam pli forte raj pli forte puŝados la vagonaron antaŭen kaj malan-
taŭen por liberigi la radojn de la vagonoj de neĝo, en kiun ili eniĝis profunde, nur ...

Li ne finis la frazon, kiam novaj ekfajfoj mallongaj tratranĉis ploregon de la
ventego kaj la vagonaro subite estis tiel forte antaŭenpuŝita, ke li perdis ekvilibron
raj falis sur la kanapon. Olnjo kaj la pastro longe ridis simplanime je tiu ĉi neaten-
dita falo de la avertinto mem.

Nun la ekfajfoj ĉ kaj ekpuŝoj tien kaj reen sekvis pli intense kaj preskaŭ seninter-
rompe kaj jam neniu povis stari sur la piedoj senpune. La vagonaro jam ne rest-
is ĉiam sur la sama loko, kiel antaŭe, sed, obeante al la forte puŝanta ĝin, ĉiam ru-
liĝis je pli granda raj pli granda spaco, subpremante la neĝon sub la radoj raj
post nelonga tempo la ambaŭ lokomotivoj, interkonsentinte per daŭra fajfo kaj
kolektinte ĉiujn fortojn, kiujn ili havis, expuŝis la vagonaron antaŭen kaj, jam
ne permesante al ĝi halti, ĉiam pligrandigante sian energion, triumfe forte-
ris la vagonaron de la loko kaj malgraŭ, šajne, plifortiĝinta furiozeco de la vent-
ego, al kiu ne plaĉis tia neatendita venko de homo, flugrapide ekruliĝis antaŭ-
en, disĵetante per la neĝforigilo neĝamasojn, kiujn jam jetis la ventego sur la ze-
lojn, antaŭ nelonge liberigitajn de ĝi. Vizaĝoj de ĉiuj veturintoj pliserenigis. Ree
en ĉiuj anguloj de la vagonoj ekaŭdiĝis vigla babilado, antaŭlonge jam interrom-
pita de la longedaŭra puŝado de la vagonaro.

— Nu, rakontu antoraŭ iom pri vi, - diris Olnjo, pli oportune sidiĝante en angulo de
la mola kanapo kaj ne deturnante de ĵetjo ĉiama sian ĝojan rigardon. - Nu, kiel vi
kun partas?.. Ĉu vi estas edziĝinta?.. Ha, kian absurdon mi demandas, mi tute for-
gesis, ke oni, pli frue ol pastriĝi, devas edziĝi! Ĉu mia profetajo plenumiĝis? Ĉu via
edzino estas dikulino - seppudulino?.. - kaj forkaŝi sian subitan konfuziĝon de la de-
mando, kiu nun jam šajnis al ŝi nekonvena, ŝi aldonis: - Ĉu vi havas infanojn?

— Vi eraris... - ekridis patro Josefo. - Mia Manjo estas maldikulino...

— Kaj la infanoj? Ĉu vi havas ilin?

— Mi havas tri filinojn. La plej maljuna - Manjo veturas nun kun mi en la vagonaro,
ŝi dormas nun...

– Al vin ŝi estas simila?.. Diris al mi, mi petas.

– Ŝi, ankaŭ ŝiaj fratinoj, similas al mi, - memkontente diris la pastro, kaj ekbrilinte per la okuloj.

– Tio ĉi estas bona!.. Oni parolas, ke filoj devas esti nepre similaj al sia patrino kaj filinoj, kontraŭe, por esti ĉeliĉaj, devas esti similaj al patro... Jen, vi povas konvinkiĝi je vereco de tio ĉi je mi mem. Mi estas simila, kiel vi scias, al la patrino...

– Kaj ĉu vi estas malfeliĉa?..

– Jes, jes!... - ŝi diris malaŭte kaj poste, por klariĝi la aferon, ŝi aldonis: - mi ne havas infanojn!

– Sed, eble... - la pastro intencis iondiri, sed ŝi tuj interrompis lin kaj daŭrigis kun rimarkebla, ĉiam pligrandiĝanta ardo:

– Plue, mi perdis tiel neatendite la patrinon amatan... Mi jam parolis, ke li estis dujaroj sin pasmortigis... Tiu,... nia Veseloro... Ĉu vi, Joseĉjo, memoras ĝin? Ĉu vi memoras la parkon vastegan, ĝardenojn?.. Ĉio pereis, restis nenia rememoro pri ili! Nun mi ĝuste revenas kun la edzo de tie. Imagu... oni, eksleŭtenanto Sergejo, kiu aĉetis la bienon, senkompate forhakis ĉiujn arbojn por hejtilo, gvidata de lij maldelikata profitemo... Ni, forveturante el la iama bieno, petis lin, ke li konservu en la domo nian meblaron antikvan kaj ĉefe la bibliotekon de la patro, sed... sed, kara mia Joseĉjo, imagu mian malĝojon: mi en la tuta domo trovis nenion pli-malpli valoran... Kia sendanka, monavida laktofrateto ĉion vendis al rubaj antikvaĵistoj! Kaj kia aroganta, malĝentila lifariĝis dum tiuj ĉi lastaj jaroj!.. Nun li sin praviĝas ankoraŭ kaj kuraĝas deklari, ke li rajtis fari tion, ke ni... tio-estas mi kaj la patro mortinta...: ke ni trompis lin, ne plenuminte iajn niajn promesdevojn fiktivajn!... – Olnjo per tuko forviŝis larmojn de la okuloj.

– Jes, mi estas vere malfeliĉulino! - ŝi aldonis flustre kaj per gesto apenaŭ kaptita de sia mano montris mistere la edzon, kiu dolĉe dormis sur kanapo ronkraŭa.

Joĉjo ne kuraĝis malkvietigi ian novan sekretan vundon de Olnjo, kiun ŝi tus aludis kaj, dezirante forturni de ĝi atenton de la malfeliĉulino, demandis ŝin, ridetante:

– Kaj Sonjo?.. Ĉu vi scias ion pri ŝi?..

– Sonjo?.. – ŝi ripetis kaj ĉarma rideto antaŭa lumigis ŝian vizaĝon. – Sonjo estas plifeliĉa... Ŝi estas, ne miru, pastredzino! Ŝia edzo estas ĉarma homo! Li nun estas milita preposto en Jalta... Dum la printempo pasinta mi gastis ĉe li. Li loĝas en aparta bela vilao sur bordo de la maro mem kaj ĝuas veran feliĉon familian. Ŝi nun fariĝis, ŝajne, ankoraŭ pli bela, ol antaŭe kaj estas tia dikulino... ridinda! Ankaŭ ŝiaj gepiloj, kiujn ŝi adoras, estas rimarkinde belaj kaj diketaj

kreitajoj:! Sed kio estas pli grava, ŝi ne parlas Esperanton ĝis nun. Ŝia edzo estas supiĉe sperta samideano kaj ilia ĝefilo pepas en la lingvo, kiel en sia patrujo...
— Ĉu vi baldaŭ finos viajn babiladon? — eksaŭdiĝis kolerema murmurado de la dzo de Olnjo, kiu turniĝis sur alian flankon.

La amikoj forte eksremis unu al la alia la manojn kaj, plenaj de novaj impresoj, disiĝis. Ĉu jam por ĉiam?..

Fino.

Enhavo:

		Paĝoj.
	Antaŭparolo.	2.
I.	Juna paca bataliano.	5.
II.	La onklo.	11.
III.	Agrabla novaĵo.	16.
IV.	Unua paŝo.	22.
V.	Novaj konatuloj.	25.
VI.	La lutenanto.	30.
VII.	Antaŭ kelkaj jaroj.	34.
VIII.	Daŭrigo de la antaŭa.	40.
IX.	La malamiko.	49.
X.	Inter amikoj.	54.
XI.	Ĉu en sonĝo?	61.
XII.	Akcidento.	67.
XIII.	Pluaj detaloj.	70.
XIV.	Konvenaj konsiloj.	73.
XV.	Antaŭfestaj preparoj.	77.
XVI.	Homo bojanta.	86.
XVII.	Leciono de propraj nomoj.	90.
XVIII.	El la tagliBro.	94.
XIX.	Pluaj paĝoj de la tagliBro.	100.
XX.	La ostaro.	105.
XXI.	La unua maskvojaĝo.	108.
XXII.	Unu sceneto el nova maskvojaĝo.	116.
XXIII.	La unua „flano“.	118.
XXIV.	El la pasintaĝo.	121.
XXV.	Malĝoja sciigo.	127.
XXVI.	La sekreto.	131.

XXVII. Dio tute forgesitaj rovertoj. 135.
XXVIII. Testoj. 138.
XXIX. Aventuroj. 143.
XXX. Oinjo ne eraris. 148.
XXXI. Disiĝo. 150.
XXXII. Reverno malagrablajo. 154.
XXXIII. El lataglibro. 157.
XXXIV. Kompenso. 162.
XXXV. Neatendita proxrasto. 168.
XXXVI Hejmen! 170.
XXXVII. Hejme. 175.
XXXVIII. Surprizo. 181.
XXXIX. Nova protektanto. 184.
XL. Tien kaj tie. 188.
XLI. Lastfoje. 204.
XLII. Post dekkvin jaroj. 212.

Buchbinderei
KARL HOFFMANN
n XII.,
Gatterholzgasse 17
Tel 83-10-929